

eLIBRO


Boleslaw Prus

La faraono

Tria libro



I N K O



Boleslaw Prus
LA FARAONO 3
El la pola tradukis Kabe

eLIBRO

Arangis: Franko Luin

ISBN 91-7303-118-6

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

SEPTEMBRO 2001

ĈAPITRO UNUA

Ĉu la profetoj de la subtera templo de Sfinkso vidis la novan monarĥon de Egipto apud la piramidoj, ĉu ili sciigis tion al la reĝa palaco kaj kiel? oni ne scias. Sed kiam Ramzes estis proksimiĝanta al la rivero, la respektinda ĉefpastro Herhor ordonis vekti la palacajn servistojn, kaj kiam la sinjoro estis sur Nilo, ĉiuj pastroj, generaloj kaj civilaj altranguloj jam kolektiĝis en la granda salono.

Ĉe la leviĝo de la suno Ramzes en la fronto de la malgranda taĉmento enrajdis en la palacan korton, kie la servistoj falis antaŭ li sur la vizaĝojn, kaj la gvardio levis la glavojn ĉe sono de trumpetoj kaj tamburoj.

Salutinte la armeon, lia sankteco iris en la banejon kaj banis sin en parfumita akvo. Poste li permesis ordigi siajn diajn harojn; kiam la frizisto demandis lin plej humile, ĉu li ordonas razi la kapon kaj barbon, la estro respondis:

—Superflue. Mi ne estas pastro, sed soldato.

Post momento ĉi tiuj vortoj transiris en la aŭdiencan salonon, post unu horo trakuris la palacon, tagmeze ili jam estis disportitaj en la tuta Memfiso, kaj vespere estis jam konataj en ĉiuj temploj de la ŝtato, de Tami-nhor kaj Sabne-Ĥetam norde ĝis Suunu kaj Pilak sude.

Aŭdante la novaĵon, la nomarĥoj, nobeloj, soldatoj, popolo kaj eksterlanduloj freneziĝis de ĝojo, sed la sankta pastraro tiom pli fervore funebris la mortintan faraonon.

Elirinte el la banejo, lia sankteco surmetis mallongan ĉemizon kun nigraj kaj flavaj strioj, sur ĝin flavan brustŝirmilon, sur la piedojn sandalojn, ligitajn per rimenoj, kaj sur la kapon kaskon kun pinto. Poste li alligis ŝtalan asirian glavon, kiun li portis en la batalo apud Sodaj Lagoj, kaj ĉirkaŭita de granda sekvantaro de generaloj, kun bruo kaj tinto eniris en la aŭdiencan salonon.

Tie iris renkonte al li la ĉefpastro Herhor, akompanata de la sanktaj ĉefpastroj Sem, Mefres kaj aliaj. Ilin sekvis: la grandaj juĝistoj de Memfiso kaj Teboj, dekelko da najbaraj nomarĥoj, granda kasisto, kaj la superaj intendantoj de la domoj: de greno, brutoj, vestoj, sklavoĵoj, oro kaj arĝento, kaj multaj aliaj altranguloj.

Herhor sin klinis antaŭ Ramzes kaj diris kortuŝita:

—Sinjoro! Al eterne vivanta via patro plaĉis foriri al la dioj, kie li ĝuas la eternan feliĉon. Sur vin hodiaŭ falas la devo zorgi pri la nia ŝtato. Saluton do al vi, sinjoro kaj estro de la mondo, kaj vivu eterne lia sankteco la faraono Ĥam-sam-mereramen-Ramesses-neter-hog-an!...

La ĉeestantoj kun entuziasmo ripetis la ekkrion. Oni supozis, ke la nova estro montros emocion aŭ embarason. Sed je ĝenerala mirego, la sinjoro nur sulkigis la brovojn kaj respondis:

—Konforme al la volo de mia patro kaj al la leĝoj de Egipto mi prenas en miajn manojn la regadon kaj mi estos por la gloro de la ŝtato kaj por la feliĉo de la popolo ...

Subite la sinjoro sin turnis al Herhor kaj fikse rigardante liajn okulojn, demandis:

—Sur la tiaro de via ekscelenco mi vidas la oran serpenton. Kial vi surmetis la simbolon de la reĝa povo?

Morta silento ekregis en la kunveno. La plej maltima homo en Egipto supozus neniam, ke la juna sinjoro komencos la regadon per tia demando al la plej potenca persono en la tuta regno, eble pli potenca ol la mortinta faraono.

Sed post la juna sinjoro staris dekkelko da generaloj, en la korto brilis la sentimaj regimentoj de la gvardio, kaj Nilon jam estis transiranta la armeo de Sodaj Lagoj, ebria de la triumfo, amanta sian ĉefon.

La potenca Herhor paliĝis kiel vakso kaj ne povis eligi voĉon el la kunpremita laringo.

—Mi demandis vian eksceleccon — trankvile ripetis la faraono — je kia rajto sur via tiaro estas la reĝa serpento?

—Tio estas la tiaro de via avo, la sankta Amenhotep — mallaŭte respondis Herhor. — La plej alta kolegio ordonis al mi surmeti ĝin en gravaj cirkonstancoj.

—Mia sankta avo — diris la faraono — estis patro de la reĝino kaj kiel favoron li ricevis la rajton ornami sian tiaron per la ureuso. Sed, kiel mi scias, lia ceremonia vesto troviĝas inter la relikvoj de la templo de Amon.

Herhor jam ekregis sin mem.

—Bonvolu rememori, via sankteco — klarigis li — ke la tutan tagon Egipto restis sen estro. Iu ja devis vekigi kaj kuŝigi la dion Ozirison, doni benojn al la popolo kaj honori la reĝajn antaŭulojn. Por tiel malfacila momento la plej alta kolegio ordonis al mi surmeti la sanktan relikvon, por ke ne malfruui la regado de la ŝtato kaj la servado al la dioj. Sed nun, kiam ni havas rajtan kaj potencan estron, mi demetas la miraklan relikvon ...

Dirinte ĉi tion, Herhor demetis de la kapo la tiaron, ornamitan per la ureuso, kaj transdonis ĝin al la ĉefpastro Mefres.

La minaca vizaĝo de la faraono sereniĝis kaj li direktis siajn paŝojn al la trono.

Subite la sankta Mefres baris al li la vojon kaj sin klininte al la tero, diris:

—Bonvolu, sankta sinjoro, aŭskulti plej humilan peton ...

Oni ne vidis humilecon en lia voĉo, nek en la okuloj, kiam rektiĝinte li daŭrigis:

—Jen restas la vortoj de la plej alta kolegio de ĉiuj ĉefpastraj ...

—Diru — respondis la faraono.

—Via sankteco scias, — daŭrigis Mefres — ke faraono, kiu ne posedas ĉefpastrajn sanktigojn, ne povas fari la plej altajn oferojn, nek vesti kaj senvestigi la miraklan Ozirison.

—Mi komprenas — interrompis la sinjoro. — Mi estas faraono, kiu ne posedas la rangon de ĉefpastro.

—Kaj tial — daŭrigis Mefres — la plej alta kolegio humile petas vian sanktecon, ke vi bonvolu elekti ĉefpastron, kiu povas anstataŭi vin en la plenumado de la religiaj ceremonioj.

Aŭskultante la kategorian paroladon, la ĉefpastraj kaj civilaj altranguloj tremis kaj maltrankvile moviĝis, la generaloj kvazaŭ nevole ordigis la glavojn. Sed la sankta Mefres rigardis ilin kun nekaŝata malestimo kaj ree fiksas siajn malvarmajn okulojn sur la vizaĝo de la faraono.

Sed ankaŭ nun la sinjoro de la mondo ne estis embarasita.

—Bone — respondis li — ke via ekscelenco rememorigis al mi la gravan devon. La milita metio kaj la aferoj de la ŝtato ne permesos al mi plenumi la ceremoniojn de nia sankta religio, mi do devas elekti por ili anstataŭanton ...

Dirante tion, la sinjoro komencis ĉirkaŭrigardi en la ĉambro. Maldekstre de Herhor staris la sankta Sem. La faraono

fikse rigardis lian kvietan kaj honestan vizaĝon kaj subite demandis:

—Kiu kaj kio vi estas, ekscelenco?

—Mia nomo estas Sem, mi estas ĉefpastro de la templo de Ptah en Pi-Bastis.

—Vi estos mia anstataŭanto en la religiaj devoj — diris la sinjoro, montrante lin per la fingro.

Murmureto de admiro traflugis inter la ĉeestantoj. Eĉ post plej longa konsiderado kaj interkonsiliĝoj malfacile estus elekti pli indan pastron por tiel alta posteno.

Herhor paliĝis ankoraŭ pli forte, kaj Mefres kunpremisa la blujn lipojn kaj duone kovris la okulojn per la palpebroj.

Post momento la nova monarĥo sidiĝis sur la trono, kiu anstataŭ piedoj havis skulptitajn figurojn de reĝoj kaj princoj de naŭ popoloj.

Baldaŭ Herhor, sur ora plado, donis al la sinjoro blankan kaj ruĝan kronon, ĉirkaŭitan per ora serpento. La faraono silente metis ĝin sur la kapon, kaj la ĉeestantoj falis sur la vizaĝojn.

Tio ne estis ankoraŭ la solena kronado, sed nur akcepto de la povo.

Kiam la pastroj estis incensintaj la faraonon kaj kantintaj himnon al Oziriso, ke li verŝu sur lin ĉiujn benojn, oni permesis al la civilaj kaj militistaj altranguloj kisi la malsupran ŝtupon de la trono. Poste la sinjoro prenis oran kuleron kaj, ripetante la preĝojn, kiujn voĉe diris la sankta Sem, li incensis la statuojn de la dioj, kiuj staris en du vicoj, ĉe ambaŭ flankoj de lia reĝa seĝo.

—Kion mi devas fari nun? —demandis la monarĥo.

—Vin montri al la popolo — respondis Herhor.

Tra orita, larĝe malfermita pordo kaj tra marmora ŝtuparo lia sankteco eniris sur la terason, kaj levinte la manojn, li turnis sin al la kvar partoj de la mondo. Eksonis trumpetoj kaj sur la supro de la pilonoj oni pendigis flagojn. Kiu ajn estis sur la kampo, en la korto aŭ en la strato, falis sur la vizaĝon; la bastono, levita super la dorso de la bruto aŭ sklavo, malleviĝis, kaj ĉiuj ŝtataj krimuloj, kondamnitaj en tiu ĉi tago, ricevis pardonon.

Revenante de la teraso, la monarĥo diris:

—Kion ankoraŭ mi devas fari?

—Atendas vian sanktecon la manĝo kaj la ŝtataj aferoj — diris Herhor.

—Mi do povas ripozi — respondis la faraono. — Kie estas la restaĵoj de mia sankta patro?

—Oni transdonis ilin al la enbalzamigistoj — murmuretis Herhor.

La okuloj de la faraono pleniĝis per larmoj kaj la lipoj ek-tremis. Sed tuj li ekregis sin kaj silente rigardis la plankon. Estus nekonvene, se la servistoj vidus la emocion de tiel potenca sinjoro. Volante turni la atenton de la sinjoro al alia temo, Herhor diris:

—Ĉu via sankteco bonvolos akcepti la respektigon de la reĝino patrino?

—Mi?... mi devas akcepti la respektigon de mia patrino? — demandis la faraono per sufokita voĉo.

Kaj volante nepre trankviliĝi, li aldonis kun rideto:

—Via ekscelencio forgesis, kion diris la saĝulo Eney?... Eble la sankta Sem ripetos al ni liajn belajn vortojn ...

—”Memoru, — citis Sem — ke ŝi naskis vin kaj nutris per ĉiuj rimedoj ...”

—Daŭrigu ... daŭrigu!... — insistis la sinjoro, penante ekregi sin.

—”Se vi forgesus pri tio, ŝi levos siajn manojn al la dio, kaj li favore aŭskultos ŝian plendon. Ŝi longe portis vin sub sia koro, kiel grandan ŝarĝon, kaj naskis vin, kiam pasis monatoj. Poste ŝi portis vin sur la dorso kaj dum tri jaroj metis sian mamon en vian buŝon. Tiel ŝi edukis vin, ne sentante abomenon al via malpureco. Kaj kiam vi iris en la lernejon kaj oni ekzercis vin en la skriboj, ĉiutage ŝi stariĝis antaŭ via instruisto kun pano kaj biero de sia domo.”¹

La faraono profunde ekspiris kaj diris pli trankvile:

—Vi do vidas, ke ne konvenas, ke mia patrino salutu min. Mi, mi devas iri al ŝi ...

Kaj li trapasis longan vicon de salonoj, kies muroj estis kovritaj per marmoro, alabastro kaj ligno, hele kolorigitaj, skulptitaj kaj oritaj, kaj post li lia grandega sekvantaro. Proksimiĝinte al la antaŭĉambro de la patrino, li faris signon, ke oni lasu lin sola.

Li trairis la antaŭĉambron, momenton haltis antaŭ la pordo, poste li ekfrapis kaj mallaŭte eniris.

En la ĉambro kun nudaj muroj, en kiu anstataŭ mebloj estis simpla lito kaj breĉita kruĉo kun akvo, ĉio kiel signo de la funebro, sidis sur ŝtono la patrino de la monarĥo, la reĝino Nikotris. Ŝi estis nudpieda, en dika ĉemizo; ŝia frunto estis malpurigita per nila koto, ŝi havis cindron en la implikitaj haroj.

Ekvidinte Ramzeson, la respektinda sinjorino kliniĝis, por fali al liaj piedoj. Sed la filo kaptis ŝin inter siajn brakojn kaj diris kun ploro:

1 Aŭtentika.

—Se vi, patrino, vin klinas antaŭ mi ĝis la tero, mi antaŭ vi devos malleviĝi sub la teron ...

La reĝino karese premis lian kapon al sia brusto, viŝis al li la larmojn per la maniko de sia dika ĉemizo, kaj levinte la manojn supren murmuretis:

—Ĉirkaŭu ĉiuj dioj ... la spiritoj de via patro kaj avo ĉirkaŭu vin per siaj zorgoj kaj benoj ... Ho Izido, neniam mi avaris al vi oferojn, sed hodiaŭ mi donas la plej grandan ... Mi donas al vi mian amatan filon ... Ĉi tiu mia reĝa filo fariĝu sendivida via filo, kaj lia gloro kaj potenco pligrandigu vian dian heredaĵon ...

La sinjoro multfoje ĉirkaŭprenis kaj kisis la reĝinon, fine li sidigis ŝin sur la lito, kaj li mem sidigis sur la ŝtono.

—Ĉu la patro lasis al mi ordonojn? — demandis li.

—Li nur petis, ke vi ne forgesu lin, kaj al la plej alta kolegio li diris la jenajn vortojn: "Mi lasas al vi posteulon, kiu estas leono kaj aglo en unu persono; obeu lin, kaj li levos Egipton al potenca senlima."

—Ĉu vi pensas, ke la pastroj obeos al mi?

—Memoru — diris la patrino — ke la emblemo de la faraono estas la serpento. Kaj la serpento estas saĝo, kiu silentas kaj mordas morte en neatendita momento ... Se vi prenos la tempon kiel liganon, vi venkos ĉion.

—Herhor estas terure maltima ... Hodiaŭ li kuraĝis surmeti la tiaron de la sankta Amenhotep ... Kompreneble mi ordonis al li demeti ĝin, kaj mi forigos lin de la regado ... Lin kaj kelkajn anojn de la plej alta kolegio ...

La reĝino ekskuis la kapon.

—Egipto estas via, — diris ŝi, — kaj la dioj donis al vi gran-

dan saĝon. Sen tio mi terure timus malkonsenton kun Herhor ...

—Mi ne malkonsentas kun li, mi lin forpelas.

—Egipto estas via, — ripetis la patrino — sed mi timas la batalon kontraŭ la pastroj. Vere, via patro, tro malsevera, kuragiĝis ĉi tiujn homojn, sed oni ne devas alkonduki ilin al la malespero per la severeco. Cetere, pripensu: kiu anstataŭos al vi ilian konsilon?... Ili scias ĉion, kio estis, estas kaj estos sur la tero kaj ĉielo; ili vidas la plej kaŝitajn homajn pensojn kaj direktas la korojn, kiel la vento la foliojn. Sen ili vi ne nur ne scios, kio okazas en Tiro kaj Ninivo, sed eĉ en Memfiso kaj Teboj.

—Mi ne forpuŝas la saĝon, sed mi volas la obeon, — respondis la faraono. — Mi scias, ke ilia saĝo estas granda, sed ĝi devas esti kontrolata kaj direktata, por ke ĝi ne ruinigu la ŝtaton ... Diru vi mem, patrino: kion dum tridek jaroj ili faris el Egipto?... La popolo suferas mizeron aŭ ribelas, ni havas malmulte da soldatoj, la trezorejo estas malplena, kaj dume, kelke da monatoj de ni, kvazaŭ ŝvelanta kuko kreskas Asirio kaj jam hodiaŭ trudas al ni traktatojn!...

—Faru, kiel vi volas. Sed memoru, ke la emblemo de la faraono estas la serpento, kaj la serpento estas la silento kaj saĝo.

—Vi diras la veron, patrino, sed kedu al mi, ke iafoje la kuraĝo valoras pli multe ol la prudento. Jam hodiaŭ mi scias, ke la pastroj intencis tutajn jarojn konduki la militon kontraŭ Libio. Mi finis ĝin en la daŭro de dekelkelo da tagoj kaj nur tial, ke ĉiutage mi faris ian paŝon frenezan, sed decidan. Se mi ne estus kurinta renkonte al ili en la dezerton, kio ja

estis granda malprudento, hodiaŭ ni havus Libianojn apud Memfiso ...

—Mi scias, vi persekutis Tiehennan, kaj Tifono surprizis vin — diris la reĝino. — Ho senkonsidera infano ... vi ne pensis pri mi!

La sinjoro ekridetis.

—Estu trankvila via koro — respondis li. — Kiam la farao batalas, ĉe lia dekstra kaj maldekstra mano stariĝas Amon. Kaj kiu egalas lin?...

Ankoraŭ unu fojon li ĉirkaŭprenis la patrinon kaj foriris.

ĈAPITRO DUA

La grandega sekvantaro de lia sankteco restis ankoraŭ en la atendejo, sed kvazaŭ fendita en du partojn. De unu flanko Herhor, Mefres kaj kelkaj pli maljunaj pastroj, de la alia ĉiuj generaloj, civilaj oficistoj, kaj plejmulto da junaj pastroj.

La agla okulo de la faraono tuj rimarkis la dividon de la altranguloj, kaj en la koro de la juna estro ekflamis ĝoja fiero.

”Kaj jen, ne eltirante la glavon, mi akiris venkon!...” pensis li.

La altranguloj pli kaj pli malkaŝe foriĝis de Herhor kaj Mefres. Neniu dubis, ke ambaŭ ĉefpastroj, ĝis hodiaŭ plej potencaj en la ŝtato, ne posedas la favoron de la faraono.

Nun la sinjoro transiris en la manĝoĉambron, kie antaŭ ĉio mirigis lin la nombro de la servantaj pastroj kaj de la pladoj.

—Mi devas manĝi ĉion ĉi? — demandis li, ne kaŝante sian miron.

La pastro, zorganta pri la kuirejo, klarigis al la faraono, ke la manĝoj, kiujn ne uzos lia sankteco, iros ofere al la dinastio.

Kaj dirante tion, li montris la vicon de statuoj, starantaj apud la muroj.

La sinjoro ekrigardis la statuojn, kiuj havis tian aspekton, kvazaŭ oni nenion donadus al ili, kaj poste la pastrojn, kies

vizaĝoj estis freŝaj, kvazaŭ ili manĝus ĉion, kaj li postulis bieron kaj soldatan panon kun ajlo.

La supera pastro ŝtoniĝis de mirego, sed li ripetis la postulon al la malsupera. Ĉi tiu ŝanceliĝis, sed ripetis la postulon al servaj knaboj kaj knabinoj. La knaboj, ŝajnis, ne kredis al la propraj oreloj, sed tuj ili diskuris en la tuta palaco.

Post kvaronhoro ili revenis timigitaj, murmuretante al la pastroj, ke nenie estas soldata pano kaj ajlo.

La faraono ekridetis kaj ordonis, ke de nun neniam manku en la kuirejo simplaj manĝoj. Poste li manĝis kolombon, pecon da fiŝo, tritikan bulkon kaj trinkis iom da vino.

Li konfesis en la animo, ke la manĝo estis preparita bone kaj la vino estis bonega. Sed li ne povis forpeli la penson, ke la kortega kuirejo devas engluti eksterordinarajn sumojn.

Bruliginte incenson por la honoro de la antaŭuloj, la monarĥo iris en la reĝan kabineton por aŭskulti la raportojn.

Herhor venis la unua. Li sin klinis antaŭ la sinjoro multe pli profunde, ol li faris tion salutante la monarĥon, kaj kun granda emocio gratulis lin pri la venko super Libianoj.

—Via sankteco — diris li — sin ĵetis sur Libianojn, kiel Tifono sur la mizerajn tendojn de vagantoj en la dezerto. Vi gajnis grandan batalon kun tre malgrandaj perdoj kaj per unu svingo de via glavo vi finis la militon, kies finon ni, simplaj homoj, ne povis antaŭvidi.

La faraono sentis, ke lia malamikeco al Herhor komencas malfortiĝi.

—Kaj tial — daŭrigis la ĉefpastro — la plej alta kolegio petegas vian sanktecon, ke vi destinu por la bravaj regimentoj dek talentojn da rekompenco ... Kaj vi mem, ĉefa militestro, permesu aldoni al via nomo la epiteton: "Venka!..."

Kalkulante je la juneco de la faraono, Herhor iom troigis la flaton. La sinjoro baldaŭ trankviliĝis kaj subite demandis:

—Kian epiteton vi donus al mi, se mi neniigus la asirian armeon kaj plenigus niajn templojn per la trezoroj de Nini-vo kaj Babilono?...

”Li do ĉiam pensas pri tio!...” — diris al si la ĉefpastro.

La faraono, kvazaŭ por konfirmi liajn dubojn, ŝanĝis la temon de la interparolado kaj demandis:

—Kiom da soldatoj ni havas?

—Ĉi tie, apud Memfiso?...

—Ne, en la tuta Egipto.

—Via sankteco havis dek regimentojn ... — diris la ĉefpastro. — La respektinda Nitager ĉe la orienta limo havas dek kvin ... Dek estas en la sudo, ĉar Nubio komencas boli ... Kvin staras garnizone en la tuta lando.

—Kune kvardek — diris ila faraono post pripenso.

—Kiom da soldatoj tio estas?

—Ĉirkaŭ sesdek mil ...

La sinjoro salte leviĝis de la seĝo.

—Sesdek, anstataŭ cent dudek?... — ekkriis li. — Kion tio signifas?... Kion vi faris kun mia armeo?...

—Ni ne havis sufiĉajn rimedojn por pli granda nombro ...

—Ho dioj!... — diris la faraono, kaptante sin je la kapo. — Post unu monato atakos nin Asirianoj!... Ni ja estas senarmigitaj ...

—Kun Asirio ni havas provizoran traktaton — intermetis Herhor.

—Virino povus tiel respondi, sed ne milita ministro — eksplodis la sinjoro. — Kion valoras traktato, post kiu ne staras

armeo?... La duono de la armeo, kiun posedas la reĝo Assar, povus frakasi nin hodiaŭ.

—Volu trankviliĝi, sankta sinjoro. Ĉe la unua sciigo pri la perfido de Asirianoj, ni havus duonmilionan armeon,...

La faraono ridis antaŭ lia nazo.

—Kian?... De kie?... Vi frenezigiĝis, pastro. Vi fosas en la papirusoj, sed mi sep jarojn servas en la armeo kaj preskaŭ ĉiutage partoprenas en ekzercoj kaj manovroj. Kiamaniere post kelke da monatoj ni havos duonmilionan armeon?...

—Alkuros ĉiuj nobeloj ...

—Mi ne bezonas viajn nobelojn!... La nobeloj ne estas soldatoj. Por duonmiliono armeo oni bezonas almenaŭ cent kvindek regimentojn, kaj ni, kiel vi mem diras, posedas nur kvardek ... Kie do la homoj, kiuj hodiaŭ paŝtas la brutojn, plugas la teron, knedas potojn aŭ drinkas kaj faras nenion, kie ili lernos la militan metion?... Egiptanoj estas mizera materialo por soldatoj; mi scias tion, mi ja vidas ilin ĉiutage ... Libiano, Greko, Ĥeto, ankoraŭ infano, uzas la pafarkon kaj ŝtonĵetilon kaj perfekte svingas la bastonegon; post unujara lernado li jam scias bone marŝi. Sed Egiptano apenaŭ post trijara laboro komencas marŝi kiel soldato. Vere estas, ke post du jaroj li jam kutimas al la glavo kaj lanco, sed eĉ kvar jaroj ne sufiĉas al li por trafe ĵeti sagojn ... Do post kelke da monatoj vi povus havi ne armeon, sed duonmilionan bandon, kiun tuj frakasos alia bando, la asiria. Ĉar kvankam la asiriaj regimentoj estas malbone ekzercitaj, sed la asiria soldato scias ĵeti ŝtonojn kaj sagojn, haki kaj piki, kaj antaŭ ĉio li havas la atakemon de sovaĝa besto, kiu tute mankas al la delikata Egiptano. Ni rompas la malamikon per tio, ke niaj disciplinitaj kaj ekzercitaj soldatoj estas kiel murrompiloj: oni devas mortigi du-

non de soldatoj por detruĵi la kolonon. Sed sen ekzercita kolono ne ekzistas egipta armeo.

—Saĝan veron diras via sankteco — respondis Herhor al la spireganta faraono. — Nur la dioj tiel konas la aferojn ... Mi ankaŭ scias, ke la fortoj de Egipto estas malgrandaj, ke por krei ilin necesaj estas multaj jaroj da laboro ... Jen kial mi volas fari traktaton kun Asirio.

—Vi ja jam faris ...

—Provizoran. Sargon, vidante la malsanon de via patro, kaj timante vian sanktecon, prokrastis la aferon ĝis via suriro sur la tronon.

La faraonon ree ekregis kolero.

—Kio?... — ekkriis li. — Ili do, efektive pensas preni Feniĉion?... Kaj ni supozas, ke mi subskribos la honton de mia regado?... Malbonaj spiritoj ekregis vin ĉiujn!...

La aŭdienco estis finita. Ĉi tiun fojon Herhor falis sur la vizaĝon, kaj revenante de la sinjoro, meditis en sia animo:

”Lia sankteco aŭskultis la raporton ĝis la fino, li do ne forĵetas miajn servojn ... Mi diris al li, ke li devas subskribi la traktaton kun Asirio, la plej malfacila afero do estas finita ... Li ŝanĝos sian opinion, antaŭ ol Sargon venos duan fojon ... Sed li estas leono, eĉ ne leono, sed furioza elefanto, ĉi tiu junulo ... Tamen li ja nur tial fariĝis faraono, ke li estas nepo de ĉefpastro!... Li ankoraŭ ne komprenis, ke la samaj manoj, kiuj levis lin tiel alten ...”

En la vestiblo la nobla Herhor haltis, pensis momenton, fine anstataŭ reveni hejmen, iris al la reĝino Nikotris.

En la ĝardeno estis nek virinoj, nek infanoj; el la dissemiataj palacetoj flugis ĝemoj: la virinoj, apartenantaj al la domo

de la mortinta faraono, ploris tiun, kiu foriris al la Okcidento.

Ilia ĉagreno, ŝajnas, estis sincera.

Dume en la kabineton de la sinjoro venis la plej alta juĝisto.

—Kion diros al mi via ekscelenco? — demandis la sinjoro.

—Antaŭ kelke da tagoj okazis io eksterordinara en Teboj — respondis la juĝisto. — Iu kamparano mortigis la edzinon kaj tri infanojn kaj li mem dronigis sin en sankta lageto.

—Ĉu li estis freneza?

—Ŝajnas, ke li faris tion de malsato.

La faraono ekmeditis.

—Stranga okazo — diris li — sed mi volus aŭdi ion alian. Kiaj krimoj estas la plej oftaj en la lasta tempo?

La plej alta juĝisto ŝanceliĝis.

—Parolu sentime — diris la sinjoro malpacience — kaj ne nion kaŝu de mi. Mi scias, ke Egipto falis en marĉon, mi volas ĝin eltiri, mi do devas scii ĉion malbonan ...

—La plej oftaj ... la plej ordinaraj krimoj estas ribeloj ... Sed nur la popolaĉo ribelas ... — rapidis aldoni la juĝisto.

—Mi aŭskultas — intermetis la sinjoro.

—En Kosem — daŭrigis la juĝisto — ekribelis regimento de masonistoj kaj ŝtonistoj, al kiuj oni ne donis ĝustatempe la necesajn aferojn. En Seĥem kamparanoj mortigis la skribiston, kiu kolektis la impostojn ... En Melcatis kaj Pi-hebit kamparanoj detruis la domojn de la feniciaj farmantoj ... Apud Kasa ili ne volis rebonigi kanalon, pretendante, ke por ilia laboro devas pagi al ili la ŝtata trezorejo ... Fine, en la porfiraj minejoj la kondamnitoj batis la gardistojn kaj volis forkuri al la maro ...

—Ĉi tiuj novaĵoj tute ne surprizas min — respondis la faraono. — Sed kion vi pensas pri ili?

—Antaŭ ĉio oni devas puni la kulpajn ...

—Kaj mi pensas, ke antaŭ ĉio oni devas doni al la laboristoj, kion ili rajte postulas — diris la sinjoro. — Malsata bovo kuŝiĝas sur la tero, malsata ĉevalo ŝanceliĝas sur la piedoj kaj ĝemas ... Do ĉu oni povas postuli, ke malsata homo laboru kaj ne plendu?

—Via sankteco do ...

—Pentuer elektos esploran komitaton — interrompis la faraono. — Dume mi ne volas, ke oni punu ...

—Sed tiam eksplodos ĝenerala ribelo!... — ekkriis la terurita juĝisto.

La faraono apogis la barbon sur la manoj kaj meditis.

—Bone! — diris li post momento. — La tribunaloj faru sian devon, sed delikate ... Pentuer komencu la esploron ankoraŭ hodiaŭ ... Vere — aldonis li post momento — pli facile estas decidiĝi en la batalo, ol en la senordo, kiu ekregis Egipton.

Post la foriro de la plej alta juĝisto la faraono alvokis Tutmozison. Li ordonis al li en sia nomo saluti la armeon, revenantan de Sodaj Lagoj, kaj disdoni dudek talentojn al la oficiroj kaj soldatoj.

Poste la sinjoro ordonis, ke venu Pentuer, kaj dume akceptis la grandan kasiston.

—Mi volas scii, kia estas la stato de la trezorejo?

—Ni havas — respondis la altrangulo — en la nuna momento la valoron de dudek mil talentoj en la grenejoj, staloj, provizejoj kaj kestoj. Sed la impostoj alflugas ĉiutage.

—Ankaŭ la ribeloj ĉiutage — respondis la faraono. —Kaj kiaj estas entute la enspezoj kaj elspezoj?

—Por la armeo ni elspezas ĉiujare dudek mil talentojn ...
Por la kortego de via sankteco du ĝis tri mil talentojn ĉiumo-
nate ...

—Kaj poste?... Kio ankoraŭ?... Kaj la publikaj laboroj?...

—En la nuna momento ili estas farataj senpage — diris la
granda kasisto, mallevente la kapon.

—Kaj la enspezoj?...

—Ni elspezas tiom, kiom ni havas ... — murmuretis la ka-
sisto.

—Ni do havas kvardek aŭ kvindek mil talentojn jare — re-
spondis la faraono. — Kie estas la resto?...

—Kiel garantiaĵo ĉe la Fenicianoj, ĉe bankieroj kaj komer-
cistoj, fine ĉe la sanktaj pastroj ...

—Bone — respondis la sinjoro. — Sed ekzistas ja la netuŝe-
bla trezorejo de la faraonoj en oro, plateno, arĝento kaj juve-
loj. Kiom ĝi valoras?...

—Jam antaŭ dek jaroj ĝi estis tuŝita kaj elspezita ...

—Kiel?... Por kio?...

—Por la bezonoj de la kortego — respondis la kasisto —
por donacoj al la nomarĥoj kaj temploj ...

—La kortego havis enspezojn de la kurantaj impostoj, kaj
ĉu la donacoj povis elĉerpi la trezorejon de mia patro?...

—Oziriso-Ramzes, la patro de via sankteco, estis malava-
ra sinjoro kaj faris grandajn donacojn ...

—Kiajn?... Kiel grandajn?... Mi volas fine scii tion ... —pa-
rolis malpacience la faraono.

—Precizaj kalkuloj estas en la arĥivoj, mi memoras nur la
ĝeneralajn nombrojn ...

—Parolu!...

—Ekzemple al la temploj — respondis la kasisto ŝanceli-

ĝante — Oziriso-Ramzes donis dum sia feliĉa regado ĉirkaŭ cent urbojn, cent dudek ŝipojn, du milionojn da brutoj, du milionojn da sakoj da greno, cent dudek mil ĉevalojn, okdek mil sklavojn, ĉirkaŭ ducent mil barelojn da biero kaj vino, tri milionojn da panoj, tridek mil vestojn, tricent mil kruĉojn da mielo, oleo kaj incenso ... Kaj krom tio mil talentojn da oro, tri mil da arĝento, dek mil talentojn da fandita bronzo, kvincent talentojn da malhela bronzo, ses milionojn da floraj kronoj, mil ducent statuojn de dioj kaj tricent mil juvelojn ... Aliajn nombrojn mi ne memoras, sed ĉio estas enskribita ...¹

La faraono kun rido levis la manojn supren kaj post momento li terure ekkoleris kaj batante la tablon per la pugno, ekkriis:

—Plenmano da pastroj uzis tiom da biero, pano, kronoj kaj vestoj, posedante proprajn enspezojn!... Grandegajn enspezojn, kiuj kelkcenton da fojoj superas la bezonojn de ĉi tiuj sanktuloj ...

—Via sankteco bonvolis forgesi, ke la pastroj subtenas dekojn da miloj da malriĉuloj, kuracas saman nombron da malsanuloj kaj nutras kaj armas dekkelkon da regimentoj per la rimedoj de la temploj.

—Por kio ili bezonas regimentojn?... La faraonoj ja uzas ilin nur dum la milito. El la malsanuloj ĉiuj preskaŭ pagas por si, aŭ per mono aŭ per laboro. Kaj la malriĉuloj?... Ili ja laboras por la temploj: portas akvon por la dioj, partoprenas en la solenoj kaj, antaŭ ĉio, ludas rolon en la farado de la mirakloj. Tio estas ili, kiuj antaŭ la pordoj de la temploj retrovas la saĝon, vidadon kaj aŭdadon; iliaj vundoj resaniĝas, iliaj piedoj kaj manoj reakiras la kapablon moviĝi, kaj la popolo, vidan-

1 La donacoj de Ramzes III al la temploj estis multe pli grandaj.

te tiajn miraklojn, tiom pli fervore preĝas kaj tiom pli mal-avare oferas al la dioj ... La mizeruloj estas kvazaŭ bovinoj kaj ŝafinoj de la temploj: ili alportas puran profiton ...

—Kaj tial — ekkuraĝis intermeti la kasisto — la pastroj ne elspezas ĉion, sed amasigas kaj pligrandigas sian kapitalon ...

—Por kio?

—Por ia subita bezono de la ŝtato ...

—Kiu vidis la kapitalon?

—Mi mem — diris la al tranguo. — La trezoroj, kolektikaj en Labirinto, ne malgrandiĝas, sed kreskas de generacio al generacio, por ke ...

—Por ke — interrompis la faraono — Asirianoj havu de kie preni, kiam ili invados Egipton, tiel bone administratan de la pastroj!... Mi dankas vin, granda kasisto — aldonis li. — Mi sciis, ke la financa situacio de Egipto estas malbona. Sed mi ne supozis, ke la ŝtato estas ruinigita ... En la lando ribeloj, ni ne havas armeon, la faraono estas en mizero ... Sed la trezorejo de Labirinto pligrandiĝas de generacio al generacio!... Se ĉiu dinastio, nur dinastio, farus tiom da donacoj al la temploj, kiom faris mia patro, Labirinto jam posedus deknaŭ mil talentojn da oro, ĉirkaŭ sesdek mil talentojn da arĝento, kaj kiom da greno, brutoj, tero, sklavoj kaj urboj, kiom da vestoj kaj juveloj, tion ne povus kalkuli eĉ la plej bona matematikisto!...

La granda kasisto adiaŭis la sinjoron. Sed la faraono ankaŭ ne estis kontenta; ĉar post mallonga konsidero ŝajnis al li, ke li tro malkaŝe parolis kun siaj oficistoj.

ĈAPITRO TRIA

La soldatoj, starantaj garde en la antaŭĉambro, anoncis Pentueron. La pastro falis antaŭ la faraono sur la vizaĝon kaj demandis pri ordonoj.

—Mi ne volas ordoni, sed peti vin — diris la sinjoro. — Vi scias, oni ribelas!... Ribelas la kamparanoj, metiistoj, eĉ mal-liberuloj ... Ĉie ribeloj, de maro ĝis la minejoj ... Mankas nur unu afero, ke ribelu miaj soldatoj kaj proklamu faraonon ... ekzemple Herhoron!...

—Vivu eterne, via sankteco! — respondis la pastro. — Ne ekzistas en Egipto homo, kiu ne oferus sian vivon por vi kaj benus vian nomon.

—Ha, se ili sciis, — diris la estro kun kolero — kiel malriĉa kaj senforta estas la faraono, ĉiu nomarĥo volus esti sinjoro de sia nomeso! Mi pensis, ke heredinte la duoblan kronon, mi ion signifos ... Sed jam en la unua tago mi konvinkigis, ke mi estas nur ombro de la antaŭaj monarĥoj de Egipto! Ĉar kio povas esti faraono sen mono, sen armeo kaj, antaŭ ĉio, sen fidelaj servistoj?... Mi estas kiel la statuoj de la dioj, kiujn oni incensas kaj al kiuj oni faras oferojn ... Sed la statuoj estas senfortaj kaj per la oferoj sin grasigas la pastroj ... Sed vi ja apartenas al ilia partio!

—Dolore estas por mi, — respondis Pentuer — ke via sankteco parolas tiel en la unua tago de sia regado. Se la novaĵo disvastiĝus en Egipto ...

—Al kiu mi devas paroli pri tio, kio doloras min? — interrompis la sinjoro. — Vi estas mia konsilanto kaj vi savis min, aŭ almenaŭ volis min savi, ne por rakonti al ĉiuj, mi supozas, kio fariĝas en mia reĝa koro, kiun mi malfermas al vi ... Sed vi estas prava.

La sinjoro promenis en la ĉambro kaj post momento diris per multe pli trankvila tono:

—Mi nomis vin estro de la komitato, kiu devas esplori la kaŭzojn de la senĉesaj ribeloj en mia ŝtato. Mi volas, ke oni punu nur la kulpajn kaj estu justa al la malfeliĉaj ...

—Subtenu vin Dio per sia favoro!... — murmuretis la pastro. — Mi faros, kion vi ordonas. Sed la kaŭzojn de la ribeloj mi konas sen esploro ...

—Parolu ...

—Multfoje mi parolis pri tio al via sankteco: la laboranta popolo estas malsata, havas tro da laboro kaj pagas tro grandajn impostojn ... Kiu antaŭe laboris de la leviĝo ĝis la subiro de la suno, hodiaŭ devas komenci unu horon antaŭ la leviĝo kaj fini unu horon post la subiro. Antaŭ ne longe, ĉiun dekan tagon, la laboristo povis viziti la tombojn de la gepatroj, paroli kun iliaj ombroj kaj fari oferojn. Sed hodiaŭ neniu iras tien, ĉar neniu havas tempon. Antaŭe la kamparano manĝis ĉiutage tri tritikajn panojn, hodiaŭ li ne havas sufiĉe eĉ por hordea. Antaŭe, la laboroj ĉe kanaloj, akvobaroj kaj ŝoseoj estis kalkulataj al la impostoj; hodiaŭ oni devas aparte pagi la impostojn, kaj la publikajn laborojn plenumi senpage. Jen la kaŭzo de la ribeloj.

—Mi estas la plej malriĉa nobelo en la ŝtato! — ekkriis la faraono. — Lu ajn posedanto de bieno donas al siaj brutoj konvenan manĝon kaj ripozon; sed mia brutaro estas ĉiam mal-

sata kaj laca!... Kion do mi devas fari, diru vi, kiu petis min, ke mi plibonigu la sorton de la kamparanoj?

—Vi ordonas al mi, sinjoro, paroli?...

—Mi petas ... ordonas ... fine, kiel vi volas ... Sed parolu saĝe.

—Benata estu via regado, vera filo de Oziriso! — respondis la pastro. — Jen kion oni devas fari ... Antaŭ ĉio, ordonu, sinjoro, ke oni pagu por la publikaj laboroj, kiel antaŭe ...

—Kompreneble.

—Poste, proklamu, ke laboro sur la kampoj daŭru nur de la leviĝo ĝis la subiro de la suno ... poste faru, ke la popolo ripozu ĉiun sepan tagon; ne ĉiun dekan, sed ĉiun sepan. Poste, malpermesu al la sinjoroj doni la kamparanojn kiel pruntgarantion kaj al la skribistoj bati kaj turmenti ilin laŭ sia bontruvo. Fine, donu dekonon aŭ almenaŭ dudekonon de la teroj al la kamparanoj kiel proprajon, por ke neniu povu ĝin repreni aŭ okupi kiel garantiaĵon. Donu, sinjoro, al la kamparanoj dezertajn sablojn, kaj post kelke da jaroj elkreskos tie ĝardenoj ...

—Vi bele parolas — intermetis la faraono — sed vi diras, kion vi vidas en via koro, ne en la mondo. La homaj planoj, eĉ la plej bonaj, ne ĉiam konformiĝas al la natura irado de la aferoj ...

—Via sankteco, mi jam vidis tiajn ŝanĝojn kaj iliajn rezultatojn — respondis Pentuer. — En kelkaj tempoj oni faris diversajn provojn: pri la kuracado, instruado, edukado de bestoj kaj kreskaĵoj, fine, pri plibonigado de la homoj. Kaj jen kio okazadis: kiam oni donis al kamparano maldiligenta kaj malgrasa bonan manĝon kaj ripozon ĉiun sepan tagon, li fariĝis grasa, laborema kaj fosis pli da tero, ol antaŭe. Laboris-

to pagata estas pli gaja kaj faras pli multe da laboro, ol sklavo, eĉ batata per feraj vergoj. Homoj sataj naskas pli multe da infanoj ol lacaj kaj konsumataj de la laboro; la idoj de la liberaj homoj estas sanaj kaj fortaj, kaj la idaro de sklavoj estas malsanema, malgaja kaj havas inklinon al ŝtelo kaj mensogo. Fine, oni konvinkiĝis, ke la tero kulturata de la posedanto, donas unu fojon kaj duonon pli multe da greno kaj legomoj, ol tero, kulturata de sklavoj. Mi diros al via sankteco ion ankoraŭ pli strangan; kiam al la plugistoj ludas muziko, la homoj kaj bovoj laboras pli bone, pli rapide kaj malpli laciĝas, ol sen muziko!... Ĉion ĉi oni konstatis en niaj temploj.

La faraono ridetis.

—Mi devas enkonduki la muzikon ankaŭ en miajn bienojn — diris li. — Sed se la pastroj konstatis tiel strangajn aferojn, pri kiuj vi rakontas al mi, kial ili ne agas tiamaniere kun la kamparanoj en siaj bienoj?...

Pentuer mallevis la kapon.

—Ĉar — respondis li sopirante — ne ĉiuj pastroj estas saĝuloj kaj havas noblajn korojn ...

—Jes, jes — ekkriis la sinjoro. — Kaj nun diru al mi vi, kiu estas filo de kamparano kaj scias, ke inter la pastroj ekzistas friponoj kaj malsaĝuloj, diru, kial vi ne volas servi al mi en la batalo kontraŭ ili?... Vi ja komprenas, ke mi ne plibonigos la sorton de la kamparanoj, se antaŭe mi ne instruos al la pastroj la obeon al mia volo ...

Pentuer tordis siajn manojn.

—Sinjoro — respondis li — sendia kaj danĝera estas la batalo kontraŭ la pastraro!... Pli ol unu faraono komencis ĝin, kaj ... ne povis fini ...

—Ĉar ne helpis lin saĝuloj, kiel vi ... — eksplodis la sinjoro.

— Kaj vere, neniam mi komprenos: kial saĝaj kaj honestaj pastroj kuniĝas kun la bando de friponoj, kiaj estas la plimulto de ĉi tiu klaso?...

Pentuer skuis la kapon kaj komencis paroli malrapide:

—De tridek mil jaroj la sankta pastraro zorgas pri Egipto kaj ĝi faris la landon tia, kia ĝi estas: mirindaĵo de la tuta mondo. Kaj kial la pastroj, malgraŭ la mankoj, sukcesis tion fari?... Ĉar ili estas la lumingo, en kiu brulas la lumo de la saĝo. La lumingo povas esti malpura, eĉ malbonodora. Tamen ĝi konservas la dian fajron, sen kiu inter la homoj regus mallumo kaj sovaĝeco. Vi parolas, sinjoro, pri la batalo kontraŭ la pastraro — daŭrigis Pentuer. — Kia povas esti ĝia rezultato por mi?... Se vi malgajnos, mi estos malfeliĉa, ĉar vi ne plibonigos la sorton de la kamparanoj. Kaj se vi gajnos. ... o, ne ĝisvivu mi tion!... Ĉar se vi rompus la lumingon, kiu scias, ĉu vi ne estingus la fajron de la saĝo, kiu de jarmiloj flamas super Egipto kaj super la mondo ... Jen, mia sinjoro, la kaŭzoj, kial mi ne volas min miksi je la batalo kontraŭ pastraro ... Mi sentas, ke ĝi proksimiĝas, kaj mi suferas, ke tia vermo, kiel mi, ne povas malhelpi ĝin. Sed mi ne partoprenos en ĝi, ĉar mi devus perfidi aŭ vin, aŭ Dion, kiu estas la kreinto de la saĝo ...

Aŭskultante lin, la faraono promenis en la ĉambro, meditante.

—Faru — diris li sen kolero — kiel vi volas. Vi ne estas soldato, mi do ne povas riproĉi al vi la mankon de kuraĝo ... Sed vi ne povas esti mia konsilanto ... Tamen mi petas vin, aranĝi juĝejon por esplori la ribelojn, kaj kiam mi alvokos vin, parolu, kion ordonas al vi la saĝo ...

Pentuer ekgenuis kaj adiaŭis la sinjoron.

—En ĉiu okazo — aldonis la faraono — sciu, ke mi ne volas estingi la dian lumon ... Kulturu la pastroj la saĝon en siaj temploj, sed ili ne detruu mian armeon, ne faru malhonorajn traktatojn kaj ... ne ŝtelu — diris li jam ekscitita — la reĝajn trezorojn ... Eble ili pensas, ke mi, kvazaŭ almozulo, starados ĉe iliaj pordoj, por ke ili bonvolu liveri al mi rimedojn por relevi la staton, ruinigitan per ilia malsaĝa kaj malnobla regado?... Ha, ha!... Pentuer ... eĉ la diojn mi ne petus pri tio, kio estas mia potenco kaj mia rajto. Vi povas foriri.

La pastro, ne turnante sin, eliris kaj ankoraŭ en la pordo falis sur la vizaĝon.

La sinjoro restis sola.

”La mortemaj homoj estas kvazaŭ infanoj — pensis li. — Herhor ja estas saĝa, scias, ke Egipto en okazo de milito bezonas duonmilionan armeon, ke ĉi tiun armeon oni devas ekzerci, kaj malgraŭ tio li malgrandigis la nombron de regimentoj kaj la nombron de soldatoj en ĉiu. La granda kasisto ankaŭ estas saĝa, tamen ŝajnas al li afero tute natura, ke ĉiuj trezoroj de la faraonoj transiris en Labirinton!... Fine Pentuer ... Kia stranga homo!... Li volas donacadi al la kamparanoj manĝon, teron kaj senĉesajn festojn ... Bone, sed ĉio ĉi malgrandigos miajn enspezojn, kiuj sen tio estas jam tro malgrandaj. Sed se mi dirus al li: helpu min repreni de la pastroj la reĝajn trezorojn, li nomus tion malpia kaj diris, ke mi volas estingi la lumon en Egipto!... Stranga homo ... Li volonte konsentus renversi la tutan ŝtaton por la bono de la kamparanoj, sed li ne kuraĝus preni ĉefpastron ĉe nuko kaj konduki lin en malliberejon. Kun plej granda trankvilo li ordonas al mi rezigni duonon de miaj enspezoj, sed mi estas certa, ke li ne kuraĝus elporti kupran utelon el Labirinto ...”

La faraono ekridetis kaj ree komencis mediti:

”Ĉiu deziras esti feliĉa; sed se vi volas fari, ke ĉiuju estu feliĉaj, iu kaptos vin je la manoj, kiel homo, al kiu oni volas elŝiri malsanan denton ... Kaj tial la monarĥo devas esti decidema ... Kaj tial mia sankta patro agis malbone, malzorgante la kamparanojn kaj senlime konfidante al la pastroj ... Pezan heredaĵon li lasis al mi, sed ... ne fleksiĝos sub ĝi miaj ŝultroj ... Apud Sodaj Lagoj ankaŭ estis malfacila afero ... Pli malfacila, ol ĉi tie ... Ĉi tie estas nur babiluloj kaj alarmantoj, tie estis homoj armitaj kaj deciditaj morti ... Unu batalo pli larĝe malfermas niajn okulojn, ol dekoj da jaroj de trankvila regado ... Kiu diros al si: mi rompos la baron! — rompos ĝin. Sed kiu ŝanceliĝos, devos cedi ...”

Falis la krepusko. En la palaco oni ŝanĝis la gardistojn kaj en la pli malproksimaj ĉambroj oni ekbruligis torĉojn. Nur en la ĉambron de la faraono neniu kuraĝis eniri sen ordono.

La sinjoro, laca de la sendormo, de la hieraŭa vojaĝo kaj hodiaŭaj okupoj, falis sur la apogseĝon. Ŝajnis al li, ke jam centojn da jaroj li estas faraono, kaj li ne povis kredi, ke de la horo, kiam li estis apud la piramidoj, ne pasis ankoraŭ unu tago.

”Unu tago?... Ne eble!...”

Poste venis al li la penso, ke eble en la koro de la heredinto loĝas animoj de la antaŭaj faraonoj. Sendube estas tiel, ĉar alie de kie estus en li la sento de maljuneco aŭ antikveco?... Kaj kial la regado ŝajnus al li simpla afero, kvankam ankoraŭ antaŭ kelke da monatoj li tremis pensante, ke li ne scios regi.

”Unu tago?... — ripetis li en sia animo. — Sed mi estas jam mil jarojn en ĉi tiu loko!...”

Subite li ekaŭdis sufokitan voĉon:

—Mia filo!... filo!

La faraono salte leviĝis de la seĝo.

—Kiu estas ĉi tie? — ekkriis li.

—Mi estas, mi ... Ĉu vi jam forgesis pri mi ...

La estro ne povis sin orienti, de kie venas la voĉo. De supre, de malsupre, aŭ eble de la granda statuo de Oziriso, kiu staris en la angulo.

—Fila mia — ree parolis la voĉo — respektu la volon de la dioj, se vi volas ricevi ilian benitan helpon ... Ho, respektu la diojn, ĉar sen ilia helpo la plej granda potenco estas kvazaŭ cindro kaj ombro ... Ho, respektu la diojn, se vi volas, ke la maldolĉo de viaj eraroj ne venenu al mi la ĉeeston en la feliĉa lando de Okcidento ...

La voĉo eksilentis. La sinjoro ordonis alporti torĉojn. Unu pordo de la ĉambro estis fermita, ĉe la alia staris gardistoj. Neniu fremda povis eniri.

Kolero kaj maltrankvilo ŝiris la koron de la faraono. Kio estis tio? Ĉu vere parolis al li la ombro de la patro, aŭ ĉu la voĉo estis nur nova trompo de la pastroj?

Sed se la pastroj povas paroli al li de malproksime, malgraŭ la dikaj muroj, ili povas ankaŭ sekrete aŭskulti. Kaj tiam li, la sinjoro de la mondo, estas kvazaŭ sovaĝa besto, persekutata de ĉiuj flankoj.

Estas vere, ke en la palaco estis ordinara afero aŭskulti ĉe la pordoj. Sed la faraono pensis, ke almenaŭ lia kabineto estas libera, kaj ke la trokuraĝo de la pastroj haltas ĉe la pordo de la plej alta povo.

Sed se tio estis spirito?...

La sinjoro ne volis vespermanĝi kaj iris dormi. Ŝajnis al li, ke li ne ekdormos; sed la laciĝo superis la eksciton.

Post kelke da horoj vekis lin sonoriloj kaj lumo. Estis jam noktomezo, kaj la astrologo venis prezenti al la sinjoro raporton pri la situacio de la steloj. La faraono aŭskultis ĝis la fino kaj diris:

—Ĉu vi ne povus, respektinda profeto, en la estonteco prezenti la raportojn al la nobla Sem?... Li ja anstataŭas min en la aferoj, kiuj koncernas la religion ...

La pastron astrologon forte mirigis la indiferenteco de la faraono al la ĉielaj aferoj.

—Via sankteco bonvolas forpuŝi la konsilojn, kiujn la steloj donas al la monarĥoj?...

—Donas? ripetis la faraono. — Diru do, kiaj estaj iliaj promesoj por mi?

La astrologo sendube atendis tian demandon, ĉar li respondis sen pripenso:

—La horizonto estas por momento vualita ... La sinjoro de la mondo ne trovis ankoraŭ la vojon de la vero, kiu instruas ekkoni la volon de la dioj. Sed pli aŭ malpli baldaŭ trovos ĝin, kaj sur ĝi longan kaj feliĉan vivon, plenan de gloro, regadon ...

—Bone!... Mi dankas vin, sankta viro. Nun kiam mi scias, kion mi devas serĉi, mi obeos la konsilojn, kaj vin mi ree petas, ke de nun vi komunikiĝu kun la respektinda Sem. Li estas mia anstataŭanto, kaj se vi legos ion interesan en la steloj, li komunikos al mi matene ...

La pastro forlasis la dormoĉambron, balancante la kapon.

—Oni interrompis mian dormon!... — diris la sinjoro kun malkontenta mieno.

—La plej respektinda reĝino Nikotris — diris subite la ad-

jutanto — antaŭ unu horo ordonis al mi peti aŭdiencon de via sankteco ...

—Nun?... Noktomeze? — demandis la sinjoro.

—Jes. Ŝi diris, ke noktomeze via sankteco vekigōs ...

La faraono pensis momenton kaj diris al la adjutanto, ke li atendas la reĝinon en la ora salono. Li pensis, ke tie neniu povos aŭskulti ilin.

La sinjoro ĵetis mantelon sur siajn ŝultrojn, surmetis nelaĉitajn sandalojn kaj ordonis bone lumigi la oran salonon. Poste li eliris, ordonante, ke la servistoj ne akompanu lin.

La patrino li jam trovis en la salono, en funebraj vestoj el dika tolo. Ekvidinte la faraonon, la respektinda sinjorino volis ree fali sur la genuojn, sed la filo levis ŝin kaj ĉirkaŭprenis.

—Ĉu okazis io grava, patrino, ke vi interrompas vian ripozon en tiel malfrua horo? — demandis li.

—Mi ne dormis ... mi preĝis ... — respondis ŝi. — Ho mia filo, vi bone divenis, ke la afero estas grava!... Mi aŭdis la dian voĉon de via patro ...

—Vere? — diris la faraono, sentante, ke la kolero plenigas lin.

—Via senmorta patro — daŭrigis la reĝino — diris al mi plena de malĝojo, ke vi suriras eraran vojon ... Vi malrespekte forpuŝas la ĉefpastran rangon kaj malestime agas kun la diaj servistoj.

”Kiu restos ĉe Ramzes — diris via dia patro — se li malkontentigos la diojn kaj se forlasos lin la sankta pastraro?... Diru al li ... diru al li — ripetis la respektinda ombro — ke tiamaniere li pereigos Egipton, sin mem kaj la dinastion ...”

—Oh, oh!... — ekkriis la faraono — jen kiel ili minacas min tuj en la unua tago de mia regado!... Mia patrino, la hundo

plej laŭte bojas, kiam ĝi timas, do la minacoj estas malbona antaŭdiro, sed nur por la pastroj!...

—Sed tion diris via patro ... — ripetis la ĉagrenita reĝino.

—La senmorta patro kaj sankta Amenhotep — respondis la faraono — konas mian koron kaj vidas la plorindan staton de Egipto. Kaj ĉar mia koro volas relevi la ŝtaton, forigante la trouzon, ili do ne povus min malhelpi plenumi miajn intencojn ...

—Vi do ne kredas, ke la spirito de via patro donas al vi konsilojn? — demandis la reĝino pli kaj pli terurita.

—Mi ne scias. Sed mi havas la rajton supozi, ke la voĉoj de la spiritoj, sonantaj en diversaj anguloj de nia palaco, estas ia artifiko de la pastroj. Nur la pastroj povas min timi; neniam la dioj kaj spiritoj ... Do ne la spiritoj timigas nin, patrino ...

La reĝino ekmeditis kaj oni povis vidi, ke la vortoj de la filo forte ŝin impresas. Ŝi vidis multajn miraklojn dum sia vivo, kaj kelkaj ankaŭ al ŝi ŝajnis suspektindaj.

—En tia okazo — respondis ŝi, sopirante — vi ne estas singarda, mia filo!... Posttagmeze estis ĉe mi Herhor, tre nekontenta de la aŭdienco ĉe vi ... Li diris, ke vi volas forigi la pastrojn de la korto ...

—Por kio mi bezonas ilin?... Por ke mia kuirejo kaj kelo havu grandajn elspezojn?... Aŭ eble por ke ili aŭskultu, kion mi parolas, kaj rigardu, kion mi faras?...

—La tuta lando indignos, kiam la pastroj konigos, ke vi estas malpia ... — intermetis la reĝino.

—La lando jam indignas, sed la pastroj estas kulpaj pri tio — respondis la faraono. — Kaj pri la pieco de la Egipta popolo mi komencas havi tute novan opinion ... Se vi, patrino, konus la nombron de procesoj pri malpiaĵoj al la dioj en Malsupra

Egipto, kaj pri ŝteloj en la Supra, vi konvinkiĝus, ke por nia popolo la pastraj aferoj jam ĉesis esti sanktaj.

—Tio estas la influo de la fremduloj, kiuj plenigas Egipton — ekkriis la reĝino. — Precipe de Fenicianoj ...

—Indiferente estas, kies; Egipto ne rigardas plu la statuojn kaj pastrojn, kiel superhomajn estaĵojn ... Kaj se vi aŭskultus, patrino, kion diras la nobeloj, oficiroj kaj soldatoj, vi komprenus, ke venis la tempo meti la reĝan povon en la loko de la pastra, se oni ne volas, ke ĉiu povo falu en la lando.

—Egipto estas via — sopiris la reĝino. — Via saĝo estas eksterordinara, faru do, kion vi volas ... Sed agu singarde, ho singarde!... La skorpiono, eĉ mortigita, povas vundi la nesingardan venkinton ...

Ŝi ĉirkaŭprenis lin, kaj la sinjoro revenis en sian ĉambron.

Li vidis jam klare, ke inter li kaj la pastroj komenĉiĝis batalo, aŭ ĝustadire io abomena, kio ne meritis eĉ la nomon de batalo kaj kontraŭ kio li, militestro, ne povis trovi en la unua momento efikan rimedon.

Ĉar kie estas la malamiko? Kontraŭ kiu devas marŝi lia fidela armeo?... Ĉu kontraŭ la pastroj, kiuj falas antaŭ li sur la vizaĝon? Ĉu kontraŭ la steloj, kiuj diras, ke la faraono ne suriris ankoraŭ la vojon de la vero? Kontraŭ kio kaj kontraŭ kiu batali?...

Eble la voĉojn de la spiritoj, sonantaj en la mallumo? Ĉu la propran patrinon, kiu terurigita petegas lin, ke li ne dispelu la pastrojn?...

La faraono tordiĝis sur la lito, sentante sian senfortecon. Subite venis al li jena penso: "Mi ne atentu la malamikon, kiu disfluas, kiel koto en la mano!... Oni babilu en la malplenaj salonoj ... oni koleru kontraŭ mia senpieco ... Mi donados la

ordonojn, kaj kiu kuraĝos ne plenumi ilin, estos mia malamiko, kaj kontraŭ li mi uzos la policon, tribunalon kaj armeon ...”

ĈAPITRO KVARA

Tiel da en la monato Hator, post tridek kvar jaroj de regado, mortis la faraono Mer-amen-Ramzes XII, la sinjoro de la du mondoj, la estro de la eterneco, la disdonanto de la vivo kaj de ĉia ĝojo.

Li mortis, ĉar li sentis, ke lia korpo fariĝas malforta kaj senutila. Li mortis, ĉar li sopiris al la eterna patrujo, kaj la regadon de la tera ŝtato li deziris konfidi al pli junaj manoj. Fine, li mortis, ĉar li tiel deziris, ĉar tia estis lia volo. La dia spirito forflugis, kvazaŭ akcipitro, kiu longe rondflugante super la tero, perdiĝas fine en la blua spaco.

Kiel lia vivo estis ĉeesto de senmorta estaĵo en la lando de la vanteco, same lia morto estis nur unu el la momentoj de superhoma estado.

La sinjoro vekigis ĉe la leviĝo de la suno kaj apogita sur du profetoj, ĉirkaŭita de pastroj, iris en la kapelon de Oziriso. Kiel ĉiutage, li revivigis la dion, lavis kaj vestis lin, faris oferon kaj levis la manojn por la preĝo.

Dume la pastroj kantis:

Ĥoro I. Honoro al vi, kiu leviĝas sur la horizonto kaj trakuras la ĉielon.

Ĥoro II. La vojo de via sankteco estas la feliĉo de tiuj, sur kies vizaĝojn falas viaj radioj ...

Ĥoro I. Ĉu vi povus iri, kiel vi iras, sen halto, ho suno?...

Ĥoro II. Granda migrulo de la spaco, vi kiu ne havas sin-

joron kaj por kiuj centoj da milionoj da jaroj estas nur unu palpebrumo ...

Ĥoro I. Vi subiras, sed vi daŭras. Vi multobligas la horojn, noktojn kaj tagojn, kaj vi mem daŭras laŭ viaj propraj leĝoj ...

Ĥoro II. Vi lumigas la teron, oferante vin mem per viaj propraj manoj, kiam en la figuro de Ra vi leviĝas sur la horizonto.

Ĥoro I. Ho stelo, kiu aperas, granda per via lumo, vi mem formas viajn membrojn ...

Ĥoro II. Kaj naskita de neniu, vi naskas vin mem sur la horizonto.

En tiu momento la faraono ekparolis:

”Ho vi, radiantanta sur la ĉielo! Permesu al mi eniri en la eternecon, kuniĝi kun la respektindaj kaj perfektaj ombroj de la supera lando. Kun ili mi rigardu viajn brilojn matene kaj vespere, kiam vi kuniĝas kun via patrino Nut. Kaj kiam vi turnos vian vizaĝon al la okcidento, leviĝu miaj manoj por la preĝo, por honori la vivon, ekdormantan post la montoj.”¹

Tiel kun la manoj levitaj al la ĉielo, parolis la sinjoro, ĉirkaŭita de la nubo de la incensoj. Subite li eksilentis, kaj falis posten en la brakojn de la asistantaj pastroj.

Li ne vivis plu.

La novaĵo pri la morto de la faraono kiel fulmo trakuris la palacon. La servistoj forlasis siajn okupojn, la estroj ĉesis kontroli la sklavojn, oni alarmis la gvardion kaj okupis ĉiujn enirojn.

En la ĉefa korto komencis kolektiĝi la amaso: kuiristoj, ĉevalistoj, kelistoj, virinoj de lia sankteco kaj iliaj infanoj. Unuj

1 Himno aŭtentika.

demandis, ĉu tio estas vera, aliaj miris, ke la suno lumas ankoraŭ sur la ĉielo, kaj ĉiuj kune kriis ĝis perdo de la spiro:

—”Ho sinjoro!... Ho nia patro!... Ho amata!... Ĉu eble estas, ke vi jam forlasis nin?... Ho jes, li jam iras al Abidos!... Al la okcidento, al la okcidento en la teron de la justuloj!... La loko, kiun vi amis, ĝemas kaj ploras!...”

Terura krio eksonis en ĉiuj kortoj, en la tuta parko. Ĝi resaltis de la orientaj montoj, la vento portis ĝin sur siaj flugiloj trans Nilon, kaj ĝi ektimigis la urbon Memfison.

Dume la pastroj preĝante metis la korpon de la mortinto en riĉa, fermita portilo. Ok pastroj stariĝis ĉe la teniloj, kvar prenis en la manojn ventumilojn el strutaj plumoj, aliaj incenson kaj prepariĝis eliri.

En ĉi tiu momento alkuris la reĝino Nikotris, kaj ekvidinte la korpon jam en la portilo, sin ĵetis al la piedoj de la mortinto.

—”Ho mia edzo, ho mia frato, ho mia amata!... — kriis ŝi, dronante en la larmoj. — Ha amata, restu kun ni, restu en via domo, ne foriru de la loko sur la tero, en kiu vi estas ...”

—”En paco, en paco, al la okcidento — kantis la pastroj — ho granda monarĥo, iru en paco al la okcidento ...”

—”Ho ve! — diris la reĝino — vi rapidas al la rivero, por transiri sur la alian bordon! Ho pastroj, ho profetoj ne rapidu, lasu lin; vi ja revenos hejmen, sed li iros en la landon de la eterneco ...”

—”En paco, en paco, al la okcidento!... — kantis la pastra ĥoro. — Se plaĉos al Dio, kiam venos la tago de la eterneco, ni ree ekvidos vin, ho sinjoro, ĉar vi jen iras en la landon, kiu kunigas ĉiujn homojn.”²

La respektinda Herhor donis signon. La servistinoj superforte forŝiris la reĝinon de la piedoj de la faraono kaj kondukis ŝin en ŝian ĉambron.

La portilo, portata de la pastroj, ekmoviĝis; la estro estis vestita kaj ĉirkaŭita, kiel dum la vivo. Dekstre kaj maldekstre, antaŭ kaj post li iris: generaloj, kasistoj, juĝistoj, grandaj skribistoj, portantoj de la hakilo kaj sago, kaj, antaŭ ĉio granda amaso da pastroj de ĉiuj rangoj.

En la korto la servistoj falis sur la vizaĝon, ĝemante kaj plorante, la armeo prezentis la armilojn kaj eksonis trumpetoj, kvazaŭ por saluti reĝon vivantan.

Kaj efektive la sinjoro kvazaŭ vivanta estis portata al la rivero. Kiam oni atingis Nilon, la pastroj starigis la portilon sur orita ŝipo, sub purpura baldakeno, kiel dum lia vivo.

Tie oni superŝutis la portilon per floroj, kontraŭ ĝi oni starigis la statuon de Anubis, kaj la reĝa ŝipo ekiris al la alia bordo de Nilo. La estron adiaŭis la ploroj de la servistoj kaj kortegaj virinoj.

Du horojn de la palaco, trans Nilo kaj trans la kanaloj, fruktoportaj kampoj kaj palmaj arbaroj, inter Memfiso kaj "Plata Altaĵo de Mumio" kuŝis stranga kvartalo. Ĉiuj ĝiaj konstruaĵoj estis destinitaj por la mortintoj, kaj loĝataj nur de kolŝitoj kaj paraŝitoj, kiuj enbalzamigadis la kadavrojn.

La kvartalo estis kvazaŭ vestiblo de la vera tombejo, ponto, kiu kunigis la vivantan socion kun la loko de la eterna ripozo. Tien estis alportataj la mortintoj kaj estis farataj el ili mumioj; tie familioj marĉandis kun la pastroj pri la prezo de la enterigo. Tie estis preparataj la sanktaj libroj kaj zonoj, ĉerkoj, mebloj, vazoj kaj statuoj por la mortintoj.

—Kiu venis? — oni demandis de interne.

—Oziriso Mer-amen-Ramzes, la sinjoro de du mondoj, venas al vi kaj postulas, ke vi preparu lin al la eterna vojaĝo — respondis la pastro.

—Ĉu estas eble, ke estingiĝis la suno de Egipto?... Ke mortis tiu, kiu mem estis la spiro kaj vivo?...

—Tia estis lia volo — respondis la pastro. — Akceptu do la sinjoron kun konvena respekto kaj faru al li ĉiujn servojn, por ke ne frapu vin punoj en ĉi tiu kaj en la estonta vivo.

—Ni faros, kiel vi deziras — respondis la voĉo.

Nun la pastroj lasis la portilon apud la pordo kaj rapide foriris, por ke ne falu sur ilin la malpura spiro de la kadavroj, amasigitaj en ĉi tiu loko. Restis nur la civilaj oficistoj, komandataj de la granda juĝisto kaj kasisto.

Post sufiĉe longa momento de atendado, la pordego malfermiĝis, kaj eliris el ĝi dekelko da homoj. Ili havis pastrajn vestojn kaj kovritajn vizaĝojn.

Vidante ilin, la juĝisto diris:

—Ni transdonas al vi la korpon de sinjoro via kaj nia. Faru kun ĝi, kion ordonas nia sankta religio, malzorgu nenion, por ke la granda mortinto ne estu per via kulpo maltrankviligita en la alia mondo.

La kasisto aldonis:

—Uzu oron, arĝenton, malakiton, turkisojn, jaspisojn, smeraldojn kaj plej multekostajn parfumojn por ĉi tiu sinjoro, por ke nenio manku al li kaj por ke li havu ĉion de la plej bona kvalito. Tion diras al vi mi, la kasisto. Kaj se troviĝus malnoblulo, kiu anstataŭ noblaj metaloj volus meti mizerajn falsajojn, kaj anstataŭ multekostaj ŝtonoj fenician vitron, li memoru, ke oni dehakos al li la manojn kaj elŝiros la okulojn.

—Estos farite, kiel vi postulas — respondis unu el la vualitoj.

La aliaj levis la portilon kaj eniris kun ĝi en la kvartalon de la mortintoj, kantante:

—Vi iras en paco al Abidos!... Atingu en paco la teban okcidenton!... Al la okcidento, al la okcidento, al la tero de la justuloj!...

La pordego fermiĝis, kaj la plej alta juĝisto kaj la oficistoj, akompanantaj lin, revenis al la rivero kaj palaco.

Dume la vualitoj transportis la portilon en grandegan konstruaĵon, kie oni enbalzamigadis la kadavrojn de la reĝoj kaj de tiuj altranguloj, kiuj akiris specialan favoron de la faraono. Ili haltis en la vestiblo, kie staris ŝipeto sur malgrandaj radoj, kaj komencis elpreni la mortinton el la portilo.

—Rigardu! — ekkriis unu el la vualitoj — ĉu ili ne estas ŝtelistoj?... La faraono ja mortis en la kapelo de Oziriso, li do devis esti en solena vesto ... Kaj jen ĉi tie: anstataŭ oraj braceletoj — kupraj, la ĉeno ankaŭ estas kupra kaj en la ringoj estas falsitaj ŝtonoj ... Mi dezirus scii, kiu tiel servis lin, la pastroj aŭ la skribistoj?

—Certe la pastroj ... Friponoj, sekiĝu viaj manoj!... Kaj tiaj friponoj kuraĝas admoni nin, ke oni donu al la mortinto ĉion de la plej bona kvalito ...

—Ne ili postulis, sed la kasisto ...

—Ili ĉiuj estas ŝtelistoj ...

Parolante tiel, ili demetis de la mortinto la reĝajn vestojn, surmetis al li negliĝan robon, broditan per oro kaj transportis la kadavron en la ŝipeton.

—Ni danku la diojn — diris unu el la vualitoj — ke ni jam

havas novan sinjoron. Ĉi tiu faros ordon kun la pastraro ...
Kion ili prenis per la manoj, tion ili redonos per la buŝo ...

—Oni diras, ke tio estos severa estro — respondis alia. —
Li estas en bonaj rilatoj kun Fenicianoj, amas la societaton de
Pentuer kiu ja ne devenas de la pastroj sed de tiaj mizeruloj,
kiel ni ... Kaj la armeo, oni diras, lasus sin bruligi kaj dronigi
por la nova faraono!...

—Kaj en la lastaj tagoj li glore venkis la Libianojn ...

—Kie li estas, ĉi tiu nova faraono? — demandis alia. — En
la dezerto!... Mi timas, ke antaŭ lia reveno okazos al li ia mal-
feliĉo ...

—Kion oni povas fari al li, se post li staras la armeo! Mi ne
ĝisvivu bonan enterigon, se la juna sinjoro ne faros kun la
pastroj, kiel la bubalo kun tritiko ...

—Vi malsaĝulo — intermetis alia, kiu silentis ĝis nun. — La
faraono venkos la pastrojn?...

—Kial ne?...

—Ĉu vi vidis iam leonon, kiu disŝiris piramidon?...

—Kion vi babilas!

—Aŭ bubalon, kiu ĝin renversis?

—Kompreneble, ĝi ne povas tion fari.

—Kaj la ventego?

—Ĉu la diablo inspiris al vi hodiaŭ la demandojn?...

—Bone, mi diras al vi, ke leono, bubalo aŭ vento pli facile
renversos piramidon, ol la faraono venkos la pastraron ... Eĉ
se la faraono estus leono, bubalo kaj vento en unu persono ...

—Vi, malsupre!... — oni kriis de supre. — Ĉu la mortinto
jam estas preta?

—Jam ... Jam ... nur lia makzelo refalas — oni respondis el
la vestiblo.

—Indiferente ... Rapide donu lin ĉi tien, ĉar Izido post unu horo devas iri en la urbon.

Post momento la ora ŝipeto kun la kadavro estis per ŝnuroj levita supren, sur la eksteran balkonon.

El la vestiblo oni eniradis en grandan salonon, blue kolorigitan kaj ornamitan per flavaj steloj. Sur la tuta longo de la salono al unu el la muroj estis alkroĉita kvazaŭ balkono, arkforma, kies ekstremoj leviĝis unu etaĝon, la mezo unu kaj duonon.

La salono prezentis la ĉielan firmamenton, la balkono la vojon de la suno sur la ĉielo, kaj la faraono devis esti Oziriso, aŭ la suno, kiu iras de la oriento al la okcidento.

Malsupre staris amaso da pastroj kaj pastrinoj, kiuj, atendante la solenon, parolis pri indiferentaj aferoj.

—Preta!... — oni kriis de la balkono.

La interparoladoj eksilentis. Supre trifoje eksonis bronza lado kaj sur la balkono aperis la orita ŝipeto de la suno, en kiu veturis la mortinto.

”Jen li aperas en nubo, por apartigi la ĉielon de la tero, kaj poste kunigi ilin ...

Senĉese kaŝita en ĉiu objekto, li estas la sola vivanta, en kiu eterne ekzistas ĉiuj aferoj ...”

La ŝipeto iom post iom leviĝis al la mezo de la arko kaj fine haltis sur la supro.

Tiam sur la malsupra ekstremo de la arko aperis pastrino, alivestita, kiel la diino Izido, kun la filo Horus, kaj same malrapide komencis supreniri. Tio estis la bildo de la luno, kiu sekvas la sunon.

Nun la ŝipeto de la supro de la arko komencis malleviĝi al la okcidento, kaj malsupre ree eksonis la ĥoro:

”Dio, enkorpigita en ĉiuj objektoj, spirito Ŝu en ĉiuj dioj. Li estas la korpo de la vivanta homo, kreinto de la arbo, kiu portas fruktojn, li estas la kaŭzo de la fruktigaj superakvoj. Sen li nenio vivas en la tera spaco.”³

La ŝipeto malaperis sur la okcidenta ekstremo de la balkono, Izido kun Horus haltis sur la supro de la arko. Tiam al la ŝipeto alkuris aro da pastroj: ili elprenis la kadavron de la faraono, metis ĝin sur marmora tablo, kvazaŭ Ozirison por ripozo post la taga laboro.

Nun al la mortinto proksimiĝis paraŝito, alivestita kiel la dio Tifono. Sur la kapo li havis teruran maskon kaj vilan flavruĝan perukon, sur la dorso haŭton de apro, kaj en la mano ŝtonan etiopian tranĉilon.

Li komencis rapide detranĉi plandojn de la mortinto.

—Kion vi faras al la dormanto, frato Tifono? — demandis lin Izido de la balkono.

—Mi skrapas la piedojn de mia frato Oziriso, por ke li ne malpurigu la ĉielon per la tera polvo — respondis la paraŝito, alivestita kiel Tifono.

Fortranĉinte la plandojn, la paraŝito prenis kurban metal-fadenon, metis ĝin en la nazon de la mortinto kaj komencis eltiri la cerbon. Poste li distranĉis la ventron kaj tra la truo rapide eltiris la intestojn, koron kaj pulmojn.

Dume la helpantoj de Tifono alportis kvar grandajn urnojn, ornamitajn per la kapoj de la dioj: Hape, Emset, Duamut kaj Kebhsneuf, kaj en ĉiun el la urnoj metis iun internan organon de la mortinto.

—Kion vi faras tie, frato Tifono? — demandis duan fojon Izido.

3 Aŭtentika.

—Mi purigas mian fraton Ozirison de la teraj aferoj, por ke li fariĝu pli bela — respondis la paraŝito.

Apud la marmora tablo estis baseneto, kies akvo estis saturita per sodo. La paraŝitoj, puriginte la kadavron, ĵetis ĝin en la baseneton, en kiu ĝi devis malsekiĝi sepdek tagojn.

Dume Izido, trairante la tutan balkonon, proksimiĝis al la ĉambro, en kiu la paraŝito ĵus malfermis kaj purigis la reĝajn restaĵojn. Ŝi demandis terurita:

—Kie estas mia frato?... kie mia dia edzo?...

Subite ektondris, eksonis trumpetoj kaj bronzaĵoj, kaj la paraŝito, alivestita kiel Tifono, eksplodis de rido kaj ekkriis:

—Bela Izido, kiu kun la steloj gajigas la noktojn, ne ekzistas plu via edzo!... Neniam plu la radianta Oziriso sidiĝos sur la orita ŝipeto, neniam plu la suno sin montros sur la firmamento ... Mi faris tion, mi Set, kaj mi kaŝis lin tiel profunde, ke neniu dio, eĉ ĉiuj kune retrovos lin!...

Ĉe tiuj vortoj la diino disŝiris la vestojn, komencis ĝemi kaj elŝiri siajn harojn. Ree eksonis la trumpetoj, tondroj kaj sonoriloj, inter la pastroj kaj pastrinoj leviĝis murmureto, poste krio, malbenoj kaj fine ĉiuj ĵetis sin sur Tifonon, kriante:

—Malbenita spirito de la mallumo!... Vi, kiu ekscitas la ventojn de la dezerto, boligas la maron, kovras la teran lumon!... Falu en senfundaĵon, el kiu ne povus vin liberigi eĉ la patro de la dioj ... Malbenita, malbenita Set!... Via nomo estu teruro kaj abomeno!...

Tiel malbenante, ĉiuj ĵetis sin kun pugnoj kaj bastonoj sur Tifonon; la malbela dio komencis forkuri kaj fine malaperis el la salono.

Ree tri sonoj de la bronzaĵoj, kaj la soleno estis finita.

—Sufiĉe! — ekkriis la plej maljuna pastro al la aro, kiu jam

efektive komencis interbatali. — Vi, Izido, povas iri en la urbon, la ceteraj al aliaj mortintoj, kiuj atendas nin ... Ne malzorgu la simplajn mortintojn, ĉar ni ne scias, kiel oni pagos al ni por ĉi tiu ...

—Certe ne multe! — intermetis la paraŝito. — Oni diras, ke en la trezorejo restis nenio, kaj Fenicianoj minacas, ke ili ĉesos pruntedoni, se ili ne ricevos novajn rajtojn ...

—La morto ekstermu viajn Fenicianojn!... Baldaŭ oni devos almozpeti de ili hordean panon; ĉion ili jam proprigis al si ...

—Sed se ili ne donos monon al la faraono, ni ricevos nion por la enterigo ...

Iom post iom eksilentis la interparoladoj kaj la ĉeestantoj forlasis la bluan salonon. Restis nur gardistoj ĉe la baseneto kun la restaĵoj de la faraono.

La tuta soleno, prezentanta la mortigon de Oziriso (la suno) per Tifono (la dio de la mallumo kaj krimo) servis, por distranĉi kaj purigi la restaĵojn de la faraono, kaj tiel prepari ilin por la enbalzamigo.

Sepdek tagojn la mortinto kuŝis en la akvo, saturita per sodo, kredeble kiel rememoraĵo, ke la malbona Tifono dronigis la korpon de la frato en Sodaj Lagoj. Dum la tuta tempo, matene kaj vespere, la pastrino, alivestita kiel Izido, venis en la bluan salonon. Tie, ĝemante kaj elŝirante al si la harojn, ŝi demandis la ĉeestantojn: ĉu oni vidis ŝian dian edzon kaj fraton?

Kiam pasis la tempo de la funebro, Horus, la filo kaj posteulo de Oziriso, aperis en la salono kaj li, fine, rimarkis la banujon.

—Eble ĉi tie oni devus serĉi la restaĵojn de mia patro kaj frato? — demandis Horus.

Ili komencis serĉi, trovis kaj, kun granda ĝojo de la pastroj, ĉe sonoj de la muziko elprenis la korpon de la faraono el la fortiga bano.

Oni enmetis la korpon en ŝtonan tubon, tra kiu dum kelke da tagoj pasis varmega aero, kaj sekiginte oni transdonis al la enbalzamigistoj.

Nun komenciĝis la plej gravaj ceremonioj, kiujn sur la faraono plenumis la plej altaj pastroj de la kvartalo de mortintoj.

La korpon de la mortinto, turninte la kapon al la sudo, oni lavis per sanktigita akvo, kaj ĝian internon per palma vino. Sur la planko, surŝutita per cindro, sidis larmistinoj, kaj elŝirante al si harojn, gratante al si vizaĝojn, ploris la mortinton. Ĉirkaŭ la funebra lito kolektiĝis pastroj, alivestitaj kiel dioj: Izido, nuda, kun la krono de la faraonoj, la junula Horus, Anubis kun ŝakala kapo, Tot, kun birda kapo kaj kun tabletoj en la mano, kaj multaj aliaj.

Sub la kontrolo de ĉi tiu respektinda aro, specialistoj komencis plenumi la internon de la mortinto per forte odorantaj herboj, segaĵoj, kaj eĉ ili verŝis tien odorajn arbajn sukojn, seninterrompe preĝante. Poste, anstataŭ liaj propraj, oni metis al li vitrajn okulojn, enkadrigitajn en bronzo.

Oni surŝutis la tutan korpon per soda pulvoro.

Nun elpaŝis alia pastro, kaj klarigis al la ĉeestantoj, ke la korpo de la mortinto estas la korpo de Oziriso kaj liaj ecoj estas la ecoj de Oziriso: la miraklaj ecoj de lia maldekstra tempio estas la ecoj de la tempio de la dio Tumu; lia dekstra okulo estas la okulo de la dio Tumu, kies radioj trapenetas la mallumon. Lia maldekstra okulo estas la okulo de Horus, kiu ekstermas ĉiujn vivantajn kreaĵojn; la supra lipo estas Izi-

do, la malsupra — Neftis. La kolo de la mortinto estas diino, la manoj estas diaj animoj, la fingroj estas ĉielaj serpentoj, la filoj de la diino Selkit. Liaj flankoj estas du plumoj de Amon, la dorso estas la spino de Sibū, la ventro estas la flanko de Nue.⁴

Alia pastro diris:

—”Oni donis al mi buŝon por paroli, piedojn por paŝi, manojn por faligi malamikojn. Mi reviviĝas, mi ekzistas, mi malfermas la ĉielon; mi faras tion, kion oni ordonis al mi en Memfiso.”⁵

Dume sur la kolo de la mortinto oni pendigas bildon de skarabo, faritan el multekosta ŝtono, kun surskribo:

”Ho mia koro, kiun mi ricevis de mia patrino; ho mia koro, kiun mi havis, kiam mi estis sur la tero, ne leviĝu kaj ne atestu kontraŭ mi en la tago de la juĝo.”⁶

Nun ĉiun manon kaj piedon, ĉiun fingron de la mortinto oni ĉirkaŭvolvis per rubandoj, sur kiuj estis skribitaj preĝoj kaj ĵuroj. Sur la brusto kaj kolo oni metis tutajn manuskriptojn de ”La libro de la mortintoj” kun la sekvantaj meditoj, kiujn la pastroj voĉe legis super la mortinto:

”Mi estas tiu, kontraŭ kiu neniu dio starigas barojn.

Kiu li estas?

Li estas Tum sur la ŝildo, li estas Ra sur la ŝildo, kiu leviĝas en la okcidento de la ĉielo.

Mi estas Hieraŭo kaj mi konas la Morgaŭon.

Kiu li estas?

4 Maspero.

5 Aŭtentika.

6 Aŭtentika.

Hieraŭo estas Oziriso, Morgaŭo estas Ra, en la tago, kiam li detruos la malamikojn de la Sinjoro, kiu estas super ĉio, kaj kiam li oferos sian filon Horuson. Per aliaj vortoj: en la tago, kiam la ĉerkon de Oziriso renkontos lia patro Ra, Li venkos la diojn, laŭ la ordono de Oziriso, la sinjoro de la monto Amenti.

Kio ĝi estas?

Amenti estas kreaĵo de la animoj de la dioj, laŭ la ordono de Oziriso, la sinjoro de la monto Amenti. Per aliaj vortoj: Amenti estas la ekscito, kaŭzita de Ra; ĉiu dio, kiu venas tien, batalas. Mi konas grandan dion, kiu loĝas tie.

Mi estas el mia lando, mi venas el mia urbo, mi detruas la malbonon, forigas tion, kio restas ne bona, kaj forpuŝas de mi la malpuraĵon. Mi atingas la landon de la ĉielanoj, mi eniras tra potenca pordego.

Ho, vi, kunuloj, donu al mi la manon, ĉar mi estos unu el vi.”⁷

Kiam ĉiu membro de la mortinto jam estas ĉirkaŭvolvita per la rubandoj, kaj armita per amuletoj, kiam li jam posedas sufiĉan provizon da meditoj, kiuj permesos al li orienti sin en la lando de la dioj, oni devas zorgi pri dokumento, kiu malfermos al li la pordegon de tiu lando.

Ĉar inter la tombo kaj ĉielo la mortinton atendas kvardek du teruraj juĝistoj, kiuj sub prezido de Oziriso esploras lian teran vivon. Nur kiam la koro de la mortinto, metita sur pelson de la justeco, montriĝos egala al la diino de la vero, kaj kiam la dio Dutes, notanta sur tabuletoj agojn de la mortinto, juĝos ilin bonaj, nur tiam Horus prenas la animon je la mano kaj kondukas antaŭ la tronon de Oziriso.

7 "La libro de la mortintoj".

Por ke la mortinto povu sin senkulpigi antaŭ la tribunalo, oni devas involvi lian mumion en papiruson, sur kiu estas skribita lia ĝenerala konfeso. Dum la envolvado la pastroj diras laŭte kaj klare, por ke la mortinto nenion forgesu:

—”Estroj de la vero, mi alportas al vi nur la veron. Al neniu homo mi faris perfide malbonon, neniun el miaj proksimumoj mi faris malfeliĉa ... Neniam mi estis maldeca, neniam mi diris maldecan vorton en la domo de la vero. Mi ne estis intima kun la malbono. Mi ne faris malbonon. Kiel estro mi ne ordonis al miaj subuloj labori super iliaj fortoj. Neniu per mia kulpo fariĝis timema, mizera, suferanta, malfeliĉa. Mi faris nenion, kion malestimus la dioj. Mi ne turmentis la sklavojn. Mi ne lasis ilin malsataj. Mi ne igis ilin plori. Mi ne mortigis. Mi ne ordonis fortigi perfide. Mi ne mensogis. Mi ne rabis trezorojn de la temploj. Mi ne malgrandigis la enspezojn, oferitajn al la dioj. Mi ne ŝtelis panon, nek zonojn de la mumioj. Mi ne pekis kontraŭ la pastro de mia distrikto. Mi ne forprenis, nek malgrandigis lian havon. Mi ne forŝiris infanon de la brusto de ĝia patrino. Neniam mi agis brute. Mi ne uzis falsan pesilon. Mi ne kaptis birdojn. Mi ne malhelpis leviĝon de la akvo. Mi ne deturnis fluon de la kanaloj. Mi ne estingis fajron en nekonvena momento. Mi ne ŝtelis la oferojn de la dioj, kiujn ili elektis. Mi estas pura ... Mi estas pura ... Mi estas pura ...”⁸

Kiam la mortinto, dank'al "La Libro", jam sciis, kiel agi en la eterna lando, kaj, antaŭ ĉio, kiam li sciis, kiel senkulpigi sin antaŭ la tribunalo de la kvardek du dioj, tiam la pastroj armis

8 Ĉapitro 75-a de "La libro de la mortintoj". Tio estas unu el la plej altideaj dokumentoj, kiujn lasis al ni la antikva mondo

lin ankaŭ per la antaŭparolo de ĉi tiu libro kaj klarigis al li ĝian grandan gravecon.

Por tiu celo la enbalzamigistoj, ĉirkaŭantaj la freŝan mumion de la faraono, foriris, kaj venis la ĉefa pastro de la distrikto kaj murmuretis al la mortinto en la orelon:

—”Sciu, ke posedante ĉi tiun libron, vi apartenos al la vivantaj kaj akiros grandan influon ĉe la dioj. Sciu, ke dank’al ĝi neniuj kuraĝos kontraŭstari al vi. La dioj mem proksimiĝos al vi kaj ĉirkaŭprenos vin, ĉar vi apartenos al ilia rondo.

Sciu, ke la libro permesos al vi ekscii, kio estis en la komenco. Neniu homo publikigis ĝin, neniu okulo ĝin vidis, neniu orelo ĝin aŭdis. La libro estas la vero mem, sed neniu kaj neniam konis ĝin. Estu ĝi videbla nur por vi kaj por tiu, kiu ĝin al vi donis. Ne aldonu al ĝi komentariojn, kiujn povus dikti via memoro aŭ via fantazio. Ĝi estas skribita tuta en la ĉambro, kie oni enbalzamis la mortintojn. Tio estas granda mistero, kiun konas neniu ordinara homo, neniu en la mondo.

La libro estos via nutraĵo en la malsupra lando de la spiritoj, ĝi liveros al via animo rimedojn por restadi sur la tero, donos al vi vivon eternan kaj faros, ke neniu havos povon super vi.”⁹

Oni riĉe vestis la reĝajn restaĵojn, metis oran maskon sur la vizaĝon, ringojn kaj braceletojn sur la krucitajn brakojn. Sub la kapon oni metis eburan apogilon, sur kiu ordinare dormas Egiptanoj. Fine, oni fermis la korpon en tri ĉerkoj; papera, kovrita per surskriboj, orita cedra kaj marmora. La du unuaj estis plene adaptitaj al la korpo de la mortinto; eĉ la skulptita vizaĝo estis simila, sed ridanta.

9 “La libro de la mortintoj”, ĉapitro 148-a.

Post trimonata restado en la kvartalo de la mortintoj, la mumio de la faraono estis preta al la solena enterigo. Oni ree transportis ĝin en la reĝan palacon.

ĈAPITRO KVINA

Dum sepdek tagoj, dum kiuj la respektindaj restaĵoj malsekiĝis en la soda akvo, Egipto portis funebrajn vestojn.

La temploj estis fermitaj, oni ne faris procesiojn. Eksilentis ĉiu muziko, oni ne aranĝis festojn, la dancistinoj fariĝis ploristinoj, kaj anstataŭ danci, ŝiris siajn harojn, kio ankaŭ alportis al ili profiton.

Oni ne trinkis vinon, oni ne manĝis viandon. La plej grandaj altranguloj estis en dikaj vestoj, nudpiede. Neniu sin razis (ekster la pastroj), la plej fervoraj eĉ ne lavis sin, sed ŝmiris siajn vizaĝojn per koto, kaj ŝutis cindron sur la harojn.

De Mediteraneo ĝis la unua katarakto de Nilo, de la libia dezerto ĝis la duoninsulo Sinai, regis silento kaj malĝojo. Estingiĝis la lumo de Egipto, foriris al la okcidento kaj forlasis siajn servistojn la sinjoro, kiu donadis ĝojon kaj vivon.

En la alta societo plej modaj estis la interparoladoj pri la ĝenerala malĝojo, kiu ekregis eĉ la naturon.

—Ĉu vi ne rimarkis — parolis altrangulo al altrangulo — ke la tagoj estas pli mallongaj kaj pli mallumaj?

—Mi ne kuraĝis tion diri al vi — respondis la alia — sed efektive estas tiel. Mi eĉ rimarkis, ke malpli da steloj lumas nokte kaj ke la plena luno daŭras malpli longe, kaj ke la nova luno pli longe ol ordinare.

Paŝtistoj diras, ke la brutoj ne volas manĝi en la paŝtejoj, ili nur blekas ...

—Mi aŭdis de ĉasistoj, ke la plorantaj leonoj ne atakas plu kapreolojn, ĉar ili ne manĝas viandon.

—Teruraj tempoj!... Venu al mi hodiaŭ vespere, kaj ni trinkos glason da funebra fluidaĵo, kiun elpensis mia kelisto.

—Mi scias, sendube vi havas la nigran sidonan bieron?...

—La dioj gardu nin trinki en la nuna tempo gajigajn trinkaĵojn! Tio, kion elpensis mia kelisto, ne estas biero ... Pli ĝustadire mi komparus ĝin kun vino, saturita per muskato kaj bonodoraj herboj.

—Tre konvena trinkaĵo en la tempo, kiam nia sinjoro restas en la kvartalo de mortintoj, kiu ĉiam spiras odoron de la muskato kaj bonodoraj herboj.

Tiel dum sepdek tagoj ĉargreniĝis la altranguloj.

Unua ekstremo de ĝojo trakuris Egipton en la momento, kiam el la kvartalo de la mortintoj oni konigis, ke la korpon de la sinjoro oni elprenis el la soda bano kaj ke la enbalzamigistoj kaj pastroj jam komencis la ceremoniojn.

En tiu tago oni unuafoje tondis la harojn, forigis la koton de la vizaĝoj, kaj kiu sentis deziron, lavis sin. Efektive, ne ekzistis plu kaŭzo malĝoji: Horus trovis la restaĵojn de Oziriso; la estro de Egipto, dank'al la arto de la enbalzamigistoj, retrovis la vivon, kaj dank'al la preĝoj de la pastroj kaj al "La libro de la mortintoj" fariĝis egala al la dioj.

De tiu momento la mortinta faraono Mer-amen-Ramzes estis oficiale nomata Oziriso; neoficiale oni nomis lin tiel tuj post la morto.

Gajeco de la Egipta popolo komencis forigi la funebbron,

precipe inter la soldatoj, metiistoj kaj vilaĝanoj. Inter la simpla popolo la ĝojo eksplodis iafoje en nekonvena formo.

Famoj komencis rondiri, oni ne scias de kie, ke la nova faraono, kiun la popolo jam amis instinkte, volas plibonigi la sorton de la vilaĝanoj, laboristoj, eĉ sklavo.

Kaj tial (kia skandalo!) okazis, ke la masonistoj, lignaĵistoj kaj potistoj, anstataŭ trinki trankvile kaj paroli pri familiaj aferoj, kuraĝis en drinkejoj ne nur plendi pri la impostoj, sed eĉ indigni kontraŭ la povo de la pastroj. La vilaĝanoj, anstataŭ preĝi dum libera tempo kaj honori la antaŭulojn, parolis unuj al aliaj: kiel bone estus, se ĉiu el ili posedus kelke da bedoj da tero kiel propraĵon kaj povus ripozi ĉiun sepan tagon!

Senutile estus paroli pri la soldatoj, precipe pri la fremdlandaj regimentoj. Ili imagis, ke ili estas la plej eminenta klaso de Egipto, aŭ se ili ne estas, ili baldaŭ estos, post sukcesa milito, kiu devis eksplodi.

Kontraŭe, la nomarĥoj, nobeloj, kaj precipe la ĉefpastroj solene portis la funebrojn je la mortinta sinjoro, kvankam oni jam povis ĝoji, kiam la faraono fariĝis Oziriso.

Ĝustadire la nova estro faris ankoraŭ malbonon al neniu, la kaŭzo do de la malĝojo de la altranguloj estis nur famoj, la samaj, kiuj ĝojigis la simplan popolon. La nomarĥoj kaj nobeloj sentis agacon ĉe la penso, ke ilia kamparano povus resti senokupa kvindek tagojn en la jaro, kaj kio estas pli malbona, posedi kiel propraĵon teron, eĉ se ĝi sufiĉus nur por konstrui tombon. La pastroj paliĝis kaj kunpremis la dentojn, rigardante la administradon de Ramzes kaj manieron, kiel li agis kun ili.

Efektive, en la palaco de la reĝo farigis grandaj ŝanĝoj.

La faraono transportis sian loĝejon en flankan konstruaĵon, en kiu preskaŭ ĉiujn ĉambrojn okupis generaloj. En la subtera etaĝo li loĝigis grekajn soldatojn, supre gvardiistojn, en la ĉambroj ĉe la muro Etiopianojn. Ĉirkaŭ la palaco staris garde Azianoj, kaj apud la ĉambroj de lia sankteco la skadrono, kiu kun Ramzes persekutis Tehennan en la dezerto.

Pli malbone estis, ke lia sankteco, malgraŭ la lasta ribelo de Libianoj, redonis al ili sian favoron, punis neniun, kontraŭe, donacadis al ili sian konfidon.

Estas vere, ke la pastroj, kiuj estis en la ĉefa palaco, restis tie kaj plenumis la religiajn ceremoniojn, direktatajn de Sem. Sed ĉar la pastroj ne akompanis la faraonon ĉe la matena, taga kaj vespera manĝo, ilia nutraĵo fariĝis tre simpla.

Vane la sanktaj viroj rememorigis, ke ili devas nutri reprezentantojn de deknaŭ dinastioj kaj multe da dioj. La trezoristo, divenante la intencojn de la faraono, respondis al la pastroj, ke al la dioj kaj antaŭuloj sufiĉos floroj kaj parfumoj, kaj ke la profetoj mem, kiel ordonas la moraleco, devas manĝi hordean panon kaj trinki akvon aŭ bieron. Kiel argumentoj por sia malĝentila teorio la trezoristo citis la ekzemplon de la ĉefpastro Sem, kiu vivis kiel pentofaranto; fine la trezoristo ripetis, ke lia sankteco kun la generaloj manĝas nur soldatan nutraĵon.

La palacaj pastroj komencis silente konsideri, ĉu ne pli prudente ili agos, se ili forlasos la avaran reĝan domon, kaj transloĝiĝos en la proprajn domojn apud la temploj, kie iliaj devoj estos malpli ŝarĝaj kaj la malsato ne tordos iliajn internaĵojn.

Kaj eble ili senprokraste farus tion, se la plej respektindaj Herhor kaj Mefres ne ordonus al ili resti sur la posteno.

La situacio de Herhor ĉe la nova sinjoro ankaŭ ne povis esti nomata tre feliĉa. La ministro, antaŭ nelonge ĉiopova, kiu iam preskaŭ ne forlasadis la reĝajn ĉambrojn, sidis nun sola en sia palaco kaj ofte dum tutaj dekaĵoj ne vidis la faraonon. Li estis ankoraŭ la milita ministro, sed li preskaŭ ĉesis doni ordonojn. Ĉiujn militajn aferojn la faraono plenumis mem. Li mem legis la raportojn de la generaloj, mem solvis neklarajn demandojn, kaj liaj adjutantoj prenis el la milita ministrejo la necesajn dokumentojn.

Lia ekscelenco Herhor estis vokata al la monarĥo preskaŭ nur por ricevi riproĉojn.

Tamen ĉiuj altranguloj devis konfesi, ke la nova faraono multe laboras.

Ĉiutage Ramzes XIII vekigis antaŭ la leviĝo de la suno, sin banis kaj bruligis incenson antaŭ la statuo de Oziriso. Tuj poste li aŭskultis raportojn de la plej alta juĝisto, de la plej alta skribisto de la grenejoj kaj staloj de la tuta lando, fine de la intendanto de siaj palacoj. La lasta plej multe suferis; preskaŭ ne estis tago, en kiu la sinjoro ne diris al li, ke la kortego kostas tro multe kaj estas tro multenombra.

Efektive, en la reĝa palaco loĝis kelkcento da virinoj de la mortinta faraono kun konvena nombro da infanoj kaj servistoj. La intendanto, senĉese admonata, ĉiutage forpelis dekelkon da personoj kaj limigis elspezojn al la ceteraj. Post unu monato, ĉiuj kortegaj sinjorinoj kun ploro kaj krio kuris en la loĝejon de la reĝino Nikotris, petegante helpon.

La respektinda reĝino tuj iris al la monarĥo; falinte sur la vizaĝon, ŝi petis, ke li ekkompatu la virinojn de sia patro kaj ne lasu ilin morti de mizero.

La faraono aŭskultis kun sulkigita frunto kaj ordonis al la

intendanto ĉesigi la ŝparadon. Sed samtempe li diris al la plej respektinda sinjorino, ke post la enterigo de la patro la virinoj estos forigitaj el la palaco kaj dissenditaj en la bienojn.

—Nia kortego — diris li — kostas ĉirkaŭ tridek mil talentojn jare, tio estas duonon pli multe, ol la tuta armeo. Tian sumon mi ne povas elspezi, ne ruinigante min kaj la ŝtaton.

—Faru, kiel vi volas — respondis la reĝino. — Egipto estas via. Sed mi timas, ke la dispelitaj korteganoj fariĝos viaj malamikoj.

Aŭdante tion, la sinjoro prenis la patrinojn je la mano, kondukis ŝin al la fenestro kaj montris arbaron de lancoj de la soldatoj, kiuj ekzerciĝis en la korto.

Ĉi tiu ago de la faraono havis neatenditan rezulton. En la okuloj de la reĝino, kiuj antaŭ unu momento estis plenaj de larmoj, ekbrilis fiero. Subite ŝi klinis sin kaj kisis la manon de la filo, parolante per kortuŝita voĉo:

—Vere, vi estas la filo de Izido, kaj mi faris bone, cedante vin al la diino ... Egipto fine havas estron!...

De tiu tempo la respektinda sinjorino neniam kaj en neniu afero protektis iun al la filo. Kaj kiam oni petis pri tio, ĉiam ŝi respondis:

—Mi estas servistino de lia sankteco kaj mi konsilas al vi plenumi sen kontraŭstaro la ordonojn de lia sankteco. Ĉio, kion li faras, venas de la inspiro de la dioj. Kaj kiu povus kontraŭstari al la dioj?...

Post la matenmanĝo la faraono sin okupis pri la militaj kaj financaj aferoj, kaj je la tria horo posttagmeze, akompanata de granda sekvantaro, li veturis al la armeo, kies tendaro estis apud Memfiso, kaj rigardis la ekzercojn.

Efektive, la plej grandaj ŝanĝoj fariĝis en la militaj aferoj de la ŝtato.

En la daŭro de kvin monatoj lia sankteco formis du novajn regimentojn, aŭ pli ĝuste revivigis tiujn, kiuj estis nuligitaj dum la antaŭa regado. Li forigis la oficirojn drinkemajn kaj ludemajn, kaj tiujn, kiuj turmentis la soldatojn.

En la oficejojn de la milita ministrejo, kie antaŭe laboris nur pastroj, li enkondukis siajn plej kapablajn adjutantojn, kiuj baldaŭ prenis en siajn manojn gravajn dokumentojn pri la armeo. Li ordonis fari liston de ĉiuj viroj en la regno, kiuj iam apartenis al la milita klaso, sed de dekelko da jaroj plenumis neniujn oficojn kaj mastrumis en siaj bienoj. Li fondis du novajn oficirajn lernejojn por infanoj, komencante de dek jaroj, kaj renovigis la antaŭan moron, ke la milita junularo ricevadu la matenmanĝon nur post trihora marŝo, en vicoj kaj kolonoj.

Fine, neniuj taĉmento havis la rajton loĝi en kamparoj; ĉiu devis esti en la kazernoj aŭ en la tendaro. Ĉiu regimento havis sian placon por la ekzercoj, kie tutan tagon oni uzis ŝtonĵetilojn, aŭ arkpafis al ŝildoj, starigitaj en interspaco de cent ĝis ducent paŝoj.

Estis ankaŭ proklamita ordono al la familioj de la milita klaso, ke la viroj ekzerciĝu en la ĵetado de ŝtonoj, sub direkto de la oficiroj kaj dekestroj de la regula armeo. Senprokraste oni plenumis la ordonon, kaj Egipto, jam du monatojn post la morto de Ramzes XII, havis aspekton de tendaro.

Eĉ la kamparaj kaj urbaj infanoj, kiuj ĝis nun ludis je skribistoj kaj pastroj, imitante la plenaĝulojn, komencis ludi je soldatoj. Sur ĉiu placo kaj en ĉiu ĝardeno, de la mateno ĝis la

vespero, fajfis ŝtonoj kaj sagoj, kaj la tribunaloj estis superŝutitaj per plendoj pri korpaj vundoj.

Aliformita estis Egipto kaj malgraŭ la funebro, regis en ĝi granda movado, kaj ĉio sub la influo de la nova estro.

Kreskis la fiero de la faraono kaj li estis kontenta, vidante, kiel la tuta ŝtato konformiĝas al lia reĝa volo.

Sed venis momento, kiam eĉ li fariĝis malĝoja.

En la sama tago, kiam la enbalzamigistoj elprenis la korpon de Ramzes XII el la soda bano, la granda trezoristo, prezentante la kutiman raporton, diris al la faraono:

—Mi ne scias, kion fari ... Ni havas en la trezorejo du mil talentojn, kaj por la enterigo de la mortinta sinjoro oni bezonas almenaŭ unu mil ...

—Kiel, du mil?... — ekmiris la estro. — Kiam mi prenis en la manojn la regadon, vi diris, ke ni havas dudek mil ...

—Ni elspezis dekok ...

—En du monatoj?...

—Ni havis grandegajn elspezojn ...

—Tio estas vera — respondis la faraono — sed ĉiu tage alfluas novaj impostoj ...

—La impostoj — respondis la trezoristo — mi ne scias kial, ree malgrandiĝis kaj ne alfluas en tia kvanto, kiel mi kalkulis. Sed ili ankaŭ estas elspezitaj ... Via sankteco bonvolu ne forgesi, ke ni havas kvin novajn regimentojn; do ĉirkaŭ ok mil homoj forlasis siajn okupojn kaj vivas je la konto de la ŝtato ...

La faraono ekmeditis.

—Ni devas — diris li — fari novan prunton. Interkonsentu kun Herhor kaj Mefres, por ke la temploj donu al ni monon.

—Mi parolis pri tio. La temploj donos al ni nenion.

—La profetoj ofendiĝis!... — ekridetis la faraono. —En tia okazo ni devas alvoki la idolanojn ... Sendu al mi Dagonon.

Antaŭ la subiro de la suno venis la fenicia bankiero. Li falis sur la vizaĝon antaŭ la sinjoro kaj donacis al li oran pokalon, inkrustitan per juveloj.

—Nun mi jam povas morti!... — ekkriis Dagon — kiam mia plej favora estro sidiĝis sur la tronon ...

—Sed antaŭ ol vi mortos — diris la faraono al la genuanta Feniciano — penu trovi por mi kelke da miloj da talentoj.

La Feniciano rigidiĝis aŭ eble ŝajnis grandan konfuzon.

—Via sankteco prefere ordonu al mi serĉi perlojn en Nilo — respondis li — ĉar mi tuj pereos kaj mia sinjoro ne suspektos min pri malbonaj intencoj ... Sed trovi tian sumon hodiaŭ!...

Ramzes XIII ekmiris.

—Kiel? — demandis li — do Fenicianoj ne havas plu monon?...

—Sangon kaj vivon nian kaj de niaj infanoj ni donos al via sankteco — respondis Dagon. — Sed monon ... Kie ni prenos monon?... Iam la temploj pruntis al ni por dekkvin aŭ dudek procentoj jare. Sed de la tempo, kiam via sankteco, ankoraŭ kiel kronprinco, estis en la templo de Hator, tie apud Pi-Bast, la pastroj tute rifuzis al ni krediton ... Se ili povus, ili hodiaŭ elpelus nin el Egipto, kaj ankoraŭ pli volonte ekstermus ... Ah, kion ni suferas dank'al ili ... La kamparanoj laboras, kiel ili volas kaj kiam ili volas, kaj kiel imposton ili donas, kio faldas de ilia buŝo ... Se oni batas iun, li ribelas, kaj kiam malfeliĉa Feniciano sin turnas al la tribunalo, aŭ li perdas, aŭ devas

terure pagi ... Niaj horoj sur ĉi tiu tero estas kalkulitaj!... — konkludis Dagon kun larmoj.

La faraono malĝojiĝis.

—Mi esploros la aferon — respondis li — kaj la tribunaloj estos justaj. Sed dume mi bezonas kvin mil talentojn ...

—Kie ni prenos ilin, sinjoro? — ĝemis Dagon. — Montru al ni via sankteco aĉetantojn, kaj ni vendos la tutan nian havon, por plenumi viajn ordonojn ... Sed kie estas la aĉetantoj?... Eble nur la pastroj, kiuj taksos niajn riĉaĵojn je ridinda prezo kaj ne pagos kontante ...

—Serĉu en Tiro, Sidono — intermetis la sinjoro. — Ĉiu el ĉi tiuj urboj ja povus prunti al ni ne nur kvin, sed eĉ cent mil talentojn ...

—Tiro, Sidono!... — ripetis Dagon. — Hodiaŭ la tuta Fenicio kolektas la oron kaj juvelojn, por page liberigi sin de Asirianoj ... En nia lando jam vagas senditoj de la reĝo Assar kaj diras, ke se nur ĉiujare ni pagos malavare, la reĝo kaj satrapoj ne nur ne premegos nin, sed eĉ liveros al ni pli grandajn gajnojn, ol tiuj, kiujn ni havas nun dank'al la favoro de via sankteco kaj Egipto ...

La monarĥo paliĝis kaj kunpremis la dentojn. La Feniciano rimarkis tion kaj rapide aldonis:

—Fine, por kio mi konsumas la tempon de via sankteco per mia malsaĝa babilado?... Estas ĉi tie, en Memfiso, princo Hiram ... Li povas pli bone klarigi ĉion al mia sinjoro, ĉar li estas saĝulo kaj membro de la plej alta konsilantaro de niaj urboj ...

Ramzes viviĝis.

—Donu ĉi tien plej rapide Hiramon, — respondis li. — Ĉar

vi, Dagon, parolas kun mi ne kiel bankiero, sed kiel funebra ploristino.

La Feniciano ankoraŭ unu fojon ekfrapis la plankon per la frunto kaj demandis:

—Ĉu la respektinda Hiram ne povus tuj veni ĉi tien?... Vere, estas jam malfrue ... Sed li tiel timas la pastrojn, ke li preferus nokte prezenti sian respektegon al via sankteco ...

La faraono ekmordis la lipojn, sed konsentis. Li eĉ sendis kun la bankiero Tutmozison, por ke tiu konduku Hiramon en la palacon tra sekretaj eniroj.

ĈAPITRO SESA

Ĉirkaŭ la deka vespere venis Hiram, en nigra vesto de memfisa bazara vendisto.

—Kial via nobleco tiel kaŝas vin?... — demandis la faraono, malagrade impresita. — Ĉu mia palaco estas malliberejo aŭ domo de pestuloj?.

—Ah, nia estro! — suspiris la maljuna Feniciano. — De la momento, kiam vi fariĝis la sinjoro de Egipto, krimuloj estas tiuj, kiuj kuraĝas vidi vin kaj ne komunikas tion, pri kio vi bonvolis paroli ...

—Al kiu vi devas ripeti miajn vortojn?... — demandis la sinjoro.

Hiram levis la okulojn kaj manojn supren.

—Via sankteco konas viajn malamikojn!... — respondis li.

—Ne grave — diris la faraono. — Via nobleco scias, por kio mi alvokis vin? Mi volas pruntepreni kelke da miloj da talentoj ...

Hiram eksiblis kaj tiel ŝanceliĝis sur siaj piedoj, ke la sinjoro permesis al li sidiĝi en sia ĉeesto, kio estis plej granda honoro.

Komforte sidiĝinte kaj ripozinte, Hiram diris:

—Por kio via sankteco devas pruntepreni, se vi povas havi grandajn trezorojn?...

—Mi scias, kiam mi prenos Ninivon — interrompis la fa-

raono. — Malproksimaj tempoj, kaj la monon mi bezonas hodiaŭ ...

—Mi ne parolas pri la milito — respondis Hiram. —Mi parolas pri afero, kiu tuj donos al la trezorejo grandan sumon kaj konstantan jaran profiton ...

—Kiamaniere?

—Via sankteco permesu kaj helpu nin elfosi kanalon, por kunigi Mediteraneon kun Ruĝa maro ...

—Vi ŝercas, maljuna homo ... — ekkriis li. — Kiu povus plenumi tian laboron kaj kia danĝero por Egipto?... La maro ja superverŝus nin ...

—Kiu maro?... Ĉar sendube nek Ruĝa, nek Mediteranea — respondis trankvile Hiram. — Mi scias, ke egiptaj pastroj inĝenieroj esploris la aferon kaj elkalkulis, ke tio estas tre bona afero, la plej bona en la mondo ... Sed ... ili mem preferas ĝin fari, aŭ pli ĝuste ili ne volas, ke ĝin faru la faraono.

—Kiajn pruvojn vi havas? — demandis Ramzes.

—Mi ne havas pruvojn, sed mi sendos al via sankteco pastron, kiu klarigas al vi la tutan aferon per planoj kaj kalkuloj ...

—Kiu li estas?...

Hiram konsideris momenton kaj diris:

—Ĉu mi havas la promeson de via sankteco, ke neniu sciros pri tio, ekster ni?... Li faros al vi pli grandajn servojn, sinjoro, ol mi mem ... Li konas multe da sekretoj kaj multe da ... friponaĵoj de la pastroj ...

—Mi promesas.

—Lia nomo estas Samentu ... Li estas granda saĝulo, sed ... li bezonas multe da mono kaj estas tre ambicia ... Kaj ĉar la ĉefpastroj humiligas lin, li diris al mi, ke se via sankteco de-

ziros, li faligos la pastraron ... Li konas multe da sekretoj ... Tre multe!...

Ramzes profunde ekmeditis. Li komprenis, ke la pastro estas granda perfidulo, sed li taksis ankaŭ, kiel grandajn servojn li povas fari al li.

—Bone — diris la faraono — mi pripensos pri Samentu. Kaj nun ni supozu unu momenton, ke oni povas konstrui tiun kanalon: kian utilon mi havos de ĝi?

Hiram levis la maldekstran manon kaj komencis kalkuli sur ĝiaj fingroj:

—Antaŭ ĉio — diris li — Fenicio pagos al via sankteco kvin mil talentojn da tributoj, kiujn ĝi ŝuldas al vi ... Due, Fenicio pagos al via sankteco por la rajto plenumi la laborojn ... Trie, kiam komenciĝos la laboroj, ni pagos jare mil talentojn da imposto kaj krom tio tiom da talentoj, kiom da dekoj da laboristoj liveros al ni Egipto. Kvare, por ĉiu egipta inĝeniero ni donos al via sankteco unu talenton jare ... Kvine, kiam la laboroj estos finitaj, via sankteco ludonos al ni la kanalon por cent jaroj, kaj ni pagos por tio mil talentojn jare. Ĉu tio estas malgrandaj profitoj? — demandis Hiram.

—Kaj nun, kaj hodiaŭ — diris la faraono, — ĉu vi donus al mi la kvin milojn da tributo?

—Se hodiaŭ estos farita la kontrakto, ni donos dek mil kaj ni aldonos tri mil, por pagi antaŭe imposton por tri jaroj ...

Ramzes ekmeditis. Pli ol unu fojon Fenicianoj proponis al la egiptaj monarĥoj la konstruon de ĉi tiu kanalo, sed ĉiam ili renkontis neflekseblan kontraŭstaron de la pastroj. La egiptaj saĝuloj klarigis al la faraonoj, ke la kanalo kaŭzos subakvigon de Egipto per la ondoj de Mediteraneo kaj Ruĝa Maro. Sed

aliflanke Hiram certigis, ke tio ne okazos kaj ke la pastroj scias pri tio!...

—Vi promesas — diris la faraono post longa momento — vi promesas pagi po mil talentoj jare dum cent jaroj. Vi diras, ke ĉi tiu kanalo, elfosita en la sabloj, estas la plej bona afero en la mondo. Mi tion ne komprenas kaj mi konfesas, Hiram, ke mi suspektas ...

—Sinjoro — respondis li — mi diros al vi ĉion, sed mi ĵure petegas vin per via krono ... per la ombro de via patro ... ke vi malkovru la sekreton al neniu ... Ĝi estas la plej granda mistero de la ĥaldeaj kaj egiptaj pastroj, eĉ de Fenicio ... De ĝi dependas la estonteco de la mondo!...

—Oh, oh ... Hiram!... — respondis la faraono kun rideto.

—Al vi, reĝo — daŭrigis la Feniciano — la dioj donis saĝon, energion kaj noblecon, vi do estas nia ... Al vi sola el la teraj monarĥoj oni povas konfidi la sekreton, ĉar vi sola povas plenumi grandajn aferojn ... Kaj tial vi akiros tian potencon, kian atingis neniu homo ...

La faraono eksentis en la koro dolĉon de la fiero, sed li ekregis sin.

—Ne laŭdu min — diris li — pro tio, kion mi ankoraŭ ne faris; sed diru al mi, kiajn profitojn alportos la kanalo al Fenicio kaj al mia regno?

Hiram sidiĝis pli komforte en la apogseĝo kaj komencis paroli per mallaŭta voĉo:

—Sciu, nia sinjoro, ke oriente, sude kaj norde de Asirio kaj Babilono estas neniuj dezertoj, nek marĉoj, loĝataj de monstroj, sed grandegaj ... grandegaj landoj kaj regnoj ... landoj tiel grandegaj, ke la piedistaro de via sankteco, fama per siaj mar-

ŝoj, devus iri preskaŭ du jarojn senhalte al la oriento, por atingi iliajn limojn ...

Ramzes levis supren la brovojn, kiel homo, kiu permesas al iu mensogi, sed scias pri la mensogo.

Hiram iom levis la ŝultrojn kaj daŭrigis:

—Oriente kaj sude de Babilono, sur la bordo de granda maro loĝas preskaŭ cent milionoj da homoj, kiuj havas potencajn reĝojn, pastrojn pli saĝajn ol la egiptaj, antikvajn librojn, lertajn metiistojn ... Ĉi tiuj popoloj ne nur scias fabriki teksaĵojn, meblojn kaj vazojn, same belajn, kiel Egiptanoj, sed de nememoreblaj tempoj havas subterajn kaj surterajn templojn, pli grandajn, pli belajn kaj pli riĉajn, ol la egiptaj ...

—Daŭrigu ... Daŭrigu!... — intermetis la sinjoro. Sed sur la vizaĝo oni ne povis legi, ĉu lin interesas la priskribo, aŭ ĉu indignigas lin la mensogo.

—En tiuj landoj estas perloj, multvaloraj ŝtonoj, oro, kupro ... plej mirindaj grenoj, floroj kaj fruktoj ... fine, estas arbaroj, en kiuj tutajn monatojn oni povas vagi inter arboj, pli dikaj, ol la kolonoj en viaj temploj, pli altaj, ol la palmoj ... La loĝantaro estas simpla kaj kvieta ... Se via sankteco sendus tien sur ŝipoj du siajn regimentojn, vi povus akiri teron, pli grandan, ol la tuta Egipto, pli riĉan, ol la trezorejo de Labirinto ... Morgaŭ, se via sankteco permesos, mi sendos al vi specimenojn de tiaj teksaĵoj, arboj kaj bronzaĵoj ... Mi sendos ankaŭ du grajnoj de tieaj miraklaj balzamoj; al homo, kiu englutis ilin, malfermiĝas la pordegoj de la eterneco kaj li povas ĝui la feliĉon, kiu apartenas nur al la dioj.

—Sendu, mi tre petas vin, la specimenojn — interrompis la faraono. — Kaj la balzamoj ... lasu ilin!... Ni sufiĉe ĝuos la eternecon kaj diojn post la morto ...

—Kaj malproksime, tre malproksime, oriente de Asirio — daŭrigis Hiram — sin etendas ankoraŭ pli grandaj landoj, kiuj havas ducent milionojn da loĝantoj ...

—Kiel facilaj estas por vi la milionoj!... — ekridetis la sinjoro.

Hiram metis la manon sur la koro.

—Mi ĵuras — diris li — per la ombroj de miaj antaŭuloj kaj per mia honoro, ke mi diras la veron!...

La faraono faris movon: tiel granda ĵuro mirigis lin.

— Daŭrigu ... daŭrigu ... — diris li.

—Tiuj landoj — daŭrigis la Feniciano — estas tre strangaj. Loĝas ilin popoloj kun oblikvaj okuloj kaj flava haŭto. Ĉi tiuj popoloj havas sinjoron, kiu estas nomata filo de la Ĉielo kaj regas ilin per saĝuloj, kiuj tamen ne estas pastroj kaj ne havas tian povon, kiel la viaj en Egipto ... Ĉi tiuj popoloj similas Egiptanojn ... Ili respektas la mortintajn antaŭulojn kaj tre zorgas pri iliaj kadavroj. Ili uzas skribon, kiu ne multe diferencas de via pastra ... Sed ili portas longajn vestojn el teksaĵoj, tute nekonataj ĉe vi, havas sandalojn, similajn al malgrandaj benketoj, kaj la kapojn ili kovras per pintaj skatoloj ... La tegmentoj de iliaj domoj ankaŭ estas pintaj kaj iliaj randoj estas turnitaj supren ... Ĉi tiuj eksterordinaraj popoloj havas grenon, pli fruktoportan ol la egipta tritiko, kaj faras el ĝi trinkaĵon, pli fortan ol la vino. Ili posedas ankaŭ kreskaĵon, kies folioj donas forton al la membroj, gajecon al la spirito kaj eĉ permesas vivi sen dormo. Ili havas paperon, kiun ili scias ornamu per diverskoloraj pentraĵoj, kaj argilon, kiu bruligita brilas kiel vitro kaj sonoras kiel metalo ... Morgaŭ, ĉar via sankteco permesis, mi sendos la specimenojn ...

—Mirindaĵon vi rakontas, Hiram!... — Sed kian rilaton tio havas al la kanalo, kiun vi volas fosi?...

—Mi respondos mallonge — diris la Feniciano. — Kiam la kanalo estos preta, la tuta fenicia kaj egipta ŝiparo transveturos en Ruĝan Maron, de tie pli malproksimen kaj post kelke da monatoj atingos tiujn riĉajn landojn, kiujn preskaŭ neeble estas atingi tra la kontinento. Kaj ĉu via sankteco — daŭrigis li kun brilantaj okuloj — ne vidas la trezorojn, kiujn ni trovas tie?... Oron, multvalorajn ŝtonojn, grenojn, lignon?... Mi ĵuras al vi — daŭrigis li ekscitita — ke tiam pli facile estos havi oron ol kupron, ligno estos pli malkara ol pajlo, kaj sklavo ol bovino ... Permesu nur, sinjoro, elfosi la kanalon kaj dunge donu al ni kvindek mil soldatojn ...

Ramzes ankaŭ ekflamis.

—Kvindek mil soldatojn — ripetis li. — Kaj kiom vi donos por ili?

—Mi jam diris al via sankteco ... Mil talentojn ĉiujare por la rajto plenumi la laborojn, kaj kvin mil por la laboristoj, kiujn ni mem pagos kaj nutros ...

—Kaj kiujn vi morte turmentos per la laboro?...

—Gardu nin la dioj!... — ekkriis Hiram. — Tio ne estas bona afero, se pereas laboristoj ... La soldatoj de via sankteco ne laboros pli multe ĉe la kanalo, ol hodiaŭ ĉe la fortikaĵoj kaj ŝoseoj ... kaj kia gloro por vi, estro!... kiaj enspezoj por la trezorejo!... Kia utilo por Egipto!... La plej malriĉa kamparano povos havi lignan kabaneton, kelkon da brutoj, meblojn, eble eĉ sklavon ... Neniu faraono levis la ŝtaton tiel alten kaj plenumis tiel grandegan aferon! Ĉar kio estos la senvivaj kaj senutilaj piramidoj kompare kun la kanalo, kiu faciligos la transportadon de la trezoroj de la tuta mondo?...

—Jes — aldonis la faraono — kaj kvindek mil soldatoj ĉe la orienta limo ...

—Kompreneble!... — ekkriis Hiram. — Vidante tiajn fortojn, kiuj kostos nenion al via sankteco, Asirio ne kuraĝos etendi la manon kontraŭ Fenicio ...

La plano estis brila kaj promesis tiajn profitojn, ke Ramzes sentis kapturton. Sed tuj li ekregis sin.

—Hiram — diris li — belajn promesojn vi faras ... Tiel belajn, ke mi timas, ĉu post ili vi ne kaŝas malpli sukcesajn rezultatojn. Kaj tial mi devas bone pripensi kaj demandi konsilon de la pastroj.

—Memvole ili neniam konsentos!... — ekkriis la Feniciano. — Tamen ... (la dioj pardonu al mi blasfemon), mi estas certa, ke se la plej alta ŝtata povo transiris hodiaŭ en la manojn de la pastroj, post kelke da monatoj ili alvokus nin por ĉi tiu konstruo ...

Ramzes ekrigardis lin kun malvarma malestimo.

—Maljunulo — diris li — al mi lasu la zorgon pri la obeo de la pastroj, kaj vi mem donu pruvojn, ke tio, kion vi diris, estas vera. Mi estus sentaŭga reĝo, se mi ne povus forigi la malhelpojn, kiuj kreskas inter mia volo kaj la aferoj de la ŝtato.

—Vere, vi estas granda monarĥo, sinjoro nia — murmuretis Hiram, sin klinante ĝis la tero.

Estis jam malfrua nokto. La Feniciano adiaŭis la faraonon kaj kun Tutmozis forlasis la palacon. En la sekvinta tago li sendis per Dagon kesteton kun specimenoj el la nekonataj landoj.

La sinjoro trovis en ĝi statuetojn de dioj, indiajn teksaĵojn kaj ringojn, malgrandajn pecojn da opio, kaj en dua fako plenmanon da rizo, teajn foliojn, porcelanajn kalikojn orna-

mitajn per pentraĵoj kaj dekelkon da desegnaĵoj, faritaj sur papero per kolorigiloj kaj ĥina inko.

Li rigardis ĉion plej atente kaj konfesis, ke tiajn objektojn li vidis neniam: nek rizon, nek paperon, nek bildojn de homoj, kun pintaj ĉapoj kaj oblikvaj okuloj.

Li ne dubis plu pri la ekzistado de nova lando, en kiu ĉio estis alia, ol en Egipto: la montoj, arboj, domoj, pontoj, ŝipoj ...

”Kaj tia lando ekzistas sendube de jarcentoj — pensis li — niaj pastroj scias pri ĝi, konas ĝiajn riĉaĵojn, sed ne diras pri ĝi eĉ unu vorton ... Ili do estas perfiduloj, kiuj volas malriĉigi la faraonojn kaj limigi ilian povon, por poste depuŝi ilin de la trono ... Sed ... ho miaj antaŭuloj kaj posteuloj, — diris li en sia animo — vin mi alvokas kiel atestantojn, ke mi metos finon al ĉi tiuj friponaĵoj. Mi relevos la saĝon, sed mi ekstermos la mensogon kaj donacos ripozon al Egipto ...”

Pensante tiel, la sinjoro levis la okulojn kaj rimarkis Dagonon, kiu atendis ordonojn.

—Via kesto estas tre interesa — diris li al la bankiero — sed ... ne tion mi volis de vi.

La Feniciano proksimiĝis senbrue, ekgenuis antaŭ la faraono kaj murmuretis:

—Se via sankteco bonvolos subskribi la kontrakton kun la nobla Hiram, Tiro kaj Sidono metos ĉe viaj piedoj ĉiujn siajn trezorojn ...

Ramzes sulkgis la brovojn. Ne plaĉis al li la konduto de Fenicianoj, kiuj kuraĝis proponi al li kondiĉojn. Li respondis malvarme:

—Mi pripensos kaj donos respondon al Hiram. Vi povas foriri, Dagon.

Post la foriro de la Feniciano, Ramzes ree meditis.

Reakcio komencis vekigi en lia animo.

”Ĉi tiuj komercistoj — diris li en sia koro — rigardas min, kiel unu el la siaj ... Ili eĉ kuraĝas montri al mi de malproksime sakon da oro, por devigi min subskribi la traktaton!... Mi dubas, ĉu iu faraono permesis al ili tian intimecon. Mi devas ŝangi tion. La homoj, kiuj falas sur la vizaĝon antaŭ la senditoj de Assar, ne povas diri al mi: ”Subskribu, kaj vi ricevos ...” Malsaĝaj feniciaj ratoj, kiuj ŝtelveninte en la reĝan palacon, opinias ĝin sia porka stalo!...”

Ju pli longe li pensis, ju pli detale li rememoris la konduton de Hiram kaj Dagon, des pli forta kolero ekregis lin.

”Kiel ili kuraĝas ... kiel ili kuraĝas proponi al mi kondiĉojn ...”

—Tutmozis, ĉi tien!... — ekkriis li.

La favorato tuj aperis.

—Kion vi ordonas, mia sinjoro?

—Sendu malsuperan oficiron al Dagon kun sciigo, ke li ĉesas esti mia bankiero. Li estas tro malsaĝa por tiel alta posteno ...

—Por kiu via sankteco destinas ĉi tiun honoron?

—En la nuna momento mi ne scias ... Oni devos trovi iun inter la egiptaj aŭ grekaj komercistoj ... En la ekstrema okazo ni nin turnos al ... la pastroj.

La novaĵo trakuris ĉiujn reĝajn palacojn kaj ne pasis ankoraŭ unu horo, kiam ĝi jam atingis Memfison. En la tuta urbo oni rakontis, ke Fenicianoj falis en malfavoron de la faraono, kaj ĉe la vespero la popolo jam komencis rompi butikojn de la malamataj fremduloj.

La pastroj ekspiris libere. Herhor eĉ faris viziton al la sankta Mefres kaj diris al li:

—Mia koro sentis, ke la sinjoro sin deturnos de tiuj ĉi idoloj, kiuj trinkas sangon de la popolo. Mi pensas, ke oni devas montri al li nian dankemon ...

—Kaj eble malfermi la pordojn de niaj trezoroj?... — demandis seke la sankta Mefres. — Ne rapidu, via ekscelenco ... Mi jam deĉifris ĉi tiun junulon, kaj ve al ni, se ni permesos al li komandi nin.

—Kaj se li rompus kun Fenicianoj?...

—Li mem gajnus, ĉar li ne pagus al ili la ŝuldojn — diris Mefres.

—Laŭ mia opinio — respondis Herhor post pripenso — nun estas momento por reakiri la favoron de la juna faraono. Flamema en la kolero, li scias tamen esti dankema ... mi speritis tion ...

—Kiom da vortoj, tiom da eraroj!... — interrompis la venĝema Mefres. — Unue, ĉi tiu princo ne estas ankoraŭ faraono, ĉar li ne estis kronita en la templo ... Due, li neniam estos vera faraono, ĉar li malrespektas la ĉefpastrajn benojn ... Fine, ni ne bezonas lian favoron, sed li la favoron de la dioj, kiujn li ofendas ĉiutage!...

Mefres, spiregante de kolero, ripozis momenton kaj daŭrigis:

—Li estis unu monaton en la templo de Hator, aŭskultis la plej altan saĝon, kaj tuj poste li komencis la rilatojn kun la Fenicianoj. Li eĉ vizitadis la templon de Astarte kaj prenis de tie pastrinon, kio ofendas la principojn de ĉiuj religioj ... Poste li publike mokis mian piecon kaj konspiris kun homoj, same senkonsideraj, kiel li mem, kaj per Fenicianoj ŝtelis la ŝtatajn

sekretojn ... Kaj kiam li suriris la tronon ... mi eraras, kiam li suriris la unuan ŝtupon de la trono, li montras sian abomenon al la pastroj, ribeligas la kamparanojn kaj soldatojn kaj rekomencas rilatojn kun siaj amikoj Fenicianoj ... Ĉu vi forgesis, nobla Herhor, pri ĉio ĉi?... Kaj se vi memoras, ĉu vi komprenas la danĝerojn, kiuj minacas nin de tiu junulaĉo?... Li ja havas en sia mano direktilon de la ŝtata ŝipo, kiu iras inter akvoturnoj kaj ŝtonegoj. Kiu do povas garantii, ke ĉi tiu frenezulo, kiu hieraŭ alvokis al si Fenicianojn, kaj hodiaŭ malpaciĝis kun ili, ne faros morgaŭ ion, kio kondukos la ŝtaton al pereoo?...

—Do?... — demandis Herhor, fikse rigardante liajn okulojn.

—Do ni havas neniun motivon montri al li nian dankemon, aŭ pli ĝustadire malfortecon. Kaj ĉar li nepre volas monon, ni ne donos monon!...

—Kaj poste? — demandis Herhor.

—Poste li regos la ŝtaton kaj pligrandigos la armeon sen mono — respondis la incitita Mefres.

—Kaj ... se lia malsata armeo volos rabi la templojn?... — daŭrigis Herhor.

—Ha!... hal ... ha!... — eksplodis Mefres.

Subite li fariĝis serioza kaj sin klinante, diris per ironia tono:

—Tio estas la afero de via ekscelenco ... Homo, kiu kiel vi tiel longe administris la ŝtaton, devis sin prepari al tiu danĝero.

—Ni supozu — parolis malrapide Herhor — ni supozu, ke mi trovus rimedon kontraŭ la danĝeroj, kiuj minacas la ŝtaton. Sed ĉu via ekscelenco, kiu estas la plej alta ĉefpastro, ĉu vi povus antaŭgardi de ofendo la templojn kaj pastraron?...

Momenton ili rigardis unu la alian.

—Vi demandas, ĉu mi povos? — diris Mefres. — Ĉu mi povos?... Kia demando!... La dioj metis en mian manon tondron, kiu detruos ĉiun malpiulon.

—Pst!... — murmuretis Herhor. — Estu tiel ...

—Kun la konsento, aŭ sen la konsento de la plej alta kolegio — aldonis Mefres. — Kiam la ŝipo renversiĝas, oni ne havas tempon diskuti pri la remistoj.

Ili disiris malgajaj. En la sama tago vespere alvokis ilin la faraono.

Ili venis en la ordonita horo, ĉiu aparte. Ambaŭ sin klinis profunde antaŭ la sinjoro kaj ĉiu stariĝis en alia angulo, ne rigardante la kunulon.

”Ĉu ili malpaciĝis?... — pensis Ramzes. — Tio ne estus mal-feliĉo.”

Post momento eniris la sankta Sem kaj profeto Pentuer. Ramzes sidiĝis sur estrado, montris al la kvar pastroj malaltajn taburetojn kontraŭ si kaj diris:

—Sanktaj pastroj! Mi ne alvokis vin nun por konsiloj, ĉar ĉiuj miaj ordonoj koncernis ekskluzive la militajn aferojn ...

—Tio estas la rajto de via sankteco — intermetis Herhor.

—Mi faris ankaŭ, kion mi povis en tiel mallonga tempo, por pligrandigi la defendajn fortojn de la ŝtato. Mi fondis du novajn oficirajn lernejojn kaj revivigis kvin nuligitajn regimentojn ...

—Tio estis via rajto — diris Mefres.

—Pri aliaj militaj plibonigoj mi ne parolas, ĉar vin, homojn sanktajn, tiaj aferoj ne interesas ...

—Vi estas prava, sinjoro — diris samtempe Mefres kaj Herhor.

—Sed restas alia afero — daŭrigis la faraono, kontenta de la jesado de la altranguloj, kies opinion li atendis. — Proksimiĝas la tago de la enterigo de mia dia patro, sed la trezoroj ne posedas sufiĉajn rimedojn ...

Mefres leviĝis de la tabureto.

—Oziris-Mer-amen-Ramzes — diris li — estis justa sinjoro, kiu certigis al sia popolo longan pacon, kaj gloron al la dioj. Permesu do via sankteco, ke la enterigo de ĉi tiu pia faraono estu farita je la elspezoj de la temploj.

Ramzeson mirigis kaj kortuŝis la respekto al lia patro. Momenton li silentis, kvazaŭ ne povante trovi respondon, fine li diris:

—Mi estas tre danka al vi pro la respekto al mia patro, egala al la dioj. Mi permesas tian enterigon kaj ankoraŭ unu fojon dankas vin.

Li interrompis, apogis la kapon sur la mano kaj meditis, kvazaŭ batalante kontraŭ si mem. Fine li levis la kapon: lia vizaĝo viviĝis, la okuloj brilis.

—Mi estas kortuŝita — diris li — per ĉi tiu pruvo de via simpatio, sanktaj pastroj. Se la memoro pri mia patro estas tiel kara por vi, sendube vi ne povas esti malbonvolaj kontraŭ mi ...

—Ĉu via sankteco dubis pri tio? — intermetis la ĉefpastro Sem.

—Vi diras la veron — daŭrigis la faraono — malprave mi suspektis vin ... Sed mi volas tion rebonigi, mi do estos sincera kun vi ...

—Benu vian sanktecon la dioj!... — diris Herhor.

—Mi do estos sincera. Mia dia patro, pro la aĝo, malsano, eble ankaŭ pro la pastraj okupoj, ne povis dediĉi tiom da for-

toj kaj tempo al la ŝtataj aferoj, kiom mi povas. Mi estas juna, forta, libera, mi volas regi kaj mi regos mem. Kiel ĉefo devas konduki la armeon je sia propra respondeco kaj laŭ sia propra plano, tiel mi administros la ŝtaton. Jen estas mia klara volo, kiun mi ne forlasos. Sed mi komprenas, ke eĉ se mi estus plej sperta, mi ne povus regi sen fidelaj servistoj kaj saĝaj konsilistoj. Kaj tial iafoje mi demandas pri via opinio en diversaj aferoj ...

—Por tio ni ja estas la plej alta konsilantaro ĉe la trono de via sankteco — intermetis Herhor.

—Bone — daŭrigis la faraono — mi profitos viajn servojn, eĉ de la nuna momento, tuj ...

—Ordonu, sinjoro — diris Herhor.

—Mi volas plibonigi la sorton de la egipta popolo. Sed ĉar en tiaj aferoj tro rapida agado povas esti malutila, por komenci mi donacos al ili bagatelon: post ses tagoj de laboro sepan tagon de ripozo.

—Tiel estis dum la regado de la dek ok dinastioj ... Tio estas leĝo tiel malnova, kiel Egipto — diris Pentuer.

—La ripozo ĉiun sepan tagon donos al ĉiu laboristo kvindek tagojn jare, tio estas, forprenos de lia sinjoro kvindek draĥmojn. Kaj je unu miliono da laboristoj la ŝtato perdos ĉirkaŭ dek mil talentojn jare ... — diris Mefres. — Ni jam faris la kalkulon en la temploj!... — aldonis li.

—Jes — vive respondis Pentuer — estos malprofito, nur en la unua jaro. Ĉar kiam la popolo refortigos sin per la ripozo, en la sekvantaj jaroj ili reakiros ĉion kun superaĵo ...

—Vi diras la veron — respondis Mefres — tamen en ĉiu okazo oni devas havi dek mil talentojn por la unua jaro. Mi pensas, ke eĉ dudek mil talentoj ne estus tro multe ...

—Vi estas prava, respektinda Mefres — respondis la faraono. — Por la ŝanĝoj, kiujn mi volas enkonduki en mian regionon, dudek, eĉ tridek mil talentoj ne estos tro granda sumo. Jen kial — rapide aldonis li — mi bezonos vian helpon, sanktaj viroj ...

—Ĉiun intencon de via sankteco ni estas pretaj subteni per niaj preĝoj kaj procesioj — diris Mefres.

—Bone, vi preĝu kaj instigu al tio la popolon. Sed krom tio donu al la ŝtato tridek mil talentojn — respondis la faraono.

Le ĉefpastro silentis. La sinjoro atendis momenton, fine li turnis sin al Herhor:

—Via ekscelenco silentas?

—Vi mem diris, nia estro, ke la trezorejo ne havas rimedojn por la enterigo de Oziris-Mer-amen-Ramzes. Mi do ne povas eĉ diveni, kie ni povus preni tridek mil talentojn?...

—Kaj la trezorejo de Labirinto?...

—Tio estas diaj trezoroj, kiujn oni povus tuŝi nur en la momento de plej granda bezono de la ŝtato — respondis Mefres. Ramzes ekbolis de kolero.

—Ni lasu la kamparanojn — diris li, batante per la pugno la dorson de la seĝo — mi mem bezonas ĉi tiun sumon!...

—Via sankteco — respondis Mefres — povas en la daŭro de unu jaro akiri pli ol tridek mil talentojn, kaj Egipto dufoje pli multe ...

—Kiel?...

—Tre simple — diris Mefres. — Ordonu, monarĥo, forpeli Fenicianojn el la lando ...

Ŝajnis, ke la sinjoro sin ĵetos sur la trokuraĝan ĉefpastron: li paliĝis, liaj lipoj tremis kaj la okuloj eliris el la kavoj. Sed tuj li diris per mirige trankvila tono:

—Sufiĉe ... Se nur tiajn konsilojn vi scias doni al mi, mi vivos sen ili ... Fenicianoj ja havas niajn subskribojn, ke ni fidele pagos al ili la ŝuldojn!... Ĉu vi forgesis pri tio, Mefres?...

—Via sankteco pardonu al mi, sed en la nuna momento okupis min tute aliaj pensoj. Viaj antaŭuloj, sinjoro, ne nur sur papirusoj, sed sur bronzo kaj ŝtonoj skulptis, ke la donacoj, faritaj de ili al la dioj kaj temploj, apartenas kaj eterne apartenos al dioj kaj temploj.

—Kaj al vi — diris la faraono.

—Tiom al ni — respondis la obstina ĉefpastro — kiom la regno apartenas al vi, monarĥo. Ni nur gardas la trezorejojn kaj pligrandigas ilin, sed ni ne havas la rajton malŝpari ilin ...

La sinjoro, spiregante de kolero, forlasis la kunvenon kaj iris en sian kabineton. Terure klare aperis antaŭ liaj okuloj lia situacio.

Li ne dubis plu pri la malamo de la pastroj al si. Tio estis la samaj malhumilaj altranguloj, kiuj en la pasinta jaro ne donis al li la memfisan korpuson kaj nur tiam faris lin vic-reĝo, kiam ŝajnis al ili, ke li humiliĝis, forlasante la palacon. La samaj, kiuj kontrolis ĉiun lian movon, sendis pri li raportojn, sed al li, la kronprinco, diris nenion pri la traktato kun Asirio. La samaj, kiuj trompis lin en la templo de Hatar, kaj apud Sodaj Lagoj mortigis la kaptitojn, al kiuj li promesis la pardonon. La faraono rememoris la salutojn de Herhor, la rigardojn de Mefres kaj la tonon de la voĉo de ambaŭ. El sub la ŝajno de ĝentileco ĉiumomente elglitis ilia fiero kaj malŝato al li ... Li bezonas monon, kaj ili promesas al li preĝojn, ili eĉ kuraĝas paroli, ke li ne estas la sola estro de Egipto.

La juna sinjoro senvole ekridetis; li rememoris la dungatajn

paŝtistojn, kiuj diras al la posedanto de la brutaro, ke li ne havas rajton fari kun ĝi, kion li volas!...

Sed krom la ridinda flanko de la afero, estis ankaŭ la flanko grava. En la trezorejo estis eble mil talentoj, kiuj laŭ la ĝisnuna normo de la elspezoj povis sufiĉi por sep ĝis dek tagoj. Kaj poste?... Kiel kondutos la oficistoj, servistoj kaj, antaŭ ĉio, la armeo, ne nur ne ricevante la salajron, sed malsataj?...

La ĉefpastroj konas la situacion de la faraono; se ili ne rapidas helpi lin, ili do volas lin pereigi ... Pereigi en la daŭro de kelke da tagoj, eĉ antaŭ la enterigo de lia patro.

Ramzes rememoris okazon de sia infaneco.

Li estis en la pastra lernejo, kiam por la festo de la diino Mut oni venigis la plej faman arlekenon en Egipto.

La artisto ŝajnigis malfeliĉan heroon. Kiam li ordonis, oni ne obeis lin; lian koleron oni respondis per rido; kaj kiam por puni la mokulojn li kaptis hakilon, la hakilo rompiĝis en lia mano.

Fine oni ellasis kontraŭ li leonon, kaj kiam la senarmila heroo komencis forkuri, montriĝis, ke ne leono persekutas lin, sed porko en leona felo.

La lernantoj kaj instruistoj ĝis larmoj ridis la aventurojn, sed la juna princo sidis malgaja: li bedaŭris la homon, kiu celis grandajn aferojn, kaj falis kovrita de moko.

Ĉi tiu sceno kaj la tiamaj sentoj reviviĝis hodiaŭ en la memoro de la faraono.

—Ili volas fari min tia!... — diris li al si mem.

Malespero ekregis lin, ĉar li sentis, ke kun la lasta elspezita talento finiĝos lia povo kaj kun ĝi ankaŭ la vivo.

Subite fariĝis en li ŝango. La sinjoro haltis en la mezo de la ĉambro kaj meditis:

”Kio povas okazi al mi?... Nur la morto ... Mi foriros al miaj grandaj antaŭuloj, al Ramzes Granda ... Al ili mi ja ne povas diri, ke mi pereis, ne defendante min ... Post la malfeliĉoj de la tera vivo mi trovus eternan malhonoron ...

Kiel?... li, la venkinto ĉe Sodaj Lagoj, devus cedi antaŭ plenmano da uzurpuloj, kun kiuj unu sola azia regimento havus nemulte por fari?... Ĉar Mefres kaj Herhor volas regi Egipton kaj faraonon, lia armeo devas suferi malsaton kaj milionoj da kamparanoj ne ricevi la favoron de la ripozo?... Sed ĉu ne liaj antaŭuloj konstruis ĉi tiujn templojn? ... Ĉu ne ili plenigis ilin per batalaj akiroj?... Kaj kiu gajnis la batalojn? la pastroj aŭ la soldatoj? Kiu do havas rajton je la trezoroj: la pastroj, aŭ la faraono kaj lia armeo?”

La juna sinjoro levis la ŝultrojn kaj alvokis al si Tutmozison. Malgrau la malfrua nokto la reĝa favorato aperis tuj.

—Ĉu vi scias? — diris la faraono — la pastroj rifuzis al mi prunton, kvankam la trezorejo estas malplena.

Tutmozis rektigis sin.

—Ĉu via sankteco ordonas konduki ilin en malliberejon? — respondis li.

—Ĉu vi farus tion?...

—Ne ekzistas en Egipto oficiro, kiu ŝanceliĝus plenumi ordonon de nia sinjoro kaj ĉefo.

—En tia okazo — diris malrapide la faraono — en tia okazo oni devas malliberigi neniun. Mi havas tro da potenco por mi kaj tro da malestimo al ili. Oni ne fermas en kirasa kesto mortintaĵon, kiun oni renkontas sur la vojo, oni ĉirkaŭiras.

—Sed hienon oni metas en kaĝon — murmuretis Tutmozis.

—Sed estas ankoraŭ tro frue — respondis Ramzes. — Mi devas esti kompatema por ili, almenaŭ ĝis la tago de la ente-

rigo de mia patro. Alie ili estus pretaj fari ian friponaĵon al la respektinda mumio kaj detruu la trankvilon de lia animo ... Kaj nun iru al Hiram kaj diru, ke li sendu al mi la pastron, pri kiu ni parolis.

—Tiel estos. Mi devas tamen averti vian sanktecon, ke hodiaŭ la popolaĉo atakis la domojn de la memfisaj Fenicianoj ...

—Oh!... Tio ne estis necesa.

—Ŝajnis ankaŭ al mi — daŭrigis Tutmozis — ke de la tempo, kiam via sankteco ordonis al Pentuer esplori la staton de la kamparanoj kaj laboristoj, la pastroj ekscitas la nomarĥojn kaj nobelojn ... Ili diras, ke vi volas ruinigi la nobelojn por la kamparanoj ...

—Kaj la nobeloj kredas?...

—Ekzistas tiaj, kiuj kredas. Sed multaj malkaŝe respondas, ke tio estas intrigo de la pastroj kontraŭ via sankteco.

—Kaj se efektive mi volus plibonigi la sorton de la kamparanoj? — demandis la faraono.

—Vi faros, sinjoro, kiel plaĉos al vi — respondis Tutmozis.

—Jen estas respondo, kiun mi komprenas! — ekkriis gaje Ramzes XIII. — Estu trankvila kaj respondu al la nobeloj, ke ne nur ili perdos nenion, plenumante miajn ordonojn, sed eĉ ilia sorto multe pliboniĝos. La riĉaĵoj de Egipto devas fine esti elŝiritaj el la malindaj manoj, kaj redonitaj al la fidelaj servistoj.

La faraono adiaŭis la favoraton kaj kontenta iris dormi. Lia momenta malespero ŝajnis al li nun ridinda.

En la sekvinta tago, ĉe la tagmezo, oni anoncis al lia sankteco, ke venis deputatoj de la feniciaj komercistoj.

—Ĉu ili volas plendi pri la atako kontraŭ iliaj domoj? — demandis la faraono.

—Ne — respondis la adjutanto — ili volas prezenti al vi sian respekregon.

Efektive, dekelko da Fenicianoj, kondukataj de Rabsun, venis kun donacoj. Kiam la sinjoro sin montris al ili, ili falis sur la vizaĝon kaj Rabsun diris, ke laŭ la malnova moro ili kuraĝas meti mizeran oferon antaŭ la piedoj de la sinjoro, kiu donas al ili la vivon kaj la ŝirmon al ilia havo.

Ili metis sur la tabloj orajn pladojn, ĉenojn kaj pokalojn, plenajn de juveloj. Rabsun metis sur la ŝtupoj de la trono pladon kun papiruso, per kiu Fenicianoj promesis doni al la armeo ĉion necesan, ĝis du mil talentoj.

La donaco estis granda: ĉio kune valoris pli ol tri mil talentojn.

La sinjoro tre favore respondis al la fidelaj komercistoj kaj promesis al ili sian protekton. Ili adiaŭis lin feliĉaj.

Ramzes XIII ekspiris libere: la bankroto de la trezorejo kaj la neceso uzi superforton kontraŭ la pastroj estis prokrastita dek tagojn.

Vespere, ree sub la gardo de Tutmozis, Hiram sin prezentis en la kabineto de lia sankteco. Nun li ne plendis pri la laciĝo, sed falis sur la vizaĝon kaj per ĝemanta voĉo malbenis la malsaĝan Dagonon.

—Mi eksciis — diris li — ke ĉi tiu favulo kuraĝis rememorigi al via sankteco nian interkonsenton pri la kanalo al Ruĝa Maro ... Pereu li!... Pesto lin manĝu!... Liaj infanoj fariĝu paŝtistoj de porkoj, kaj liaj nepoj Hebreoj ... Kaj vi, sinjoro, ordonu nur: kiom da riĉaĵoj posedas Fenicio, ĉion ni metos antaŭ viaj piedoj, sen kvitanco kaj kontrakto ... Ĉu ni estas Asi-

rianoj, aŭ ... pastroj — aldonis li murmurete — ĉu ne sufiĉas al ni unu sola vorto de tiel potenca monarĥo?...

—Kaj se mi, Hiram, postulus vere grandan sumon?... — demandis la faraono.

—Kian?

—Ekzemple ... tridek mil talentojn ...

—Tuj?

—Ne, en la daŭro de unu jaro.

—Via sankteco havos ilin — respondis Hiram sen pripenso.

Tia malavareco mirigis la sinjoron. — Sed mi devas doni garantiaĵojn ...

—Formala afero!... — respondis la Feniciano — via sankteco donos al ni la minejojn, por ne veki suspektojn de la pastroj ... Se ne ili, Fenicio sin donus al vi tuta sen garantiaĵo kaj kvitancoj ...

—Kaj la kanalo?... Ĉu mi devas tuj subskribi la traktaton? — demandis la faraono.

—Tute ne. Via sankteco faros kun ni la traktaton, kiam vi mem volos ...

Al Ramzes ŝajnis, ke li estis levita al la ĉielo. En tiu momento li unue ekkonis la dolĉon de la reĝa povo, kaj tio, dank'al Fenicianoj!

—Hiram — diris li, ne regante sin plu. — Hodiaŭ mi donas al vi, Fenicianoj, permeson konstrui la kanalon, por kunigi Mediteraneon kun Ruĝa Maro ...

La maljunulo falis al la piedoj de la faraono.

—Vi estas la plej granda reĝo! Neniam oni vidis tian sur la tero! — ekkriis li.

—Dum iom da tempo malpermesite estas al vi paroli pri tio

al iu ajn, ĉar la malamikoj de mia gloro spionas. Sed por ke vi estu certa, mi donas al vi ĉi tiun mian reĝan ringon ...

Li demetis de la fingro ringon, ormamitan per ŝtono, sur kiu estis gravurita la nomo de Horus, kaj metis ĝin sur la fingron de la Feniciano.

—La riĉaĵo de la tuta Fenicio atendas vian ordonon! — ripetis kortuŝita Hiram. — Vi plenumos verkon, kiu glorigados vian nomon, ĝis estingiĝos la suno ...

La faraono ĉirkaŭprenis lian grizharan kapon kaj ordonis al li sidiĝi.

—Ni do estas liganoj — diris la sinjoro post momento — kaj mi esperas, ke tio donos prosperon al Egipto kaj Fenicio ...

—Por la tuta mondo! — intermetis Hiram.

—Diru al mi tamen, princo, kial vi havas tian konfidon al mi?...

—Mi konas la noblan karakteron de via sankteco. Se vi, sinjoro, ne estus faraono, post kelke da jaroj vi fariĝus la plej fama fenicia komercisto kaj ĉefo de nia plej alta konsilantaro ...

—Bone — respondis Ramzes. — Sed por plenumi la promeson, mi devas antaŭe frakasi la pastrojn. Tio estas batalo, kaj ĝia rezultato ne estas certa ...

Hiram ekridetis.

—Sinjoro — diris li — se ni estus tiel malnoblaj, ke ni forlasus vin hodiaŭ, kiam via trezorejo estas malplena kaj viaj malamikoj kuraĝaj, vi estus venkita! Ĉar homo sen rimedo perdas energion, kaj de malriĉa reĝo sin deturnas lia armeo, regnanoj kaj altranguloj ... Sed se vi, sinjoro, havas nian monon kaj niajn agentojn, viajn generalojn kaj armeon, vi havos

tiom da embaraso kun la pastroj, kiom elefanto kun skorpi-
ono. Apenaŭ vi metos sur ilin la piedon, ili jam estos fraka-
sitaj ... Cetere, tio ne estas mia afero. En la ĝardeno atendas
la ĉefpastro Samentu, al kiu via sankteco ordonis veni. Mi
foriras; nun venis lia horo ... Sed mia mono ĉiam estas preta
por vi kaj ĝis tridek mil talentoj via sankteco povas ordoni ...

Hiram falis sur la vizaĝon kaj foriris, promesante tuj sen-
di la ĉefpastron.

Post duonhoro aperis Samentu. Lia barbo kaj liaj densaj
haroj estis nerazitaj, kiel konvenas al adoranto de Set; li ha-
vis severan vizaĝon kaj okulojn plenajn de saĝo. Li klinis sin
sen troa humileco kaj ne mallevis la okulojn antaŭ la pene-
trema rigardo de la faraono.

—Sidiĝu — diris la sinjoro.

La ĉefpastro sidiĝis sur la planko.

—Vi plaĉas al mi — diris Ramzes. — Vi havas figuron kaj fi-
zionomion de Hiksosoĵ, kaj ili estas la plej bravaj soldatoj de
mia armeo.

Subite li demandis:

—Ĉu vi partoprenis en la malnoblaĵo?

—Ne. Mi sekrete aŭskultis la interkonsenton ... En la temp-
loj, kiel en la palacoj de via sankteco, la muroj estas truitaj per
kanaloj, dank'al kiuj eĉ de supro de la pilonoj oni povas aŭdi,
kion oni diras en la subtera etaĝo ...

—Kaj de la subtera etaĝo oni povas paroli al personoj, kiuj
loĝas supre? — interrompis la faraono.

—Kaj ŝajnigi konsilojn de la dioj — aldonis serioze la pas-
tro.

La faraono ekridetis. Do la supozo, ke ne la spirito de lia
patro parolis al li kaj al la patrino, sed pastroj, estis vera!

—Kial vi konfidis al Fenicianoj grandan sekreton de la ŝtato? — demandis Ramzes.

—Ĉar mi volis malhelpi la traktaton, same malutilan al ni, kiel al Fenicio.

—Vi povis averti iun el la eminentaj Egiptanoj ...

—Kiun?... — demandis la pastro. — Ĉu tiajn, kiuj estas senfortaj kontraŭ Herhor, aŭ tiajn, kiuj denuncus min por min pereigi en turmentoj?... Mi diris ĉion al Hiram, ĉar li havas rilatojn kun niaj altranguloj, kiujn mi vidas neniam.

—Kial Herhor kaj Mefres faris tian traktaton? — demandis la faraono.

—Ili estas, laŭ mia opinio, homoj de malforta inteligento, kiujn timigis Beroes, la granda ĥaldeaj pastro. Li diris al ili, ke super Egipto dek jarojn pendos malfavoraj sortoj, ke se ni dum tiu ĉi tempo komencus militon kontraŭ Asirio, ni estus venkitaj ...

—Kaj ili kredis?

—Ŝajnas, ke Beroes montris al ili miraklojn ... Li eĉ leviĝis super la teron ... Sendube tio estas stranga afero; sed mi neniam komprenos, kial ni devas perdi Fenicion, ĉar Beroes scias flugi super la tero?

—Do ankaŭ vi ne kredas miraklojn?...

—Jes kaj ne ... Ŝajnas, ke Beroes vere plenumas eksterordinarajn aferojn, sed niaj pastroj nur trompas la popolon kaj la faraonojn.

—Vi malamas la pastraron?

Samentu disetendis la manojn.

—Ili ankaŭ malamas min, aŭ pli ĝuste — malestimas, je la preteksto, ke mi servas al Set. Tamen kiaj dioj tio estas, kies kapojn kaj manojn oni devas movi per ŝnuroj?... Aŭ kiaj pas-

troj, kiuj ŝajngante piecon kaj sobrecon, havas po dek virinoj, elspezas dekojn da talentoj jare, ŝtelas la oferojn de la altaroj, kaj estas ne multe pli instruitaj, ol la lernantoj de supera lernejo.

—Sed vi akceptas donacojn de Fenicianoj?

—De kiu mi prenas?... Sole Fenicianoj vere respektas Seton kaj timas, ke li ne dronigu iliajn ŝipojn. Ĉe ni lin respektas nur mizeruloj. Se mi kontentiĝus per iliaj oferoj, mortus de malsato mi kaj miaj infanoj.

La faraono pensis, ke ĉi tiu pastro ne estas malbona homo, kvankam li perfidas sekretojn de la temploj. Krom tio li ŝajnis saĝa kaj verdira.

—Ĉu vi aŭdis ion — demandis la sinjoro — pri la kanalo, kunigonta Mediteraneon kun Ruĝa Maro?

—Mi konas ĉi tiun aferon. Jam de kelkcento da jaroj niaj inĝenieroj estas studintaj la projekton.

—Kaj kial oni ne plenumis ĝin?

—Ĉar la pastroj timas, ke alfluus Egipton fremdaj popoloj, kiuj povus subfosi nian religion kaj kun ĝi la enspezojn.

—Ĉu estas vera tio, kion Hiram diris pri la popoloj, kiuj loĝas en la malproksima oriento?

—Tute vera. Jam de longe ni scias pri ili, kaj ne pasas dek jaroj, en kiuj ni ne ricevas de tie iun juvelon, desegnaĵon aŭ fabrikaĵon.

La faraono ree ekmeditis kaj subite demandis:

—Ĉu vi servos min fidele, se mi vin faros mia konsilanto?...

—Mi servos vian sanktecon per mia vivo kaj morto. Sed ... se mi fariĝus konsilanto de la trono, indignus la pastroj, kiuj malamas min.

—Ĉu vi pensas, ke oni povas faligi ilin?...

—Eĉ tre facile! — respondis Samentu.

—Kia estus via plano, se mi devus min liberigi de ili?

—Oni devus preni la trezorejon de Labirinto — diris la pastro.

—Ĉu vi konas la vojon?

—Mi jam havas multe da montroj, la ceterajn mi trovos, ĉar mi scias, kie oni devas serĉi ilin.

—Kaj poste? — demandis la faraono.

—Oni devus fari al Herhor kaj Mefres proceson pri ŝtata perfido, pro sekretaj rilatoj kun Asirio.

—Kaj la pruvoj?

—Ni trovos ilin kun helpo de Fenicianoj — respondis la pastro.

—Ĉu tio estus sen danĝero por Egipto?

—Tute. Antaŭ kvarcent jaroj la faraono Amenhotep IV fagligis la povon de la pastroj, proklaminte kredon je unu sola dio Re Harmahis. Kompreneble, li forprenis la trezorejon el la temploj de aliaj dioj. Tiam nek la popolo, nek la armeo, nek la nobeloj defendis la pastrojn. Kio do okazos hodiaŭ, kiam la antaŭa kredo malfortiĝis?

—Kiu helpis Amenhotepon? — demandis la faraono.

—Simpla pastro Ey.

—Sed kiu post la morto de Amenhotep IV fariĝis heredanto de lia trono? — diris Ramzes, fikse rigardante la okulojn de la pastro.

Sed Samentu respondis trankvile:

—La fakto pruvas, ke Amenhotep estis malforta estro, kiu pli zorgis pri la gloro de Re, ol pri la ŝtato.

—Vere, vi estas granda saĝulo!... — diris Ramzes.

—Preta servi vian sanktecon.

—Mi nomas vin mia konsilanto — diris la faraono. — Sed en tia okazo vi ne povas kaŝe viziti min, vi loĝos ĉe mi ...

—Pardonu, sinjoro, sed antaŭ ol la anoj de la plej alta kolegio ne estos en malliberejo pro traktado kun la malamiko de la ŝtato, mia ĉeesto en la palaco alportus pli da malutilo, ol da bono ... Mi do servos kaj konsilos al via sankteco, sed sekrete ...

—Kaj vi trovos la vojon al la trezorejo de Labirinto?

—Mi esperas, ke antaŭ ol vi revenos, sinjoro, de Teboj, mi sukcesos fini la aferon. Kaj kiam ni transportas la trezorejon en vian palacon, kiam la tribunalo kondamnos Herhoron kaj Mefreson, kiujn via sankteco povos poste pardoni, tiam kun via permeso mi aperos malkaŝe ... Kaj mi ĉesos esti pastro de Set, kiu nur fortimigas de si la homojn ...

—Kaj vi pensas, ke ĉio sukcesos?...

—Mi donus mian vivon!... — ekkriis la pastro. — La popolo amas vian sanktecon, facile do estas ribeligi ĝin kontraŭ la perfidaj altranguloj. La armeo obeas vin, kiel neniun faraonon de la tempoj de Ramzes Granda ... Kiu povos kontraŭstari?... Kaj krom tio via sankteco havas Fenicianojn kaj monon, la plej grandan forton en la mondo!...

Samentu volis adiaŭi la sinjoron, Ramzes permesis al li kisi siajn piedojn kaj donacis pezan oran ĉenon kaj braceleton, ornamitan per safiroj.

Ne multaj altranguloj akiris tian favoron post longaj jaroj de servado.

La vizitoj kaj promesoj de Samentu verŝis novan kuraĝon en la koron de la faraono.

Se oni sukcesus akiri la trezorojn de Labirinto!... Malgranda parto sufiĉus por liberigi la nobelojn de la feniciaj ŝuldoj,

por plibonigi la sorton de la kamparanoj kaj reaĉeti la bienojn, donitajn kiel garantiaĵo.

Kaj per kiaj konstruaĵoj oni povus pliriĉigi la staton!...

Jes, la riĉaĵoj de Labirinto povus forigi ĉiujn embarasojn de la faraono. Ĉar kion helpos, ke Fenicianoj proponas al li grandan prunton? Iam oni devos pagi ĝin, kun la procentoj, kaj pli aŭ malpli frue doni kiel garantiaĵon la reston de la reĝaj bienoj. Tio do estus nur prokrasti la ruinon, sed ne antaŭgardi sin de ĝi.

ĈAPITRO SEPA

EN la mezo de la monato Famenut (januaro) komenciĝis la printempo. La tuta Egipto verdis de la naskiĝanta tritiko, kaj sur la nigra tero svarmis kamparanoj, kiuj semis lupenon, pizon, fazeolon kaj hordeon. En la aero leviĝisodoro de la oranĝaj floroj. La akvo tre malleviĝis kaj malkovris ĉiutage novajn terajn pecojn.

La preparoj por la enterigo de Oziriso-Mer-amen-Ramzes estis finitaj.

La respektinda mumio de la reĝo estis fermita en blanka skatolo, kies supra parto bonege prezentis la trajton de la mortinto. La faraono ŝajnis rigardi per siaj okuloj, kaj lia vizaĝo esprimis kvietan malĝojon, bedaŭron ne al la mondo, kiun li forlasis, sed al la homoj, kiuj restis ankoraŭ kondamnitaj al la teda surtera vivo.

La portreto de la faraono havis sur la kapo egiptan kufon kun blankaj kaj bluaj strioj, sur la kolo ĉenojn de juveloj, sur la brusto bildon de homo genuanta kun disetenditaj brakoj, sur la piedoj bildojn de dioj, sanktaj birdoj kaj okuloj, ne sur vizaĝoj, sed rigardantaj kvazaŭ el la spaco.

La restaĵoj de la reĝo, tiel enpakitaj, ripozis sur riĉa lito, en malgranda cedra kapelo, kies muroj estis kovritaj per surskriboj, kantantaj la vivon kaj agojn de la mortinto. Super la korpo flugpendis mirakla akcipitro kun homa kapo, kaj apud la

lito tage kaj nokte restis garde pastro, alivestita kiel Anubis, la funebra dio, kun ŝakala kapo.

Krom tio oni preparis pezan bazaltan sarkafagon, kiu formis la eksteran ĉerkon de la mumio. La sarkofago ankaŭ havis la formon kaj trajtojn de la mortinta faraono, estis kovrita per surskriboj kaj bildoj de preĝantaj homoj, sanktaj birdoj kaj skaraboj.

La 17-an de Famenut la mumion kun la kapelo kaj sarkofago oni transportis de la kvartalo de la mortintoj en la reĝan palacon kaj starigis en la plej granda salono.

La salonon tuj plenigis pastroj, kantantaj funebrajn himnojn, korteganoj kaj servistoj de la mortinta reĝo, kaj antaŭ ĉio virinoj, kiuj ĝemis tiel laŭte, ke iliajn kriojn oni povis aŭdi sur la alia bordo de Nilo.

—Ho sinjoro!... Ho nia sinjoro!... — kriis ili — kial vi forlasis nin?... Vi, tiel bela, tiel bona?... Vi, kiu volonte parolis kun ni, nun vi silentas, kial?... Vi ja amis nian societeton, kaj hodiaŭ vi estas tiel malproksime de ni?...

Dume la pastroj kantis:

Ĥoro I. — Mi estas Tumu, unu kaj sola ...

Ĥoro II. — Mi estas Ra, en lia unua brilo ...

Ĥoro I. — Mi estas la dio, kiu kreas sin mem ...

Ĥoro II. — Kiu mem donas al si la nomon, kaj kiun neniu el la dioj pavas haltigi ...

Ĥoro I. — Mi konas la nomon de la granda birdo Benu, kiu provas tion, kio estas ...¹

Post dutagaj ĝemoj kaj preĝoj antaŭ la palaco haltis grandega veturilo en formo de barko. Ĝiaj ekstremoj estis ornamitaj per ŝafaj kapoj kaj ventumiloj el strutaj plumoj, super

1 "Libro de la mortintoj" — aŭtentika.

la riĉa baldakeno flugpendis aglo kaj la serpento ureuso, la simbolo de la faraona povo.

Sur la veturilon oni metis la sanktan mumion, malgraŭ la vivega kontraŭstaro de la kortegaj virinoj. Unuj sin kroĉis al la ĉerko, aliaj gratis al si la vizaĝojn kaj ŝiris la harojn, eĉ batis la homojn, portantajn la ĉerkon.

La krioj estis teruraj.

Fine, la veturilo, akceptinte la dian korpon, ekmoviĝis akompanata de grandega homa amaso, kiu kovris la tutan spacon de la palaco ĝis Nilo. Ankaŭ tie estis homoj, ŝmiritaj per koto, gratitaj, vestitaj en funebraj tukoj; ĉiuj kriis kiel frenezaj. Apud ili, konforme al la funebra ceremoniaro, sur la tuta vojo atendis ĥoroj.

Ĥoro I. — Al Okcidento, en la loĝejon de Oziriso iras vi, kiu estis la plej bona el la homaj, vi kiu malamis la malveron.

Ĥoro II. — Al Okcidento! Ne ekfloros plu homo, tiel amanta la veron, sentanta tian abomenon al la mensogo.

Ĥoro de la veturigistoj. — Al Okcidento, ho bovoj, kiuj tiras la funebran veturilon, al Okcidento!... Via sinjoro sekvas vin.

Ĥoro III. — Al Okcidento, al Okcidento, en la landon de la justuloj! La loko, kiun vi amis, ĝemas kaj ploras.

La popolamaso. — Iru en paco al Abidos!... Iru en paco al Abidos! Atingu en paco la teban Okcidenton!...

Ĥoro de ploristinoj. — Ha nia sinjoro, ho nia sinjoro, kiam vi foriras al Okcidento, la dioj mem ploras.

Ĥoro de la pastroj. — Li estas feliĉa, li la plej respektinda el la homoj, ĉar la sorto permesas al li ripozi en la tombo, kiun li mem preparis.

Ĥoro de la veturigistoj. — Al Okcidento, ho bovoj, kiuj tiras

la funebran veturilon, al Okcidento!... Via sinjoro sekvas vin ...

La popolamaso. — Iru en paco al Abidos!... Iru en paco al Abidos!... al Okcidenta maro! ²

Ĉiun kelkcenton da paŝoj staris taĉmento da soldatoj, kiuj salutis la sinjoron per surda bruo de tamburoj kaj adiaŭis per terura sono de trumpetoj. Tio ne estis funebra irado, sed triumfa marŝo al la lando de la dioj.

Kelke da paŝoj post la veturilo iris Ramzes, ĉirkaŭita de granda sekvantaro de generaloj, kaj post li la reĝino Nikotris, sin apoganta sur du kortegaj sinjorinoj. La filo kaj la patrino ne ploris, ĉar ili sciis (kion ne sciis la simpla popolo), ke la mortinta sinjoro jam estas ĉe Oziriso kaj estas tiel kontenta en la lando de la feliĉo, ke li ne volus reveni sur la teron.

Post kelkhora irado, akompanata de senĉesa krio, la restaĵoj haltis sur la bordo de Nilo.

Tie oni demetis ilin de la veturilo kaj transportis sur veran oritan ŝipon, skulptitan, kovritan per pentraĵoj, kiu havis blankajn kaj purpurajn velojn.

La kortegaj virinoj ankoraŭ unu fojon provis repreni de la pastroj la mumion; ankoraŭ unu fojon eksonis ĉiuj ĥoroj kaj ĉiuj orkestroj. Poste sur la ŝipon, portantan la reĝan mumion, eniris la reĝino Nikotris kaj dekkelko da pastroj, la popolo komencis ĵeti bukedojn kaj florkronojn, kaj la remiloj ekmurmuretis ...

Ramzes XII lastfoje forlasis sian palacon, rapidante sur Nilo al sia tombo en Teboj. Survoje, kiel zorgema monarĥo, li devis halti en ĉiuj famaj lokoj, por adiaŭi ilin.

La vojaĝo daŭris tre longe. Ĝis Teboj estis preskaŭ cent

2 Aŭtentikaj esprimoj.

mejloj, oni veturis kontraŭ la fluo, kaj la mumio devis viziti ĉiujn apudbordajn templojn kaj partopreni en la solenaj diservoj.

Kelke da tagoj post la forveturo de Ramzes XII al la eterna ripozo, Ramzes XIII ekveturis post li, por revivigi la korojn de siaj regnantoj, senvivajn de la malĝojo, akcepti ilian respekteton kaj fari oferojn al la dioj. Post la mortinta sinjoro forveturis, ĉiu sur propra ŝipo, ĉiuj ĉefpastroj, multaj altrangaj pastroj, la plej riĉaj bienposedantoj kaj la plimulto de la nomarĥoj. La nova faraono pensis, ne sen maldolĉo, ke lia sekvantaro estos tre malmultenombra.

Sed okazis alie. Ĉe la flanko de Ramzes XIII troviĝis ĉiuj generaloj, tre multaj oficistoj, la malgranda nobelaro kaj ĉiuj malsuperaj pastroj. Tio pli mirigis, ol ĝojigis la faraonon.

Tio estis nur la komenco. Kiam la ŝipo de la juna sinjoro aperis sur Nilo, venis renkonte al ĝi tia amaso da grandaj kaj malgrandaj, riĉaj kaj malriĉaj ŝipetoj, ke ili preskaŭ kovris la riveron. Sidis en ili malriĉaj familioj de kamparanoj kaj metistoj, riĉe vestitaj komercistoj, Fenicianoj en helaj koloroj, graciaj grekaj maristoj, eĉ Asirianoj kaj Ĥetoj.

La amaso ne kriis, sed bruegis; ĝi ne ĝojis, sed frenezis. Ĉiun momente sur la reĝan ŝipon grimpis deputataro, por kisi la ferdekon, kiun tuŝis la piedoj de la sinjoro, fari donacojn: plenmanon da greno, teksaĵon, simplan argilan kruĉon, paron da birdoj, kaj precipe florajn kronetojn. Antaŭ ol la faraono preterpasis Memfison, oni devis kelkfoje liberigi la ŝipon de la donacoj, por ke ĝi ne dronu.

La junaj pastroj parolis unu al alia, ke ekster Ramzes Granda neniu faraono estis salutata kun tia entuziasmo.

Sama estis la tuta vojaĝo de Memfiso ĝis Teboj, kaj la eks-

tazo de la popolo anstataŭ malgrandiĝi kreskis. La kamparanoj forlasis la kampojn, la metiistoj la stablojn, por ĝui la plezuron vidi la novan estron, pri kies intencoj jam naskiĝis legendoj. Oni atendis grandegajn ŝanĝojn, kvankam neniu sciis, kiajn. Unu afero estis certa, ke la severeco de la oficistoj kvietiĝis, ke Fenicianoj malpli senkompate kolektis la impostojn, kaj ke la egipta popolo, ordinare humila, komencis levi la kapojn en la ĉeesto de la pastroj.

Se nur la faraono permesos — oni parolis en drinkejoj, sur kampoj, en bazaroj — ni faros la ordon kun la sanktaj viroj ... Ili estas kulpaj, ke ni pagas grandajn impostojn, ke la vundoj neniam resaniĝas sur niaj dorsoj!...

Sep mejlojn sude de Memfiso inter la branĉoj de la libiaj montoj, kuŝis la lando Piom aŭ Fayum, interesa per tio, ke ĝi estis kreita de homaj manoj.

Iam en tiu loko estis kalva dezerto, ĉirkaŭita de amfiteatro de nudaj montoj. La faraono Amenhemat, tri mil kvincent jarojn antaŭ Kristo, estis la unua, kiu entreprenis ŝanĝi ĝin en fruktodonan landon.

Por ĉi tiu celo li apartigis la orientan parton de la dezerto kaj ĉirkaŭis ĝin per potenca digo. Ĝi estis unu etaĝon alta, cent paŝojn dika ĉe la fundamento, kaj pli ol kvardek kilometrojn longa.

Tiel oni konstruis akvujojn, kiu povis enteni ĉirkaŭ tri miliardojn da kubaj metroj, tri kubajn kilometrojn da akvo, kies supraĵo okupis preskaŭ tricent kvadratajn kilometrojn. La akvujo servis por la irigado de ducent mil hektaroj, kaj krom tio dum la leviĝo de la rivero ĝi sorbis superfluan de la akvo kaj gardis grandan parton de Egipto de subita subakvigo.

Ĉi tiun grandegan akvan amason oni nomis la lago Moe-

ris kaj rigardis kiel unu el la mirakloj de la mondo. Dank'al ĝi la dezerta valo ŝanĝiĝis en la riĉan landon Piom, kie vivis en bonstato preskaŭ ducent mil loĝantoj. En ĉi tiu provinco, krom la palmoj kaj tritiko, oni kulturis plej belajn rozojn, kies oleon oni dissendis en la tuta Egipto, eĉ ekster ĝiaj limoj.

La ekzistado de la lago Moeris estis ligita kun alia mirakla laboro de la egiptaj inĝenieroj, la kanalo de Jozefo.

Ĉi tiu kanalo, ducent paŝojn larĝa, sin etendis kelkdekon da mejloj, okcidente de Nilo. Ĝi troviĝis du mejlojn malproksime de la rivero, kaj servis por la irigado de la teroj, najbaraj al la libiaj montoj, kaj kondukis la akvon en la lagon Moeris.

Ĉirkaŭ la lando Piom estis kelke da antikvaj piramidoj kaj multe da malgrandaj tomboj. Ĉe ĝia orienta limo estis la fama Labirinto (Lope-ro-hunt). Ĝi estis konstruita ankaŭ de Amen-hemat kaj havis formon de grandega hufofero, kiu okupis pecon da tero mil paŝojn longan kaj sescent larĝan.

Ĉi tiu konstruaĵo estis la plej granda trezorejo de Egipto. Tie ripozis la mumioj de multaj gloraj faraonoj, eminentaj pastroj, militestroj kaj arĥitektoj. Tie dormis ankaŭ la restaĵoj de la respektataj bestoj, kaj antaŭ ĉio de krokodiloj. Fine, tie estis la gardejo de riĉaĵoj de la egipta regno, kolektitaj dum jarcentoj, riĉaĵoj tiel grandegaj, ke ne eble estas hodiaŭ havi ideon pri ili.

Labirinto ne estis nealirebla de ekstere, nek tre gardata; ĝin gardis nur malgranda taĉmento de pastraj soldatoj kaj kelke da pastroj de provita honesteco. La sendanĝereco de la trezorejo estis bazita je tio, ke ekster tiuj kelkaj personoj neniu sciis, kie ĝin serĉi en Labirinto, kiu estis dividita en du etaĝojn: subtera kaj surtera, el kiuj ĉiu kalkulis mil kvincent ĉambrojn!...

Ĉiu faraono, ĉiu ĉefpastro, fine ĉiu granda trezoristo, tuj post ricevo de la ofico, havis la devon per la propraj okuloj rigardi la riĉaĵojn de la ŝtato. Malgraŭ tio neniu el la altranguloj povus trovi la vojon tien, eĉ konjekti, kie estas la trezorejo. Ĉu en la ĉefa konstruaĵo, aŭ en unu el la flankoj, super la tero aŭ sub la tero?

Multaj pensis, ke la trezorejo estas lokita vere sub la tero, malproksime ekster Labirinto mem. Aliaj estis certaj, multnombraj ili estis, ke la trezorejo kuŝas sub la fundo de la lago, por ke oni povu, en okazo de neceso, subakvigi ĝin. Fine, neniu altrangulo amis sin okupi per ĉi tiu demando, sciante, ke atenco kontraŭ la riĉaĵoj de la dioj altiras pereon de la malpiulo.

Eble la profanoj sukcesus trovi la vojon, se la timo ne paralizus iliajn pensojn. Morto korpa kaj morto eterna minacis homon kaj lian familion, kiu kuraĝus per malpia penso malkovri tiajn sekretojn.

Veninte en la landon, Ramzes vizitis antaŭ ĉio la provincon Piom. Ĝi havis la aspekton de kava plado, kies fundo estis la lago, kaj randoj — la montoj. Kien li turnis la okulojn, ĉie li trovis sukplenan verdaĵon de herboj, punktitan de floroj, arojn da palmoj, figajn kaj tamarindajn arbaretojn, en kiuj de la leviĝo ĝis la subiro de la suno sonis birdaj kantoj kaj gajaj homaj voĉoj.

Tio estis kredeble la plej feliĉa angulo de Egipto.

La popolo akceptis la faraonon kun granda entuziasmo.

Lin kaj lian sekvantaron oni superŝutis per floroj, donacis al li multekostajn parfumojn, kaj oron kaj multvalorajn ŝtonojn por dek talentoj.

La sinjoro gastis du tagojn en la feliĉa lando, kie ĝojo ŝaj-

nis flori sur la arboj, flugi en la aero, rebrili de la akvoj de la lago. Sed oni rememorigis al li, ke li devas viziti Labirinton.

Li forlasis la valon kun sopiro, kaj veturante rerigardis al ĝi de la vojo. Sed baldaŭ lia atento estis altirita de grandega griza konstruaĵo, majeste sidanta sur monteto.

Ĉe la pordo de la senmorta Lope-ro-hunt salutis lin areto da pastroj kun asketa aspekto, kaj malgranda taĉmento, kies ĉiu soldato estis tute razita.

—Ĉi tiuj homoj havas aspekton de pastroj!... — ekkriis Ramzes.

—Efektive ĉiu el ili ricevis la unuan pastran benon, kaj la centestroj la superan — respondis la ĉefpastro de la konstruaĵo.

Rigardante pli atente la fizionomiojn de ĉi tiuj strangaj soldatoj, kiuj ne manĝis viandon kaj vivis celibate, la faraono rimarkis en ili inteligentecon kaj kvietan energion. Li vidis ankaŭ, ke lia sankta persono faras neniun impreson en ĉi tiu loko.

”Mi tre dezirus scii, kiel penetros ĉi tien Samentu?...” — diris al si la sinjoro.

Li komprenis, ke ĉi tiujn homojn oni povas nek timigi, nek subaĉeti. Tia memkonfido estis legebla sur iliaj vizaĝoj, kvazaŭ ĉiu el ili posedus je sia dispono nevenkeblajn regimentojn de spiritoj.

”Ni vidos — pensis li — ĉu miaj Grekoj kaj Azianoj timos ĉi tiujn virojn?... Feliĉe, ili estas tiel sovaĝaj, ke ili ne ŝatas la solenajn mienojn ...”

Laŭ la peto de la pastroj, la sekvantaro de Ramzes restis antaŭ la pordego, kvazaŭ sub gardo de la razitaj soldatoj.

—Ĉu mi devas lasi ĉi tie ankaŭ mian glavon? — demandis la faraono.

—Ĝi tute ne ĝenas nin — respondis la ĉefa gardisto.

La juna sinjoro volis regali la sanktan viron almenaŭ per la plato de la glavo, sed li detenis sin.

Tra granda korto, inter du vicoj de sfinksoj, la faraono kaj pastroj eniris en la ĉefan konstruaĵon. Tie, en vasta, sed iom malluma vestiblo estis ok pordoj, kaj gardisto demandis:

—Tra kiu pordo via sankteco volas eniri en la trezorejon?

—Tra tiu, kiu kondukos nin plej rapide.

Ĉiu el la kvin pastroj prenis du paketojn de torĉoj, sed nur unu lumigis. Apud li staris la ĉefa gardisto, tenante en la manoj rozarion, sur kies eroj estis skribitaj iaj signoj. Post ili Ramzes, ĉirkaŭita de la ceteraj pastroj.

La ĉefpastro sin turnis dekstren kaj eniris en grandan ĉambregon, kies muroj kaj kolonoj estis kovritaj per surskriboj kaj figuroj. De tie ili penetris en malvastan koridoron, kiu kondukis supren, kaj ili troviĝis en alia ĉambrego, rimarkinda per la granda nombro de pordoj. Tie foriĝis antaŭ ili unu ŝtono de la planko, malkovrante truon, tra kiu ili malsupreniris kaj ree tra malvasta koridoro ili sin turnis al ĉambro sen pordoj.

La gvidanto tuŝis hieroglifon kaj la muro foriĝis antaŭ ili.

Ramzes volis konjekti la direkton, en kiu ili iris, sed tuj liaj pensoj implikiĝis. Li vidis nur, ke ili rapide trapasas grandajn salonojn, malgrandajn ĉambrojn, malvastajn koridorojn, ke ili grimpas supren aŭ kuras malsupren, ke unuj ĉambregoj havas multe da pordoj, kaj aliaj tute ne posedas ilin. Samtempe li rimarkis, ke la gvidanto ĉe ĉiu nova eniro glitigas unu eron de sia longa rozario kaj iafoje ĉe lumo de la torĉo komparas ĝiajn signojn kun la signoj sur la muroj.

—Kie ni estas nun — demandis subite la faraono — sub la tero aŭ super tero?

—Ni estas en la povo de la dioj — respondis lia najbaro.

Post kelke da transiroj kaj kurbiĝoj la faraono ree diris:

—Sed ni jam estis ĉi tie, eble eĉ du fojojn!...

La pastroj silentis, kaj tiu, kiu portis la torĉon, lumigis la murojn unu post alia; Ramzes, bone rigardinte ilin, konfesis en sia animo, ke li ne estis ankoraŭ tie.

En malgranda ĉambro, sen pordoj, oni mallevis la torĉon, kaj la faraono rimarkis sur la tero sekiĝintan, nigran kadavron, envolvitan en putrinta tuko.

—Tio estas — diris la gardisto de la konstruaĵo — la kadavro de Feniciano, kiu en la tempoj de la XVI dinastio provis penetri en Labirinton kaj venis ĝis tie ĉi.

—Ĉu oni mortigis lin? — demandis la faraono.

—Li mortis de malsato.

Ili jam iris duonon de horo, kiam la pastro, portanta la torĉon, lumigis niĉon de koridoro, kie ankaŭ kuŝis sekiĝinta korpo.

—Tio estas — diris la gardisto — la kadavro de nubia pastro, kiu en la tempoj de via avo provis eniri ĉi tien.

La faraono ne demandis, kia okazis al li. Li havis impreson, ke li estas en profundegaĵo kaj ke Labirinto premezas lin per sia pezo. Li ne revis plu pri orientado en la centoj da koridoroj, salonoj, ĉambroj. Li eĉ ne deziris klarigi al si, per kia miraklo disiĝas antaŭ ili la ŝtonaj muroj aŭ foriĝas la plankoj.

”Samentu faros nenion — diris li al si mem — aŭ li pereos, kiel tiuj du, pri kiuj mi devas diri al li.”

Tian senton de senespero, senforteco kaj nenieco li havis ankoraŭ neniam. Dum momentoj ŝajnis al li, ke la pastroj

lasos lin en unu el la malvastaj ĉambroj sen pordoj. Tiam ek-regis lin malespero, li kaptis la glavon kaj estis preta pecetigi ilin. Sed tuj li rememoris, ke sen ilia helpo li ne povos eliri de ĉi tie, kaj li mallevis la kapon.

Ho, se almenaŭ dum unu momento li povus ekvidi la tagan lumon!... Kiel terura devas esti la morto inter ĉi tiuj tri mil ĉambroj, plenaj de krepusko aŭ mallumo!...

La animoj de herooj havas iafoje momentojn de profunda senespero, pri kies ekzistado eĉ ne scias ordinara homo.

La marŝo daŭris jam preskaŭ unu horon, kiam fine ili venis en malaltan ĉambregon, apogitan sur okangulaj kolonoj. La tri pastroj, kiuj ĉirkaŭis la faraonon, disiĝis, kaj Ramzes rimarkis, ke unu el ili sin alpremis al kolono kaj kvazaŭ malaperis en ĝia interno.

Post momento en unu el la muroj malfermiĝis mallarĝa truo, la pastroj revenis al la antaŭaj lokoj kaj la gvidanto ordonis eklumigi kvar torĉojn. Ĉiuj ekiris al la truo kaj singarde englitis tra ĝi.

—Jen estas la kameroj — diris la gardisto de la konstruaĵo.

La pastroj rapide eklumigis la torĉojn sur la kolonoj kaj muroj. Ramzes ekvidis vicon de grandegaj ĉambroj, plenplenaj de diversaj objektoj de senlima valoro. En ĉi tiu kolekto ĉiu dinastio, ĉiu faraono lasis, kion ili havis plej rimarkindan kaj multekostan.

Estis tie veturiloj, ŝipetoj, litoj, tabloj, kestoj kaj kronoj oraj aŭ kovritaj per oraj ladoj, inkrustitaj per eburo, perlamoto kaj kolora ligno tiel arte, ke artistoj metiistoj faris ilin dum dekoj da jaroj. Estis tie armaĵoj, ŝildoj kaj saguoj, brilantaj de multekostaj ŝtonoj, vazoj, pladoj kaj kuleroj el pura oro, multekostaj vestoj kaj baldakenoj.

Ĉio ĉi, dank'al la sekeco, kaj pureco de la aero, de jarcentoj konserviĝis sen ŝanĝoj.

Inter la rimarkindaj objektoj Ramzes trovis la modelon de la asiria palaco, donacita de Sargon al Ramzes XII. La ĉefpastro, kiu klarigis al la faraono, de kiu venas ĉiu donaco, atente observis lian fizionomion. Sed anstataŭ admiro li rimarkis malkontentecon.

—Diru al mi, via ekscelenco — demandis subite la faraono — kian utilon alportas ĉi tiuj trezoroj, ŝlositaj en tiu ĉi malluma loko?...

—Granda forto estas en ili por la okazo, se Egipto troviĝus en danĝero — respondis la ĉefpastro. — Per kelke da ĉi tiuj kaskoj, veturiloj, glavoj ni povas aĉeti la bonvolon de ĉiuj asiriaj satrapoj. Eble ne povus kontraŭstari eĉ la reĝo Assar mem, se ni liverus al li meblojn por la trona salono aŭ armilejo.

—Mi pensas, ke ili preferus preni ĉion de ni per la glavo, ol iom da trezoroj per la bonvolo por ni — interrompis la sinjoro.

—Ili provu!... — diris la ĉefpastro.

—Mi komprenas ... Vi havas rimedojn por neniigi la trezorojn. Sed en tia okazo neniu plu profitos de ili.

—Tio ne estas mia afero. — Ni gardas, kion oni konfidis al ni, kaj faras, kion oni ordonis.

—Ĉu ne pli bone estus uzi parton de la trezoroj por subteni la ŝtatan kason kaj relevi Egipton el la malsukceso, en kiu ĝi dronas hodiaŭ? — demandis la faraono.

—Tio ne dependas de ni.

La faraono sulkgigis la brovojn. Dum kelke da minutoj li

rigardis la objektojn, cetere sen granda entuziasmo, fine li ree demandis:

—Bone. Ĉi tiuj artaj verkoj povas esti utilaj por akiri la bonvolon de la asiriaj altranguloj. Sed se eksplodus milito kontraŭ Asirio, kiel ni ricevus grenon, homojn kaj armilojn de la popoloj, kiuj ne ŝatas la artajn maloftaĵojn?

—Malfermu la trezorejon!... — diris la ĉefpastro. Ankaŭ ĉi tiun fojon la pastroj diskuris: du malaperis kvazaŭ en la interno de kolonoj, unu suriris la muron per ŝtupetaro kaj faris ion ĉe skulptita figuro.

Ree foriĝis kaŝita pordo kaj Ramzes eniris en la veran trezorejon.

Tio estis vasta ĉambro, plenplena de netakseblaj materialoj. Tie staris argilaj bareloj, plenaj de ora sablo, oraj pecegoj, metitaj kiel brikoj, kaj oraj stangoj ligitaj kune. Arĝentaj pecegoj, starigitaj unu sur alia, formis kvazaŭ muron, kelkon da ulnoj larĝan, altan ĝis la plafono.

En niĉoj kaj sur ŝtonaj tabloj kuŝis multekostaj ŝtonoj de ĉiuj koloroj: rubenoj, topazoj, smeraldoj, safiroj, diamantoj, fine perloj de la grandeco de nukso, eĉ de birda ovo. Multaj el ĉi tiuj juveloj sufiĉus por aĉeti urbon.

—Jen estas nia riĉaĵo por la okazo de malfeliĉo — respondis la pastro gardisto.

—Kian malfeliĉon vi ankoraŭ atendas? — demandis la faraono. — La popolamaso estas malriĉa, la kortego kaj nobeloj dronas en ŝuldoj, la armeo estas malgrandigita ĝis duono, la faraono ne havas monon ... Ĉu iam ajn Egipto estis en pli malbona situacio?...

—Ĝi estis en pli malbona, kiam ĝin sklavigis Hiksoso.

—Post dekelko da jaroj — respondis Ramzes — sklavigos

nin eĉ Izraelidoj, se ne faros tion pli frue Libianoj kaj Etiopianoj. Kaj tiam la belaj ŝtonoj, pecetigitaj, servos kiel ornamo por la hebreaj kaj negraj sandaloj ...

—Estu trankvila, via sankteco. En okazo de neceso ne nur la trezorejo, sed eĉ Labirinto malaperos sen postesigno, kun la gardistoj.

Ramzes definitive komprenis, ke li havas antaŭ si fanatikulojn, kiuj pensas nur pri unu afero: allasi neniun al la trezorejo!

La faraono sidiĝis sur la oraj brikoj kaj diris:

—Vi do konservas ĉi tiujn trezorojn por tempo, kiam mal-feliĉo premegos Egipton?

—Vi diras la veron, sankta sinjoro.

—Sed kiu konvinkos vin, gardistoj, ke tia tempo jam venis, se ĝi venos?

—Por tio devas esti kunvokita eksterordinara kunveno de aŭtoĥtonaj Egiptanoj, en kiu partoprenos: la faraono, dektri altrangaj pastroj, dektri nomarĥoj, dektri nobeluloj, kaj po dektri oficiroj, komercistoj, metiistoj kaj kamparanoj.

—Al tia kunveno vi donus la trezorojn? — demandis la faraono.

—Ni donus la necesan sumon, se la tuta kunveno, kvazaŭ unu viro, proklamus, ke Egipto estas en danĝero, kaj ...

—Kaj?...

—Kaj se la statuo de Amon en Teboj konfirmus la decidon.

Ramzes mallevis la kapon, por kaŝi la esprimon de granda kontenteco. Li jam havis planon.

”Tian kunvenon mi sukcesos kolekti kaj instigi ĝin al unanimeco — diris li al si. — Ankaŭ ŝajnas al mi, ke la statuo de

Amon konfirmos la decidon, kiam mi ĉirkaŭos liajn pastrojn per miaj Azianoj ...”

—Mi dankas vin, piaj viroj — diris li laŭte — ke vi montris al mi la multekostajn objektojn, kies granda valoro ne malhelpas min tamen esti la plej malriĉa el la reĝoj de la mondo. Kaj nun elkonduku min, mi petas, per pli mallonga kaj pli oportuna vojo.

—Mi deziras al via sankteco — respondis la gardisto — ke vi aldonu al Labirinto saman kvanton da riĉaĵoj ... Koncerne la vojon, estas nur unu kaj ni devas reveni per la sama.

Unu el la pastroj donis al Ramzes iom da daktiloj, alia botelon da vino, preparita kun fortiga rimedo. La faraono retrovis la fortojn kaj iris gaja.

—Mi donus multe — diris li, ridetante — por koni ĉiujn kurbiĝojn de tiu ĉi stranga vojo!...

La pastro gvidanto haltis.

—Mi certigas vian sanktecon — diris li — ke ni mem ne komprenas, nek memoras la vojon, kvankam ĉiu el ni faris ĝin multfoje ...

—Kiel do vi trovas ĝin?

—Ni profitas de kelkaj montraj, sed se ni perdus nur unu, eĉ en ĉi tiu momento, ni mortus de malsato.

Fine ili eliris el la vestiblo kaj el ĝi en la korton. La faraono komencis ĉirkaŭrigardi kaj kelke da fojoj spiris.

—Por ĉiuj trezoroj de Labirinto mi ne volus ilin gardi! — ekkriis li. — Timo falas sur mian bruston, kiam mi pensas, ke oni povas morti en ĉi tiuj ŝtonaj keloj ...

—Sed oni povas ankaŭ ekami ilin — respondis la ĉefpastro kun rideto.

La faraono dankis ĉiujn gvidantojn kaj finis per la vortoj:

—Mi volus fari por vi ian favoron, postulu do ...

Sed la pastroj aŭskultis indiferente kaj ilia ĉefo diris:

—Pardonu al mi, sinjoro, mian kuraĝon, sed ... kion ni povus deziri? Niaj figoj kaj daktiloj estas same dolĉaj, kiel tiuj el via ĝardeno, nia akvo same bona, kiel tiu el via puto. Kaj se allogus nin riĉaĵoj, ĉu ni ne posedas pli multe da ili, ol ĉiuj reĝoj?...

”Ĉi tiujn mi fleksos per nenio — pensis la faraono — sed ... mi donos al ili la decidon de la kunveno kaj la verdikton de Amon ...”

ĈAPITRO OKA

Forlasinte la landon Piom, la faraono kaj lia sekvantaro dekelkon da tagoj veturis al la sudo, kontraŭ la fluo de Nilo, ĉirkaŭitaj de nuboj de ŝipoj, salutataj per krioj, superŝutataj per floroj.

Sur ambaŭ bordoj de la rivero sin etendis seninterrompa vico de argilaj dometoj, figaj arbaroj, palmaj bukedoj. Ĉiuhore sin montris grupo de blankaj domoj de iu urbeto, aŭ pli grandaj urboj kun koloraj konstruaĵoj, kun grandegaj pilonoj de temploj.

Okcidente la muro de la libiaj montoj desegniĝis ne tre klare; kontraŭe oriente la arabia ĉeno pli kaj pli proksimiĝis al la rivero. Oni povis vidi klare la breĉitajn ŝtonegojn nigrajn, flavajn aŭ rozajn, kiuj rememorigis per la formo ruinojn de citadeloj aŭ temploj, konstruitaj de grandeguloj.

En la mezo de Nilo oni renkontadis insulojn, kiuj, ŝajnis, hieraŭ elakviĝis, kaj hodiaŭ jam estis kovritaj de riĉaj vegetaĵoj kaj loĝataj de sennombraj birdaj aroj. Kiam proksimiĝis la brua sekvantaro de la faraono, la birdoj timigite leviĝis kaj, rondflugante super la ŝipoj, kunigis siajn kriojn kun la potenco voĉo de la popolo. Super ĉio ĉi pendis la pura ĉielo kaj lumo tiel plena de vivo, ke en ĝiaj ondoj la nigra tero fariĝis brila kaj ŝtonoj ĉielarke koloriĝis.

La tempo fluis gaje por la faraono. En la komenco iom incitis lin la senĉesaj krioj, sed poste li tiel kutimis al ili, ke li

tute ne atentis ilin. Li povis legi dokumentojn, interkonsiliĝi, eĉ dormi.

Tridek ĝis kvardek mejlojn de Piom, sur la maldekstra bordo de Nilo kuŝis granda urbo Siut, en kiu Ramzes ripozis kelke da tagoj. Estis eĉ konvene halti, ĉar la mumio de la mortinta reĝo estis ankoraŭ en Abidos, kie ĉe la tombo de Oziriso oni solene preĝis.

Siut estis unu el la plej riĉaj urboj de Supra Egipto. Tie oni fabrikis la famajn vazojn el blanka kaj nigra argilo kaj teksis tolon; tie estis la ĉefa bazaro, kien oni alportis komercaĵojn el la oazoj, dissemitaj en la dezerto.

Tie, fine, estis la fama templo de Anubis, la dio kun la lupa kapo.

En la dua tago sin prezentis al lia sankteco la pastro Pentuer, la ĉefo de la komitato, esploranta la situacion de la popolo.

—Ĉu vi havas novaĵojn? — demandis la sinjoro.

—Jenajn: la tuta Egipto benas vian sanktecon. Ĉiuj, kun kiuj mi parolis, estas plenaj de espero kaj diras, ke via regado estos renaskiĝo de la ŝtato.

—Mi volas — respondis la faraono — ke miaj regnantoj estu feliĉaj, ke la popolo spiru libere. Mi volas, ke Egipto havu, kiel iam, ok milionojn da loĝantoj kaj reakiru la terojn, kiujn forŝiris de ĝi la dezerto. Mi volas, ke la laborema homo ripozu ĉiun sepan tagon kaj ke ĉiu kamparano posedu pecon da tero, kiel propraĵon ...

Pentuer falis sur la vizaĝon antaŭ la bona sinjoro.

—Leviĝu — diris Ramzes. — Tamen mi devas konfesi al vi, ke mi travivis malfacilajn momentojn. Ĉar mi vidas la mizeron de mia popolo, deziras relevi ĝin, kaj samtempe oni scii-

gas al mi, ke la trezorejo estas malplena. Vi ja mem scias plej bone, ke ne posedante kelkdekon da miloj da talentoj, mi ne povus riski fari tiajn reformojn. Sed hodiaŭ mi jam estas trankvila: mi havas rimedon por elpreni la necesan sumon el Labirinto.

Pentuer kun miro rigardis la monarĥon.

—La gardisto de la trezorejo klarigis al mi, kion mi devas fari — daŭrigis la faraono. — Mi devas kunvoki ĝeneralan kunvenon de ĉiuj klasoj, po dektri homoj de ĉiu klaso. Kaj kiam ili proklamos, ke Egipto bezonas subtenon, Labirinto liveros al mi trezorojn ... Ho dioj!... aldonis li — por du ... por unu el tiuj juveloj, kiuj kuŝas tie, oni povas doni al la popolo kvindek ripozojn jare!... Neniam ili estos pli bone uzitaj.

Pentuer skuis la kapon.

—Sinjoro — diris li — ses milionoj da Egiptanoj, kaj mi kun miaj amikoj la unuaj, konsentos, ke vi ĉerpu el tiu trezorejo ... Sed ... forlasu la iluziojn, via sankteco!... Cent plej altrangaj oficistoj de la ŝtato kontraŭstaros, kaj tiam Labirinto donos nenion ...

—Ili do volas, ke mi fariĝu almozulo ĉe iu templo?... — eksplodis la faraono.

—Ne — respondis la pastro. — Ili timos, ke la trezorejo, unu fojon tuŝita, tute malpleniĝos. Ili suspektos la plej fidelajn servistojn de via sankteco, ke ili dividas la profitojn, fluantajn el ĉi tiu fonto ... Kaj tiam la envio murmuretos al ili: kial ankaŭ vi ne povus gajni ion? Ne malbonvolo al vi, sed reciproka malkonfido kaj avideco puŝos ilin al kontraŭstaro.

Aŭskultinte la vortojn, la sinjoro trankviliĝis, eĉ ek ridetis.

—Se estas tiel, kara Pentuer, kiel vi diras, estu trankvila — diris Ramzes. — En la nuna momento mi komprenis, por kio

Amon kreis la povon de la faraono kaj donis al li superhoman potencon. Li faris tion, por ke cent eĉ plej altrangaj friponoj ne povu pereigi la ŝtaton.

Ramzes leviĝis de la seĝo kaj aldonis:

—Diru al mia popolo, ke ĝi laboru kaj estu pacienca ... Diru al la pastroj, kiuj estas fidelaj al mi, ke ili servu al la dioj kaj kulturu la saĝon, kiu estas la suno de la mondo ... Ve al ili, se ili kolerigos mian koron!

—Sinjoro — diris la pastro — mi estas via fidela servisto.

Sed kiam adiaŭinte la faraonon, li eliris, sur lia vizaĝo estis videbla ĉagreno ...

Dek kvin mejlojn de Siut, kontraŭ la fluo de la rivero, la sovaĝaj arabiaj ŝtonegoj preskaŭ tuŝas Nilon; kontraŭe la libiaj montoj foriras de ĝi tiel malproksimen, ke la tiea valo estas eble la plej larĝa en Egipto.

En ĉi tiu loko, unu apud la alia, staris du respektegataj urboj: Tinis kaj Abidos. Tie naskiĝis Menes, la unua egipta faraono; tie antaŭ cent mil jaroj oni metis en la tombon la sanktajn restaĵojn de la dio Oziriso, kiun perfide mortigis lia frato Tifon.

Tie, fine, kiel rememoraĵon de ĉiuj tiuj grandaj okazoj, la glora faraono Seti konstruis templon, al kiu alkuradis pilgrimoj de la tuta Egipto. Ĉiu fidelulo devis almenaŭ unu fojon en la vivo tuŝi per la frunto ĉi tiun benitan teron. Sed vere feliĉa estis tiu, kies mumio povis fari la vojaĝon al Abidos kaj almenaŭ de malproksime halti apud la muroj de la templo.

La mumio de Ramzes XII loĝis tie kelkajn tagojn, ĉar li estis monarĥo konata de sia pieco. Ne estas do mirinde, ke ankaŭ Ramzes XIII komencis sian regadon per la honora adoro al la tombo de Oziriso.

La templo de Seti ne apartenis al la plej antikvaj kaj belaj en Egipto, sed ĝi distingiĝis per pureco de la egipta stilo. Lia sankteco Ramzes XIII vizitis ĝin kaj faris oferojn, akompanata de la ĉefpastro Sem.

La teroj, apartenantaj al la templo, okupis naŭdek hektarojn, sur kiuj estis fiŝaj lagetoj, ĝardenoj floraj, fruktaj kaj legomaj, fine domoj, aŭ pli ĝuste malgrandaj palacoj de la pastroj. Ĉie kreskis palmoj, figarboj, oranĝujoj, poploj, akacioj, kiuj formis aŭ aleojn, kiuj sin direktis al la ĉefaj partoj de la mondo, aŭ grupoj de arboj, plantitaj regule kaj preskaŭ de sama alteco.

Eĉ la mondo de vegetaĵoj, sub la zorga okulo de la pastroj, ne kreskis laŭ sia propra impulso, formante neregulajn, sed pentrindajn arojn; eĉ ĝi dismetis sin laŭ rektaj paralelaj linioj, aŭ grupiĝis en geometriajn figurojn.

La palmoj, tamarindoj, cipresoj kaj mirtoj estis kvazaŭ soldatoj, en vicoj aŭ kolonoj. La herbo estis tapiŝo, tondita kaj ornamita per floroj, ne de iu ajn koloro, sed de tiu, kiu estis necesa. La popolo rigardante de supre la herbarojn de la temploj, vidis sur ili florantajn bildojn de la dioj aŭ de la sanktaj bestoj; la saĝulo trovis aforismojn, skribitajn per hieroglifoj.

La mezan parton de la ĝardenoj okupis ortangulo, naŭcent paŝojn longa kaj tricent larĝa. La ortangulo estis ĉirkaŭita de ne tre alta muro, kiu posedis unu videblan pordegon kaj dekelkon da kaŝitaj pordetoj. Tra ĉi tiu pordego la popolo eniradis en la korton, ĉirkaŭantan la templon de Oziriso kaj kovritan per ŝtona planko. Nur en la centro de la korto staris la templo: ortangula konstruaĵo, kvarcent kvindek paŝojn longa kaj cent kvindek larĝa.

De la pordego kondukis al la templo aleo de sfinksoj kun

leonaj korpoj kaj homaj kapoj. Ili staris en du vicoj, po dek en ĉiu, kaj rigardis reciproke al si la okulojn. Inter ili povis trairi nur la plej altrangaj oficistoj.

En la fino de la aleo de la sfinksoj, ankaŭ kontraŭ la pordego por la popolo, staris du obeliskoj, t. e. maldikaj kaj altaj kvarangulaj kolonoj el granito, sur kiuj estis skribita historio de la faraono Seti.

Nur post la obeliskoj leviĝis la potenca pordego de la templo, havanta ĉe ambaŭ flankoj grandegajn konstruaĵojn en formo de detranĉitaj piramidoj, nomataj *pilonoj*. Tio estis kvaŝaŭ du masivaj turoj, sur kies muroj estis pentraĵoj, prezentantaj venkojn de Seti aŭ liajn oferojn al la dioj.

Ĉi tiun pordegon ne povis trapasi kamparanoj, sed nur riĉaj burĝoj kaj privilegiataj klasoj. Tra ĝi oni eniradis en *peristilon*, korton, ĉirkaŭitan de koridoro, apogita sur multe da kolonoj. La peristilo povis lokigi ĉirkaŭ dek mil piulojn.

De la korto, la nobeloj povis ankoraŭ eniri en la unuan ĉambregon, la *hipostilon*; ĝi havis plafonon, apogitan sur du vicoj de altaj kolonoj, kaj povis lokigi ĉirkaŭ du mil piulojn. Ĉi tiu ĉambrego estis la ekstrema punkto por la profanoj. La plej altrangaj oficistoj, sed kiuj ne ricevis pastrajn benojn, havis la rajton preĝi nur tie kaj de tiu loko rigardi la kovritan statuon de la dio, kiu staris en la ĉambrego de la "dia aperado".

Post ĉi tiu ĉambrego estis la ĉambro de la "oferaj tabloj", kie la pastroj transdonis al la dioj oferojn, alportatajn de la fideluloj.

Sekvanta estis la ĉambro de la "ripozo", kie ripozis la dio, revenanta aŭ iranta al la procesio, lasta — kapelo aŭ sanktejo, kie loĝis la dio.

La kapelo estis ordinare tre malgranda kaj malluma, iafoje elhakita en unu ŝtona peco. De ĉiuj flankoj ĉirkaŭis ĝin kapeloj same malgrandaj plenaj de vestoj kaj mebloj, vazoj kaj juveloj de la dio, kiu en sia nealirebla kaŝejo dormis, banis sin kaj oleis, manĝis kaj trinkis, ŝajnas eĉ akceptis vizitojn de junaj kaj belaj virinoj.

En la sanktejon eniradis nur la ĉefpastroj kaj la reganta faraono, se li havis la sanktajn benojn. Simpla mortulo, penetrante tien, povis perdi la vivon.

La muroj kaj la kolonoj de ĉiu ĉambrego estis kovritaj per klarigaj surskriboj kaj pentraĵoj. En la koridoro, ĉirkaŭanta la peristilon, estis nomoj kaj portretoj de ĉiuj faraonoj: de Menes, la unua estro de Egipto, ĝis Ramzes XII. En la hipostilo aŭ ĉambrego de la nobeloj oni prezentis en facile komprenebla maniero la geografion kaj statistikon de Egipto kaj de la vasalaj popoloj. En la ĉambrego de la "aperado" estis kalendaro kaj rezultatoj de la astronomiaj observoj; en la ĉambro de la "oferaj tabloj" kaj de la "ripozo" troviĝis pentraĵoj, koncernantaj la religiajn ceremoniojn, kaj en la sanktejo receptoj por elvoki superterajn estaĵojn kaj estri la fenomenojn de la naturo.

Ĉi tiu lasta speco de superhoma scienco estis esprimita en tiel implikitaj frazoj, ke eĉ la pastroj de la tempo de Ramzes XII ne komprenis ilin. Nur la Ĥaldeano Beroes devis revivigi la mortantan saĝon.

Ripozinte du tagojn en la registara palaco en Abidos, Ramzes XIII sin direktis al la templo. Li portis blankan ĉemizon, antaŭtukon kun oranĝaj kaj bluaj strioj, ŝtalan glavon ĉe la flanko kaj oran kaskon sur la kapo. Li sidiĝis en veturilo, kies ĉevalojn, ornamitajn per strutaj plumoj, kondukis nomarĥoj,

kaj ĉirkaŭita de sekvantaro malrapide ekveturis al la domo de Oziriso.

Kien ajn li rigardis: la kampojn, riveron, tegmentojn de la domoj, eĉ la branĉon de figaj kaj tamarindaj arboj, ĉie sin puŝis la popola amaso kaj sonis nesilentanta krio, simila al furiozanta fulmotondro.

Atinginte la templon, la faraono haltigis la ĉevalojn kaj eliris antaŭ la popola pordego, kio tre plaĉis al la popolaĉo kaj ĝojigis la pastrojn. Piedire li trapasis la aleojn de la sfinksoj, kaj salutita de la sanktaj viroj, bruligis incenson antaŭ la statuoj de Seti, kiuj sidis ĉe ambaŭ flankoj de la granda pordego.

En la peristilo la ĉefpastro altiris la atenton de lia sankteco al la artplenaj portretoj de la faraonoj kaj montris la lokon, destinitan por lia portreto. En la hipostilo li klarigis al li signifon de la geografiaj kartoj kaj statistikaj tabeloj. En la ĉambro de la "dia aperado" Ramzes oferis incenson al la grandega statuo de Oziriso kaj la ĉefpastro montris al li la kolonojn, oferitajn al apartaj planedoj: Merkurio, Venero, Luno, Marso, Jupitero kaj Saturno. Ili staris sep ĉirkaŭ la statuo de la dio de la suno.

—Vi diras al mi — demandis Ramzes — ke estas ses planedoj, kaj mi vidas sep kolonojn?...

—La sepa prezentas la teron, kiu ankaŭ estas planedo — murmuretis la ĉefpastro.

La mirigita faraono postulis klarigojn, sed la saĝulo silentis, montrante per signoj, ke lia buŝo estas sigelita por pli detalaj klarigoj.

En la ĉambro de la "oferaj tabloj" eksonis mallaŭta, sed bela muziko, dum kiu ĥoro de pastrinoj plenumis solenan

dancon. La faraono demetis sian oran kaskon kaj multvaloran kirason kaj transdonis ambaŭ al Oziriso, postulante, ke la donacoj restu en la trezorejo de la dio kaj ne estu transportitaj en Labirinton.

Interŝanĝe por tia malavareco la ĉefpastro donacis al la monarĥo la plej belan dekkvinjaran dancistinon, kiu ŝajnis tre kontenta de sia sorto.

Kiam la faraono eniris en la ĉambregon de la "ripozo", li sidigis sur la trono, kaj lia religia antaŭanto, Sem, ĉe sonoj de la muziko kaj en la fumo de la incensoj eniris en la sanktejon, por elporti de tie la dion.

Post duono de horo ĉe la surdiganta sono de sonoriloj aperis en la krepusko de la ĉambrego ora ŝipeto, kovrita per kurtenoj, kiuj de tempo al tempo moviĝis, kvazaŭ post ili sidus vivanta estaĵo.

La pastroj falis sur la vizaĝon, Ramzes pli atente rigardis la diafanajn kurtenojn. Unu el ili foriĝis, kaj la faraono ekvidis tre belan infanon, kiu rigardis lin per tiel saĝaj okuloj, ke la estro de Egipto sentis preskaŭ timon.

—Jen estas Horus — murmuretis la pastroj — Horus, la leviĝanta suno. Li estas la filo kaj la patro de Oziriso, kaj la edzo de lia patrino, kiu estas lia fratino.

Komenciĝis procesio, sed nur en la interno de la templo. Antaŭe iris la harpistoj kaj dancistinoj, poste blanka bovo kun ora ŝildo inter la kornoj. Poste du pastraj ĥoroj kaj ĉefpastroj, portante la dion, ree ĥoroj kaj fine la faraono en portilo, portata de ok pastroj.

Kiam la procesio trapasis ĉiujn ĉambregojn kaj koridorojn de la templo, la dio kaj Ramzes ambaŭ revenis en la ĉambron

de la ripozo. La kurtenoj, kovrantaj la sanktan ŝipeton, ree disiĝis, kaj la bela infano ekridetis al la faraono.

Sem reportis la ŝipeton kaj la dion en la kapelon. "Eble mi devus fariĝi ĉefpastro?" — pensis la monarĥo, al kiu la infano tiel plaĉis, ke li dezirus vidi ĝin plej ofte.

Sed kiam li eliris el la templo, ekvidis la sunon kaj la sen-nombran popolamason, li konfesis en sia koro, ke li komprenas nenion. De kie venis la infano, similanta neniun egiptan, de kie la superhoma saĝo en ĝiaj okuloj, kaj kion signifas ĉio ĉi?...

Subite li rememoris sian mortigitan fileton, kiu povus esti same bela, kaj la estro de Egipto en la ĉeesto de cent mil regnantoj ekploris.

—Konvertita!... La faraono estas konvertita!... — diris la pastroj. — Apenaŭ li enpaŝis la templon de Oziriso, kaj jen moliĝis lia koro!...

En la sama tago unu blindulo kaj du paralizitoj, kiuj preĝis ekster la muro de la templo, retrovis la sanon. La pastra konsilantaro decidis proklami ĉi tiun tagon mirakla kaj fari sur la ekstera muro pentraĵon, prezentantan la plorantan faraonon kaj la resanigitajn kriplulojn.

Malfrue post tagmezo Ramzes revenis en sian palacon, por aŭskulti la raportojn. Kiam ĉiuj altranguloj forlasis la kabineton de la sinjoro, venis Tutmozis, dirante:

—La pastro Samentu deziras prezenti sian respektegon al via sankteco.

—Bone, enkonduku lin.

—Li petegas vin, sinjoro, ke vi akceptu lin en la tendo, meze de la militista tendaro, kaj certigas, ke la muroj de la palaco amas aŭskulti ...

—Mi dezirus scii, kion li volas? — diris la faraono kaj anoncis al la korteganoj, ke li pasigos la nokton en la tendaro.

Antaŭ la subiro de la suno la sinjoro forveturis kun Tutmozis al sia fidela armeo; li trovis tie la reĝan tendon, antaŭ kiu laŭ ordono de Tutmozis la gardan postenon okupis Azianoj.

Vespere venis Samentu en pilgrima mantelo kaj respekte salutinte lian sanktecon, flustris:

—Ŝajnas al mi, ke la tutan tempon iris post mi unu homo, kiu haltis proksime de via tendo. Eble li estas sendita de ĉefpastroj?...

Laŭ ordono de la faraono Tutmozis elkuris kaj efektive trovis fremdan oficiron.

—Kiu vi estas? — demandis li.

—Mi estas Eunana, centestro de la regimento de Izido ... La malfeliĉa Eunana, ĉu via ekscelenco ne memoras min?... Antaŭ pli ol unu jaro dum la manovroj apud Pi-Bailos mi rimarkis la sanktajn skarabojn ...

—Ah, tio estas vi!... — interrompis Tutmozis. — Via regimento ja ne estas en Abidos?

—La akvo de la vero fluas de viaj lipoj. Nia tendaro estas en la mizera ĉirkaŭaĵo de Mena, kie la pastroj ordonis al ni rebonigi la kanalojn, kvazaŭ al kamparanoj aŭ Hebreoj ...

—Kiel vi venis ĉi tien?

—Mi petegis la ĉefon pri kelktaga forpermeso — respondis Eunana — kaj dank'al la rapideco de miaj piedoj mi alkuris ĉi tien, kiel soifanta cervo al la fonto.

—Kion vi volas?

—Mi volas petegi la protekton de lia sankteco kontraŭ la razitaj kapoj, kiuj ne donas al mi promocion, ĉar mi estas kompatema al la suferoj de la soldatoj.

Tutmozis revenis ĉagrenita en la tendon kaj ripetis al la faraono la interparoladon kun Eunana.

—Eunana? — ripetis la sinjoro. — Jes. Mi memoras lin ... Li faris al ni embarason kun la skaraboj, sed rekompence li ricevis bastonadon dank'al Herhor. Kaj vi diras, ke li plendas kontraŭ la pastroj?... Li venu ĉi tien!...

La faraono ordonis al Samentu foriri en alian parton de la tendo kaj sendis sian favoraton, por ke li alkonduku Eunanon.

Baldaŭ aperis la malfeliĉa oficiro. Li falis sur la viziĝon, kaj poste, genuante kaj ĝemante, li diris:

”Ĉiutage mi preĝas al Ra Harmahis ĉe lia leviĝo kaj subiro kaj al Amon, Re, Ptah, kaj al aliaj dioj kaj diinoj. Estu sana, monarĥo de Egipto! Konservu plej longe vian vivon! Sukcesu en ĉio, kaj mi povu vidi almenaŭ la brilon de viaj kalkanoj ...”¹

—Kion li deziras? — demandis la faraono Tutmozison, unufoje obeante la ceremoniaron.

—Lia siankteco bonvolas demandi: kion vi deziras? — ripetis Tutmozis.

La malsincera Eunana, ĉiam genuante, sin turnis al la favorato kaj daŭrigis:

—Via ekscelenco estas la okulo kaj orelo de la sinjoro, kiu donas al ni la ĝojon kaj vivon, mi do respondos al vi kvazaŭ al la tribunalo de Oziriso: dek jarojn mi servas en la pastra regimento de la dio Izido, ses fojojn mi batalis ĉe la orientaj limoj. Miaj samaĝuloj jam estas generaloj, kaj mi ĉiam estas nur centestro, ĉiam ricevas bastonadon, laŭ ordono de la piaj pastroj. Kial tia maljustaĵo? ”Tage mi turnas mian koron al la libroj, kaj nokte mi legas; ĉar malsaĝa estas tiu, kiu forlasas la

1 Aŭtentika.

librojn tiel rapide, kiel forkuranta gazelo; malnobla estas lia animo, egala al la azeno, kiu ricevas vipojn, egala al la surdulo, kiu ne aŭdas kaj al kiu oni devas paroli per la mano. Malgraŭ mia soifo al la scienco, mi ne estas malmodesta pri mia scio, sed mi akceptas la konsilojn de ĉiuj, ĉar de ĉiuj oni povas lerni ion, kaj la respektindajn saĝulojn mi ĉirkaŭas per mia respekto!...”

La faraono faris malpacienca movon, sed li aŭskultlis, sciante, ke Egiptano opinias la babiladon sia devo kaj plej alta respekto por la superuloj.

—Jen kia mi estas — daŭrigis Eunana. — ”En la fremda domo mi ne rigardas al la virinoj, mi donas al la servistoj manĝi, kiel konvenas, sed mi mem ne malpacas ĉe la divido. Mi havas ĉiam kontentan vizaĝon, kaj en la ĉeesto de miaj superuloj mi ĉiam kondutas kun respekto kaj sidiĝas neniam, kiam pli aĝa homo staras. Mi ne estas trudema kaj neinvitita mi ne eniras en fremdan domon. Kion vidas mia okulo, pri tio mi silentas, ĉar mi scias, ke oni estas surda por tiuj, kiuj uzas multe da vortoj. La saĝo instruas, ke la korpo de la homo similas grenejon, plenan de diversaj respondoj. Kaj tial mi ĉiam elektas bonan respondon kaj diras ĝin, kaj la malbonan mi konservas en mia animo. Mi ne ripetas la kalumniojn kaj koncerne la komisionoj, mi ĉiam plej bone plenumas ilin ...”²

Kaj kion mi havas por tio?... — finis Eunana per pli laŭta voĉo. — Mi suferas la malsaton, portas ĉifonojn, kaj sur la dorso mi ne povas kuŝi, tiel batita ĝi estas. Mi legas en la libroj, ke la pastraro rekompensadis iam la kuraĝon kaj prudenton. Vere! tio devis esti antaŭ tre longe. Ĉar la hodiaŭaj

2 Aŭtentikaj malnovegiptaj maksimumoj.

pastroj sin deturnas de la prudentaj homoj kaj forpelas la forton kaj kuraĝon el la oficiraj ostoj ...

—Mi ekdormos apud tiu ĉi homo!... — diris la faraono.

—Eunana — aldonis Tutmozis — vi konvinkis lian sanktecon, ke vi estas sperta en la libroj, kaj nun diru al ni plej mal-longe, kion vi deziras?

—La sago ne tiel rapide trafas celon, kiel rapide mia peto atingos la kalkanojn de lia sankteco — respondis Eunana. — La servado ĉe la razitaj kapoj fariĝis por mi tiel abomena, la pastroj plenigis mian koron per tia maldolĉo, ke se mi ne povos transiri en la armeon de la faraono, mi trapikos min per la propra glavo, antaŭ kiu pli ol unu, pli ol cent fojojn tremis la malamikoj de Egipto. Mi preferas esti dekestro, mi preferas esti simpla soldato de lia sankteco, ol centestro en la pastraj regimentoj; porko aŭ hundo povas servi al ili, ne fidela Egiptano!...

La lastajn frazojn Eunana diris kun tiel rabia kolero, ke la faraono sin turnis greke al Tutmozis.

—Prenu lin en la gvardion. Oficiro, kiu tiel malamas la pastrojn, povas esti utila al ni.

—Lia sankteco, la sinjoro de ambaŭ mondoj, ordonis akcepti vin en la gvardion — ripetis Tutmozis.

—Mia sano kaj vivo apartenas al nia sinjoro Ramzes ... li vivu eterne! — ekkriis Eunana kaj kisis la tapiŝon, kiu kuŝis sub la reĝaj piedoj.

Kiam Eunana, radianta de feliĉo, repaŝis el la tendo, ĉiun kelkon da paŝoj falante sur la vizaĝon kaj benante la monarĥon, la faraono diris:

—Lia babilado tiklis mian gorĝon ... Mi devas instrui la

egiptajn soldatojn kaj oficirojn esprimi ĉion mallonge, ne kiel scienculoj.

—Se li havus nur ĉi solan mankon!... — murmuretis Tutmozis, sur kiun Eunana faris malagrablan impreson.

La sinjoro alvokis Samentuon.

—Estu trankvila — diris li al la pastro. — La oficiro, kiu iris post vi, ne spionis vin. Li estas tro malsaĝa por tiaj komisioj ... Sed li povas havi pezan manon en okazo de bezono!... Kaj nun — aldonis la faraono — kio igas vin esti tiel singarda?

—Mi jam preskaŭ konas la vojon al la trezorejo en Labirinto — respondis Samentu.

La sinjoro skuis la kapon.

—Malfacila afero!... — flustris li. — Unu horon mi kuris tra diversaj koridoroj kaj ĉambregoj, kiel muso, kiun persekutas kato. Kaj mi konfesas al vi, ke ne nur mi ne komprenas la vojon, sed eĉ mi ne entreprenus ĝin sola. La morto sub libera ĉielo povas esti gaja; sed la morto en tiuj truoj, en kiuj talpo perdis la vojon, brr ...

—Tamen ni devas trovi kaj okupi ĉi tiun vojon — diris Samentu.

—Kaj se la gardistoj donos al ni la necesan parton de la trezoroj? — demandis la faraono.

—Ili ne faros tion, dum vivas Mefres, Herhor kaj liaj partianoj. KREDU al mi, sinjoro, ke ĉi tiuj altranguloj volas teni vin en vindoj kvazaŭ suĉinfanon ...

La faraono paliĝis de kolero.

—Ne bezonu mi teni ilin en ĉenoj!... Kiel vi pensas trovi la vojon?

—Ĉi tie, en Abidos, en la tombo de Oziriso mi trovis la tutan planon de la vojo al la trezorejo — diris la pastro.

—Kaj de kie vi sciis, ke ĝi estis ĉi tie.

—Tion klarigis al mi surskriboj en mia templo de Set.

—Kiam vi trovis la planon?

—Kiam la mumio de la eterne vivanta patro de via sankteco estis en la templo de Oziriso — respondis Samentu. — Mi akompanis la sanktajn restaĵojn kaj deĵorante nokte en la ĉambrego de la Ripozo, mi eniris en la sanktejon.

—Vi devus esti generalo, ne ĉefpastro! — ekkriis ridante Ramzes. — Kaj vi jam komprenas la vojon al Labirinto?

—Jam de longe mi komprenis ĝin, nun mi kolektis la montrojn por min direkti.

—Ĉu vi povas tion klarigi al mi?

—Volonte, mi eĉ montros iam al via sankteco la planon. La vojo — daŭrigis Samentu — iras zigzage kvar fojojn tra la tuta Labirinto; ĝi komenciĝas en la plej alta etaĝo, finiĝas en la plej profunda subteraĵo kaj posedas diversajn aliajn kurbiĝojn. Jen kial ĝi estas longa.

—Kiel vi transpasos de unu ĉambrego al alia, kie estas multe da pordoj?...

—Sur ĉiu pordo, kondukanta al la celo, estas parto de la frazo: "Ve al la perfidulo, kiu penas trapenetri la plej altan sekreton de la ŝtato kaj etendi malpian manon al la riĉaĵoj de la dioj. Lia kadavro estos, kvazaŭ mortaĉaĵo, kaj lia spirito ne ĝuos ripozon, sed vagos en mallumaj lokoj, ŝirata de la propraj pekoj ..."

—Kaj vin ne fortimigas la surskribo?

—Ĉu vian sanktecon fortimigas libia lanco?... La minacoj estas bonaj por la popolaĉo, ne por mi, kiu mem scius skribi ankoraŭ pli terurajn malblenojn ...

La faraono ekmeditis.

—Vi estas prava — diris li. — La lanco ne malutilos tiun, kiu scias ĝin rebati, kaj trompa vojo ne erarigos la saĝulon, kiu konas la parolon de la vero ... Sed kion vi faros, por ke cedu antaŭ vi la ŝtonoj en la muroj kaj por ke la kolonoj ŝanĝiĝu en pordojn de la eniro?...

Samentu malestime levis la ŝultrojn.

—En mia templo — respondis li — estas ankaŭ nevideblaj eniroj, eĉ pli malfacile malfermeblaj, ol tiuj de Labirinto. Kiu konas la vorton de la sekreto, atingas ĉion, kiel prave diris via sankteco.

La faraono apogis la kapon sur la mano kaj daŭrigis mediti.

—Mi bedaŭrus, se sur la vojo renkontus vin malfeliĉo ...

—En la plej malbona okazo mi renkontos la morton, kaj ĉu ĝi ne minacas eĉ la faraonojn?... Fine, ĉu via sankteco ne iris kuraĝe al Sodaj Lagoj, kvankam vi ne estis certa, ĉu vi revenos de tie? Cetere, ne imagu, sinjoro, ke mi devos trairi la tutan vojon, sur kiu iradas la personoj, vizitantaj Labirinton. Mi trovos pli proksimajn punktojn kaj en la daŭro de unu preĝo al Oziriso mi atingos lokon, kien irante vi povus diri tri-dek preĝojn ...

—Ĉu ekzistas tie aliaj eniroj?

—Sendube, kaj mi devas ilin trovi — respondis Samentu. — Mi ja ne eniros, kiel via sankteco, tage, nek tra la ĉefa pordego.

—Kiel do?...

—En la ekstera muro estas pordetoj, kiujn mi konas, kaj kiujn la pastroj de Labirinto gardas neniam ... En la korto la gardistoj nokte estas malmultenombraj kaj tiel fidas al la protekto de la dioj aŭ al la timo de la popolaĉo, ke plej ofte ili

dormas ... Krom tio, trifoje inter la subiro kaj la leviĝo de la suno, la pastroj iras en la templon preĝi kaj iliaj soldatoj faras la samon sub la libera ĉielo. Antaŭ ol ili finos unu diservon, mi estos en la trezorejo.

—Kaj se vi perdos la vojon?...

—Mi havas la planon.

—Kaj se la plano estas malvera? — diris la faraono, ne povante kaŝi sian maltrankvilon.

—Kaj se via sankteco ne akiros la trezorojn?... Se Feniciajnoj, post konsidero, ne donos la promesitan prunton?... Se la armeo estos malsata kaj la esperoj de la popolaĉo trompigitaj?... Bonvolu kredi al mi, mia sinjoro — daŭrigis la pastro — ke mi, inter la koridoroj de Labirinto, estos pli sendanĝera, ol vi en via regno ...

—Sed la mallumo!... la mallumo!... Kaj la muroj, kiujn oni ne povas trapenetri, kaj la profundaĵo, kaj la centoj da vojoj, kie oni ne povas sin orienti ... KREDU al mi, Samentu, ke batali kontraŭ homoj estas nur ludo; sed terura estas ombro kaj nekonataĵo!...

—Via sankteco — diris li — ne konas mian vivon ... Kiam mi havis dudek kvin jarojn, mi estis pastro de Oziriso ...

—Vi? — ekmiris la faraono.

—Mi, kaj mi tuj diros, kial mi transiris al la servado al Set. Oni sendis min sur la duoninsulon Sinai, por ke mi konstruu malgrandan kapelon por la montanoj. La konstruado daŭris ses jarojn, kaj mi, havante multe da libera tempo, vagis inter la montoj kaj vizitis la tieajn kavernojn. Kion mi ne vidis tie!... Koridorojn kelke da horoj longajn; malvastajn enirojn, tra kiuj oni devis rampi sur la ventro; ĉambrojn tiel grandegajn, ke ĉiu el ili povus enteni templon. Mi vidis subterajn riverojn

kaj lagojn, kristalajn konstruaĵojn, tute mallumajn kavernojn, en kiuj oni ne povis vidi la propran manon, aŭ tiel lumajn, ke kvazaŭ iu suno brilis en ili ... Kiom da fojoj mi perdis la vojon en la sennombraj trajtoj, kiom da fojoj estingiĝis mia torĉo, kiom da fojoj mi rulfalis en nevideblan senfundaĵon!... Ofte mi pasigis kelke da tagoj en la subteraĵoj, nutrante min per rostita hordeo, lekante la malsekaĵon de la ŝtonegoj, ne sciante, ĉu mi revenos en la mondon. Sed mi akiris sperton, mia vizado fariĝis pli sentema, mi eĉ ekamis tiun inferan landon. Hodiaŭ, kiam mi pensas pri la infanaj kaŝejoj de Labirinto, mi volas ridi ... La homaj konstruaĵoj estas talpejoj kompare kun la senlimaj konstruaĵoj, faritaj de la silentaj kaj nevideblaj spiritoj de la tero. Sed foje mi renkontis teruran objekton, kiu tute ŝanĝis miajn opiniojn. Okcidente de la minejo de Sinai sin etendas nodo de valoj kaj montoj, kie ofte sonas subteraj tondroj, la tero tremas kaj iafoje oni vidas flamojn. Interesita mi iris tien por pli longa tempo, mi serĉis kaj dank' al nerimarkebla fendo mi trovis tutan ĉenon de grandegaj kavernoj, sub kies arkaĵoj povus stari plej alta piramido. Kiam mi vagis tie, alflugis al mi forta putraodoro, tiel abomena, ke mi volis forkuri. Sed mi ekregis min, eniris en la kavernon, de kie ĝi venis, kaj mi ekvidis ... Bonvolu imagi, sinjoro, homon, kiu havas piedojn kaj manojn je duono malpli longajn ol ni, sed dikajn, malgraciajn kaj finitajn per ungegoj. Aldonu al tio larĝan voston, platigitan de la flankoj, dentan supre, kiel la koka kresto; aldonu tre longan kolon kaj sur ĝi hundan kapon. Fine, vestu la monstron per armaĵo, kovrita sur la dorso per kurbaj pikiloj ... Nun imagu, ke la figuro staras sur la piedoj, apogita al la ŝtonego per la manoj kaj brusto ...

—Io tre malbela — intermetis la faraono. — Mi tuj mortigus tion ...

—Tio ne estis malbela — diris la pastro, ekstremante. — Ĉar imagu, sinjoro, ke la monstro estis tiel alta, kiel obelisko ...

Ramzes faris geston de malkontenteco.

—Samentu — diris li — ŝajnas al mi, ke vi vizitis viajn kavernojn en songo ...

—Mi ĵuras al vi, per la vivo de miaj infanoj — ekkriis la pastro — ke mi diras la veron!... Ĉi tiu monstro en la haŭto de rampaĵo, kovrita per pikila kiraso, se ĝi sin etendas sur la tero, estus kun la vosto kvindek da paŝoj longa ... Malgraŭ la timo kaj abomeno kelkfoje mi revenis en la kaverton kaj atente rigardis ĝin.

—Ĝi do vivis?

—Ne. Tio estis kadavro tre malnova, sed tiel bone konservita, kiel niaj mumioj, dank'al la sekeco de la aero aŭ aliaj teraj saloj, nekonataj de mi. Tio estis mia lasta trovaĵo — daŭrigis Samentu. — Mi ne iris plu en la kavernojn, sed mi multe meditis. Oziriso — pensis mi — kreas grandajn estaĵojn: leonojn, elefantojn, ĉevalojn ... Set naskas serpenton, vesper-ton, krokodilon ... La monstro, kiun mi renkontis, estas sendube kreaĵo de Set; kaj ĉar ĝi superas per sia kresko ĉion, kion mi konas sub la suno, do Set estas pli forta dio, ol Oziriso. Tiam mi konvertiĝis al Set, kaj reveninte Egipton, mi ekloĝis en lia templo. Kaj kiam mi rakontis al la pastroj pri miaj aventuroj, ili klarigis al mi, ke ili konas multajn tiajn monstrojn.

Samentu iom ripozis kaj daŭrigis:

—Se iam via sankteco bonvolos viziti nian templon, mi montros al vi en la tomboj strangajn kaj terurajn estaĵojn: anserojn kun lacertaj kapoj kaj vespertaj flugiloj, lacertojn

similajn al cignoj, sed pli grandajn ol strutoj, krokodilon trifoje pli longan ol tiuj, kiuj loĝas en Nilo, ranon tiel grandan, kiel hundo ... Tio estas aŭ mumioj, aŭ skeletoj, trovitaj en kavernoj kaj konservataj en niaj tomboj. La popolo pensas, ke ni preĝas al ili, kaj ni nur esploras ilian strukturon kaj gardas ilin de la putro.

—Mi kredos al vi, kiam mi mem vidos — respondis la faraono. — Sed diru al mi, de kie povus aperi en la kavernoj tiaj estaĵoj?...

—Mia sinjoro, — diris la pastro — la mondo, en kiu ni vivas, profunde aliiĝas. Jam en Egipto ni trovas ruinojn de urboj kaj temploj, kaŝitaj profunde en la tero. Estis tempo, kiam la lokon de Malsupra Egipto okupis brako de la maro kaj Nilo fluis je la tuta larĝo de nia valo. En la tempoj ankoraŭ pli antikvaj tie, kie estas nia regno, estis la maro ... Niaj antaŭuloj loĝis la landon, kiun nun okupas la okcidenta dezerto ... Antaŭ dekoj da jarmiloj ne ekzistis homoj, kiel ni, sed kreaĵoj, similaj al simioj, kiuj tamen sciis konstrui terdomojn, konservi fajron, batali per bastonegoj kaj ŝtonoj. Tiam ekzistis nek ĉevaloj, nek bovoj; grandegaj elefantoj, rinoceroj kaj leonoj trifoje superis per sia kresko la nunajn samnomajn bestojn. Sed eĉ la grandegaj elefantoj ne estas la plej antikvaj kreaĵoj. Antaŭ ili vivis grandegaj rampaĵoj: flugantaj, naĝantaj kaj paŝantaj. Antaŭ la rampaĵoj estis en nia mondo nur moluskoj kaj fiŝoj, kaj antaŭ ili nur vegetaĵoj, sed tiaj, kiaj ne ekzistas hodiaŭ.

—Kaj antaŭe? — demandis Ramzes.

—Antaŭe la tero estis dezerta kaj malplena, kaj la Dia spirito sin portis super la akvojn.

—Mi ion aŭdis pri tio — diris la faraono — sed mi ne kre-

dos, antaŭ ol vi montros al mi la mumion de la monstroj, kiuj, kiel vi diras, ripozas en via templo.

—Kun la permeso de via sankteco, mi finos, kion mi komencis — diris Samentu. — Kiam en la kaverno de Sinai mi ekvidis la grandegan kadavron, la timo ekregis min kaj dum kelke da jaroj mi volis iri en neniun kavernon. Sed la pastroj de Set klarigis al mi, de kie venis tiel strangaj estaĵoj, kaj mia timo malaperis, grandiĝis scivolo. Hodiaŭ ne ekzistas por mi pli agrabla ludo, ol vagi sub la tero kaj serĉi vojon en la mallumo. Jen kial Labirinto ne estos por mi pli malfacila, ol promeno tra la reĝa palaco.

—Samentu — diris la sinjoro — mi tre ŝatas vian superhoman kuraĝon kaj saĝon. Vi rakontis al mi tiom da interesaj aferoj, ke, vere, mi mem volonte vizitus la kavernojn kaj iam mi veturos kun vi al Sinai. Tamen mi dubas, ĉu vi sukcesos en Labirinto, kaj por ĉiu eventualo, mi kunvokos la kunvenon de Egiptanoj, por ricevi la rajtigon profiti de la trezorejo.

—Tio ne povas malutili — respondis la pastro. — Sed mia laboro ne estos malpli necesa, ĉar Mefres kaj Herhor ne konsentos doni la trezorojn.

—Ĉu vi havas la certecon, ke vi sukcesos? — insiste demandis la faraono.

—De la tempo, kiam ekzistas Egipto — penis konvinki lin Samentu — estis neniu homo, kiu posedis tiom da rimedoj, kiel mi, por venki en ĉi tiu batalo, kiu eĉ ne estas por mi batalo, sed ludo. Unujn timigas la mallumo, kiun mi amas kaj eĉ vidas en ĝi. Aliaj ne scias sin direkti inter la multenombraj ĉambroj kaj koridoroj, mi faras tion tre facile. Ankoraŭ aliaj ne konas la sekreton, kiel malfermi la kaŝitajn pordojn, kion mi scias tre bone. Se mi posedus nenion plu, ol tion, kion mi

Ĵus citis, en la daŭro de unu monato aŭ du mi trovus la vojon en Labirinto. Sed mi posedas krom tio detalan planon de la trajoj kaj mi konas la parolojn, kiuj kondukos min de unu ĉambrego al alia. Kio do povas malhelpi min?...

—Tamen sur la fundo de via koro sin kaŝas dubo: vi ektimis la oficiron, kiu, ŝajnis, iris post vi...

La pastro levis la ŝultrojn.

—Mi timas nenion kaj neniun — respondis li trankvile — sed mi estas singarda. Mi antaŭvidas ĉion kaj mi eĉ estas preparita al tio, ke oni min kaptos ...

—Teruraj turmentoj atendus vin!...

—Neniaj. Rekte de la subteraĵoj de Labirinto mi malfermos al mi la pordon en la landon, kie regas la eterna lumo.

—Kaj vi ne koleros kontraŭ mi?

—Kial? — demandis la pastro. —Mi atingos grandan celon: mi volas okupi en la ŝtato la postenon de Herhor ...

—Mi ĵuras, ke vi ĝin okupos!

—Se mi ne pereos — respondis Samentu. —Sed suprojn de montoj oni suriras super senfundaĵoj; en tia ekskurso la piedo povas ekgliti kaj mi povas rulfali, sed tio estas indiferenta: vi sinjoro zorgos pri la estonteco de miaj infanoj.

—Iru do — diris la faraono. — Vi indas esti la unua mia helpanto.

ĈAPITRO NAŬA

Forlasinte Abidoson, Ramzes veturis senhalte kontraŭ la fluo de la rivero al la urboj Tan-ta-ren (Dendera) kaj Kenne, kiuj kuŝis unu preskaŭ kontraŭ la alia: unu sur la orienta, la alia sur la okcidenta bordo de Nilo.

En Tan-ta-ren estis du famaj lokoj: la lageto de la sanktaj krokodiloj kaj la templo de Hator, posedanta superan lernejon. Tie oni instruis medicinon, piajn kantojn, diversajn diservojn, fine astronomion.

La faraono vizitis ambaŭ. Li ekkoleris, kiam oni ordonis al li bruligi incenson antaŭ la sanktaj krokodiloj, kiujn li opiniis malbonodoraj kaj malsaĝaj rampaĵoj. Kaj kiam unu el ili dum la oferado kaptis la sinjoron per dentoj je la vesto, Ramzes tiel ekbatis ĝin per la bronza kulero, ke la rampaĵo por momento fermis la okulojn kaj disetendis la piedegojn; poste ĝi reiris en la akvon, kvazaŭ kompreninte, ke la juna monarĥo ne amis intimecon eĉ de la dioj.

—Eble tio estis malpiaĵo? — demandis li la pastron.

La ekscelenco rigardis flanken, ĉu iu aŭskultas, kaj respondis:

—Se mi scius, ke via sankteco faros al ĝi tian oferon, mi donus al vi bastonegon anstataŭ incensujo. Ĉi tiu krokodilo estas la plej trudema besto en la tuta templo. Foje ĝi kaptis infanon ...

—Kaj ĝi manĝis ĝin?...

—La gepatroj estis kontentaj!... — respondis la pastro.

—Diru al mi — demandis la faraono post pripenso — kiel vi, saĝaj homoj povas fari oferojn al bestoj; kiam neniu rigardas, vi ja batas ilin per bastonoj!...

La ĉefpastro ankoraŭ unu fojon ĉirkaŭrigardis, kaj vidante, ke estas neniu proksime, respondis:

—Vi ja, monarĥo, ne suspektas la fidelulojn de la Sola Dio, ke ili kredas je la sankteco de la bestoj ... Tio, kion oni faras, oni faras por la popolaĉo ... La bovo Apis, kiun ŝajne respektegas la pastroj, estas la plej bela bovo en la tuta Egipto kaj konservas la rason de nia brutaro. La ibisoj kaj cikonioj purigas de la mortintaĵo niajn kampojn; dank'al katoj musoj ne detruas niajn provizojn da greno, kaj dank'al krokodiloj ni havas bonan akvon en Nilo, kiu alie venenus nin ... Sed la senkonsidera kaj malklera popolaĉo ne komprenas la utilecon de tiuj bestoj kaj ekstermus ilin en la daŭro de unu jaro, se ni ne antaŭgardus ilian vivon per religiaj ceremonioj. Jen estas la sekreto de niaj temploj, destinitaj por la bestoj, kaj de nia pieco por ili. Ni incensas tion, kion la popolo devas respekti, ĉar ĝi estas utila.

En la templo de Hatar la faraono rapide trakuris kortojn de la medicina lernejo kaj indiferekte aŭskultis la antaŭdirojn, kiujn faris por li la astrologoj. Kaj kiam la ĉefpastro astrologo montris al li oran tabulon, sur kiu estis gravurita karto de la ĉielo, la sinjoro demandis:

—Kiel ofte realiĝas viaj antaŭdiroj, kiujn vi legas en la ste-loj?

—Iafoje ili realiĝas.

—Kaj se vi legus viajn horoskopojn sur arboj, ŝtonoj aŭ sur akva fluo, ili ankaŭ realiĝas?

La pastro konfuziĝis.

—Via sankteco ne pensu, ke ni estas trompistoĵ. Ni antaŭdiras al la homoj la estontecon, ĉar ĝi interesas ilin, kaj ĝustadi, nur tion ili komprenas pri la astronomio.

—Kaj kion vi komprenas?

—Ni konas — diris la pastro — la strukturon de la ĉiela firmamento kaj la movojn de la steloj ...

—Kion tio povas utili?...

—Ne malgrandaj estas la servoj, kiujn ni faris al Egipto. Ni montras la ĉefajn direktojn, laŭ kiuj oni konstruas templojn kaj fosas kanalojn. Sen la helpo de nia scienco ŝipoj, naĝantaj sur la oceano, ne povus forlasi la bordojn. Ni kunmetas la kalendaron kaj antaŭkalkulas la estontajn fenomenojn sur la ĉielo. Baldaŭ, ekzemple, ni havos mallumiĝon ...

Sed Ramzes ne aŭskultis plu; li turnis sin kaj foriris. "Kiel oni povas — pensis li — konstrui templojn por tiel infana ludo, kaj eĉ gravuri ĝiajn rezultatojn sur oraj tabuloj!... Ĉi tiuj senokupaj sanktaj viroj jam ne scias, kion fari."

Post mallonga restado en Tan-ta-ren Ramzes transpasis Nilon, por iri en la urbon Kene.

Tie estis nek sanktaj temploj, nek incensataj krokodiloj kaj oraj tabuloj kun steloj. Tie floris la potfarado kaj komerco. De tie iris du ŝoseoj al la havenoj de Ruĝa Maro: Koseir kaj Berenice, kaj vojo al la porfiraj montoj, de kie oni venigis statuojn kaj grandegajn pecegojn por la konstruaĵoj.

En Kene svarmis Fenicianoj, kiuj akceptis la estron kun granda entuziasmo kaj donacis al li diversajn juvelojn valorantajn dek talentojn.

Malgraŭ tio la faraono apenaŭ unu tagon pasigis en Kene,

ĉar oni sciigis al li de Teboj, ke la respektinda mumio de Ramzes XII jam estas en la palaco Luksor kaj atendas la enterigon.

En tiu epoko Teboj estis grandega urbo kaj okupis ĉirkaŭ dudek kvadratajn kilometrojn. Ĝi posedis la plej grandan templon de Amon en Egipto kaj multe da publikaj kaj privataj konstruaĵoj. La ĉefaj stratoj estis larĝaj, rektaj kaj pavimitaj per ŝtonaj platoj; la bordoj de Nilo formis bulvarojn, la domoj estis kvar- kaj kvinetaĝaj.

Ĉiu templo kaj palaco havis grandegan pordegon kun pilonoj, kaj tial oni nomis Tebojn urbo "centpordega". En realeco ĝi estis urbo unuflanke tre industria kaj komerca, aliflanke kvazaŭ la sojlo de la eterneco. Sur la okcidenta bordo de Nilo, sur la montoj kaj inter la montoj estis sennombraj tomboj de pastroj, riĉuloj kaj reĝoj.

Sian brilon Teboj ŝuldis al du faraonoj: Amenofis III aŭ Memnon, kiu "trovis la urbon argila kaj lasis ĝin ŝtona" kaj Ramzes II, kiu finis kaj kompletigis la konstruaĵojn, kometitajn de Amenofis.

Sur la orienta bordo de Nilo, en la suda parto de la urbo estis tuta kvartalo de grandegaj reĝaj konstruaĵoj: palacoj, somerdomoj, temploj, sur kies ruinoj nun estas konstruita la urbeto Luksor. En ĉi tiu kvartalo la restaĵoj de la faraono atendis la lastajn ceremoniojn.

Kiam venis Ramzes XIII, la tuta urbo forlasis la domojn, por saluti lin, hejme restis nur maljunuloj kaj kripluloj, kaj en mallumaj stratoj ŝtelistoj. Tie unuafoje la faraono aŭdis kriojn kaj malbenojn kontraŭ la pastroj, kio lin mirigis. Li deziris doni tian donacon al la laboranta Egipto, sed li ne supozis, ke liaj intencoj jam fariĝis publike konataj kaj ke la popolo atendas ilian realiĝon.

La vojaĝo de unu mejlo daŭris kelke da horoj, inter densaj amasoj. La reĝa veturilo tre ofte haltis kaj ne moviĝis, antaŭ ol la gvardio de lia sankteco sukcesis levi tiujn, kiuj kuŝis sur la ventro.

Kiam la faraono atingis fine la reĝan ĝardenon, kie li okupis unu el la malgrandaj somerdomoj, li estis tiel laca, ke en ĉi tiu tago li ne okupis sin per la aferoj de la ŝtato. En la sekvinta tago li bruligis incensojn antaŭ la mumio de la patro, kiu estis en la ĉefa reĝa konstruaĵo, kaj diris al Herhor, ke oni povas transporti la restaĵojn en la tombon.

Sed oni ne faris tion tuj.

De la palaco oni transportis la mortinton en la templon de Ramzes, kie li ripozis unu tagon. Poste kun granda soleno oni enkondukis la mumion en la templon de Amon-Ra.

La detaloj de la funebra ceremonio estis samaj kiel en Memfiso, sed multe pli grandiozaj.

La reĝaj palacoj, sur la dekstra bordo de Nilo en la suda parto de la urbo, estis kunigitaj kun la templo de Amon-Ra, en la norda parto, per vojo, unika en ĝia speco. Tio estis aleo, du kilometrojn longa, tre larĝa; ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj estis plantitaj grandegaj arboj kaj staris duobla vico de sfinksoj. Unuj havis leonajn korpojn kun homaj kapoj, aliaj kun ŝafaj. Ili estis kelkcent.

Sennombraj popolaj amasoj de Teboj kaj de la ĉirkaŭaĵo puŝis unuj aliajn ĉe ambaŭ flankoj de la vojo; tra la mezo antaŭeniris la funebra procesio. Iris orkestroj de diversaj regimentoj, taĉmentoj de ploristinoj, ĥoroj de kantistoj, ĉiuj metiaj kaj komercaj korporacioj, deputatoj de kelkdeko da nacioj, kiuj estis en rilatoj kun Egipto, kun siaj dioj kaj standardoj ... Kaj ree orkestroj, larmistinoj kaj pastraj ĥoroj.

Ankaŭ ĉi tiun fojon la reĝa mumio estis portata en ora ŝipeto, sed multe pli luksa, ol en Memfiso. La veturilo, al kiu estis jungitaj ok paroj da blankaj bovoj, estis preskaŭ du etaĝojn alta, kaj preskaŭ malaperis sub la amasoj da bukedoj, strutaj plumoj kaj multekostaj teksaĵoj. Ĉirkaŭis ĝin densaj fumoj de incensoj, kio faris la impreson, ke Ramzes XII sin montras al sia popolo jam kiel dio, en la nuboj.

De la pilonoj de ĉiuj teabaj temploj sonis kvazaŭ tondroj, kaj potencaj, larmantaj sonoj de bronzaĵoj.

Kvankam la aleo de la sfinksoj estis libera kaj larĝa, kvankam la marŝo estis kondukata de la plej bonaj egiptaj generaloj, sekve en la plej granda ordo, tamen por trairi du kilometrojn inter la palacoj kaj la temploj de Amon, la procesio uzis tri horojn.

Nur kiam oni jam enportis la mumion de Ramzes XII en la templon, el la palaco en ora kaleŝo, tirata de du viglaj ĉevaloj, elveturis Ramzes XIII. La popolo ĉe ambaŭ flankoj de la aleo, kiu dum la procesio staris silente, nun, vidante la amantan monarĥon, ektondris per tiel grandega aklamado, ke disfluis en ĝi sonoj kaj bruo de la supro de la temploj.

Estis nun momento, ke la popolaĉo, puŝata de la entuziasmo, volis elkuri sur la mezon de la aleo kaj ĉirkaŭi la sinjoron. Sed Ramzes per unu sola gesto de la mano haltigis la vivantan fluan kaj malhelpis la malpiaĵon.

En la daŭro de dekelko da minutoj la faraono traveturis la korton kaj haltis antaŭ la grandegaj pilonoj de la plej grandioza templo en Egipto.

Kiel Luksor estis kvartalo de la palacoj en la suda parto de la urbo, tiel Karnak estis kvartalo de la dioj en la norda. La ĉefa centro de Karnak estis la templo de Amon-Ra.

La konstruaĵo okupis du hektarojn, kaj la ĝardenoj kaj la getoj, ĉirkaŭantaj ĝin, pli ol dudek hektarojn. Antaŭ la templo staris du pilonoj dek etaĝojn altaj. La korto, ĉirkaŭita de koridoro, apogita sur kolonoj, okupis ĉirkaŭ unu hektaron, kaj la kolona ĉambrego, kie kunvenadis la privilegiataj klasoj, estis duonhektara. Tio ne estis ĝustadire konstruaĵo, sed provinco.

La ĉambrego aŭ hipostilo estis pli ol cent kvindek paŝojn longa kaj sepdek kvin larĝa, ĝia plafono estis apogita sur tridek kvin kolonoj. El ili dudek centraj kolonoj havis po dek kvin paŝoj da ĉirkaŭo kaj kvar ĝis kvin etaĝojn da alto!... La statuoj en la templo, ĉe la pilonoj, kaj ĉe la sankta lageto havis respondajn proporciojn.

En la grandega pordego atendis la faraonon Herhor, la ĉefpastro de la templo. Ĉirkaŭita de tuta stabo de pastroj Herhor salutis la monarĥon preskaŭ fiere, kaj bruligante antaŭ li incensojn, ne rigardis lin. Poste tra la korto li kondukis la faraonon en la hipostilon kaj ordonis enlasi la deputaron en la internon de la mura zono.

En la mezo de la hipostilo estis la ŝipeto kun la mumio de la mortinta monarĥo, kaj ĉe ambaŭ ĝiaj flankoj du same altaj tronoj. Sur unu sidiĝis Ramzes XIII, ĉirkaŭita de la generaloj kaj nomarĥoj, sur la alia Herhor, ĉirkaŭita de la pastroj. La ĉefpastro Mefres donis al Herhor la tiaron de Amenhotep, kaj la juna faraono duan fojon ekvidis sur la kapo de Herhor la oran serpenton, la simbolon de la reĝa povo.

Ramzes paliĝis de kolero kaj pensis:

”Ne bezonu mi demeti de vi la ureuson kun la kapo!...”

Sed li silentis, sciante, ke en ĉi tiu plej granda egipta templo Herhor estas sinjoro, egala al la dioj, kaj potenculo, eble pli granda ol la faraono mem.

Dum la tuta tempo, kiam la popolo plenigadis la korton kaj post la purpura kurteno, apartiganta la mortulojn de la sanktejo, sonis harpoj kaj mallaŭtaj kantoj, Ramzes rigardis la ĉambregon. Tuta arbaro de potencaj kolonoj, kovritaj de la planko ĝis la supro per pentraĵoj, mistera lumigo, plafono, pendanta ie sub la ĉielo, faris sur lin premegan impreson.

”Kion valoras — pensis li — gajni batalon apud Sodaj Lagoj?... Konstrui tian templon, jen estas verko!... Kaj ili ĝin konstruis ...”

En tiu momento li sentis la potencon de la pastraro. Ĉu li, lia armeo, kaj eĉ la tuta popolo povus renversi ĉi tiun templon?... Kaj se malfacile estas sukcesi kontraŭ konstruaĵo, ĉu pli facile estos batali kontraŭ la konstruintoj?

El la malagrablaj meditoj elŝiris lin la voĉo de la ĉefpastro Mefres:

—Via sankteco — diris la maljunulo — vi, la plej nobla konfidato de la dioj (li salutis Herhoron), vi nomarĥoj, skribistoj kaj simpla popolo! La glora ĉefpastro de ĉi tiu templo, Herhor, alvokis vin, por ke vi juĝu, laŭ la antikva moro, la terajn agojn de la mortinta faraono kaj rifuzu aŭ donu al li la rajton de la enterigo ...

Kolero leviĝis al la kapo de la faraono. Ne sufiĉas, ke oni malŝatas lin en ĉi tiu loko, sed ili eĉ kuraĝas diskuti pri la agoj de lia patro kaj decidi pri lia enterigo ...

Sed li trankviliĝis. Tio estis nur formalaĵo, tiel antikva, kiel la egiptaj dinastioj. Ĝustadire tio ne estis juĝo, sed laŭdo de la mortinto.

Laŭ signo, farita de Herhor, la ĉefpastroj sidiĝis sur taburetoj. La nomarĥoj kaj generaloj, ĉirkaŭantaj la tronon de Ramzes, ne sidiĝis: por ili oni ne preparis seĝojn.

La faraono ekmemoris ankaŭ ĉi tiun ofendon; sed li jam tiel regis sin, ke oni ne povis rimarki, ĉu li vidis la malŝaton al la siaj.

Dume la sankta Mefres meditis pri la vivo de la mortinta sinjoro.

—Ramzes XII — diris li — faris neniun el la kvardek du pekoj, do la juĝo de dioj estos favora por li. Krom tio la reĝa mumio, dank'al la escepta zorgemo de la pastroj, estas provizita per ĉiuj amuletoj, preĝoj, konsiloj kaj ĵuroj, estas do sendube, ke la faraono jam loĝas kun la dioj, sidas apud Oziriso kaj mem estas Oziriso. La dia naturo de Ramzes XII montriĝis jam dum lia tera vivo. Li regis pli ol tridek jarojn, donacis al la popolo profundan pacon kaj konstruis aŭ finis multe da temploj. Krom tio li mem estis ĉefpastro kaj superis per sia pieco la plej piajn pastrojn. En lia regado la unu-an lokan okupis respekto al la dioj kaj suprenlevado de la sankta pastraro. Pro tio amis lin la ĉielaj fortoj, kaj unu el la tebaj dioj, Ĥonsu, petita de la faraono, bonvolis iri en la landon Buĥen kaj tie elpelis la malbonan spiriton el la reĝa filino.

Ripozinte iom, Mefres daŭrigis:

—Nun, altranguloj, kiam mi pruvis al vi, ke Ramzes XII estis dio, vi demandos, por kia celo ĉi tiu supera estaĵo mal-supreniris la egiptan teron kaj pasigis sur ĝi kelkdekon da jaroj? Por levi la mondon, kiu falis de la ruino de kredo. Kiu sin okupas hodiaŭ pri la pieco, kiu zorgas plenumi la volon de la dioj? En la malproksima nordo ni vidas grandan asirian popolon, kiu kredas nur la forton de la glavo, kaj anstataŭ saĝo kaj pieco, sin okupas per la sklavigo de la popoloj. Pli proksime de ni loĝas Fenicianoj, por kiuj oro estas dio, trom-

po kaj procentegoj estas ilia pieco. Fine aliaj popoloj, Ĥetoj oriente, Libianoj okcidente, Etiopianoj sude kaj Grekoj sur Mediteraneo estas barbaroj kaj rabistoj. Anstataŭ labori, ili ŝtelas, anstataŭ perfektigi en la saĝo, ili drinkas, ludas ostojn aŭ dormas, kiel lacaj brutoj. En la mondo ekzistas nur unu vere pia kaj saĝa popolo, la egipta, sed rigardu, kio okazas ankaŭ ĉi tie? Alfluis sendiaj fremduloj, kaj la religio falis ankaŭ ĉe ni. La nobeloj kaj altranguloj ĉe kruĉoj da vino mokas la diojn kaj la eternan vivon, la popolo ĵetas koton sur la sanktajn statuojn kaj ne faras oferojn al la temploj. La piecon anstataŭis lukso, la saĝon malĉasteco. Ĉiu volas porti grandegajn perukojn, sin olei per eksterordinaraj parfumoj, posedi broditajn per oro ĉemizojn kaj antaŭtukojn, sin ornami per ĉenoj kaj braceletoj, inkrustitaj per multekostaj ŝtonoj. La hordea pano ne sufiĉas plu al li: li deziras kukojn kun lakto kaj mielo; la piedojn li lavas per biero, la soifon li estingas per eksterlandaj vinoj. La tuta nobelaro dronas en ŝuldoj, la popolo estas batata kaj troŝargita, en diversaj lokoj eksplodas ribeloj. Kion mi diras: en diversaj lokoj!... De iom da tempo, dank'al misteraj konspirantoj en la tuta Egipto, longe kaj larĝe, ni aŭdas unu krion: "Ĉiun sepan tagon donu al ni la ripozon!... Ne batu nin sen juĝo!... Donacu al ni po unu bedo da tero kiel proprajon!..." Tio antaŭdiras la ruinon de nia ŝtato, kontraŭ kiu oni devas trovi rimedon. La sola savo estas la religio, kiu instruas nin, ke la popolo devas labori, la sanktaj viroj, kiuj konas la volon de la dioj, devas montri al ĝi la laboron, la faraono kaj liaj oficistoj devas kontroli, ĉu la tasko estas konsciencie plenumata. Tion instruas al ni la religio; konforme al tiaj principoj regis la ŝtaton Ramzes-Oziris XII

egala al la dioj. Kaj ni, la ĉefpastroj, honorante lian piecon, gravuros la jenan surskribon en la tomboj kaj temploj:

”Horus bovo, Apis forta, kiu kunigis la kronojn de la regno, ora nizo, reganta per la glavo, venkinto de naŭ popoloj, reĝo de Supra kaj Malsupra Egipto, sinjoro de du mondoj, filo de la suno, Amen-mer-Ramessu amata de Amon-Ra, sinjoro kaj estro de Tebaido, filo de Amon-Ra, adoptita de Horus, kaj naskita de Hormaĥis, reĝo de Egipto, estro de Fenicio, reganta naŭ popolojn.”¹

Kiam la propono estis akceptita per aklamado, de post la kurteno enkuris dancistinoj kaj dancis antaŭ la sarkofago sanktan dancon; la pastroj ekbruligis incensojn. Poste oni demetis la mumion de la ŝipeto kaj transportis en la sanktejon de Amon, kien Ramzes XIII ne havi rajton eniri.

Baldaŭ la religia ceremonio estis finita kaj la ĉeestantoj forlasis la templon.

Revenante en la palacon de Luksor, la juna faraono tiel dronis en siaj pensoj, ke li preskaŭ ne rimarkis la sennombran amason kaj ne aŭdis ĝiajn kriojn.

”Mi ne povas trompi mian propran koron — diris Ramzes al si mem. — La ĉefpastroj malŝatas min, kio okazis ankoraŭ al neniuj faraonoj; ili eĉ montras al mi, kiel mi povas reakiri ilian favoron. Ili volas regi la ŝtaton, kaj mi devas zorgi, ke oni plenumu iliajn ordonojn... Sed estos alie: mi ordonas, kaj vi devas plenumi... Kaj aŭ mi pereos, aŭ mi apogos sur viaj nukoj mian reĝan piedon ...”

Du tagojn la respektinda mumio de Ramzes XII resti en la templo de Amon, en tiel dia loko, ke ekster Herhor kaj Mefres, eĉ la ĉefpastroj ne povis tien eniri. Antaŭ la mortinto

1 Aŭtentika surtomba surskribo.

lumis nur unu lampo, kies flamo, mirakle konservata, neni-
am estingiĝadis. Super la mortinto flugpendis la simbolo de
la animo, nizo kun homa kapo. Ĉu tio estis maŝino aŭ reala
vivanta estaĵo, neniu sciis. Certe estis nur, ke la pastroj, kiuj
kuraĝis sekrete rigardi la kurtenon, vidis, ke la estaĵo pendis
en la aero sen apogo, movante la lipojn kaj okulojn.

Oni daŭrigis la funebran ceremonion, kaj la ora ŝipeto
transportis la mortinton sur la alian bordon de Nilo. Sed an-
taŭe, ĉirkaŭita de grandega sekvantaro de pastroj, ploristinoj,
soldatoj kaj popolo, meze de la incensa fumo, muziko kaj
kantoj, ĝi traveturis la ĉefan straton de Teboj.

Tio estis eble la plej bela strato en la egipta regno: larĝa,
glata, kun du vicoj de arboj. Ĝiaj kvar- eĉ kvinetaĝaj domoj,
de la fundamento ĝis la supro estis kovritaj de mozaiko, aŭ
skulptitaj kolore. Tio faris impreson, ke oni pendigis sur la
konstruaĵoj grandegajn kolorajn tapiŝojn, aŭ ke oni kovris ilin
per kolosaj pentraĵoj, prezentantaj la laboron de komercistoj,
metiistoj, maristoj, kaj malproksimajn landojn kaj popolojn.

Unuvorte, tio ne estis strato, sed pli ĝuste grandega gale-
rio de pentraĵoj, barbare desegnitaj, trobrile pentritaj.

La funebra procesio trairis de la nordo, al la sudo du kilo-
metrojn. Proksimume en la centro de la urbo ĝi haltis kaj po-
ste sin turnis al la okcidento, al Nilo.

En tiu loko, en la mezo de la rivero estis granda insulo, al
kiu kondukis ponto, konstruita sur ŝipetoj. Por eviti malfeli-
ĉan okazon, la generaloj komandantaj la procesion ankoraŭ
unu fojon ordigis la sekvantaron, starigis po kvar homoj en
ĉiu vico kaj ordonis al ili iri tre malrapide, ne paŝante ritme.
Por tiu celo la orkestroj en la fronto ludis kantojn, ĉiun de
malsama takto.

Post kelke da horoj la procesio trapasis unu ponton, la insulon, la alian ponton kaj atingis la maldekstran, okcidentan bordon de Nilo.

Se la orientan parton de Teboj oni povas nomi la urbo de la dioj kaj reĝoj, la okcidenta estis la kvartalo de memorigaj temploj kaj tomboj.

La procesio iris de Nilo al la montoj, tra la meza vojo. Sude de la vojo sur altaĵo staris templo, memoriganta la venkojn de Ramzes III; ĝiaj muroj estis kovritaj per portretoj de la venkitaj popoloj: Ĥetoj, Araboj, Libianoj, Amoreoj, Filistenoj, Etiopianoj. Iom pli malsupre leviĝis du grandegaj statuoj de Amenhotep II, kvin etaĝojn altaj, malgraŭ ilia sidanta teniĝo. Unu el la statuoj posedis miraklan econ: kiam la radioj de la leviĝanta suno falis sur ĝin, la statuo sonis, kiel harpo, kies kordojn oni disŝiris.

Ankoraŭ pli proksime de la vojo, ĉiam maldekstre de ĝi, staris Ramesemu, ne tre granda, sed bela templo de Ramzes II. Ĝian peristilon gardis statuoj, kun la simboloj de la reĝa povo en la manoj. En la korto estis ankaŭ statuo de Ramzes II, kvar etaĝojn alta.

La vojo seninterrompe iris delikate supren; pli kaj pli klare oni povis vidi la krutajn altaĵojn, truitajn kvazaŭ spongo: tio estis la tomboj de la egiptaj altranguloj. Ĉe la eniro al ili, inter krutaj ŝtonegoj, troviĝis la tre originala templo de la reĝino Hatasu. La konstruaĵo estis kvarcent kvindek paŝojn longa. De la korto, ĉirkaŭita de muro, oni eniradis en alian korton, ĉirkaŭitan de kolonoj, sub kiu estis subtera templo. De la kolona korto oni eniradis per ŝtuparo en templon, elhakitatan en ŝtonego, sub kiu ankaŭ estis subteraĵoj.

Tiamaniere la templo havis du etaĝojn: malsupran kaj su-

pran, el kiuj ĉiu estis dividita same. La ŝtuparo estis grandega; anstataŭ balustrado ĝi havis du vicojn de sfinksoj; la eniron al ĉiu ŝtuparo gardis du sidantaj statuoj.

De la templo de Hatasu komenciĝis malgaja intermonto, kiu kondukis de la tomboj de la altranguloj al la tomboj de la reĝoj. Inter ĉi tiuj du kvartaloj estis la elhakita en ŝtonego tomboj de la ĉefpastro Retemenof; ĉambroj kaj koridoroj, formantaj ĝin, okupis sub la tero pli ol unu hektaron.

La vojo en la intermonto fariĝis tiel kruta, ke la homoj devis helpi la tirantajn bovojn kaj puŝi la funebran ŝipeton. La sekvantaro iras kvazaŭ sur kornico, elhakita sur flanko de la ŝtonego, fine ĝi haltas sur vasta placo, dekkelkon da etaĝoj super la fundo de la intermonto.

Tie troviĝas pordo, kondukanta en la subteran tombon, kiun konstruis al si la faraono dum la tridek jaroj de sia regado. Ĉi tiu tombo estas tuta palaco kun ĉambroj por la sinjoro, por la familio kaj servistoj, kun manĝoĉambro, dormoĉambro kaj banejo, kun kapeloj de diversaj dioj, fine kun puto, sur kies fundo estas malgranda ĉambro, en kiu eterne ripozos la mumio de la faraono.

Ĉe la ruĝa lumo de la torĉoj oni vidas la murojn de ĉiuj ĉambroj, kovritajn de preĝoj kaj pentraĵoj, kiuj prezentas iujn okupojn kaj distraĵojn de la mortinto: ĉasojn, konstruadon de temploj kaj kanaloj, triumfajn vojaĝojn, solenojn por la honoro de la dioj, batalojn kontraŭ la malamikoj, laboron de la popolo ...

Sed tio ne sufiĉas: la ĉambroj ne nur estas plenplenaj de mebloj, vazoj, veturiloj, armiloj, floroj, viando, kukoj, vino, sed estas tie ankaŭ multe da statuoj. Tio estas diversaj portretoj de Ramzes XII, de liaj pastroj, ministroj, virinoj, soldatoj

kaj sklavoj. La sinjoro eĉ en la alia mondo ne povas vivi sen multekostaj mebloj, sen luksa manĝo kaj sen fidelaj servistoj.

Kiam la funebra veturilo haltis ĉe la eniro en la tombon, la pastroj prenis la reĝan mumion el la sarkofago kaj metis ĝin sur la tero, apoginte la dorson al la ŝtonego. Tiam Ramzes XIII bruligis incenson antaŭ la restaĵoj de la patro, kaj la reĝino Nikotris ĉirkaŭpreninte la kolon de la mumio, komencis paroli kun larmoj:

—”Mi estas via fratino, via edzino Nikotris, ne forlasu min, ho granda! Ĉu vi efektive deziras, mia bona patro, ke mi foriru? Se mi foriros, vi restos sola, kaj ĉu iu estos kun vi?...”²

La ĉefpastro Herhor bruligis incenson antaŭ la mumio, kaj Mefres verŝis vinon kaj diris:

—”Al via samulo mi oferas tion, Oziris-Mer-amen-Ramzes, monarĥo de Malsupra kaj Supra Egipto, kies voĉo estas justa antaŭ la granda dio”.

Poste eksonis la larmistoj kaj pastraj ĥoroj:

Ĥoro I. Plendu, plendu, ploru, ploru, senĉese ploru tiel laŭte, kiel vi povas ...

La ploristinoj. Ho nobla vojaĝanto, kiu direktas siajn paŝojn al la lando de la eterneco, kiel rapide oni forŝiras vin de ni!...

Ĥoro II. Kiel bela estas, kio okazas al li! Ĉar li tre amis Ĥonsu'n de Teboj, la dio permesis al li atingi la okcidenton, en la mondo de la generacioj de liaj servistoj.

La ploristinoj. Ho vi, kiun ĉirkaŭadis tiom da servistoj, nun vi estos en la tero, kiu ordonas la solecon ... Vi, kiu havis delikatajn vestojn kaj amis puran tolaĵon, vi kuŝas nun en la vesto hieraŭa!...

Ĥoro I. En paco al Okcidento, ho nia sinjoro, iru al Okci-

2 Aŭtentika.

dento ... Ni ree ekvidos vin, kiam venos la tago de la eterneco, ĉar vi iras en la landon, kiu kunigas ĉiujn homojn.”³

Komenciĝis la lastaj ceremonioj.

Oni alkondukis bovon kaj antilopon, kiujn devis mortigi Ramzes XIII, sed mortigis ilin lia anstataŭanto religia, la ĉefpastro Sem. La malsuperaj pastroj rapide buĉis la bestojn; Mefres kaj Herhor, preninte la femurojn, vice almetis ilin al la buŝo de la mumio. Sed la mumio ne volis manĝi, ĉar ĝi ne estis ankoraŭ vivanta, kaj ĝia buŝo estis fermita.

Por forigi la malhelpon, Mefres lavis ĝin per sankta akvo kaj incensis per parfumoj kaj aluno, dirante:

—”Jen staras mia patro, jen staras Oziris-Mer-amen-Ramzes. Mi estas via filo, mi estas Horus, mi venas al vi, por vin purigi kaj viviĝi ... Mi ree kunmetas viajn ostojn, kunigas, kio estis distranĉita, ĉar mi estas Horus, la venĝanto de mia patro ... Vi sidas sur la trono de Re, kiu venas de Nut, kiun naskas Re ĉiumatene, kiu naskas Mer-amen-Ramzeson ĉiutage, kiel Re.”⁴

Parolante tiel, la ĉefpastro tuŝis per amuletoj la buŝon, bruston, manojn kaj piedojn de la mumio.

Ree eksonis la ĥoroj.

Ĥoro I. Oziris-Mer-amen-Ramzes manĝos de nun kaj trinkos ĉion, kion manĝas kaj trinkas la dioj. Li sidas sur ilia loko, li estas sana kaj forta, kiel ili ...

Ĥoro II. Li havas la povon en ĉiuj siaj membroj; li malamas ne manĝi, kiam li estas malsata, kaj ne trinki kiam li soifas.

Ĥoro I. Ho dioj, donu al Oziris-Mer-amen-Ramzes mil milojn da kruĉoj da vino, mil vestojn, panojn kaj bovojn ...

3 Aŭtentika.

4 Aŭtentika.

Horo II. Ho, vi, vivantaj sur la tero, kiuj trapasos ĉi tie, se la vivo estas por vi kara kaj la morto abomena, se vi deziras, ke viaj honoroj transpasu al viaj posteuloj, diru ĉi tiun preĝon por la mortinto, enterigita ĉi tie ...

Mefres. Ho vi grandaj, vi princoj, skribistoj kaj faraonoj, vi aliaj homoj, kiuj venos milionon da jaroj post mi, se iu el vi anstataŭ mia nomo metus la sian, Dio punos lin per la detruo de lia persono sur la tero ...”⁵

Post ĉi tiu malbeno la pastroj ekbruligis la torĉojn, prenis la reĝan mumion kaj remetis ĝin en la keston, kaj kun la kesto en la ŝtonan sarkofagon, kies ĝeneralaj konturoj havis homan formon. Poste ili forportis la grandegan ŝarĝon en la tombon.

Trapasinte ĉe la lumo de la torĉoj kelke da koridoroj kaj ĉambroj, ili haltis en unu, kie estis la puto. Ili mallevis la sarkofagon en la truon kaj ili mem eniris post ĝi en la malsupran subteraĵon. Tie ili lokis la sarkofagon en malvasta ĉambro kaj rapide masonis la truon, tiel ke eĉ la plej sperta okulo ne trovis la eniron en la tombon. Poste ili revenis supren kaj same zorge masonis la eniron en la puton.

Ĉion ĉi plenumis la pastroj mem sen atestantoj, kaj plenumis tiel perfekte, ke la mumio de Ramzes XII ĝis la hodiaŭa tago ripozas en sia mistera loĝejo, rifuĝinte tie ne nur de ŝtelistoj, sed ankaŭ de la moderna scivolemo. Dum dudek naŭ jarcentoj oni superfortis multe da reĝaj tomboj, sed ĉi tiu restis netuŝita.

Dum unu pastra grupo estis kaŝanta la restaĵojn de la pia faraono, alia, lumiginte la subterajn ĉambrojn, invitis la vivantojn al festeno.

En la manĝoĉambro eniris Ramzes XIII, la reĝino Niko-

5 Aŭtentika.

tris, Sem kaj dekelko da civilaj kaj militistaj altranguloj. En la mezo de la ĉambro staris tabloj, ŝarĝitaj per manĝaĵoj, vino kaj floroj, kaj apud la muro sidis la porfira statuo de la mortinta sinjoro. Ĝi ŝajnis rigardi la ĉeestantojn kaj per melankolia rideto inviti ilin al la manĝo. La festeno komenciĝis per sankta danco, akompanata de la kanto de unu el la plej altaj pastrinoj:

”Ĝuu la tagojn de la feliĉo, ĉar la vivo daŭras nur unu momenton ... Ĝuu la feliĉon, ĉar kiam vi eniros en la tombon, vi ripozos tie eterne, la tutan longon de ĉiu tago.”

Post la pastrino ekparolis profeto, kaj akompanata de harpoj, li diris per kantanta voĉo:

”La mondo estas senĉesa ŝanĝo kaj senĉesa renovigo. Tio estas saĝa aranĝo de la sorto, admirinda decido de Oziriso, ke kiam unu korpo detruigigas kaj pereas, restas post ĝi aliaj korpoj ... La faraonoj, ĉi tiuj dioj, kiuj estis antaŭ ni, ripozas en siaj piramidoj; iliaj mumioj kaj samuloj restis; sed la palacoj, kiujn ili konstruis, ne restas plu sur la antaŭaj lokoj, ili ne ekzistas plu ... Ne malesperu do, sed sekvu vian deziron kaj feliĉon; ne uzu vian koron, antaŭ ol venos la tago, en kiu vi petegos, kaj Oziriso, la dio, kies koro ne batas plu, favore aŭskultos viajn petojn ... Plendoj de la tuta mondo ne redonos la feliĉon al la homo, kiu kuŝas en la tombo; ĝuu do la tagojn de la feliĉo kaj ne estu maldiligenta en la ĝojo. Vere, ne ekzistas homo, kiu povus kunporti sian havon en la alian mondon, vere, ne ekzistas homo, kiu foriris tien kaj revenis!...”⁷

La festeno estis finita kaj la ĉeestantoj, ankoraŭ unu fojon incensinte la statuon de la mortinto, ekiris revene al Teboj. En la templo de la tombo restis nur pastroj por akurate fari ofe-

7 Aŭtentika.

rojn al la sinjoro, kaj soldatoj, por gardi la tombon de malpiaj atencoj de ŝtelistoj.

Ramzes XII restis sola en sia mistera ĉambro. Tra la malgranda fenestro, kaŝita en la ŝtonego, apenaŭ penetris al li la krepusko; anstataŭ strutaj plumoj murmuretis super la sinjoro flugiloj de grandegaj vespertoj; anstataŭ muziko sonis nokte ĝemantaj blekoj de hienoj, kaj de tempo al tempo potenca voĉo de la leono, kiu de sia dezerto salutis la faraonon en la tombo.

ĈAPITRO DEKA

Post la enterigo de la faraono Egipto revenis al la ordinara vivmaniero, kaj Ramzes XIII al la ŝtataj aferoj.

En la monato Epifii (aprilo, majo) la nova monarĥo vizitis la urbojn trans Teboj, sur la bordoj de Nilo. Li estis en Sni, urbo tre komerca kaj industria, kie troviĝis la templo de Kneph, aŭ la "animo de la mondo". Li vizitis Edfu'n, kies templo kun deketaĝaj pilonoj posedis grandegan bibliotekon de papirusoj, kaj sur la muroj skribitan kaj pentritan kvazaŭ enciklopedion de tiama geografio, astronomio kaj teologio. Li haltis en la ŝtonminejoj de Ĥennu; en Nubio aŭ Kom-Ombo li faris oferon al Horus, la dio de la lumo, kaj al Sebek, kiu estas la spirito de la krepusko. Li estis sur la insulo Ab, kiu inter la nigraj ŝtonegoj havis aspekton de smeraldo, naskis la plej bonajn daktilojn kaj estis nomata ĉefurbo de la elefantoj; ĉar tie koncentriĝis la tuta komerco de la eburo. Fine li vizitis la urbon Sunnu, ĉe la unua katarakto de Nilo, estis en la grandegaj minejoj de granito kaj sienito, kie oni fendis la ŝtonegojn per kojnoj, saturitaj de akvo, kaj hakis obeliskojn, naŭ etaĝojn altajn.

Ĉie, kie sin montris la nova sinjoro de Egipto, regnано salutis lin kun kurioza entuziasmo. Eĉ krimuloj, laborantaj en la minejoj, kies korpo estis kovrita de necikatriĝintaj vundoj, eĉ ili ĝuis la feliĉon: la faraono ordonis liberigi ilin de la laboro por tri tagoj.

Ramzes XIII povis esti kontenta kaj fiera: neniuj faraonoj dum sia venka triumfo estis tiel akceptata, kiel li dum sia paca ekskurso. La nomarĥoj, skribistoj kaj ĉefpastroj, vidante la senliman konfidon de la popolo al la nova faraono, kliniĝis antaŭ lia povo kaj murmuretis inter si:

—La popolaĉo estas kvazaŭ aro da bovoj, kaj ni kiel prudentaj kaj ŝparemaj formikoj. Ni respektu do la novan sinjoron, por ke ni ĝuu la sanon kaj gardu niajn domojn de la ruino.

Tiamaniere la opozicio de la altranguloj, tre forta antaŭ kelke da monatoj, hodiaŭ eksilentis kaj cedis la lokon al senlima humileco. La tuta aristokratio kaj pastraro falis sur la vizaĝon antaŭ Ramzes XIII; sole Mefres kaj Herhor restis neflekseblaj.

Ne estas do mirinde, ke kiam la faraono revenis de Sunnu Tebojn, tuj en la unua tago la granda trezoristo alportis al li malbonajn novaĵojn.

—Ĉiuj temploj — diris li — rifuzis al la trezorejo krediton kaj plej humile petegas vian sanktecon, ke en la daŭro de du jaroj vi ordonu pagi la sumojn, pruntitajn de ili ...

—Mi komprenas — respondis la monarĥo — tio estas verko de la sankta Mefres!... Kiom ni ŝuldas al ili?

—Ĉirkaŭ kvindek mil talentojn ...

—Kvindek mil talentojn mi devas pagi en la daŭro de du jaroj!... — ripetis la faraono. — Kaj poste, kio ankoraŭ? ...

—La impostoj alfluas tre malrapide — diris la trezoristo. — Jam de tri monatoj ni ricevas apenaŭ la kvaronon de tio, kion oni ŝuldas al ni ...

—Kio okazis?

La trezoristo estis embarasita.

—Mi aŭdis — diris li — ke iuj homoj klarigis al la kamparanoj, ke dum la regado de via sankteco ili povas ne pagi la impostojn ...

—Oh! Oh!... — ekkriis Ramzes ridante — tiuj homoj ŝajnas al mi tre similaj al la nobla Herhor ... Li do volas mortigi min per malsato?... Kiel vi pagas la kurantajn elspezojn? — aldonis li.

—Laŭ la ordono de Hiram pruntas al ni Fenicianoj — respondis la trezoristo. — Ni jam prenis ok mil talentojn ...

—Sed vi donas al ili kvitancojn?

—Kvitancojn kaj garantiojn ... — ekĝemis la trezoristo.

—Ili diras, ke tio estas simpla formalajaĵo; tamen ili loĝiĝas en la bienoj de via sankteco kaj forprenas de la kamparanoj ĉion, kion ili povas ...

Ebriigita de la akcepto de la popolo kaj de la humileco de la riĉuloj, la faraono ne koleris plu kontraŭ Herhor kaj Mefres. La tempo de la kolero pasis, venis la momento de la agado, kaj en la sama tago Ramzes kombinis planon.

En la sekvinta tago li alvokis siajn plej konfidindajn homojn: la ĉefpastron Semon, la profeton Pentueron, la favoraton Tutmozis kaj la Fenicianon Hiramon. Kiam ili kunvenis, li diris:

—Kredeble vi scias, ke la temploj postulis, ke mi redonu al ili la sumojn, kiujn pruntis de ili mia eterne vivanta patro. Ĉiu ŝuldo estas sankta, kaj tiun de la dioj mi dezirus pagi antaŭ ĉio. Sed mia trezorejo estas malplena, ĉar eĉ la impostoj alfluas neakurate ... Kaj tial mi opinias, ke la ŝtato estas en danĝero kaj mi estas devigita, por havi monajn rimedojn, min turni al la trezoroj, gardataj en Labirinto.

La du pastroj faris maltrankvilan movon.

—Mi scias — daŭrigis la faraono — ke laŭ niaj sanktaj leĝoj, mia dekreto ne sufiĉas por malfermi al ni la kelojn de Labirinto. Sed la tieaj pastroj klarigis al mi, kion mi devas fari. Mi devas kunvoki reprezentantojn de ĉiuj klasoj de Egipto, po dektri de ĉiu klaso, kaj ricevi de ili konfirmon de mia volo ...

En ĉi tiu momento la faraono ekridetis kaj daŭrigis:

—Hodiaŭ mi alvokis vin, por ke vi helpu min kunvoki la reprezentantojn de la klasoj, kaj jen kion mi ordonas al vi: vi, nobla Sem, elektos al mi dektri pastroj kaj dektri nomarĥojn ... Vi, pia Pentuer, venigos de diversaj nomesoj dektri kamparanojn kaj dektri metiistojn ... Tutmozis liveros dektri oficirojn kaj dektri nobelojn, la princo Hiram dektri komercistojn. Mi deziras, ke la reprezentantoj plej baldaŭ kunvenu en mia palaco en Memfiso kaj, ne perdante tempon en vana bablado, decidu, ke Labirinto devas liveri monon al mia trezorejo ...

—Mi kuraĝas rememorigi al via sankteco — interrompis la ĉefpastro Sem — ke la konsilon devas ĉeesti la noblaj Herhor kaj Mefres, kaj ke ili posedas la rajton, eĉ la devon kontraŭstari, ke oni tuŝu la trezorejon de Labirinto.

—Bone, mi plene konsentas ... — vive respondis la faraono. — Ili prezentos siajn motivojn, mi miajn ... La kunveno decidis, ĉu la ŝtato povas ekzisti sen mono kaj ĉu prudente estas amasigi trezorejon en keloj, dum la registaron minacas la mizero.

—Per kelke da safiroj, kiuj kuŝas en Labirinto, oni povus pagi ĉiujn feniciajn ŝuldojn!... — diris Hiram. — Mi tuj iras inter la komercistojn kaj liveros ne dektri, sed dektri mil tiajn, kiuj voĉdonos laŭ la ordonoj de via sankteco ...

Dirinte tion, la Feniciano falis sur la vizaĝon kaj adiaŭis la monarĥon.

Kiam Hiram foriris, la ĉefpastro Sem diris:

—Mi ne scias, ĉu bone estas, ke en la kunveno partoprenis fremdulo.

—Li devis partopreni! — ekkriis la faraono. — Ĉar li ne sole havas grandan influon je niaj komercistoj, sed kio estas pli grava, li liveras al ni hodiaŭ monon ... Mi volis konvinki lin, ke mi pensas pri tio, kion mi ŝuldas al li, kaj ke mi havas rime-dojn por pagi ĝin ...

Sekvis silento, kiun profitis Pentuer, dirante:

—Se via sankteco permesos, mi tuj forveturos, por kolekti la kamparanojn kaj metiistojn. Ĉiuj ili voĉdonos por mia sinjoro, sed el la amaso oni devas elekti la plej saĝajn.

Li adiaŭis la faraonon kaj foriris.

—Kaj vi, Tutmozis?... — demandis Ramzes.

—Mia sinjoro — diris la favorato — mi estas tiel certa pri via nobelaro kaj armeo, ke anstataŭ paroli pri ili, mi kuraĝos prezenti al vi mian propran peton ...

—Ĉu vi deziras monon?

—Tute ne. Mi volas edziĝi ...

—Vi?... — ekkriis la faraono. — Kiu virino meritis de la dioj tian feliĉon?

—Tio estas la bela Hebron, la filino de la plej nobla teba nomarĥo, Antef ... — respondis ridante Tutmozis. — Se via sankteco bonvolos prezenti mian peton al ĉi tiu respektinda familio ... Mi volis diri, ke mia amo al vi pligrandiĝos, sed mi silentos, ĉar mi mensogus ...

La faraono frapis lin je la ŝultro.

—Bone ... bone!... Ne ripetu al mi tion, pri kio mi estas cer-

ta — diris li. — Mi veturos morgaŭ al Antef kaj, pro la dioj, ŝajnas al mi, ke en la daŭro de kelke da tagoj, mi aranĝos vian edziĝon. Kaj nun vi povas iri al via Hebron ...

Restinte sola kun Sem, lia sankteco demandis: — Via vizaĝo estas malgaja ... Ĉu vi dubas, ke oni povos trovi dektri pastrojn, pretajn plenumi miajn ordonojn.

—Mi estas certa, — respondis Sem — ke preskaŭ ĉiuj pastroj kaj nomarĥoj faros tion, kio estos necesa por la feliĉo de Egipto kaj por la kontenteco de la faraono ... Sed bonvolu ne forgesi, sinjoro, ke en la aferoj de la trezorejo de Labirinto la definitivan decidon faras Amon ...

—La statuo de Amon en Teboj?...

—Jes.

La faraono malestime svingis la manon.

—Amon — diris li — tio estas Herhor kaj Mefres ... Ke ili ne konsentos, mi scias; sed mi ne intencas oferi la ŝtaton pro la obstino de du homoj.

—Via sankteco eraras — respondis Sem. — Estas vero, ke tre ofte statuoj de la dioj faras tion, kion deziras iliaj ĉefpastroj, sed ... ne ĉiam!... En niaj temploj, sinjoro, okazas iafoje eksterordinaraj kaj misteraj aferoj ... La statuoj de la dioj iafoje mem faras kaj parolas, kion ili volas ...

—En tia okazo mi estas tute trankvila — interrompis lin la faraono. — La dioj konas la staton de la lando kaj legas en mia koro. Mi volas, ke Egipto estu feliĉa, kaj ĉar nur tion mi celas, neniuj saĝa kaj bona dio povas min malhelpi.

—Realiĝu la vortoj de via sankteco!... — murmuretis la ĉefpastro.

—Vi volas ankoraŭ ion diri al mi — demandis Ramzes, vidante ke lia religia anstataŭanto prokrastas la adiaŭon.

—Jes, sinjoro. Mi havas la devon rememorigi al vi, ke ĉiu faraono, akceptinte la povon kaj enteriginte sian antaŭulon, tuj devas zorgi pri la konstruo de tombo por si kaj de templo por la dioj.

—Jes, jes! — ekkriis la sinjoro. — Pli ol unu fojon mi pensis pri tio, sed ne posedante monon mi ne rapidas ordoni ion. Ĉar vi komprenas, — aldonis li vive — ke se mi konstruos ion, tio estos io granda, kio devigos Egipton ne baldaŭ forgesi pri mi ...

—Ĉu via sankteco volas havi piramidon?...

—Ne. Mi ja ne konstruos pli grandan piramidon, ol tiu de Ĥeopso, nek pli grandan templon, ol tiu de Amon en Teboj. Mia ŝtato estas tro malforta por plenumi grandegajn verkojn ... Mi do volas fari ion tute novan, ĉar mi diros al vi, ke niaj konstruaĵoj jam tedas min. Ĉiuj similas unu alian, kiel homoj, kaj diferencas nur per la mezuroj, kiel plenaĝa homo diferencas de infano.

—Do?... — demandis la ĉefpastro, larĝe malfermante la okulojn.

—Mi parolis kun la Greko Dion, kiu estas mia plej eminenta arĥitekto, kaj li laŭdis mian planon — daŭrigis la faraono. — Kiel tombon por mi, mi volas konstrui rondan turon, kun eksteraj ŝtuparoj, tian, kia estas en Babelo ... Mi konstruos ankaŭ templon, ne al Oziriso aŭ Izido, sed al la Sola Dio, kiun kredas ĉiuj: Egiptanoj, Ĥaldeanoj, Fenicianoj kaj Hebreoj ... Mi volas, ke ĉi tiu templo estu simila al la palaco de reĝo Assar, kies planon Sargon donacis al mia patro ...

La ĉefpastro skuis la kapon.

—Tio estas grandaj intencoj, mia sinjoro — respondis li — sed ne plenumebraj ... La babilonaj turoj pro sia formo estas

malfortikaj kaj facile renversiĝas, niaj konstruaĵoj daŭras jarcentojn ... Oni ne povas konstrui templon al la Sola Dio, ĉar li bezonas nek manĝaĵojn, nek trinkaĵojn, kaj la tuta mondo estas Lia loĝejo. Kie do estas la templo, kiu povus enteni Lin? Kie la pastro, kiu kuraĝus fari al Li oferojn?...

—Bone, ni do konstruu templon al Amon Ra — interrompis la faraono.

—Jes, sed ne tian, kia estas la palaco de reĝo Assar. Ĉar ĝi estas asiria konstruaĵo, kaj al ni, Egiptanoj, ne konvenas imiti la barbarojn ...

—Mi ne komprenas vin ... — interrompis la monarĥo iom incitita.

—Aŭskultu min, nia sinjoro — diris Sem. — Rigardu limakojn, el kiuj ĉiu havas alian konkon: unu kunvolvitan, sed platan, alia kunvolvitan, sed longforman, alia similan al kesto ... Same ĉiu popolo faras konstruaĵojn, konformajn al ĝia raso kaj gusto. Memoru ankaŭ, ke la egiptaj konstruaĵoj tiel diferencas de la asiriaj, kiel Egiptanoj de Asirianoj. Ĉe ni principa formo de ĉiu konstruaĵo estas la plej fortika el ĉiuj ŝtatoj. Ĉe Asirianoj principa formo estas la kubo, kiu facile difektiĝas kaj detruigiĝas. Asiriano, fieraj kaj vanta, metas siajn kubojn unu *sur* alia kaj konstruas multetaĝan domon, sub kies pezo disiĝas la tero. Egiptano, humilaj kaj prudentaj, metas siajn detranĉitajn piramidojn unu *post* alia. Tiamaniere ĉe ni nenio pendas en la aero, sed ĉiu parto de la konstruaĵo sin apogas sur la tero. Jen kial niaj konstruaĵoj estas longaj kaj eterne daŭraj, la asiriaj — altaj kaj rompeblaj, kiel ilia ŝtato, kiu hodiaŭ rapide leviĝas, kaj de kiu post kelke da jarcentoj restos nur ruinoj. Asiriano estas kriema memlaŭdulo kaj en siaj konstruaĵoj ĉion metas ekstere: kolonojn, pentraĵojn, skulptaĵojn.

La modesta Egiptano kaŝas la plej belajn skulptaĵojn kaj kolonojn en la interno de la temploj, kiel saĝulo, kiu la altajn pensojn, sentojn kaj dezirojn kaŝas sur la fundo de sia koro, kaj ne ornamas per ili sian bruston aŭ dorson. Ĉe ni ĉio bela estas kaŝita: ĉe li ĉion oni faras *por* montrado. Asiriano, se li povus, distranĉus sian stomakon, por montri al la mondo kiel delikatajn aĵojn li manĝas ...

—Parolu ... parolu!... — intermetis Ramzes.

—Ne multe restis al mi por diri — daŭrigis Sem. — Mi volas nur turni vian atenton, sinjoro, al la ĝenerala formo de niaj konstruaĵoj. Kiam antaŭ kelke da jaroj mi estis en Ninivo, mi rigardis la asiriajn turojn, fiere leviĝantajn super la tero; ŝajnis al mi, ke tio estas furiozaj ĉevaloj, kiuj disŝirinte bridojn, stariĝas sur la postaj piedoj, sed tuj falos, aŭ eble rompos al si la krurojn. Kontraŭe, provu via sankteco ekrigardi de alta punkto egiptan templon. Kion ĝi rememorigas? Homon, kiu preĝas, kuŝante sur la tero. La du pilonoj estas manoj, levitaj al la ĉielo. La du muroj, ĉirkaŭantaj la korton, estas brakoj. La "ĉambrego de la kolonoj aŭ ĉiela" estas kapo; la ĉambroj de la "dia apero" kaj de la "oferaj tabloj" estas brusto, kaj la sekreta sanktejo estas koro de la pia Egiptano. Nia templo instruas nin, kiaj ni devas esti: "Havu manojn potencajn, kiel la pilonoj — diras ĝi al ni — kaj brakojn fortajn, kiel la muroj. Havu en la kapo saĝon tiel vastan kaj riĉan, kiel la vestiblo de la templo, animon puran, kiel la ĉambroj de la "dia apero" kaj de la "oferoj", kaj en la koro havu dion, ho Egiptano!... La asiriaj konstruaĵoj diras al sia popolo: "Leviĝu super la homojn, Asiriano, portu la kapon pli alte ol la aliaj!... Vi faros nenion grandan en la mondo, sed almenaŭ vi lasos multe da ruinoj ..." Ĉu do vi havus kuraĝon, sinjoro — konkludis la ĉefpastro

— konstrui ĉe ni asiriajn templojn, imiti la popolon, kiun Egipto rigardas kun abomeno kaj malestimo?...

Ramzes ekmeditis. Malgraŭ la leciono de Sem, ankoraŭ nun li opiniis, ke la asiriaj palacoj estas pli belaj, ol la egiptaj. Sed li tiel malamis Asirianojn, ke lia koro komencis ŝanceliĝi.

—En tia okazo — respondis li — mi prokrastos konstruon de la templo kaj de mia tombo. Kaj vi, saĝuloj, kiuj estas favoraj al mi, preparu planojn de tiaj konstruaĵoj, ke ili transigu mian nomon al la plej malproksimaj generacioj.

”Superhoma fiero plenigas la animon de ĉi tiu junulo!...” — diris al si la ĉefpastro kaj malĝoja adiaŭis la faraonon.

ĈAPITRO DEKUNUA

Dume Pentuer sin preparis por reveni de Malsupra Egipto. Unuflanke li devis trovi po dektri reprezentantojn de la kamparanoj kaj metiistoj, kiel li promesis al la nova monarĥo. Laŭ lia opinio, la plej grava afero por Egipto estis forigi la maljustaĵojn kaj trouzojn, kiujn suferis la laborantaj klasoj.

Tamen Pentuer estis pastro kaj ne nur ne deziris la falon de sia propra klaso, sed eĉ ne volis disŝiri la ligilojn, kiuj kunigis lin kun ĝi.

Por montri sian fidelecon, Pentuer iris adiaŭi Herhoron.

La altrangulo, iam potenca, akceptis lin kun rideto.

—Malofta gasto ... malofta gasto!... — ekkriis Herhor. — De la tempo, kiam vi povis fariĝi konsilisto de lia sankteco, vi ne montras vin al mi ... Verdire, ne vi sola!... Sed, kio ajn okazos, mi ne forgesos viajn servojn, eĉ se vi ankoraŭ pli evitos min.

—Mi ne estas konsilisto de nia sinjoro, mi ne evitas vian ekscelencon, al kies favoro mi ŝuldas tion, kio mi estas nun ... — respondis Pentuer.

—Mi scias, mi scias! — interrompis Herhor. — Vi ne akceptis la altan oficon, por ne labori por la pereco de la temploj. Mi scias, ke vi ne fariĝis konsilisto de ĉi tiu junulaĉo, simila al petola ĉevalo, kiu, kiel oni diras, regas nin ... Sendube vi ne permesus al li sin ĉirkaŭi per perfiduloj, kiuj pereigos lin ...

Pentuer ne dezirante paroli pri tiel danĝeraj aferoj, rakontis al Herhor, por kio li veturas en Malsupran Egipton.

—Bone — respondis Herhor — Ramzes XIII kunvoku kunsidon de ĉiuj klasoj!... Li havas la rajton ... Sed — aldonis li subite — mi bedaŭras, ke vi miksas vin je tio ... Grandaj ŝanĝoj fariĝis en vi! Ĉu vi memoras, kion vi diris dum la manovroj apud Pi-Bailos, al mia adjutanto?... Mi rememorigos al vi: vi diris, ke oni devas limigi la trouzojn kaj la diboĉojn de la faraonoj. Kaj hodiaŭ ... vi mem subtenas la infanajn pretenojn de la plej granda diboĉulo, kiun iam ajn havis Egipto.

—Ramzes XIII — interrompis Pentuer — volas plibonigi la sorton de la popolo. Mi do estus malsaĝa kaj mizera, se mi, filo de kamparanoj, ne servus al li en ĉi tiu afero.

—Sed vi ne demandas, ĉu vi ne malutilos nin, la pastraron?...

Pentuer ekmiris.

—Vi ja mem plibonigis la sorton de la kamparanoj, apartenantaj al la temploj! — ekkriis li. — Cetere mi havas vian permeson ...

—Kion?... kian? — demandis Herhor.

—Rememorigu al vi via ekscelenco la nokton, dum kiu, en la templo de Set, ni akceptis Beroeson. Mefres diris tiam, ke Egipto falis de la malleviĝo de la pastraro, mi certigis, ke la mizero de la popolo estas la kaŭzo de la malfeliĉo de la ŝtato. Al tio, se la memoro ne trompas min, vi respondis: "Mefres zorgu pri la releviĝo de la pastraro, Pentuer pri la plibonigo de la sorto de la kamparanoj ... Kaj mi antaŭzorge malhelpos la militon inter Egipto kaj Asirio."

—Vi vidas do — interrompis la ĉefpastro — ke vi havas la devon agi kun ni, ne kun Ramzes.

—Ĉu li volas militon kontraŭ Asirio? — respondis energie Pentuer. — Aŭ eble li malhelpas la pastrojn akiri saĝon?... Li volas doni al la popolo ripozon ĉiun sepan tagon, kaj poste donaci al ĉiu kamparana familio pecon da tero ... Kaj via eks-celenco ne diru al mi, ke la faraono volas ion malbonan, ĉar oni konstatis en la bienoj de la pastroj, ke kamparano libera kaj posedanta sian kampon laboras pli bone ol sklavo.

—Mi tute ne kontraŭstaras la reformojn por la popolo! — ekkriis Herhor. — Sed mi estas certa, ke Ramzes faros nenion por la popolo.

—Sendube nenion, se vi rifuzos monon ...

—Eĉ se oni donus al li unu piramidon da oro kaj arĝento, kaj duan da juveloj, li faros nenion, ĉar li estas petolema bubo, kiun la asiria ambasadoro Sargon neniam nomis alie ol "flavbekulo" ...

—La faraono havas grandajn kapablojn ...

—Sed li scias nenion, li konas nenion!... — diris Herhor. — Li apenaŭ metis la piedon en la superan lernejon, el kiu li plej rapide forkuris. Kaj tial hodiaŭ en la aferoj de la regado li estas kvazaŭ blindulo, kvazaŭ infano, kiu kuraĝe dismetas la damojn, sed tute ne scias ludi ilin.

—Tamen li regas ...

—Ĉu tio estas regado, Pentuer! — respondis la ĉefpastro kun rideto. — Li fondis novajn militajn lernejojn, pligrandigis kvanton de la regimentoj, armas la tutan popolon, promesas festojn al la popolaĉo ... Sed kiel li plenumos tion?... Vi restas malproksime de li, vi do scias nenion; sed mi certigas al vi, ke li donante la ordonojn, tute ne konsideras, kiu plenumos ilin? kiel? kiajn sekvojn ili havos? Al vi ŝajnas, ke li regas. Tio estas mi, kiu regas, mi seninterrompe regas, mi,

kiun li forpelis de si ... Mi estas la kaŭzo, ke hodiaŭ malpli da impostoj alfluas al la trezorejo, sed estas ankaŭ mi, kiu malhelpas ribelojn de la kamparanoj, kiuj jam eksplodis; dank'al mi ili ne forlasas la laborojn ĉe la kanaloj, akvobaroj kaj ŝoseoj. Fine, mi jam dufoje detenis Asirion, kiu volis proklami militon kontraŭ ni, kiun ĉi tiu frenezulo provokas per siaj militaj preparoj ... Ramzes regas!... Li nur faras malordon. Vi havis provon de lia mastrumado en Malsupra Egipto: li trinkis, diboĉis, venigis novajn kaj novajn knabinojn kaj sin okupis, oni diras, per administrado de la nomesoj, sed li komprenis nenion, absolute nenion. Sed plej malbone estas, ke li kunigis kun Fenicianoj, bankrotintaj nobeloj kaj diversaj perfiduloj, kiuj puŝas lin al la pereco ...

—Kaj la venko apud Sodaj Lagoj? — demandis Pentuer.

—Mi ne neas lian energion kaj liajn konojn de la milita arto — respondis Herhor. — Tio estas la sola afero, kiun li scias. Sed diru vi mem, ĉu li gajnis la batalon apud Sodaj Lagoj, sen via helpo, sen la helpo de la aliaj pastroj?... Mi ja scias, ke vi komunikis al li detalojn pri ĉiu movo de la libia bando ... Kaj nun pensu, ĉu Ramzes, eĉ kun via helpo, povus gajni batalon, ekzemple, kontraŭ Nitager?... Nitager estas majstro, Ramzes estas nur metia lernanto.

—Per kio do finiĝos via malamo? — demandis Pentuer.

—Malamo!... — ripetis la ĉefpastro. — Ĉu mi povas malami flavbekulon, kiu cetere estas tiel ĉirkaŭita de ĉiuj flankoj, kiel cervo de ĉasistoj, en intermonto? Sed mi devas konfesi, ke lia regado estas tiel malutila por Egipto, ke, se Ramzes havus fraton, aŭ se Nitager estus pli juna, ni jam forigus la nunan faraonon ...

—Kaj via ekscelenco fariĝus lia posteulo!... — eksplodis Pentuer.

Herhor ne ofendiĝis.

—Strange vi malsaĝiĝis, Pentuer — respondis li, levante la ŝultrojn — de la tempo, kiam vi faras politikon je via propra konto. Kompreneble, se faraono mankus, mi havus la devon fariĝi faraono, kiel la ĉefpastro de teba Amon kaj la estro de la plej alta pastra kolegio. Sed por kio? Ĉu jam de dekelko da jaroj mi ne posedas pli grandan povon ol la faraonoj?... Aŭ ĉu hodiaŭ, mi, la forpelita ministro de milito, ne faras en la ŝtato, kion mi opinias necesa?... La samaj ĉefpastroj, trezoristoj, juĝistoj, nomarĥoj, eĉ generaloj, kiuj nun evitas min, devas plenumi ĉiun sekretan ordonon de la plej alta kolegio, portanta mian sigelon?... Ĉu vi mem kuraĝus kontraŭstari al ili?...

Pentuer mallevis la kapon. Se malgraŭ la morto de Ramzes XII ne malaperis la plej alta sekreta pastra kolegio, Ramzes XIII devas aŭ cedi al ĝi, aŭ konduki kontraŭ ĝi mortan batalon.

La faraono havis ĉe sia flanko la tutan popolon, la tutan armeon, multe da pastroj kaj la plimulton da civilaj altranguloj. La kolegio povis kalkuli apenaŭ je kelke da miloj da partianoj, je siaj trezoroj kaj je sia senfine saĝa organizo. La fortoj estis tute neegalaj, sed la rezultato de la batalo tre duba.

—Vi do decidis pereigi la faraonon!... — murmuretis Pentuer.

—Tute ne. Ni nur volas savi la ŝtaton.

—En tia okazo, kion devas fari Ramzes XIII?...

—Kion li faros?... mi ne scias — respondis Herhor. — Sed mi scias, kion faris lia patro. Ramzes XII ankaŭ komencis la regadon per ignoranteco kaj despotismo; sed kiam la mono

mankis al li, kaj la plej fervoraj partianoj komencis lin malŝati, li sin turnis al la dioj. Li ĉirkaŭis sin per pastroj, lernis de ili, eĉ edziĝis kun la filino de la ĉefpastro, de Amenhotep ... Kaj post dekelko da jaroj li sukcesis fariĝi ĉefpastro ne sole pia, sed eĉ tre saĝa.

—Kaj se la faraono ne obeos ĉi tiun konsilon?

—Ni ekzistos sen li — diris Herhor,

Post momento li daŭrigis:

—Aŭskultu min, Pentuer. Mi scias ĉion, kion faras, eĉ kion pensas via faraono, kiu cetere ne estas ankoraŭ solene kronita, estas do nenio por ni. Mi scias, ke li volas fari la pastrojn siaj servistoj, kaj sin la sola estro de Egipto. Sed tia intenco estas malsaĝaĵo, eĉ perfido. Ne la faraonoj, vi scias tion tre bone, kreis Egipton, sed la dioj kaj pastroj. Ne la faraonoj mezuras la leviĝon de Nilo kaj reguligas ĝin; ne la faraonoj instruas la popolon semi, rikolti, eduki brutojn. Ne la faraonoj resanigas malsanojn de la loĝantoj kaj gardas sendanĝeron de la ŝtato kontraŭ la eksteraj malamikoj. Kio do okazus, diru mem, se la pastraro donus Egipton al la fantazio de la faraonoj. La plej saĝa el ili havas sperton de kelkdeko da jaroj; sed la pastraro esploris kaj lernis dum dekoj da jarmiloj ... La plej potenca monarĥo havas unu paron da okuloj kaj manoj; ni, ni posedas milojn da okuloj kaj manoj en ĉiuj nomesoj kaj regnoj ... Ĉu do la agado de la faraono povas esti komparata kun la nia, kaj se la opinioj diferencas, kiu devas cedi, ni aŭ li?...

—Kion mi devas nun fari? — intermetis Pentuer.

—Faru, kion ordonas al vi ĉi tiu junulaĉo, kondiĉe ke vi ne perfidos la sanktajn misterojn. Kaj la ceteron ... lasu al la tempo ... Mi sincere deziras, ke la junulo, nomata Ramzes XIII,

revenu sur la vojon de la prudento, kaj mi supozas, ke li tion farus, se ... se li ne estus ligita kun abomenaj perfiduloj, super kiuj jam pendas la mano de la dioj.

Pentuer adiaŭis la ĉefpastron, plena de malĝojaj antaŭ-sentoj; tamen li ne perdis kuraĝon, sciante, ke kion ajn li akiros hodiaŭ por la plibonigo de la sorto de la popolo, tio jam restos, eĉ se la faraono sin klinus antaŭ la potenco de la pastroj.

”En la plej malbona situacio — pensis li — ni faru, kion ni povas kaj devas. Iam la rilatoj pliboniĝos, kaj la nuna semo donos fruktojn.”

Tamen li decidis forlasi la propagandon inter la popolo. Kontraŭe, li estis preta trankviligi la malpaciencajn, por ke ili ne pligrandigu la embarasojn de la faraono.

Post kelke da semajnoj Pentuer penetris en la limojn de Malsupra Egipto, serĉante survoje plej prudentajn kamparanojn kaj metiistojn, el kiuj oni povus elekti delegitojn por la kunveno, kiun kunvokis la faraono. Ĉie dum la vojaĝo li trovis signojn de granda ekscito: kamparanoj kaj metiistoj postulis, ke oni donu al ili ripozon ĉiun sepan tagon kaj pagu por ĉiuj publikaj laboroj, kiel estis iam. Kaj nur dank'al la admonoj de la pastroj de diversaj temploj ne eksplodis ĝenerala ribelo, aŭ almenaŭ oni ne interrompis la laborojn.

Samtempe li rimarkis kun miro kelkajn novajn fenomenojn, kiujn li ne vidis antaŭ unu monato.

Unue, la popolo sin dividis en du partiojn. Unuj estis partianoj de la faraono kaj malamikoj de la pastroj, aliaj indignis kontraŭ Fenicianoj. Unuj pretendis, ke la pastroj devas liveri al la faraono la trezorojn de Labirinto, aliaj murmuretis, ke la faraono tro protektas la fremdulojn.

Sed plej stranga estis la famo, kiu venis oni ne scias de kie, ke Ramzes XIII montris simptomojn de frenezo!... Same kiel lia pli aĝa sampatra frato, kiun pro la sama kaŭzo oni forigis de la trono. Pri ĉi tiu famo parolis la pastroj skribistoj, eĉ kamparanoj.

—Kiu rakontas al vi tiajn mensogojn?... — demandis Pentuer sian konatan inĝenieron.

—Tio ne estas mensogo — respondis la inĝeniero — sed malĝoja vero ... En la teabaj palacoj oni vidis la faraonon tute nudan, kurantan en la ĝardenoj. Foje nokte lia sankteco, sub la fenestro de reĝino Nikotris, suriris la arbon kaj parolis kun si mem.

Pentuer certigis lin, ke antaŭ du semajnoj li vidis la faraonon, kiu ĝuas bonan sanon. Sed li tuj rimarkis, ke la inĝeniero ne kredas al li.

”Tia estas afero de Herhor!... — pensis li. — Cetere nur la pastroj povus havi tiel rapide novaĵojn de Teboj ...”

Por unu momento li tute perdis la deziron elekti la delegitojn, sed baldaŭ li reakiris la energion, ĉiam ripetante al si, ke kion la popolo ricevos hodiaŭ, ĝi ne povas perdi morgaŭ ... Se nur ne okazos io eksterordinara!...

Apud Memfiso, norde de la piramidoj kaj Sfinkso, jam sur la limo de la sabloj, estis malgranda templo de la diino Nut. Tie loĝis maljuna pastro Menes, inĝeniero, la plej granda astronomo de Egipto.

Kiam en la ŝtato oni faris grandan konstruaĵon aŭ novan kanalon, Menes iris al la loko kaj desegnis la planon. Ekster tiaj okazoj li vivis malriĉa kaj sola en sia templo, nokte observante la stelojn, tage laborante ĉe strangaj aparatoj.

De kelke da jaroj Pentuer ne estis en tiu loko, kaj nun mal-

agrable impresis lin ĝia mizero kaj izoleco. La brika barilo disfaladis, en la ĝardeno sekiĝis la arboj, en la korto vagis malgrasa kaprino kaj kelke da kokinoj.

Apud la templo estis neniu. Nur kiam Pentuer komencis voki, el la pilono eliris maljuna homo. Li havis nudajn piedojn, sur la kapo malpuran kufon, kiel la kamparanoj, ĉirkaŭ la koksoj ĉifonan zonan, kaj sur la dorso panteran felon, kiu perdis la harojn. Malgraŭ tio lia eksteraĵo estis plena de mem-respekto kaj lia vizaĝo de inteligenteco. Li fikse rigardis la gaston kaj diris:

—Aŭ mi eraras, aŭ vi estas Pentuer?

—Vere mi estas Pentuer — diris la veninto kaj kore ĉirkaŭprenis la maljunulon.

—Ho! Ho!... — ekkriis Menes (tio estis li). — Mi vidas, ke vi ŝanĝiĝis sur la reĝaj plankoj. Vi havas glatan haŭton, pli blankajn manojn kaj oran ĉenon sur la kolo. Tiajn ornamojn longe devus atendi la diino de la ĉiela oceano, la patrino Nut!...

Pentuer volis demeti la ĉenon; sed Menes haltigis lin kun rideto.

—Lasu — diris li. — Se vi scius, kiajn juvelojn ni havas sur la ĉielo, vi ne rapidus oferi oron ... Do vi venas loĝiĝi ĉe ni?...

Pentuer skuis la kapon.

—Ne — respondis li. — Mi venas nur por saluti vin, dia majstro.

—Kaj poste ree al la kortego?...— ridis la maljunulo. — Ho vi, vi!... se vi scius, kion vi perdas forlasante la saĝon por la palacoj, vi estus la plej malfeliĉaj homoj ...

—Ĉu vi estas sola, majstro?

—Kvazaŭ palmo en la dezerto, precipe hodiaŭ, kiam mia

surdmutulo iris kun korbo Memfison almozpeti ion por la patrino de Ra kaj por ŝia pastro.

—Tio ne tedas vin?...

—Min?... — ekkriis Menes. — Dum la tempo, kiam mi vin ne vidis, mi forŝiris de la dioj kelke da misteroj, kiujn mi ne ŝanĝus je la du kronoj de Egipto.

—Ĉu tio estas sekreto?... — demandis Pentuer.

—Kia sekreto!... Antaŭ unu jaro mi finis la mezuradon kaj kalkulojn pri la grando de la tero ...

—Kion tio signifas?

—Vi ja scias, ke la tero ne estas ebena, kiel tablo, sed ke ĝi estas grandega globo, sur kies supraĵo troviĝas la maroj, landoj kaj urboj ...

—Tio estas konata — diris Pentuer.

—Ne de ĉiuj — respondis Menes. — Sed jen kio tute ne estis konata: kiel granda estas la globo?

—Kaj vi scias? — demandis Pentuer preskaŭ timigita.

—Mi scias. Nia infanterio marŝas dum unu tago ĉirkaŭ dek tri egiptajn mejlojn¹. La tera globo estas tiel grandega, ke niaj soldatoj farus la plenan ĉirkaŭiron dum kvin jaroj ...

—Dioj!... — ekkriis Pentuer. — Ĉu vi ne timas, patro, pensi pri tiaj aferoj ...

Menes levis la ŝultrojn.

—Mezuri la grandon de piramido aŭ de la tero estas tute la sama afero. Mi faris pli malfaciliajn aferojn, ĉar mi sukcesis mezuri la interspacon inter mia templo kaj la palaco de la faraono, ne transirante Nilon ...

—Terure!... — murmuretis Pentuer.

—Kia teruro?... Sed mi malkovris aferon, kiun vere vi ĉiuj

1 Tri geografiaj mejloj.

timos ... Sed pri tio parolu al neni. En la monato Paofi ni havos mallumiĝon de la suno ... tage fariĝos nokto ... Kaj mi mortu de malsato, se en miaj kalkuloj mi eraris nur je la du-dekono de unu horo.

Pentuer tuŝis la amuleton, kiun li havis sur la brusto kaj diris preĝon. Poste li demandis:

—Mi legis en la sanktaj libroj, ke jam multfoje, por turmenti la homojn, tagmeze fariĝis nokto. Sed kio tio estas? Mi ne komprenas.

—Ĉu vi vidas la piramidojn? — demandis subite Menes, montrante al la dezerto.

—Mi vidas.

—Kaj nun metu vian manon antaŭ la okuloj ... Ĉu vi vidas la piramidojn? Vi ne vidas. La mallumiĝo de la suno estas sama afero: inter la suno kaj ni sin metas la luno, kovras la patron de la lumo kaj faras nokton ...

—Kaj tio ĉi okazos ĉe ni? — demandis Pentuer.

—En la monato Paofi. Mi jam skribis pri tio al la faraono, pensante, ke rekompence li sendos oferon al nia malzorgata templo. Sed li, leginte la leteron, priridis min kaj ordonis al mia sendito doni la leteron al Herhor ...

—Kaj Herhor?

—Li donis al ni tridek mezurojn da hordeo. Li estas la sola homo en Egipto, kiu respektas saĝon; la juna faraono estas senpripensa.

—Ne estu severa por li, patro — intermetis Pentuer. — Ramzes XIII volas plibonigi la sorton de la kamparanoj kaj metiistoj; li donos al ili ripozon ĉiun sepan tagon, malpermesos bati ilin sen juĝo, eble donacos al ili teron ...

—Kaj mi diras al vi, ke li estas senpripensa — respondis la

incitita Menes. — Antaŭ du monatoj mi sendis al li grandan planon por plifaciligi la laboron de la kamparanoj, kaj ... li ankaŭ mokis min!... Li estas ignoranto kaj malhumilulo.

—Patro, vi antaŭjuĝas ... Sed diru al mi vian planon, kaj eble mi helpos plenumi ĝin.

—Plano!... — ripetis la maljunulo. — Tio ne estas plu plano, sed realaĵo ...

Li leviĝis de la benko kaj ili ambaŭ iris al la lago en la ĝardeno, apud kiu staris laŭbo, perfekte kovrita de grim pantaj kreskaĵoj. En la laŭbo troviĝis granda rado, metita sur horizontala akso, kun multo da malgrandaj siteloj sur la ĉirkaŭo. Menes eniris en la internon de la rado kaj komencis movi ĝin per la piedoj; la rado turniĝis, la siteloj ĉerpis akvon el la lago kaj verŝis ĝin en trogon, metitan pli alte.

—Interesa aparato! — diris Pentuer.

—Kaj ĉu vi divenos, kion ĝi povas fari por la egipta popolo?

—Ne.

—Imagu do, ke la rado estas kvin aŭ dek fojojn pli granda, kaj ke en ĝia interno, anstataŭ homo, paŝas kelke da paroj da bovoj ...

—Io ... io ŝajnas al mi — intermetis Pentuer — sed mi ne komprenas ankoraŭ bone.

—Tio estas tiel simpla! — respondis Menes. — Per la helpo de ĉi tiu rado, bovoj aŭ ĉevaloj povus ĉerpi akvon el Nilo kaj verŝi ĝin en pli kaj pli suprajn kanalojn ... kaj tiamaniere la du milionoj da homoj, kiuj hodiaŭ laboras ĉe la siteloj, povus ripozi ... Nun vi vidas, ke la saĝo donas pli da feliĉo al la homoj ol la faraonoj.

Pentuer skuis la kapon.

—Kiom da ligno oni bezonus por tio! — diris li — kiom da bovoj, la paŝtaĵo!... Ŝajnas al mi, patro, ke via rado ne anstataŭos la sepan tagon de ripozo.

—Mi vidas — respondis Menes, levante la ŝultrojn — ke la rangoj ne alportis al vi utilon. Sed kvankam vi perdis la saga-cecon, kiun mi admiris en vi, mi montros al vi ankoraŭ ion ... Eble iam vi revenos al la scienco, kaj kiam mi mortos, vi volos labori por pliperfektigi kaj diskonigi miajn eltrovojn.

Ili revenis al la pilono, kaj Menes metis iom da ligno sub kupran kaldronon. Li blovis sur la flamojn kaj baldaŭ akvo komencis boli.

El la kaldrono elstaris vertikala tubo, kovrita per peza ŝtono. Kiam la akvo eksiblis en la kaldrono, Menes diris:

—Stariĝu ĉi tie kaj rigardu ...

Li ekmovis turnilon, aligitan al la tubo kaj subite la peza ŝtono estis ĵetita supren, kaj la ĉambro pleniĝis per kolonoj de varmega vaporo ...

—Mirindaĵo! — ekkriis Pentuer.

Sed tuj li trankviliĝis kaj demandis:

—Kaj ĉi tiu ŝtono, kiel ĝi plibonigos la sorton de la popolo?

—La ŝtono neniel — respondis la saĝulo, jam malpacienca. — Sed vere, mi diras al vi kaj tion memoru: venos tago, ke ĉevalo kaj bovo anstataŭos la homan laboron, kaj la bolanta akvo anstataŭos la ĉevalon kaj bovon.

—Sed kian profiton la kamparanoj havos de tio?... — insistis Pentuer.

—Ve al mi! — ekkriis Menes, kaptante sin je la kapo. — Mi ne scias, ĉu vi maljuniĝis aŭ malsaĝiĝis, sed la kamparanoj kovris al vi la tutan mondon, vualis vian inteligenton. Se la

saĝuloj atentus nur la kamparanojn, ili devus ĵeti for siajn librojn kaj kalkulojn kaj fariĝi paŝtistoj ...

—Ĉiu afero devas alporti utilon — intermetis nekuraĝe Pentuer...

—Vi kortegaj homoj — diris Menes maldolĉe — ofte uzas du mezurojn! Se Feniciano alportas al vi rubenon aŭ safiron, vi ne demandas: kia estas profito de ili? sed vi aĉetas la ŝtonon kaj ŝlosas ĝin en kesto. Sed kiam saĝulo venas al vi kun eltrovo, kiu povus ŝanĝi la aspekton de la mondo, vi tuj demandas: kia estas profito de ĝi?... Sendube timo ekregas vin, ke la esploranto de la naturo postulos plenmanon da hordeo por la objekto, kiun ne komprenas via animo.

—Vi koleras, patro. ... Ĉu mi volis ĉagreni vin?...

—Mi ne koleras, sed bedaŭras. Ankoraŭ antaŭ dudek jaroj ni estis en la templo kvin, laborantaj por malkovri misterojn de la naturo. Hodiaŭ mi restis sola kaj pro dioj! mi ne povas trovi ne sole posteulon, sed eĉ homon, kiu komprenus min.

—Certe, patro, mi restus ĉi tie ĝis la morto, por ekkoni viajn diajn projektojn — respondis Pentuer. — Sed diru, ĉu mi povas hodiaŭ ŝlosi min en templo, kiam estas pesata sorto de la ŝtato, feliĉo de la simpla popolo kaj kiam mia rolo ...

—Povas influi la sorton de la lando kaj de kelke da milionoj da kamparanoj?... — interrompis moke Menes. —Ho vi, plenaĝaj infanoj en tiaroj kaj ĉenoj de altranguloj! Ĉar permesite estas al vi ĉerpi akvon el Nilo, tuj ŝajnas al vi, ke vi povas haltigi la leviĝon aŭ malleviĝon de la rivero. Vere, ne alie pensas ŝafino, kiu sekvante la aron, imagas, ke ŝi kondukas ĝin.

—Sed pripensu, majstro. La juna faraono havas koron plenan de nobleco, li volas doni al la popolo ripozon ĉiun sepan tagon, justan juĝadon, eĉ teron ...

Menes skuis la kapon.

—Ĉio ĉi — diris li — estas vantaj aferoj. La junaj faraonoj maljuniĝas, kaj la popolo ... la popolo havis jam multfoje ripozon ĉiun sepan tagon, kaj poste perdis ĝin ... Ah, se nur tio ŝanĝiĝus! Kiom da dinastioj kaj pastroj pasis en Egipto de tri mil jaroj, kiom da urboj kaj temploj disfalis en ruinojn, eĉ novaj tavoloj de tero formiĝis.

Ĉio ŝanĝiĝis, ekster tio, ke du kaj du estas kvar, ke triangulo estas duono de kvarangulo, ke la luno povas kovri la sunon, kaj ke la bolanta akvo povas ĵeti supren ŝtonon ... En ĉi tiu pereema mondo daŭras kaj restas nur la saĝo. Ve al tiu, kiu por aferoj pasantaj, kiel la nuboj, forlasas la eternajn! Lia koro neniam ĝuos trankvilon, lia animo balanciĝos, kiel ŝipe-to dum ventego.

—La dioj parolas per via buŝo, majstro — respondis Pentuer post pripenso — sed apenaŭ unu homo el milionoj povas fariĝi ilia instrumento ... Kaj tio estas bona. Ĉar kio okazus, se la kamparanoj tutajn noktojn rigardus la stelojn, la soldatoj farus kalkulojn, la altranguloj kaj faraono, anstataŭ regi, ĵetus ŝtonojn per la helpo de bolanta akvo? Antaŭ ol la luno unu fojon ĉirkaŭirus la teron, ĉiuj devus morti de malsato ... Fine, neniu rado, neniu kaldrono defendus la landon kontraŭ atako de la barbaroj, nek disdonus juston al la plendantoj. Do — konkludis Pentuer — kvankam la saĝo estas kvazaŭ la suno, sango kaj spiro, ni ne povas ĉiuj esti saĝuloj.

Al tiuj vortoj Menes respondis plu nenion.

Kelke da tagoj pasigis Pentuer en la templo de la dia Nut, rigardante kun plezuro jen la sablan maron, jen la fruktodonan valon de Nilo. Kun Menes li observis la stelojn, rigardis la radon por la ĉerpado de akvo, iafoje promenis al la pirami-

doj. Li admiris la simplecon kaj genion de sia majstro, sed en la animo li pensis:

”Menes estas sendube dio, enkorpigita en homa figuro, kaj tial li ne zorgas pri la surtera vivo. Lia rado por ĉerpi la akvon ne estos akceptita en Egipto, ĉar unue ligno mankas al ni, due por movi tiajn radojn oni bezonus centon da miloj da bovoj, kaj kie trovi por ili paŝtaĵon, eĉ en Supra Egipto?...”

ĈAPITRO DEKDUA

En la tempo kiam Pentuer veturis tra la lando, elektante la reprezentantojn, Ramzes XIII loĝis en Teboj kaj edzigis sian favoraton Tutmozison.

Antaŭ ĉio la sinjoro de la du mondoj, ĉirkaŭita de belega sekvantaro, alveturis en orita kaleŝo en la palacon de lia eks-celenco Antef, la nomarĥo de Teboj. La granda sinjoro elkuris renkonte al la monarĥo ĝis la pordego kaj, demetinte de la piedoj multekostajn sandalojn, surgenue helpis Ramzeson malsupreniri.

Rekompence por ĉi tiu honoro, la faraono donis al li sian manon por kisi kaj diris, ke de ĉi tiu momento Antef fariĝas lia amiko kaj havas la rajton eĉ en la tronan ĉambregon eniri, ne demetante la ŝuojn.

Kaj kiam ili atingis la grandegan salonon de la palaco de Antef, la sinjoro diris en la ĉeesto de la tuta sekvantaro:

—Mi scias, nobla Antef, ke kiel viaj respektindaj antaŭuloj loĝas en plej belaj tomboj, same vi, ilia filo, estas la plej eminenta el la nomarĥoj de Egipto. Kaj vi sendube scias, ke en mia kortego kaj armeo, same kiel en mia reĝa koro, la unuan lokon okupas mia favorato, la ĉefo de la gvardio, Tutmozis.

Laŭ opinio de la saĝuloj, malbone faras la riĉulo, kiu sian plej multvaloran ŝtonon ne metas en plej belan ringon. Kaj ĉar via gento, Antef, estas por mi la plej kara, kaj Tutmozis la

plej amata, mi do projektis kunigi vin unu kun la alia. Tio facile povas esti farita, se via filino, la bela kaj saĝa Hebron, akceptos Tutmozison kiel edzon.

Al tio la nobla Antef respondis:

—Via sankteco, sinjoro de la vivanta kaj de la okcidenta mondo! Kiel la tuta Egipto kaj ĉio, kio estas en ĝi, apartenas al vi, same ĉi tiu domo kaj ĉiuj loĝantoj estas via propraĵo. Kaj se vi deziras en via koro, ke mia filino fariĝu edzino de via favorato Tutmozis, estu do tiel ...

Nun la faraono rakontis al Antef, ke Tutmozis havas dudek talentojn de jara salajro el la trezorejo kaj grandajn proprajn bienojn en diversaj nomesoj. Siaflanke la nobla Antef diris, ke lia sola filino Hebron havos kvindek talentojn jare kaj la rajton profiti de la bienoj de la patro en la nomesoj, en kiuj por pli longa tempo haltos la reĝa kortego.

Ĉar Antef ne posedis filon, lia tuta grandega kaj senŝulda riĉaĵo devis iam transiri en la manojn de Tutmozis, kun la ofico de la nomarĥo de Teboj, se estos la volo de lia sankteco.

Kiam la interkonsento estis farita, Tutmozis venis de la korto, dankis Antefon unue pro tio, ke li donas sian filinon al tia mizerulo, kaj due pro tio, ke li tiel bone ŝin edukis. Samtempe oni decidis, ke la edziĝa ceremonio havos lokon post kelke da tagoj, ĉar Tutmozis, kiel la ĉefo de la gvardio, ne havas tempon por tro longaj preparaj solenoj.

—Mi deziras al vi feliĉon, mia filo — finis Antef kun rideto — kaj grandan paciencon. Ĉar mia plej amata filino Hebron havas jam dudek jarojn, estas la unua elegantulino en Teboj kaj kutimis havi sian propran volon!

Pro la dioj!... mi diras al vi, ke mia povo super Teboj ĉiam

finiĝis ĉe la pordeto de la ĝardeno de mia filino. Kaj mi timas, ke via generala rango faros sur ŝin ne pli grandan impreson.

Poste la nobla Antef invitis la gastojn al luksa festeno, dum kiu aperis la bela Hebron kun granda sekvantaro de siaj kunulinoj.

En la manĝoĉambro staris multe da tabloj por du kaj kvar personoj kaj unu pli granda por la faraono, sur estrado. Por honori Antefon kaj sian favoraton, lia sankteco proksimiĝis al Hebron kaj invitis ŝin al sia tablo.

Hebron estis vere bela, kaj faris impreson de persono plena de sperto, kio ne estis maloftaĵo en Egipto. Ramzes baldaŭ rimarkis, ke la fianĉino tute ne atentis sian estontan edzon, kaj sendas esprimplenajn rigardojn al li, la faraono.

Ankaŭ tio ne estis maloftaĵo en Egipto.

Kiam la gastoj sidiĝis ĉe la tabloj, kiam eksonis la muziko kaj dancistinoj komencis disporti al la festenantoj vinon kaj florojn, Ramzes diris:

—Ju pli longe mi rigardas vin, Hebron, des pli forte mi miras. Se ĉi tien enirus fremdulo, li pensus, ke vi estas diino aŭ ĉefpastrino, sed neniam, ke vi estas feliĉa fianĉino.

—Vi eraras, sinjoro — respondis ŝi. — En ĉi tiu momento mi estas feliĉa, sed ne de mia fianĉiĝo ...

—Kiel tio estas ebla? — interrompis la faraono.

—La edziĝo ne logas min kaj certe mi preferus fariĝi la ĉefpastrino de Izido, ol edzino ...

—Kial do vi edziniĝas?

—Mi faras tion por la patro, kiu volas nepre havi heredonton de sia gloro. Kaj precipe, ĉar vi tion deziras, sinjoro ...

—Ĉu Tutmozis povus ne plaĉi al vi?

—Tion mi ne diras. Tutmozis estas bela, estas unua elegan-

tulo en Egipto, bele kantas kaj ricevas premiojn en la ludoj. Lia rango de ĉefo de la gvardio de via sankteco estas unu el la plej altaj en la lando. Malgraŭ tio, se la patro ne petus min kaj vi ne ordonus, mi ne fariĝus lia edzino ... Cetere eĉ tiel mi ne estos!... Al Tutmozis sufiĉas mia riĉaĵo kaj la titoloj, kiujn li heredos de mia patro, kaj la reston li trovos ĉe la dancistinoj.

—Kaj li scias pri sia malfeliĉo?

Hebron ekridetis.

—Li scias de longe, ke eĉ se mi ne estus filino de Antef, sed de lasta el la paraŝitoj, mi ne donus min al homo, kiun mi ne amas. Kaj mi povus ami nur superan ol mi.

—Ĉu vi diras tion serioze? — ekmiris Ramzes.

—Mi ja havas dudek jarojn, do jam de ses jaroj ĉirkaŭas min adorantoj. Sed baldaŭ mi ekkonis ilian valoron ... Kaj hodiaŭ mi preferus aŭskulti interparoladojn de saĝaj pastroj, ol kantojn kaj amindumojn de elegantaj junuloj.

—En tia okazo, mi ne devus sidi apud vi, Hebron, ĉar mi ne estas eĉ elegantulo kaj tute ne posedas la saĝon de la pastroj ...

—Ho vi, sinjoro, estas iu pli granda — respondis ŝi, forte ruĝiĝante. — Vi estas militestro, kiu venkis ... Vi estas vivega kiel leono, rapida kiel vulturo ... Antaŭ vi milionoj falas sur la vizaĝon, la ŝtatoj tremas ... Ĉu mi ne scias, kian teruron naskas via nomo en Tiro kaj Ninivo? La dioj povus envii vian potencon ...

Ramzes konfuziĝis.

—Hebron, Hebron ... Se vi scius, kian maltrankvilon vi semas en mia koro!...

—Jen kial — diris ŝi — mi konsentas edziniĝi kun Tutmo-

zis ... Mi estos pli proksima al via sankteco kaj, almenaŭ ĉiun kelkon da tagoj, mi vidos vin, sinjoro ...

Dirinte tion, ŝi leviĝis de la tablo kaj foriris.

Antef rimarkis ŝian agon kaj timigite alkuris al Ramzes.

—Ho sinjoro! — ekkriis li — ĉu mia filino diris ion nekonvenan?... Ŝi estas nedresebla leonino ...

—Trankviliĝu — respondis la faraono. — Via filino estas plena de saĝo kaj seriozeco. Ŝi eliris, ĉar ŝi rimarkis, ke la vino de via ekscelenco tro gajigas la festenantojn.

Efektive, en la salono regis granda bruo, tiom pli, ke Tutmozis, forlasinte la rolon de vic-mastro, fariĝis la plej viva festenanto.

—Konfidence mi diros al via sankteco — murmuretis Antef — ke la kompatinda Tutmozis devos sin gardi en ĉeesto de Hebron ...

La unua festeno daŭris ĝis la mateno. La faraono baldaŭ forveturis, sed la ceteraj restis, en la komenco sur la seĝoj, poste sur la planko ... Fine Antef devis dissendi ilin hejmen en veturiloj, kvazaŭ senvivajn objektojn.

Post kelke da tagoj oni solenis la edziĝon.

En la palaco de Antef kunvenis la ĉefpastroj Herhor kaj Mefres, nomarĥoj de la najbaraj nomesoj kaj la plej altaj oficiistoj de Teboj. Poste alveturis en durada ĉaro Tutmozis, ĉirkaŭita de oficiroj de la gvardio, kaj en la fino, lia sankteco Ramzes XIII.

Akompanis lin: la granda skribisto, ĉefo de la arkpafistoj, ĉefo de la rajdistaro, granda trezoristo, ĉefpastro Sem kaj la generaloj adjutantoj.

Kiam ĉiuj ĉi eminentuloj kunvenis en la salono de la antaŭuloj de Antef, aperis Hebron en blankaj vestoj kun multe-

nombra sekvantaro de amikinoj kaj servistinoj. Ŝia patro, bruliginte incenson antaŭ Amon, antaŭ la statuo de sia patro kaj antaŭ Ramzes sidanta sur estrado, anoncis, ke li liberigas sian filinon de la patra zorgado kaj donacas al ŝi doton. Samtempe li donis al ŝi en ora skatolo akton, konforman al sia diro, skribitan sur papiruso en la juĝejo.

Post mallonga antaŭmanĝo la fianĉino sidiĝis en multekosta portilo, portata de ok oficistoj de la nomeso. Antaŭ ŝi iris la muzikistoj kaj kantistoj, ĉirkaŭ la portilo la altranguloj, kaj post ili granda papolamaso preskaŭ same granda, kiel dum la enterigo de la faraono.

La popolo restis ekster la muro de la templo, la ĝefianĉoj, faraono kaj altranguloj eniris en la kolonan ĉambregon. Herhor bruligis incenson antaŭ la vualita statuo de Amon, la pastriroj dancis la sanktan dancon, kaj Tutmozis legis de papiruso sekvantan akton:

”Mi, Tutmozis, ĉefo de la gvardio de lia sankteco Ramzes XIII, prenas vin, Hebron, la filinon de la teba nomarĥo Antef, kiel edzinon. Mi donas al vi tuj dek talentojn pro tio, ke vi konsentis fariĝi mia edzino. Por viaj vestoj mi destinas al vi tri talentojn jare, kaj por la hejmaj elspezoj unu talenton monate. El la infanoj, kiujn ni havos, la plej aĝa filo heredos la riĉaĵon, kiun mi nun posedas kaj kiun mi povas akiri en la estonteco. Se mi ne vivus plu kun vi, eksedziĝus kaj prenis alian edzinon, mi estus devigita pagi al vi kvardek talentojn, kiujn mi garantias per miaj bienoj. Nia filo, kiam li prenos la havon, devas pagi al vi dekkvin talentojn jare. Infanoj, naskitaj de alia virino, ne havos rajton je la propraĵo de nia plej aĝa filo.”¹

1 Aŭtentika.

Nun antaŭeniris la granda juĝisto kaj en la nomo de Hebron legis akton, en kiu la juna sinjorino promesis: bone nutri kaj vesti sian eldzon, zorgi pri lia domo, familio, servistoj, brutoj kaj sklavoj, kaj konfidis al la edzo administradon de la havo, kiun ŝi ricevis kaj ricevos de la patro.

Kiam la aktoj estis legitaj, Herhor donis al Tutmozis pokaĵon da vino.

La edzo trinkis duonon, Hebron trempis la lipojn, poste ambaŭ ili bruligis incenson antaŭ la purpura kurteno.

Forlasinte la templon de la teba Amon, la geedzoj kaj ilia brila sekvantaro iris tra la aleo de la sfinksoj al la reĝa palaco. Grandaj amasoj da popolo kaj soldatoj aklamis ilin, ĵetante florojn sur la vojon.

Ĝis la lasta tago Tutmozis loĝis en ĉambroj de la faraono. Sed en la tago de la edziĝo la sinjoro donacis al li belan palacon en la fundo de la ĝardeno, ĉirkaŭitan de arbaro de figarboj, mirtoj kaj baobaboj, kie la junaj geedzoj povis pasigi tagojn de la feliĉo, kaŝitaj de la homaj okuloj, kvazaŭ apartigitaj de la mondo. En ĉi tiu trankvila kaŝejo tiel malofte sin montris homoj, ke eĉ la birdoj ne forkuradis de ili.

Kiam la geedzoj kaj gastoj troviĝis en la nova loĝejo, oni solenis la definitivan ceremonion de la edziĝo.

Tutmozis prenis Hebronon je la mano kaj kondukis ŝin al la fajro, brulanta antaŭ la statuo de Izido. Mefres verŝis sur la kapon de la knabino kuleron de sankta akvo, Hebron tuŝis la fajron per la mano, Tutmozis dividis kun ŝi pecon da pano kaj metis sur ŝian fingron sian ringon, kiel signon, ke de ĉi tiu momento ŝi fariĝas sinjorino de la bienoj, servistoj, brutoj kaj sklavoj de la juna edzo.

Dume la pastroj kantis himnon de la edziĝo kaj portis la

statuon de la dia Izido tra la tuta domo. La pastrinoj dancis la sanktajn dancojn.

La tago estis finita per spektakloj kaj granda festeno, dum kiu ĉiuj rimarkis, ke Hebron senĉese akompanis la faraonon, kaj Tutmozis restis malproksime de ŝi kaj nur regalis la gastojn.

Kiam aperis la steloj, la sankta Herhor forlasis la festenon, kaj baldaŭ post li foriris nerimarkite kelkaj plej grandaj altranguloj. Kaj ĉirkaŭ la noktomezo en la subteraĵoj de la templo de Amon kunvenis la sekvantaj respektindaj personoj: la ĉefpastroj Herhor, Mefres kaj Mentezufis, la plej alta juĝisto de Teboj kaj nomarĥoj de Abs, Horti kaj Emsuĥ.

Mentezufis ĉirkaŭrigardis la dikajn kolonojn, fermis la pordon, estingis la lumojn, kaj restis en la malalta ĉambro nur unu lampo, brulanta antaŭ la statuo de Horus. La altranguloj sidiĝis sur tri ŝtonaj benkoj, kaj la nomarĥo Abs diris:

—Se oni ordonus al mi difini la karakteron de lia sankteco Ramzes XIII, vere, mi ne scius tion fari ...

—Frenezulo! — intermetis Mefres.

—Ĉu li estas frenezulo, mi ne scias — diris Herhor.

—En ĉiu okazo li estas tre danĝera homo. Asirio jam dufoje rememorigis al ni pri la definitiva traktato, kaj hodiaŭ, kiel mi aŭdis, komencas maltrankviliĝi pro la armado de Egipto.

—Ne grave, ne grave — diris Mefres — pli danĝere estas, ke ĉi tiu malpiulo volas tuŝi la trezorojn de Labirinto.

—Mi pensas — diris la nomarĥo de Emsuĥ — ke pli malbonaj ankoraŭ estas la promesoj, faritaj al la kamparanoj. La enspezoj de la ŝtato kaj la niaj ekŝanceliĝos, se la popolaĉo komencos festi ĉiun sepan tagon ... Kaj se la faraono donus al ili teron ...

—Li estas kapabla fari tion — murmuretis le ĉefa juĝisto.

—Ĉu vere?... — demandis la nomarĥo de Horti. — Ŝajnas al mi, ke li volas sole monon. Se oni cedus al li iom el la trezoroj de Labirinto ...

—Ne eble estas — interrompis Herhor. — Al la ŝtato minacas neniun danĝero, sed nur al la faraono, kaj tio ne estas la sama afero. Due, same kiel akvobaro estas forta, ĝis kiam ne trapenetrus ĝin flueto de akvo, same Labirinto estas plena, ĝis kiam ni ne prenos el ĝi la unuan oran pecon. Ĉio sekvus ĝin ... Cetere, kiun ni helpas per la trezoroj de la dioj kaj ŝtato?... Junulon, kiu malrespektas religion, humiligas la pastrojn kaj ribeligas la popolon. Ĉu li ne estas pli danĝera ol Assar?... Tiu estas barbaro, tio estas vera, sed tute ne malutilas nin.

—Ne estas deca afero, ke la faraono tiel malkaŝe amindumas la edzinon de sia favorato, jam en la tago de la edziĝo ... — diris la meditanta juĝisto.

—Hebron mem allogas lin! — diris la nomarĥo de Horti.

—Ĉiu virino allogas ĉiujn virojn — respondis la nomarĥo de Emsuĥ. — Sed la homo ricevis la prudenton por ne peki.

—Ĉu la faraono ne estas la edzo de ĉiuj virinoj en Egipto? — murmuretis la nomarĥo de Abs. — Cetere, la pekoj koncernas la juĝon de la dioj, kaj nin interesas nur la ŝtato ...

—Danĝera!... danĝera!... — diris la nomarĥo de Emsuĥ, skuante la manojn kaj la kapon. — Estas neniun dubo, ke la popolaĉo jam fariĝis insultema kaj baldaŭ ekribelos. Tiam neniun ĉefpastro aŭ nomarĥo estos sendanĝera, ne nur je sia povo kaj riĉaĵo, sed eĉ je la vivo.

—Kontraŭ la ribelo ni havas rimedon — intermetis Mefres.

—Kian?

—Antaŭ ĉio oni povas malhelpi la ribelon — diris Mefres

— se ni konigos al la pli prudentaj el la popolo, ke tiu, kiu promesas al ili favorojn, estas frenezulo.

—Li estas homo, la plej sana sub la suno! — murmuretis la nomarĥo de Horti. — Oni devas nur kompreni, kion li volas.

—Frenezulo!... frenezulo!... — ripetis Mefres. — Lia pli aĝa sampatra frato jam ŝajnigas simion kaj drinkas kun paraŝitoj, kaj li komencos fari la samon morgaŭ, postmorgaŭ ...

La nomarĥo de Horti petis la parolon:

—Estas malbona kaj neprudenta rimedo proklami frenezulo homon de sana animo. Ĉar kiam la popolo rimarkos la mensogon, ĝi ĉesos kredi al ni en ĉio, kaj tiam nenio haltigos la ribelon.

—Se mi diras, ke Ramzes estas frenezulo, mi devas havi pruvojn — diris Mefres. — Kaj nun aŭskultu!

La altranguloj ekmoviĝis sur la benkoj.

—Diru al mi — daŭrigis Mefres — ĉu homo de sana animo kuraĝus, estante kronprinco, publike batali kontraŭ bovo, en ĉeesto de kelke da miloj da Azianoj? Ĉu prudenta princo, Egiptano, vagus nokte al fenicia templo? Ĉu li forpuŝus sen motivo, inter la sklavinojn sian unuan virinon, kio estis kaŭzo de morto ŝia kaj de ŝia infano ...

La ĉeestantoj ekmurmuris de teruro.

—Ĉion ĉi — daŭrigis la ĉefpastro — ni vidis en Pi-Bast: mi kaj Mentezufis estis atestantoj de la drinkulaj festenoj, dum kiuj la kronprinco, jam duone freneza, blasfemis kontraŭ la dioj kaj ofendis la pastrojn ...

—Tiel estis — jesis Mentezufis.

—Kaj kion vi pensas — diris varmiĝante Mefres — ĉu homo sana je la spirito, estante ĉefa militestro, forlasus la armeon por persekuti kelke da libiaj banditoj?... Mi preterpasas mul-

tajn malpli gravajn aferojn, ekzemple la projekton donaci al la kamparanoj festojn kaj teron, kaj mi demandas vin: ĉu mi povas ne nomi freneza homon, kiu faris tiom da malsaĝaĵoj, sen motivo, por plezuro!...

La ĉeestantoj silentis, la nomarĥo de Horti estis malĝoja. — Oni devas konsideri — intermetis la plej alta juĝisto — por ne esti maljusta al li ...

Nun ekparolis Herhor.

—La sankta Mefres faras al li grandan favoron — diris li per kategoria tono — nomante lin frenezulo. En la kontraŭa okazo ni devus rigardi lin kiel perfidulon ...

La ĉeestantoj faris maltrankvilan movon.

—Jes, la homo nomata Ramzes XIII, estas perfidulo, ĉar ne nur li elektas spionojn kaj ŝtelistojn por trovi la vojon al la trezorejoj de Labirinto, ne nur forpuŝas la traktaton kun Asirio, traktaton nepre necesan por Egipto ...

—Gravaj kulpigoj! — diris la juĝisto.

—Sed krom tio, aŭskultu, li interkonsentas kun la malnoblaj Fenicianoj pri fosado de kanalo inter Ruĝa kaj Meza Maro! Ĉi tiu kanalo estas la plej granda minaco por Egipto, ĉar nia lando, en unu momento, povas esti subakvigita! Ne nur la trezoroj de Labirinto, sed niaj temploj, domoj, kampoj, ses milionoj da malsaĝaj, sed senkulpaj homoj, fine nia vivo, kaj la vivo de niaj infanoj estus en danĝero ...

—Se estas tiel!... — eksopiris la nomarĥo de Horti.

—Mi kaj la nobla Mefres certigas, ke estas tiel, kaj ke ĉi tiu sola homo amasigis en siaj manoj tiajn danĝerojn, kiaj neni- am ankoraŭ minacis Egipton ... Jen kial ni kunvokis vin, respektindaj viroj, por trovi rimedojn de la savo ... Sed ni devas

agi rapide, ĉar la intencoj de ĉi tiu homo galopas antaŭen, kiel vento en la dezerto, kaj faru la dioj, ke ili ne superŝutu nin ...

Por unu momento en la krepuska ĉambro ekregis silento.

—Kion konsili? — diris la nomarĥo de Emsuĥ. — Ni vivas en niaj nomeso, malproksime de la kortego kaj krom tio ne sole ne konas la intencojn de ĉi tiu frenezulo, sed ni eĉ ne suspektis, ni preskaŭ ne kredas ... Tial mi pensas, ke plej bone estas lasi la aferon al vi, noblaj Herhor kaj Mefres. Vi trovis la malsanon, vi serĉos sanigilon kaj aplikos ĝin ... Kaj se maltrankviligas vin la grandega respondeco, prenu kiel helpanton la plej altan juĝiston ...

—Jes!... Jes!... li diras la verojn ... — aprobis la ekscititaj altranguloj.

Mentezufis eklumigis torĉon kaj metis sur la tablo antaŭ la statuo de la dio papiruson, sur kiu oni skribis sekvantan akton: Kaŭze de la danĝeroj, minacantaj la ŝtaton, la povo de la sekreta konsilantaro transpasas en la manojn de Herhor, al kiu oni aligas kiel helpantojn Mefreson kaj la plej altan juĝiston.

La akton, subskribitan de la ĉeestantaj altranguloj, oni ŝlisis en skatolo kaj kaŝis sub la altaro.

Krom tio, ĉiu el la sep partoprenantoj ĵure promesis plenumi ĉiujn ordonojn de Herhor kaj altiri en la konspiron dek altrangulojn. Herhor promesis prezenti al ili pruvojn, ke Asirio insistas pri traktato, ke la faraono ne volas ĝin subskribi, ke li interkonsentas kun Fenicianoj pri la konstruo de la kanalo kaj ke li volas perfide penetri en Labirinton.

—Mia vivo kaj honoro estas en viaj manoj — finis Herhor. — Se tio, kion mi diris, estas malvera, vi kondamnos min al la morto, kaj mian korpon al la bruligo.

Nun neniu plu dubis, ke la ĉefpastro diris la veron. Ĉar neniu Egiptano riskus sian korpon je la bruligo — sian animon je la pereco.

Kelke da tagoj post la edziĝo Tutmozis pasigis kun Hebron, en la palaco donacita de la faraono. Sed ĉiuvespere li venis en la kazernon de la gvardio, kie li tre gaje pasigis la noktojn kun la oficiroj kaj dancistinoj.

De tia konduto liaj kolegoj konkludis, ke Tutmozis edziĝis kun Hebron nur pro la doto, kio cetere mirigis neniun.

Post kvin tagoj Tutmozis venis al la faraono kaj anoncis, ke li povas repreni la servadon. Nun do li vizitis sian edzinon nur ĉe la taga lumo, kaj nokte li restis garde apud la ĉambro de la sinjoro.

Foje vespere la faraono diris al li:

—Mia palaco havas tiom da anguloj, ke oni povas spioni kaj aŭskulti, ke ĉiu mia ago estas observata. Eĉ al mia respektinda patrino ree komencas paroli voĉoj, kiuj jam eksilentis en Memfiso, kiam mi dispelis la pastrojn ... Kaj tial — daŭrigis lia sankteco — mi povas akcepti neniun ĉe mi, sed mi devas forlasi la palacon kaj en sendanĝera loko interkonsiliĝi kun miaj servistoj ...

—Ĉu mi devas sekvi vian sanktecon? — demandis Tutmozis, vidante, ke la faraono serĉas mantelon.

—Ne. Vi devas resti ĉi tie kaj gardi mian ĉambron, por ke neniu eniru. Enlasu neniun, eĉ mian patrinon, eĉ la ombron de mia eterne vivanta patro ... Diru, ke mi dormas kaj volas neniun vidi..

—Estos, kiel vi diris — respondis Tutmozis, surmetante al li mantelon kun kapuĉo.

Poste li estingis la lumon en la dormoĉambro, kaj la faraono eniris tra flanka pordo.

En la ĝardeno Ramzes haltis kaj atente ĉirkaŭrigardis. Poste, kredeble sin orientinte, li komencis rapide iri al la palaco, donacita al Tutmozis.

Post kelke da minutoj de irado, en la ombra aleo li renkontis iun, kiu sin starigis antaŭ li kaj demandis: — Kiu iras?

—Nubio — respondis la faraono.

—Libio — respondis la demandanto kaj subite posteniĝis, kvazaŭ timigita.

Tio estis gvardia oficiro. La monarĥo rigardis lin unu momenton kaj ekkriis:

—Ah, tio estas Eunana!... Kion vi faras ĉi tie?

—Mi ĉirkaŭiras la ĝardenojn. Mi faras tion kelke da fojoj ĉiunokte, ĉar iafoje englitas ŝtelistoj.

La faraono pensis momenton kaj diris:

—Vi agas prudente. Sed memoru, ke la unua devo de la gvardiisto estas silenti ... Ŝteliston elpelu, sed se vi renkontus ian altrangan personon, ne haltigu ĝin kaj silentu, ĉiam silentu ... Eĉ se ... tio estus la ĉefpastro Herhor mem!...

—Ho sinjoro — ekkriis Eunana — nur ne ordonu al mi honorinokte Herhoron aŭ Mefreson ... Mi ne scias, ĉu ĉe ilia vido la glavo mem ne elsaltus el mia ingo ...

Ramzes ekridetis.

—Via glavo estas mia — respondis li — kaj nur tiam povas eliĝi el la ingo, kiam mi ordonos.

Li faris al Eunana kaposignon kaj daŭrigis la vojon.

Post kvaronhora erarvagado sur malĝustaj vojetoj, la faraono atingis pordon, kaŝitan en densaĵo. Ŝajnis al li, ke li aŭdis bruon kaj demandis mallaŭte:

—Hebron?...

Renkonte al li elkuris figuro, vestita ankaŭ per nigra mantelo. Ŝi alkuris al Ramzes kaj ekpendis sur lia kolo, murmure-tante:

—Tio estas vi?... vi?... Kiel longe mi atendis!...

La faraono sentis, ke ŝi elglitas el lia ĉirkaŭpreno, li do prenis ŝin sur la brakojn kaj portis en laŭbon. En ĉi tiu momento la mantelo falis de li. Ramzes momenton trenis ĝin post si, sed fine lasis ĝin.

En la sekvinta tago la respektinda sinjorino Nikotris alvokis Tutmozison. La favorato de la faraono ektimis, rigardante ŝin. La reĝino estis terure pala; ŝiaj okuloj eniĝis en la kavojn, ŝajnis preskaŭ senkonsciaj.

—Sidiĝu! Kaj ... Kaj ĵuru, ke vi ripetos al neniuj, tion, kion mi diros al vi ...

—Per la ombro de mia patro ... — diris li.

—Aŭskultu — parolis la reĝino mallaŭte — mi estis por vi preskaŭ patrino ... Se do vi perfidus la sekreton, la dioj punus vin ... Ne ... Ili nur faligus sur vian kapon parton de la malfeliĉegoj, kiuj pendas super nia gento ...

Tutmozis aŭskultis kun mirego.

”Ŝi freneziĝis?...” — pensis li kun teruro.

—Rigardu ĉi tiun fenestron — daŭrigis ŝi — ĉi tiun arbon ... Ĉu vi scias, kiun mi vidis hodiaŭ nokte sur ĉi tiu arbo, antaŭ la fenestro?...

—Ĉu la sampatra frato de lia sankteco venis Tebojn?...

—Tio ne estis tiu — murmuretis ŝi plorante. — Tio estis li mem ... mia Ramzes!...

—Sur la arbo?... Hodiaŭ nokte?...

—Jes! La lumo de la torĉo falis rekte sur lian vizaĝon kaj fi-

guron ... Li havis tunikon kun blankaj kaj bluaj strioj ... frenezan rigardon ... li ridis sovaĝe, kiel tiu, malfeliĉa lia frato, kaj diris: "Rigardu, patrino, mi jam scias flugi, kion sciis nek Seti, nek Ramzes Granda, nek Ĥeops ... Rigardu, kiel al mi kreskas flugiloj!..." Li etendis al mi la manojn, kaj mi senkonscia de doloro, tuŝis tra la fenestro liajn manojn, lian vizaĝon, kovritan de malvarma ŝvito ... Fine li deglitis de la arbo kaj forkuris ...

Tutmozis aŭskultis terurita. Subite li frapis sin je la frunto.

—Tio ne estis Ramzes! — diris li kategorie. — Tio estis homo, kiu tre, tre similas lin, malnobla Greko, Likon, kiu mortigis lian filon, kaj hodiaŭ estas en la manoj de la ĉefpastroj!... Tio ne estis Ramzes!... Tio estas krimo de la malnoblaj Herhor kaj Mefres ...

Sur la vizaĝo de la reĝino ekbrilis espero, sed nur por unu momento.

—Ĉu mi ne rekonus mian filon?...

—Likon, oni diras, estas ekstreme simila al li — diris Tutmozis. — Tio estas afero de la pastroj ... Malnoblaj!... Morto estas tro malmulte por ili ...

—Do la faraono dormis la hodiaŭan nokton en sia ĉambro? — subite demandis la reĝino.

Tutmozis konfuziĝis kaj mallevis la okulojn.

—Li do ne dormis?

—Li dormis ... — diris la favorato per malcerta voĉo.

—Vi mensogas! Sed diru al mi, ĉu li ne havis tunikon kun blankaj kaj bluaj strioj?...

—Mi ne memoras ... — murmuretis Tutmozis.

—Ree vi mensogas ... Kaj ĉi tiu mantelo ... diru, ke ĝi ne

estas la mantelo de mia filo ... Mia sklavo trovis ĝin sur la sama arbo ...

La reĝino salte leviĝis kaj prenis el kesto brunan mantelon kun kapuĉo. En la sama momento Tutmozis rememoris, ke la faraono revenis noktomeze, sen mantelo, kaj eĉ klarigis al li, ke li perdis la mantelon en la ĝardeno ...

Li ŝanceliĝis, pensis, fine respondis kategorie:

—Ne, reĝino. Tio ne estas la faraono. Tio estas Likon kaj la krimo de la pastroj, pri kiu oni devas tuj raporti al lia sankteco ...

—Kaj se tio estis Ramzes ... — ree demandis la reĝino, kvankam en ŝiaj okuloj estis videbla brilo de la espero.

Tutmozis konfuziĝis. Lia suspekto pri Likon estis saĝa kaj povis esti prava; sed ne mankis montroj, ke la reĝino vidis Ramzeson. Li ja revenis en sian loĝejon post la noktomezo, havis tunikon kun blankaj kaj bluaj strioj, perdis la mantelon ... Lia frato jam estis freneza, kaj fine ĉu en tiu okazo povus erari la koro de patrino?...

Kaj subite en la animo de Tutmozis vekiĝis duboj, implikitaj kaj kunvolvitaĵoj, kiel nesto de venenaj serpentoj.

Feliĉe, dum li ŝanceliĝis, kuraĝo revenis en la koron de la reĝino.

—Bone, ke vi rememorigis al mi ĉi tiun Likonon ... Mi memoras!... Kaŭze de li Mefres suspektis Ramzeson pri idmortigo, kaj hodiaŭ eble li uzas lin por malhonoru la sinjoron ... En ĉiu okazo al neniu eĉ unu vorton pri tio, kion mi konfidis al vi ... Se Ramzes ... se li vere estus ŝargita per tia malfeliĉo, eble ĝi estas nur momenta ... oni ne povas humiligi lin, devastigante tiajn novaĵojn, oni eĉ ne povas sciigi al li tion!... Se

ĉio estas krimo de la pastroj, ni devas esti singardaj. Kvankam ... la homoj, kiuj uzas tiajn fortojn, ne povas esti fortaj ...

—Mi esploros tion — interrompis Tutmozis — sed kiam mi konvinkigos ...

—Nur ne parolu pri tio al Ramzes, mi petegas vin per la ombroj de viaj patroj!... — ekkriis la reĝino, kunmetante la manojn. —La faraono ne pardonus al ili, transdonus ilin al tribunalo, kaj tiam devus okazi unu el du malfeliĉoj: aŭ oni kondamnas al la morto la plej altajn pastrojn de la ŝtato, aŭ la tribunalo senkulpigus ilin ... Kaj tiam?... Kontraŭe, Likonon persekutu kaj mortigu sen kompatato, kiel rabobeston, kiel serpenton ...

Tutmozis adiaŭis la reĝinon, multe pli trankvilan; kontraŭe, liaj duboj kreskis.

”Se la malnobla Greko vivas ankoraŭ, malgraŭ la malliberejo de la pastroj — pensis li — antaŭ ĉio, anstataŭ grimpi sur arboj kaj sin montri al la reĝino, li preferus forkuri ... Mi mem faciligus al li la forkuron kaj superverŝus per rekompencoj, se li konfesus al mi la veron kaj serĉus rifuĝejon kontraŭ ĉi tiuj friponoj ... Sed la tuniko, la mantelo?... Kial erarus la patri-no?”

De tiu tago Tutmozis evitis la faraonon kaj ne kuraĝis rigardi en liajn okulojn ... Kaj ĉar Ramzes ankaŭ estis ĝenata, ŝajnis do, ke la koraj rilatoj malvarmiĝis.

Sed foje vespere la sinjoro ree alvokis la favoraton.

—Mi devas — diris li — interparoli kun Hiram pri gravaj aferoj, mi do eliras. Restu garde ĉi tie, apud mia dormoĉambro, kaj se iu volus paroli kun mi, ne enlasu lin ...

”Eble — pensis li — la pastroj venenis lin per hiskiamo, kaj

li, sentante, ke proksimiĝas eksplodo de la malsano, forkuras el la domo?... Ah, ni vidos.”

Efektive, li ekvidis. La faraono revenis malfrue post la noktomezo; li havis sur si mantelon, sed ... ne sian, soldatan.

Tutmozis ektimis kaj ne dormis ĝis la mateno, atendente, ke baldaŭ alvokos lin la reĝino. La reĝino ne faris tion, sed dum la matena revuo de la gvardio, la oficiro Eunana petis de sia ĉefo minuton de interparolado.

Kiam ili restis solaj en aparta ĉambro, Eunana falis al la piedoj de Tutmozis, petegante, ke li ripetu al neniu liajn vortojn.

—Kio okazis? — demandis Tutmozis, sentante malvarmon en la koro.

—Ĉefo! — diris Eunana — hieraŭ en la ĝardeno mi vidis homon, kiu kuris nuda kaj kriis per nehoma voĉo ... Oni alkondukis lin al mi kaj ĉefo ... mortigu min!...

Eunana ree falis al la piedoj de Tutmozis.

—Ĉi tiu nuda homo ... ĉi tiu ... mi ne povas diri.

—Kiu li estis? — demandis la terurita Tutmozis.

—Mi diros nenion plu!... — ĝemis Eunana. — Mi demetis mian mantelon kaj kovris la sanktan nudecon ... Mi volis rekonduki lin en la palacon, sed ... sed la sinjoro ordonis al mi resti kaj silenti ... silenti!...

—Kaj kien li iris?...

—Mi ne scias ... ne rigardis kaj ne permesis rigardi al la soldatoj ... Li malaperis ie en la ĝardeno ... Mi avertis miajn homojn, ke ... ili nenion vidis ... nenion aŭdis ... kaj se iu aŭdis aŭ vidis, li tuj estos sufokita ...

Dume Tutmozis sukcesis ekregi sin.

—Mi ne scias — diris li malvarme — mi ne scias kaj mi

komprenas nenion de tio, kion vi rakontis al mi. Sed memoru, ke mi mem foje kuris nuda, kiam mi trinkis tro multe da vino, kaj ke mi malavare rekompencis tiujn, kiuj min ne vidis. La kamparanoj, Eunana, kaj la laboristoj ĉiam iras nudaj. La grandaj sinjoroj nur tiam, kiam tio plaĉas al ili. Kaj se mi aŭ iu el la altranguloj ekdezirus stariĝi sur la kapo, saĝa kaj pia oficiro ne devus miri.

—Mi komprenas — respondis Eunana, fikse rigardante la ĉefon. — Kaj ne nur mi ripetos tion al miaj soldatoj, sed eĉ tuj, en la hodiaŭa nokto, mi promenos nuda en la ĝardeno, por ke ili sciu, ke la superuloj havas la rajton fari, kion ili volas ...

Malgraŭ la malgranda nombro da personoj, kiuj vidis la faraonon aŭ lian samulon en stato de frenezo, la novaĵo pri la strangaj okazoj tre rapide disvastiĝis. Post kelke da tagoj ĉiuj loĝantoj de Teboj, la paraŝitoj kaj akvoportantoj, la komercistoj kaj skribistoj, murmuretis, ke sur Ramzeson falis la malfeliĉo, kiu forigis de la trono liajn fratojn.

La timo kaj respekto al la faraono estis tiel granda, ke oni ne kuraĝis paroli pri tio laŭte, precipe inter fremdaj homoj. Tamen, ĉiuj sciis pri tio, ĉiuj ekster Ramzes mem!

Sed plej strange estis, ke la novaĵo tre rapide trakuris la tutan landon, kio pruvis, ke ĝi disvastiĝis per la temploj. Nur la pastroj posedis la sekreton interkomunikiĝi dum dekelko da horoj, de unu ekstremo de Egipto al alia.

Al Tutmozis neniu parolis rekte pri la teruraj novaĵoj. Sed la ĉefo de la faraona gvardio sentis ilian ekzistadon ĉe ĉiu paŝo. Per la konduto de la personoj, kun kiuj li estis en rilatoj, li divenis, ke la servistoj, sklavo, soldatoj, liveristoj de la kortego parolas pri la frenezo de la monarĥo, silentante nur por la momento, en kiu povus ilin aŭdi superulo.

Fine Tutmozis, malpacienigita kaj timigita decidiĝis paroli pri tio kun la teba nomarĥo.

Veninte en lian palacon, li trovis Antefon kuŝanta sur kanapo, en ombro, kies duono estis kvazaŭ ĝardeno, plena de maloftaj kreskaĵoj. En la mezo ŝprucis fontano en la anguloj staris statuoj de dioj, sur la muroj estis pentrita historio de la agoj de la glora nomarĥo. Nigra sklavo, staranta ĉe lia kapo, malvarmigis la sinjoron per ventumilo el strutaj plumoj; sur la planko sidis skribisto de la nomeso kaj legis raporton.

Tutmozis havis tiel malĝojan mienon, ke la nomarĥo tuj forsendis la skribiston kaj sklavon, kaj leviĝinte de la kanapo, trarigardis ĉiujn angulojn de la ĉambro, por kontroli, ĉu iu ne aŭskultas.

—Gloro patro de Hebron, mia respektinda edzino — komencis Tutmozis — per via konduto mi vidas, ke vi divenas, pri kio mi volas paroli?...

—La nomarĥo de Teboj ĉiam devas esti singardema — respondis Antef. — Mi supozas ankaŭ, ke la ĉefo de la gvardio de lia sankteco ne povis honori min per sia vizito por malgrava afero.

Momenton ili rigardis unu la alian. Fine Tutmozis sidiĝis apud la bopatro kaj murmuretis:

—Ĉu vi aŭdis la malnoblajn novaĵojn, kiujn la malamikoj de la ŝtato disportas pri nia estro?...

—Se temas pri mia filino Hebron — rapide respondis la nomarĥo — mi rememorigas al vi, ke hodiaŭ vi estas ŝia sinjoro kaj ne povas postuli, ke mi ...

Tutmozis malzorge svingis la manon.

—Malnoblaj homoj — diris la bofilo — disvastigas la fa-

mon, ke la faraono estas freneza ... Ĉu vi aŭdis pri tio, mia patro?...

Antef balancis kaj turnis la kapon, kio povis same bone signifi jeson aŭ neon. Fine li diris:

—La malsaĝo estas senlima, kiel la oceano, ĝi povas enteni ĉion.

—Tia ne estas malsaĝaĵo, sed krimo de la pastroj, kiuj posedas homon, similan al lia sankteco, kaj uzas lin por malnoblaj agoj.

Li rakontis al la nomarĥo la historion de la Greko Likon kaj lian krimon en Pi-Bast.

—Pri tiu Likon, kiu mortigis la infanon de la kronprinco, mi aŭdis — respondis Antef. — Sed kie vi havas pruvojn, ke Mefres malliberigis Likonon en Pi-Bast, ke li venigis lin Tebojn kaj ke li ellasas lin en la reĝajn ĝardenojn, por ke li tie ludu la rolon de la faraono freneziginta?...

—Ĝuste tial mi demandas vian ekscelencon: kion fari?... Mi ja estas la ĉefo de la gvardio kaj mi devas gardi la honoron kaj la personon de nia sinjoro.

—Kion fari ... kion fari? — ripetis Antef. — Antaŭ ĉio, zorgi, ke la abomenaj novaĵoj ne atingu la orelojn de la faraono ...

—Kial?

—Ĉar okazus granda malfeliĉo. Se nia sinjoro ekaŭdos, ke Likon en lia nomo ludas la rolon de frenezulo, li terure ekkoleros!... Kompreneble li turnos sin kontraŭ Mefres kaj Herhor ... Eble li nur insultos ilin, eble malliberigos, eĉ mortigos ... Kion ajn li faros, li faros sen pruvoj, kaj tiam? La hodiaŭa Egipto ne amas plu fari oferojn al la dioj, sed ĝi ankoraŭ starigis ĉe la flanko de la pastroj, kontraŭ kiuj oni maljuste agis

... kaj tiam?... Ĉar mi pensas — aldonis li, proksimiĝinte la buŝon al la orelo de Tutmozis — ĉar mi pensas, ke tio estus la fino de la dinastio ...

—Kion do fari?...

—Ĉiam la samon! — ekkriis Antef. — Trovu Likonon, pruvu, ke Mefres kaj Herhor kaŝis lin kaj ordonis al li ludi la rolon de la faraono freneziĝinta ... Tion vi povas fari, se vi volas konservi la favoron de lia sankteco. Pruvojn, kiel eble plej multe da pruvoj!... Ĉi tie ne estas Asirio, nenion vi povas fari kontraŭ la ĉefpastroj sen la plej alta tribunalo, kaj neniu tribunalo kondamnos ilin sen palpeblaj pruvoj!... Cetere, ĉu vi estas certa, ke oni ne donis al la faraono frenezigan venenon?... Tio ja estus pli simpla, ol sendi nokte homon, kiu konas nek la signalvortojn, nek la palacon kaj ĝardenojn ... Mi diras al vi: pri Likon mi aŭdis de konfidinda buŝo, de Hiram. Sed mi ne komprenas, kiel Likon povus fari en Teboj tiajn mirindaĵojn.

—Ah, ah!... — interrompis Tutmozis. — Kie estas Hiram?

—Tuj post via edziĝo li forveturis Memfison, kaj antaŭ kelke da tagoj li jam estis en Hiten.

Tutmozis ree konfuziĝis.

”En la nokto — pensis li — kiam al Eunana oni alkondukis tiun nudan homon, la faraono diris, ke li iras al Hiram. Kaj ĉar Hiram ne estis en Teboj, do?... Do lia sankteco jam en tiu horo ne sciis mem, kion li parolas!”

Tutmozis revenis hejmen tute konfuzita. Li ne nur ne sciis, kion fari en ĉi tiu eksterordinara situacio, sed eĉ, kion pensi pri ĝi? Dum la interparolado kun la reĝino Nikotris li estis certa, ke en la ĝardenoj sin montris Likon, sed hodiaŭ liaj duboj kreskis.

Kaj se dubis Tutmozis, la favorato, kiu konstante vidis Ramzeson, kio fariĝis en la koroj de fremdaj homoj?... La plej fervoraj partianoj de la faraono kaj de liaj intencoj devis ŝanceliĝi, aŭdante de ĉiuj flankoj, ke la monarĥo estas freneza.

Tio estas la unua bato, falinta sur Ramzeson, de la pastroj. Ne grava per si mem, ĝi havis nemezureblajn sekvojn.

Tutmozis ne sole dubis, sed ankaŭ suferis. Malgraŭ la malserioza ŝajno, li havis noblan kaj energian karakteron. Hodiaŭ, de kiam oni atencis la honoron kaj povon de lia sinjoro, la senaktiveco turmentis lin. Ŝajnis al li, ke li estas komandanto de citadelo, kiun subfosas la malamiko, kaj li rigardas tion senpova!...

Ĉi tiu penso tiel turmentis Tutmozison, ke sub ĝia influo venis al li kuraĝa ideo. Renkontinte foje la ĉefpastron Semon, li diris al li:

—Ĉu via ekscelenco aŭdis la famojn, kiuj rondiras pri nia sinjoro?...

—La faraono estas juna, povas do rondiri pri li diversaj fabeloj — respondis Sem, strange rigardante Tutmozison. — Sed tiaj aferoj ne koncernas min; mi anstataŭas lian sanktecon en la servado al la dioj, mi plenumas tion plej bone, kiel mi povas, kaj la aliaj aferoj ne interesas min.

—Mi scias, ke via ekscelenco estas fidela servisto de la faraono — daŭrigis Tutmozis — kaj mi ne havas la intencon min miksi en la pastrajn sekretojn. Sed mi devas turni vian atenton al unu malgranda fakto ... Mi eksciis tute certe, ke la sankta Mefres kaŝas Likonon, Grekon, kiun ŝarĝas du krimoj: li estas la mortiginto de la faraona filo kaj li tro similas lian sanktecon ... La sankta Mefres ne altiru la malhonoron sur la respektindan pastraron kaj plej baldaŭ transdonu la krimu-

lon al la tribunalo. Ĉar se ni trovos Likonon, mi ĵuras, ke Mefres perdos ne sole la oficon, sed la kapon. En nia ŝtato oni ne povas senpune ŝirmi banditojn kaj kaŝi homojn, similajn al la plej alta estro!...

Sem, en kies ĉeesto Mefres forprenis Likonon de la polico, konfuziĝis, eble timante, ke oni suspektos lin, kiel kunulon. Tamen li respondis:

—Mi penos averti la sanktan Mefreson pri ĉi tiuj suspektoj, malhonoraj por li. Sed ĉu via ekscelenco scias, kio minacas homon, kulpigantan iun pri krimo?

—Mi scias kaj mi akceptas la respondecon. Sed mi estas tiel certa pri tio, kion mi diras, ke mi tute ne zorgas pri la sekvoj de miaj suspektoj. La maltrankvilon mi lasas al la sankta Mefres kaj mi deziras al li, ke mi ne bezonu transpasi de avertoj al agoj.

La interparolado donis fruktojn: de tiu tago oni eĉ unu fojon ne vidis la samulon de la faraono.

Sed la famoj ne eksilentis, kaj Ramzes XIII sciis nenion pri ili.

Ĉar Tutmozis, timante, ke la sinjoro akre atakos la pastrojn, informis lin pri nenio.

ĈAPITRO DEKTRIA

En la komenco de la monato Paofi, lia sankteco, la reĝino Nikotris kaj la kortego revenis de Teboj en la palacon apud Memfiso.

Ĉe la fino de la vojaĝo, kiu ankaŭ tiun fojon estis farata sur Nilo, Ramzes XIII ofte falis en mediton, kaj foje diris al Tutmozis:

—Mi rimarkas strangan fenomenon ... La popolo amasiĝas sur ambaŭ bordoj same multenombre, eble eĉ pli multenombre, ol tiam, kiam ni veturis en la kontraŭa direkto. Sed la aklamoj estas multe malpli fortaj, malpli da ŝipetoj sekvas nin kaj avare oni ĵetas la florojn ...

—Dia vero fluas el via buŝo, sinjoro — respondis Tutmozis. — Efektive la popolo ŝajnas kvazaŭ laca, sed tio devenas de la teruraj varmegoj ...

—Saĝe vi diris!... — laŭdis lin la faraono, kaj lia vizaĝo serene niĝis.

Sed Tutmozis ne kredis al la propraj vortoj. Li sentis kaj, kio estas pli grava, la tuta reĝa sekvantaro sentis, ke la popolaj amasoj malvarmiĝis en sia amo al la sinjoro.

Ĉu tio estis la rezultato de la famo pri la terura malsano de Ramzes, aŭ de aliaj procedoj? Tutmozis ne sciis. Sed li estis certa, ke la malvarmiĝon de la popolo kaŭzis la pastroj.

—Jen malsaĝa popolaĉo! — pensis li, ne regante la males-timon en sia koro. — Antaŭ nelonge ili dronis, nur por vidi la

vizaĝon de lia sankteco, kaj hodiaŭ ili avaras la kriojn ... Ĉu ili jam forgesis pri la sepa tago de la ripozo kaj pri la promesita tero?...

Reveninte en la palacon, la faraono tuj donis ordonon kunvoki la delegitojn. Samtempe li komisiis al la fidelaj oficistoj kaj polico komenci agiti kontraŭ la pastroj kaj por la sepa tago de la ripozo.

Baldaŭ en Malsupra Egipto ĉio komencis zumi, kvazaŭ en abelujo. La kamparanoj postulis ne nur la festojn, sed ankaŭ ke oni pagu al ili kontante por la publikaj laboroj. La metiistoj en la drinkejoj kaj stratoj insultis la pastrojn, kiuj volas limigi la sanktan povon de la faraono. La kvanto da krimoj pli grandigis, sed la kulpaj ne volis respondi al la tribunalo. La skribistoj fariĝis pli humilaj, kaj neniu el ili kuraĝis bati simplan homon, sciante, ke oni repagos al la batinto. En la temploj neniu faris oferojn, pli kaj pli ofte oni superŝutis la diojn de la limoj per koto kaj ŝtonoj, oni eĉ renversis ilin.

Teruro falis sur la pastrojn, nomarĥojn kaj iliajn partianojn. Vane la juĝistoj proklamis sur la stratoj kaj placoj, ke laŭ la malnovaj leĝoj terkulturisto kaj metiisto, eĉ komercisto ne havas la rajton sin okupi per politiko, kiu forlogas ilin de la fruktodona laboro. La popolaĉo, kun krioj kaj ridoj, superŝutis la heraldojn per putrintaj legomoj kaj kernoj de daktiloj.

Tiam la aristokrataro komencis kolektiĝi en la palaco kaj, kuŝante ĉe la piedoj de la faraono, petegi lian helpon.

—Ni estas — kriis ili — kvazaŭ la tero fendigis sub niaj piedoj kaj kvazaŭ finiĝus la mondo!... La elementoj estas kunmiksitaj, la animoj malakordaj kaj se vi ne savos nin, sinjoro, la horoj de nia vivo estas kalkulitaj!...

—Mia trezorejo estas malplena, la armeo ne multenombra,

la polico de longe ne vidas salajron — respondis la faraono. — Se do vi volas havi daŭran pacon kaj sendanĝeron, vi devas liveri al mi monajn rimedojn. Sed ĉar via maltrankvilo malĝojigas mian reĝan koron, mi faros, kion mi povos, kaj mi esperas, ke mi sukcesos ree enkonduki la ordon.

Efektive, lia sankteco ordonis kunvoki la armeojn kaj lasi ilin en la plej gravaj punktoj de la lando. Samtempe li sendis ordonon al Nitager, por ke li konfidu la orientan limon al sia helpanto kaj marŝu kun kvin plej bonaj regimentoj al Memfiso.

Tiel faris la sinjoro, ne tiom por ŝirmi la aristokrataron kontraŭ la popolaĉo, kiom por havi ĉe la mano grandajn fortojn en la okazo, se la ĉefpastroj ribeligus Supran Egipton kaj la regimentojn, apartenantajn al la templaj.

La dekan de Paofi en la reĝa palaco kaj ĉirkaŭ ĝi ekregis granda movado. Kunvenis la delegitoj, kiuj devis doni al la faraono la rajton ĉerpi el la trezorejo de Labirinto, kaj multe da homoj, kiuj volis almenaŭ rigardi la palacon, kie havis la lokon tiel eksterordinara soleno en Egipto.

La procesio de la delegitoj komenciĝis matene. Antaŭe iris la nudaj kamparanoj, kun blankaj kufoj kaj zonoj; ĉiu havis en la mano tukon por kovri la dorson en la ĉeesto de la faraono. Post ili metiistoj, vestitaj kiel la kamparanoj, de kiuj ili diferencis nur per iom pli maldikaj tukoj kaj mallarĝaj antaŭtukoj, kovritaj per diverskolora brodaĵo. Poste la komercistoj, kelkaj en perukoj, ĉiuj en longaj ĉemizoj kaj manteloj. Tie oni jam povis vidi riĉajn braceletojn sur la piedoj kaj manoj, kaj ringojn sur la fingroj. Poste la oficiroj en kufoj kaj tunikoj kun strioj: nigraj kaj flavaj, bluaj kaj blankaj, bluaj kaj ruĝaj. Du, anstataŭ tunikoj, havis sur la brusto kuprajn duonkirasojn.

Post longa interrompo aperis dektri nobeloj en grandaj perukoj kaj blankaj vestoj ĝis la tero. Post ili paŝis la nomarĥoj en vestoj borderitaj per purpuraj rubandoj kaj kun kronoj sur la kapoj. La marŝon fermis la pastroj kun razitaj kapoj kaj vizaĝoj, kun panteraj feloj sur la dorso.

La delegitoj eniris en la grandan salonon de la palaco de la faraonoj, kie staris sep benkoj unu post alia: la plej malalta por la kamparanoj, la plej alta por la pastroj.

Baldaŭ aperis, en portilo, lia sankteco Ramzes. La delegitoj falis teren. Kiam la sinjoro de la du mondoj sidiĝis sur la trono, li permesis al siaj fidelaj regnanoj leviĝi kaj okupi lokojn sur la benkoj. Eniris kaj sidiĝis sur pli malaltaj tronoj la ĉefpastroj Herhor kaj Mefres kaj la gardisto de Labirinto kun skatolo en la mano. Brila kortego de generaloj ĉirkaŭis la faraonon, post kiu stariĝis du altaj oficistoj kun ventumiloj el pavaj plumoj.

—Fidelaj Egiptanoj! — komencis la sinjoro de la du mondoj. — Vi scias, ke al mia kortego, al mia armeo kaj al miaj oficistoj mankas monaj rimedoj, kiujn ne povas plu liveri mia malriĉiĝinta trezorejo. Pri la elspezoj por mia sankta persono, mi ne parolas, ĉar mi manĝas kaj vestas min kiel soldato, kaj ĉiu generalo aŭ granda skribisto havas pli multe da servistoj kaj virinoj ol mi.

Inter la ĉeestantoj eksonis aproba murmuro.

—Ĝis nun ekzistis kutimo — daŭrigis Ramzes — ke, kiam la trezorejo bezonis monon, oni ŝarĝis la popolaĉon per pli grandaj impostoj. Sed mi, kiu konas mian popolon kaj ĝian mizeron, ne sole ne volus ree ŝarĝi ĝin, sed kontraŭe mi tre dezirus plibonigi ĝian sorton...

—Vivu eterne, nia sinjoro! — oni kriis de kelkaj malaltaj benkoj.

—Feliĉe por Egipto — parolis la Faraono — nia ŝtato posedas trezorojn, per kiuj oni povas relevi la armeon, rekompenci la oficistojn, pliriĉigi la popolon, eĉ pagi ĉiujn ŝuldojn al la temploj kaj Fenicianoj. Ĉi tiuj trezoroj, kolektitaj de niaj gloraj antaŭuloj, kuŝas en la kelo de Labirinto. Sed ili povas esti tuŝitaj nur, se vi ĉiuj fideluloj, unuvoĉe, kvazaŭ unu viro konsentos, ke Egipto estas en bezono, kaj ke mi, la sinjoro, havas la rajton disponi la trezorojn de miaj antaŭuloj...

—Ni konsentas!... Ni petegas, prenu sinjoro, kion vi bezonas!... — oni kriis de ĉiuj benkoj.

—Nobla Herhor! — sin turnis al li la estro: — ĉu la sankta pastro havas ion por diri en ĉi tiu afero?...

—Tre malmulte — respondis la ĉefpastro, leviĝante. — Laŭ la jarcentaj leĝoj, la trezoroj de Labirinto povas esti nur tiam tuŝitaj, kiam la ŝtato posedas neniajn aliajn rimedojn... Sed hodiaŭ ne estas tiel. Se la registaro nuligus la ŝuldojn al Fenicianoj, devenantajn de malnoblaj procentegoj, ne nur pleniĝus la trezorejo de via sankteco, sed la popolaĉo, kiu laboras hodiaŭ por Fenicianoj, ekspirus pli libere...

Sur la benkoj de la delegitoj ree eksonis aproba murmuro.

—Plena de saĝo estas via konsilo, sankta viro — diris trankvile la faraono — sed danĝera. — Se mia trezoristo, la noblaj nomarĥoj kaj nobeloj lernus unu fojon nuligi la ŝuldojn, hodiaŭ ili ne pagus al Fenicianoj, kaj morgaŭ povus forgesi pri la ŝuldoj al la faraono kaj temploj. Kaj kiu certigos min, ke ankaŭ la popolaĉo, kuraĝigita de la ekzemplo de la grandaj, ne pensus, ke ankaŭ ĝi havas la rajton forgesi siajn devojn al ni?...

La bato estis tiel forta, ke la nobla Herhor kurbiĝis sur sia seĝo kaj eksilentis.

—Kaj vi, la plej alta gardisto de Labirinto, kion vi diros? — demandis la faraono.

—Mi havas ĉi tie skatolon — respondis li — kun blankaj kaj nigraj silikoj. Ĉiu delegito ricevos du silikojn kaj unu el ili li ĵetos en la urnon. Kiu volas, ke via sankteco tuŝu la trezorojn de Labirinto, metos nigran silikon; kiu preferas, ke oni ne tuŝu la proprajon de la dioj, metos blankan.

—Ne konsentu, sinjoro — murmuretis la trezoristo al la monarĥo. — Prefere ĉiu delegito klare diru, kion li havas en la animo.

—Ni respektu la malnovajn morojn — intermetis Mefres.

—Bone, ili ĵetu la silikojn en la urnon — decidis la sinjoro.

—Mia koro estas pura, miaj intencoj neskueblaj ...

La sanktaj Mefres kaj Herhor ekrigardis unu la alian.

La gardisto de Labirinto, asistata de du generaloj komencis ĉirkaŭiri la benkojn kaj donis al la delegitoj po du silikoj, unu blankan kaj unu nigran. La kompatindaj simpluloj de la popolo estis tre konfuzitaj, vidante antaŭ si tiel grandajn alt-rangulojn. Kelkaj kamparanoj falis teren, ne kuraĝis preni la silikojn kaj tre malfacile komprenis, ke ili povas ĵeti en la urnon nur unu ŝtonon.

—Mi ja volus esti kompleza al la dioj kaj al lia sankteco ...

—murmuretis maljuna paŝtisto.

Fine la altranguloj sukcesis klarigi kaj la kamparanoj kompreni, kion oni postulas. Ĉiu delegito venis al la urno kaj ĵetis sian silikon tiamaniere, ke la aliaj ne povis vidi ĝian koloron.

Dume la granda trezoristo, genuante post la trono, murmuretis al la monarĥo:

—Ĉio estas perdita ... Se ili voĉdonus malkaŝe, ni havus unuanimecon sed nun, sekiĝu mia mano, ĉu ni ne trovos en la urno dudekon da blankaj silikoj!...

—Trankviliĝu, fidela servisto — respondis Ramzes kun rideto. — Mi havas ĉe mia mano pli da regimentoj, ol estos voĉoj kontraŭ ni.

—Sed por kio tio ĉi ... por kio? — sopiris la trezoristo. — Sen unuanimeco oni ja ne malfermos al ni Labirinton ...

Ramzes ridetis kaj ridetis.

Finiĝis la procesio de la delegitoj. La gardisto de Labirinto levis la urnon kaj elŝutis ĝian enhavon sur oran pladon.

El 91 voĉdonantoj estis 83 nigraj silikoj, kaj nur 8 blankaj.

La generaloj kaj oficistoj ekremis, la ĉefpastroj kun triumfo rigardis la ĉeestantojn, sed baldaŭ ekregis ilin maltrankvilo: Ramzes havis gajan vizaĝon.

Neniu kuraĝis laŭte anonci, ke la projekto de lia sankteco malsukcesis. Sed la faraono ekparolis kun plena senĝeno:

—Fidelaj Egiptanoj, bonaj miaj servistoj! Vi plenumis mian ordonon, kaj mia favoro estas kun vi. Du tagojn vi estos gastoj de mia domo. Ricevinte donacojn, vi revenos al viaj familioj kaj okupoj. Paco kaj beno estu kun vi.

Tion dirinte, la sinjoro kun la sekvantaro forlasis la salonon. La ĉefpastroj Herhor kaj Mefres kun timo rigardis unu la alian.

—Li tute ne ĉagreniĝis — murmuretis Herhor.

—Mi ja diris, ke li estas rabia besto!... — respondis Mefres.

—Li ne timos uzi eĉ superforton, kaj se ni ne rapidos ...

—La dioj defendos nin kaj siajn templojn ...

Vespere en la ĉambro de Ramzes XIII kunvenis liaj plej fidelaj servistoj: la granda trezoristo, la granda skribisto, Tutmozis kaj Kalipos, la ĉefo de la greka regimento.

—Ho sinjoro — ĝemis la trezoristo — kial vi ne agis, kiel viaj eterne vivantaj antaŭuloj?... Se la delegitoj voĉdonus malkaŝe, ni jam posedus la rajton al la trezorejo de Labirinto!

—Veron diras via ekscelenco — intermetis la granda skribisto.

La faraono skuis la kapon.

—Vi eraras. Eĉ se la tuta Egipto krius: Donu al la trezorejo la oron de Labirinto, la ĉefpastroj ne donus ...

—Kial do ni maltrankviligis ilin, kunvokante la delegitojn?... Ĉi tiu reĝa ago forte ribeligis kaj kuraĝigis la popolaĉon, kiu jam hodiaŭ estas kvazaŭ leviĝanta akvo ...

—Mi ne timas la alfluron — diris la sinjoro. — Miaj regimentoj estos por ĝi akvobaro ... Mi havas videblan profiton de la delegitaro, ĉar ĝi montris al mi la senfortecon de la kontraŭuloj: 83 silikoj por ni, 8 por ili!... Tio signifas, ke kiam ili povas kalkuli je unu korpuso, mi — je dek. Ne kredu al iluzioj — daŭrigis la faraono. Inter mi kaj la ĉefpastroj jam komenciĝis la milito. Ili estas citadelo, kies kapitulacion ni postulis. Ili rifuzis, ni do devas komenci la atakon.

—Vivu eterne!... — ekkriis Tutmozis kaj Kalipos.

—Ordonu, sinjoro — diris la granda skribisto.

—Jen mia ordono — diris Ramzes. — Vi trezoristo disdonos cent talentojn al la polico, laboristoj, oficiroj kaj vilaĝaj juĝistoj en la nomoj: Seft, Neha-ĥent, Nehapeĥu, Sebt-Het, Aa, Ament, Ka ... En la samaj lokoj vi donos al la mastroj de drinkejoj kaj gastejoj hordeon, tritikon kaj vinon, kiun vi havas provize, por ke la popolo havu senpage manĝaĵon kaj

trinkaĵon. Vi faros tion, por ke la 20-an de Paofi provizoj estu ĉie, kie ili estas necesaj.

La trezoristo sin klinis al la tero.

—Vi, skribisto, skribu kaj ordonu publikigi en la stratoj de la ĉefurboj, ke la barbaroj de la okcidenta dezerto per grandaj fortoj volas invadi la dian provincon Fayum ...

Vi, Kalipos, sendos kvar grekajn regimentojn al la sudo. Du restos apud Labirinto, du iros ĝis Hanes. Se la pastra milico venus de Teboj, vi forpuŝos ĝin kaj ne allasos al Fayum ... Kaj kiam la popolo, indigninte kontraŭ la pastroj, minacos Labirinton, viaj Grekoj okupu ĝin ...

—Kaj se la gardistoj de la kastelo kontraŭstarus? — intermetis Kalipos.

—Tio estus ribelo — respondis la faraono kaj daŭrigis:

—Vi, Tutmozis, sendos tri regimentojn en Memfison kaj lokos ilin proksime de la temploj de Ptah, Izido kaj Horus. Kiam la incitita popolo volos ilin ataki, la koloneloj malfermos la pordegojn, ne enlasos la popolaĉon en la sanktajn lokojn kaj gardos la personojn de la ĉefpastroj kontraŭ malrespekto. En Labirinto kaj en la memfisaj temploj vi trovos pastrojn, kiuj eliros renkonte al la taĉmentoj kun verdaj branĉoj. La koloneloj demandos ilin pri la signalvortoj kaj petos ilian konsilon ...

—Kaj se iu kuraĝos kontraŭstari? — demandis Tutmozis.

—Nur la ribeluloj ne plenumas la ordonojn de la faraono — respondis Ramzes. — La temploj kaj Labirinto devas esti okupitaj de la armeoj la 23-an de Paofi — daŭrigis la faraono, sin turnante al la granda skribisto. Do la popolo, en Memfiso kaj Fayum, povas kolektiĝi jam la 18-an, en la komenco en malgrandaj aretoj, poste pli kaj pli multenombre. Se do jam

ĉirkaŭ la 20-a komenciĝus malgrandaj tumultoj, oni ne devas malhelpi ilin. Sed ataki la templojn oni povas ne pli frue, ol la 22-an kaj 23-an. Kaj kiam la armeo okupos ĉi tiujn lokojn, ĉio devas trankviliĝi.

—Ĉu ne pli bone estus tuj aresti Herhoron kaj Mefreson?
— demandis Tutmozis.

—Por kio? — Ne pri ili mi zorgas, sed pri la temploj kaj Labirinto, por kies okupo la armeo ne estas ankoraŭ preta. Cetere Hiram, kiu kaptis la leterojn de Herhor al Asirianoj, revenos nur la 20-an ... Do nur la 21-an de Paofi ni havos en la manoj pruvojn, ke la ĉefpastroj estas perfiduloj, kaj ni anoncos tion al la popolo.

—Do mi devas veturi al Fayum? — demandis Kalipos.

—Ho ne! Vi kaj Tutmozis restos apud mi, kun la plej bonaj regimentoj ... Oni ja devas havi rezervojn por la okazo, se la pastroj deturnus de ni parton de la popolo.

—Sinjoro, ĉu vi ne timas perfidon? — demandis Tutmozis.
La faraono svingis malzorge la manon.

—La perfido gutas senĉese, kiel la akvo el fendita ba relo. Sendube la ĉefpastroj iom divenas miajn intencojn, mi ankaŭ konas iliajn dezirojn ... Sed ĉar mi pli ol ili kolektis la fortojn, ili do estas la malpli fortaj ... En la daŭro de dekelko da tagoj ne eble estas formi regimentojn ...

—Kaj la sorĉoj? — demandis Tutmozis.

Tutmozis volis en ĉi tiu momento rakonti al la faraono pri la procedoj de la ĉefpastroj kun Likon. Sed ankaŭ ĉi tiun fojon haltigis lin la penso, ke kiam la sinjoro forte ekkoleros, li perdos la trankvilon, kiu hodiaŭ faras lin potenca. Antaŭ la batalo la militestro devas pensi pri nenio, ekster la batalo

mem. Venos tempo, por la afero de Likon, kiam la pastroj estos en malliberejo.

La faraono faris signon. En la ĉambro restis Tutmozis; la aliaj tri altranguloj, profunde salutinte la monarĥon, eliris.

—Fine! — eksopiris la granda skribisto, kiam li estis kun la trezoristo en la vestiblo — fine ĉesos la povo de la razitaj kapoj ...

—Vere jam estas tempo — aldonis la trezoristo. Dum la lastaj jaroj iu ajn profeto havis pli da povo ol la nomarĥo de Teboj aŭ Memfiso.

—Mi pensas, ke Herhor sekrete preparas por si ŝipeton por forkuri antaŭ la 23-a de Paofi — intermetis Kalipos.

—Kio minacas lin? — diris la skribisto. — Lia sankteco, hodiaŭ severa, morgaŭ pardonos al ili, se ili humiliĝos...

—Kaj se la reĝino Nikotris petos por ili, li eĉ lasos al ili la riĉaĵojn — aldonis la trezoristo. — En ĉiu okazo en la ŝtato ekregos ordo, kiu jam komencis manki.

—Ŝajnas al mi, ke lia sankteco faras tro grandajn preparojn — diris la skribisto. — Mi finus ĉion per la grekaj regimentoj, ne tuŝante la popolaĉon ...

—Li estas juna ... li amas la movadon ... bruon ... — aldonis la trezoristo.

—Oni tuj vidas, ke vi ne estas soldatoj!... — diris Kalipos. — Por la batalo oni devas kolekti ĉiujn fortojn, ĉar ĉiam okazas io neatendita.

—Sendube, se ni ne havus post ni la popolon — respondis la skribisto. — Sed tiel, kio neatendita povas okazi?... La dioj ne malsupreniros de la ĉielo por defendi Labirinton.

—Via ekscelenco parolas tiel, ĉar vi estas trankvila — diris

Kalipos — ĉar vi scias, ke la ĉefa militestro vigle antaŭvidas ĉion. Alie, eble tremus sur vi la haŭto.

—Mi vidas nenion neatenditan — insistis la skribisto. — Eble la ĉefpastroj ree disvastigos la famon, ke la faraono freneziĝis ...

—Ili provos diversajn artifikojn — intermetis oscedante la granda skribisto — sed vere la fortoj ne sufiĉos al ili ... En ĉiu okazo mi dankas la diojn, ke ili lokis min apud la flanko de la faraono ... Nun ni iru dormi ...

Post la foriro de la altranguloj, Tutmozis malfermis en unu el la muroj kaŝitan pordon kaj enkondukis la pastron Samentu. La sinjoro akceptis la profeton de Set kun granda ĝojo, donis al li la manon por kisi kaj ĉirkaŭprenis lian kapon.

—La paco estu kun vi, bona servisto — diris la monarĥo. — Kion vi alportas?

—Mi estis du fojojn en Labirinto — respondis la pastro.

—Kaj vi jam konas la vojon?

—Jam de longe mi konis ĝin, sed nun mi malkovris ion. La trezorejo povas fali en profundaĵon, mortigi homojn kaj detrui la juvelojn, kiuj estas ĝia plej granda riĉaĵo ...

La faraono sulkigis la brovojn.

—Jen kial — daŭrigis Samentu — via sankteco bonvolu prepari dekelkon da konfidindaj homoj. Kun ili mi eniros Labirinton en la nokto antaŭ la atako kaj mi okupos la ĉambrojn, najbarajn al la trezorejo ... Precipe la supran!...

—Vi enkondukos ilin?...

—Jes. Mi iros ankoraŭ unu fojon tien kaj kontrolos definitive, ĉu mi ne povos malhelpi la ruinon, sen fremda helpo. La homoj, eĉ plej fidelaj ne estas konfidindaj, kaj la enkonduko de ili povas altiri la atenton de ĉi tiuj hundoj, gardistoj ...

—Se jam ili ne spionas vin ... — intermetis la faraono.

—Kredu al mi, sinjoro — respondis la pastro, metante la manon sur la bruston — ke por trovi min, oni bezonas miraklon. Ilia blindiĝo estas preskaŭ infana. Ili jam sentas, ke ni volas engliti Labirinton, sed malsaĝuloj — ili duobligas gardistojn antaŭ la videblaj pordetoj. Dume mi, en la daŭro de unu monato, trovis tri kaŝitajn enirojn, pri kiuj ili forgesis aŭ eble tute ne scias. Nur iu spirito povus averti ilin, ke mi promenas en Labirinto, aŭ montri la ĉambbron, kie mi estos. Inter tri mil ĉambroj kaj koridoroj tio estas neebla.

—La nobla Samentu diras la veron — interrompis Tutmozis. — Kaj eble ni troas nian antaŭgardon kontraŭ la pastraj vipuroj.

—Ne diru tion, generalo — respondis la pastro. Iliaj fortoj kompare kun la fortoj de lia sankteco estas kvazaŭ plenmano da sablo ĉe la templo, sed Herhor kaj Mefres estas tre, tre saĝaj!... Kaj ili kredeble uzos kontraŭ ni tiajn armilojn kaj ruzojn, ke ni mutiĝos de la miro ... Niaj temploj estas plenaj de misteroj, kiuj konsternas eĉ saĝulojn kaj pulvorigas la animon de la popolaĉo.

—Rakontu al mi pri tio — petis la faraono.

—Mi avertas vin, ke la soldatoj de via sankteco renkontos mirindaĵojn en la temploj. Jen estingiĝos iliaj lumoj, jen ĉirkaŭos ilin flamoj kaj abomenaj monstroj ... Jen muro baros al ili la vojon, aŭ sub la piedoj malfermiĝos senfundaĵo. En unuj koridoroj akvo superverŝos ilin, en aliaj nevideblaj manoj ĵetos ŝtonojn ... Kiaj tondroj, kiaj voĉoj sonos ĉirkaŭ ili!...

—En ĉiu templo mi havas bonvolajn por mi malsuperajn pastrojn, en Labirinto vi estos — diris la faraono.

—Kaj niaj hakiloj — intermetis Tutmozis. — Malkuraĝa

estas la soldato, kiun fortimigas la flamoj aŭ monstroj, aŭ kiu perdas la tempon por aŭdi misterajn voĉojn.

—Vi bone parolas, generalo! — ekkriis Samentu. — Se nur vi iros brave antaŭen, la timigiloj malaperos, la voĉoj eksilentos, la flamoj ĉesos bruligi. Nun lasta vorto, nia sinjoro — sin turnis la pastro al Ramzes. — Se mi pereus ...

—Ne parolu tiel!... — vive interrompis la faraono.

—Se mi pereus — daŭrigis Samentu kun malĝoja rideto — venos al via sankteco juna pastro de Set kun mia ringo. Okupu do la armeo Labirinton kaj forpelu la gardistojn, kaj ne forlasu plu la konstruaĵon, ĉar la junulo, eble post unu monato, eble pli frue, trovos la vojon al la trezoroj dank'al la montroj, kiujn mi lasos al li ... Sed sinjoro — diris li genuante — pri unu, sole pri tio, mi petegas vin. Kiam vi venkos, venĝu min, kaj antaŭ ĉio ne pardonu al Herhor kaj Mefres. Vi ne scias, kiaj malamikoj ili estas!... Se ilia estos la venko, pereos ne nur vi, sed ankaŭ via dinastio.

—Ĉu ne konvenas al la venkinto esti grandanima? — demandis la monarĥo kun malgaja mieno.

—Nenian grandanimecon!... nenian kompaton!... kriis Samentu. — Dum ili vivos, vin kaj min minacas la morto, malhonoro, eĉ malrespekto al niaj kadavroj. Oni povas kvietigi leonon, aĉeti Fenicianon, altiri al sia koro Libianon kaj Etiopanion ... Oni povas repacigi ĥaldean pastron, ĉar li kiel aglo rondflugas super la altaĵoj kaj ne timas sagojn ... Sed egiptan profeton, kiu gustumis lukson kaj povon, vi altiros al vi per nenio. Sole la morto, ilia aŭ via, povas fini la batalon.

—Vi diras la veron, Samentu — respondis Tutmozis. — Feliĉe, ne lia sankteco, sed ni, soldatoj, solvos la jarcentan malkonsenton inter la pastroj kiaj la faraono.

ĈAPITRO DEKKVARA

La 12-an de Paofi de diversaj egiptaj temploj disvastiĝis maltrankviligaj novaĵoj.

En la lastaj tagoj en la templo de Horus renversiĝis altaro, en la temploj de Izido la statuo de la dio ploris. Ĉe la teba Amon kaj ĉe la tombo de Oziriso, en Denderaĥ oni kolektis tre malbonajn antaŭdirojn. De seneraraj signoj la pastroj konkludis, ke Egipton minacas ia granda malfeliĉo, antaŭ la fino de la monato.

La ĉefpastroj Herhor kaj Mefres ordonis procesiojn ĉirkaŭ la temploj kaj oferojn al la dioj en la domoj.

Tuj en la sekvinta tago, la 13-an de Paofi, granda procesio havis lokon en Memfiso: la dio Ptah eliris el sia templo, kaj la diino Izido el sia. Ambaŭ dioj iris al la centro de la urbo, kun tre malgranda sekvantaro de fideluloj, plejparte de virinoj. Sed ili devis reiri: la egiptaj burĝoj mokis ilin, kaj la alireligianoj eĉ ĵetis ŝtonojn sur la sanktajn ŝipetojn de la dioj.

La polico, vidante tion, restis tute indiferenta, kelkaj ĝiaj membroj eĉ partoprenis en la maldecaj ŝercoj. De la tagmezo, iuj nekonataj homoj komencis rakonti al la popolo, ke la pastraro melhelpas la reformojn por la laborantaj klasoj kaj volas ribeli kontraŭ la faraono.

Ĉirkaŭ la vespero, apud la temploj kolektiĝis aretoj da laboristoj, fajfante kaj malbenante la pastrojn. Samtempe oni

ĵetis ŝtonojn al la pordegoj, kaj iu krimulo publike rompis la nazon al Horus, gardanta sian templon.

Kelke da horoj post subiro de la suno en la templo de Ptah kolektiĝis la ĉefpastroj kaj iliaj plej fidelaj partianoj. Estis tie Herhor, Mefres Mentezufis, tri nomarĥoj kaj la plej alta juĝisto de Teboj.

—Teruraj tempoj! — diris la juĝisto. — Mi scias tute certe, ke la faraono volas ribeligi la popolaĉon, por ke ili ataku la templojn.

—Mi aŭdis — aldonis la nomarĥo de Sebes — ke oni sendis ordonon al Nitager alkuri plej rapide kun novaj regimentoj, kvazaŭ ne sufiĉus jam la nunaj! ...

—La vojo inter Malsupra kaj Supra Egipto estas interrompita jam de hieraŭ — diris la nomarĥo de Aa. — Sur la ŝoseoj staras la armeo, kaj la galeroj de lia sankteco faras revizion de ĉiu ŝipo, veturanta sur Nilo ...

—Ramzes XIII ne estas "sankteco" — interrompis seke Mefres — ĉar li ne ricevis la kronojn de la manoj de la dioj.

—Ĉio ĉi estus bagateloj — ekparolis la plej alta juĝisto. — Pli malbona estas la perfido ... Mi havas pruvojn, ke multaj junaj pastroj estas favoraj al la faraono kaj konigas al li ĉion ...

—Estas eĉ tiaj, kiuj promesis faciligi al la armeo okupi la templojn — aldonis Herhor.

—Almenaŭ ili havas tian ordonon por la 23-a — respondis Herhor.

—Kaj via ekscelenco parolas pri tio tiel trankvile? — demandis la nomarĥo de Ament.

Herhor levis la ŝultrojn, la nomarĥoj komencis rigardi unu alian.

—Tion mi ne komprenas!... — diris preskaŭ kun kolero la nomarĥo de Aa. — La temploj havas apenaŭ kelkcenton da soldatoj, la pastroj perfidas, la faraono fortranĉas nin de Teboj kaj ribeligas la popolon, kaj la nobla Herhor parolas pri tio, kvazaŭ li invitus nin al festeno ... Aŭ ni defendu nin, se tio estas ankoraŭ ebla, aŭ ...

—Aŭ ni submetu nin al lia sankteco? — demandis ironie Mefres. — Por tio vi ĉiam havos tempon!...

—Sed ni dezirus ekscii ion pri la rimedoj de la defendo ... — diris la nomarĥo de Sebes.

—La dioj savos siajn fidelulojn — respondis Herhor. La nomarĥo de Aa tordis siajn manojn.

—Se mi devas malfermi mian koron, ankaŭ mi diros, ke mirigas min via indiferenteco — interrompis la plej alta juĝisto, — Preskaŭ la tuta popolaĉo estas kontraŭ ni ...

—La popolaĉo, kiel hordeo sur kampo, iras kun la vento — diris Herhor.

—Kaj la armeo?...

—Kiu armeo ne falos antaŭ Oziriso.

—Mi scias — interrompis malpactence la nomarĥo de Aa — sed mi ne vidas Ozirison, nek la venton, kiu devas turni al ni la popolon ... Dume la faraono jam hodiaŭ akiris ilin por si per la promesoj, kaj morgaŭ li venos kun donacoj ...

—Pli forta ol la promesoj kaj donacoj estas la teruro — respondis Herhor.

—Kion ili devas timi?... La tricent soldatojn, kiujn ni havas?...

—Ili ektimos Ozirison.

—Sed kie li estas?... — demandis la ekscitita nomarĥo de Aa.

—Vi ĉiuj vidos lin. Kaj feliĉa estus tiu, kiu blindiĝus por tiu tago.

Herhor diris ĉi tiujn vortojn kun tiel solena trankvilo, ke en la kunveno ekregis silento.

—Sed definitive kion ni faras? — demandis post momento la plej alta juĝisto.

—La faraono deziras — diris Herhor — ke la popolo ataku la templojn la 23-an. Ni devas fari, ke oni ataku nin la 20-an de Paofi.

—Eterne vivantaj dioj! — ree ekkriis la nomarĥo de Aa, levante la manojn. — Por kio ni devas altiri la malfeliĉon sur niajn kapojn, kaj du tagojn pli frue?...

—Obeu Herhoron — interrompis Mefres per kategoria tono — kaj per ĉiuj rimedoj penu, ke la atako komenciĝu matene la 20-an.

—Kaj se efektive ni estos batitaj?... — demandis konfuzite la juĝisto.

—Se ne efikos la preĝoj de Herhor, tiam mi alvokos la helpon de la dioj — respondis Mefres, kaj en liaj okuloj ekbrilis kolera flamo.

—Ah, vi ĉefpastroj havas viajn sekretojn, kiujn malpermesite estas al vi malkovri — diris la granda juĝisto. — Ni do faros, kion vi ordonas, ni provokos la atakon la 20-an. Sed memoru, ke la sango de niaj infanoj kaj nia falos sur viajn kapojn ...

—Ĝi falu ...

—Tiel estu!... — ekkriis samtempe ambaŭ ĉefpastroj.

Poste Herhor aldonis:

—De dek jaroj ni regas la ŝtaton, kaj dum ĉi tiu tempo ni estis maljustaj al neniu el vi kaj plenumis ĉiun promeson.

Estu do paciencaj kaj fidelaj ankoraŭ kelke da tagoj, por vidi la potencon de la dioj kaj ricevi rekompencan.

Baldaŭ la nomarĥoj adiaŭis la pastrojn, eĉ ne penante kaŝisian malĝojon kaj maltrankvilon. Restis nur Herhor kaj Mefres.

Post longa silento Herhor diris:

—Jes, tiu ĉi Likon estis bona, dum li ludis la rolon de frenezulo. Sed anstataŭigi per li Ramzeson!...

—Se la patrino estis trompita — respondis Mefres — li devas esti tre simila al la faraono, ... Kaj sidi sur la trono, diri kelke da vortoj al la ĉirkaŭantaj, tion li sendube scios fari. Cetere ni estos apud li ...

—Tre malsaĝa komedianto!... — suspiris Herhor, frotante la frunton.

—Li estas pli saĝa, ol multe da milionoj da homoj, ĉar li posedas duoblan vidkapablon kaj povas fari grandajn servojn al la ŝtato ...

—Via ekscelenco ĉiam parolas al mi pri ĉi tiu duobla vidkapablo — respondis Herhor. — Fine konvinkiĝu mi mem pri ĝi.

—Vi volas? — demandis Mefres. — Ni do iru ... Sed pro la dioj, Herhor, pri tio, kion vi vidos, ne parolu eĉ al via propra koro.

Ili iris malsupren en la subteraĵon de la templo de Ptah kaj baldaŭ atingis vastan kelon, lumigitan per torĉo. Ĉe la malforta brilo Herhor ekvidis homon, kiu sidante ĉe la tablo manĝis. Li portis tunikon de la faraona gvardio.

—Likon — diris Mefres — la plej granda altrangulo de la ŝtato volas konvinkiĝi pri la kapabloj, kiujn donis al vi la dioj

...

La Greko forpuŝis la pladon kun la manĝaĵo kaj komencis murmuri:

—Malbenita la tago, en kiu miaj plandoj tuŝis vian teron!... Mi preferus labori en minejo kaj esti batata per bastonoj ...

—Por tio ĉiam estos tempo — interrompis severe Herhor.

La Greko eksilentis kaj subite komencis tremi, vidante en la mano de Mefres globeton el malhela kristalo. Li paliĝis, malklariĝis lia rigardo, sur lia vizaĝo aperis ŝvitaj gutoj. Liaj okuloj estis fiksitaj sur unu punkto, kvazaŭ najlitaj al la kristala globeto.

—Li jam dormas — diris Meres. — Ĉu tio ne estas stranga? — Se li ne ŝajnigas.

—Pinĉu lin ... piku ... eĉ brogu ... — diris Mefres.

Herhor eltiris el sub sia blanka vesto ponardon kaj faris movon, kvazaŭ volante frapi Likonon inter lia okulojn. Sed la Greko restis senmova, eĉ ne palpebrumis.

—Rigardu ĉi tien — diris Mefres, proksimigante al Likon la kristalon. — Ĉu vi vidas tiun, kiu forrabis Kaman?...

La Greko salte leviĝis de la seĝo kun kunpremitaj pugnoj, kun ŝaŭmo sur la lipoj.

—Ellasu min!... — kriis li per raŭka voĉo. — Ellasu min, mi volas trinki lian sangon.

—Kie li estas nun? — demandis Mefres.

—En la palaco, en la ĝardeno, proksime de la rivero ... kun li estas bela virino., — murmuretis Likon.

—Ŝia nomo estas Hebron kaj ŝi estas la edzino de Tutmozis — sufloris Herhor. — Konfesu Mefres — aldonis li — ke, por scii tion, oni ne bezonas duoblan vidkapablon ...

Mefres kunpremis siajn maldikajn lipojn.

—Se tio ne konvinkas vian ekscelencon, mi montros al vi

ion pli bonan — respondis li — Likon, trovu nun la perfidulon, kiu serĉas la vojon al la trezorejo de Labirinto ...

La dormanta Greko pli fikse rigardis la kristalon kaj post momento respondis:

—Mi vidas lin ... Li estas vestita per ĉifonoj de almozulo ...

—Kie li estas ...

—Li kuŝas sur la korto de la lasta gastejo antaŭ Labirinto ... Matene li estos tie ...

—Kia estas lia aspekto?

—Li havas flavruĝajn harojn kaj barbon.. — respondis Likon ...

—Do? — demandis Mefres Herhoron.

—Via ekscelenco havas bonan policon — respondis Herhor.

—Kontraŭe, la gardistoj de Labirinto malbone ĝin gardas! — kolere diris Mefres. — Ankoraŭ hodiaŭ nokte mi veturos tien kun Likon por averti la tieajn pastrojn ... Sed kiam mi sukcesos savi la trezorojn de la dioj, via ekscelenco permesos, ke mi fariĝos ilia gardisto ...

—Kiel deziras via ekscelenco — respondis Herhor indifere. Kaj en sia koro li aldonis:

—Fine la pia Mefres komencas montri dentojn kaj ungegojn ... Li mem deziras fariĝi nur ... la gardisto de Labirinto kaj sian edukaton Likonon fari nur ... faraono!... Vere, por savigi la avidecon de miaj helpantoj, la dioj devus krei dek Egiptojn ...”

Kiam ambaŭ altranguloj forlasis la subteraĵon, Herhor nokte, piedire revenis en la templon de Izido, kie li loĝis, kaj Mefres ordonis prepari kelke da ĉevalaj portiloj. En unu portilon junaj pastroj metis la dormantan Likonon, kun sako sur

la kapo en la alia sidiĝis la ĉefpastro mem kaj, ĉirkaŭita de kelke da rajdantoj, ektrotis al Fayum.

En la nokto de 14-a al la 15-a de Paofi, la ĉefpastro Samentu, konforme al la promeso donita al la faraono, eniris Labirinton tra koridoro, konata nur de li. Li havis en la mano faskon de torĉoj, el kiuj unu brulis, kaj sur la dorso korbon kun instrumentoj.

Samentu tre facile transiris de unu salono en alian, el koridoro en koridoron, per unu tuŝo forigante la ŝtonajn platojn en la kolonoj kaj muroj, kie estis kaŝitaj pordoj. Ifoje li ŝanceliĝis, sed tiam li legis la misterajn signojn sur la muroj kaj komparis ilin kun la signoj sur la rozario, kiun li havis sur la kolo.

Post duonhora irado li atingis la trezorojn. Foriginte tie platon en la planko, li eniris en suban salonon. Ĝi estis malalta, sed vasta, kaj ĝia plafono estis apogita sur multenombraj dikaj kolonoj.

Samentu demetis sian korbon kaj, eklumiginte la torĉojn, ĉe ilia lumo komencis legi la surskribon sur la muroj.

”Malgraŭ mia mizera aspekto — diris unu surskribo — mi estas vera filo de la dioj, ĉar mia kolero estas terura. Ekstere mi fariĝas fajra kolono kaj naskas la fulmon. Enfermita, mi estas tondro kaj detruo kaj ne ekzistas konstruaĵo, kiu kontraŭstarus al mia potenco. Kvietigi min povas nur la sankta akvo, forprenante mian forton. Sed mia kolero naskiĝis same de flamo, kiel de plej malgranda fajrero. En mia ĉeesto ĉio tordiĝas kaj falas. Mi estas kiel Tilon, kiu renversas plej grandajn arbojn kaj levas ŝtonojn!...”

—Unuvorte, ĉiu templo havas sian misteron, kiun ne konas la aliaj!... — diris al si Samentu.

Li malfermis unu kolonon kaj elprenis grandan poton. La poto havis kovrilon, algluitan per vakso, kaj truon, tra kiu pasis longa, maldika ŝnuro, finiĝanta oni ne scias kie en la interno de la kolono.

Samentu fortranĉis de la ŝnuro pecon, proksimigis ĝin al la torĉo kaj rimarkis, ke la torĉo brulas rapide kun siblo.

Nun singarde li demetis per tranĉilo la kovrilon kaj ekvidis en la poto kvazaŭ sablon kaj ŝtonetojn de cindra koloro. Li prenis kelke da ŝtonetoj kaj, foririnte flanken, almetis la torĉon. Tuj ŝprucis granda flamo, kaj la ŝtonetoj malaperis, lasante post si fumon kaj malagrablan odoron.

—Mi jam havas la veran filon de la dioj!... — diris Samentu kun rideto. — La trezorejo ne dronos en profundaĵo ...

Li iris de kolono al kolono, malfermis la kaŝejojn kaj elprenis la kaŝitajn potojn. Ĉe ĉiu estis ŝnuro, kiun Samentu tranĉis, kaj la potojn li starigis flanke.

—Lia sankteco — diris la pastro — povus donaci al mi duonon de la trezoroj, aŭ almenaŭ ... fari mian filon nomarĥo!... Kaj sendube li faros, ĉar li estas grandanima sinjoro ... Mi meritas almenaŭ la templon de Amon en Teboj ...

Antaŭgardinte tiel la suban salonon, Samentu revenis en la trezorejon, kaj de tie eniris en la supran salonon. Tie ankaŭ estis surskriboj, multenombraj kolonoj, kaj en ili potoj, provizitaj per ŝnuroj kaj plenigitaj per ŝtonetoj, kiuj ĉe la kontakto kun fajro eksplodis.

Samentu tranĉis la ŝnurojn, forigis la potojn el la kolonoj kaj iom da griza sablo prenis en ĉifonon. Poste laca li sidiĝis. Ses el liaj torĉoj jam forbrulis sendube; la nokto jam proksimiĝis al sia fino.

—Neniam mi supozus — diris li al si — ke ĉi tieaj pastroj

havas tiel strangan materion!... Oni ja povus per ĝi renversi la asiriajn citadelojn!... Vere estas, ke ni ankaŭ ne ĉion diras al niaj lernantoj.

Laca li komencis revii. Nun li estis certa, ke li okupos la plej altan postenon en la ŝtato, pli potenca ol tiu, kiun okupis Herhor. Kion li faros tiam?... Multon, multon. Li certigos saĝon kaj riĉaĵon al siaj posteuloj. Li penos elŝiri la sekretojn de ĉiuj temploj, kio senlime fortigos lian povon kaj certigos al Egipto superecon je Asirio.

La faraono ridas la diojn: tio faciligos al li la taskon fondi la kulton de unu sola dio, ekzemple de Oziriso, kaj kunigi Fenicianojn, Hebreojn, Grekojn kaj Libianojn en unu ŝtaton kun Egipto.

Samtempe li komencos la laborojn ĉe la kanalo, kiu devas kunigi Ruĝan Maron kun Meza. Kiam sur la bordoj de la kanalo estos konstruitaj fortikaĵoj kaj kolektitaj grandaj armeoj, la tuta komerco kun la nekonataj popoloj de Oriento kaj Okcidentoj falos en la manojn de Egiptanoj.

Oni devas ankaŭ posedi propran ŝiparon kaj egiptajn maristojn ... Kaj antaŭ ĉio frakasi Asirion, kiu ĉiujare fariĝas pli kaj pli danĝera ... Oni devas limigi la lukson kaj avarecon de la pastroj ... Ili estu saĝuloj, ili havu bonstaton, sed ili servu al la ŝtato, anstataŭ ekspluati ĝin por sia profito, kiel hodiaŭ ...

—Jam en la monato de Hator — diris li al si — mi estos la estro!... La juna monarĥo tro amas virinojn kaj armeon por povi sin okupi per la regado ... Kaj se li ne havos filojn, tiam mia filo, mia filo ...

Li rekonsciiĝis. Ankoraŭ unu torĉo forbrulis, kaj estis jam granda tempo forlasi la subteraĵon.

Li leviĝis, prenis la korbojn kaj forlasis la salonon sub la trezorejo.

—Mi ne bezonas helpantojn ... — pensis li ridetante. — Mi sola ĉion antaŭgardis ... mi sola, la malestimata pastro de Set!...

Li trapasis jam dekelkon da ĉambroj kaj koridoroj, kiam subite li haltis ... Ŝajnis al li, ke sur la planko de la ĉambro li vidas maldikan strion de lumo ...

En unu momento tiel granda teruro ekregis lin, ke li estingis la torĉon. Sed la strio sur la planko ankaŭ malaperis.

Samentu atente aŭskultis, sed li aŭdis nur la batadon de la pulso en la propra kapo.

—Ŝajnis al mi!... — diris li.

Per tremanta mano li prenis el la korbo malgrandan vazon, en kiu malrapide bruletis meĉo, kaj ree eklumigis la torĉon.

—Mi estas tre dormema!... — pensis li.

Li ĉirkaŭrigardis en la salono kaj aliris al la muro en kiu estis kaŝita pordo. Li premis najlon, la pordo ne malfermiĝis. Dua ... tria premo ... nenio.

—Kion tio signifas? — diris li mirigita al si. Li jam forgesis pri la luma strio. Ŝajnis al li, ke okazis al li io nova, nekomprenebla. Tiom da kaŝitaj pordoj li malfermis dum sia vivo, tiom da ili li malfermis en Labirinto, ke li tute ne povis kompreni la nunan malsukceson.

Subite ree ekregis lin timo. Li komencis kuri de muro al muro kaj ĉie provis malfermi kaŝitan pordon. Fine unu cedis. Samentu profunde ekspiris kaj troviĝis en grandega salono, tute plena de kolonoj, kiel ordinare. Lia torĉo lumigis apenaŭ parton de ĝi, la resto dronis en densa krepusko.

La mallumo, la arbaro de kolonoj, kaj antaŭ ĉio la fakto, ke

la salono estis al li nekonata, redonis al la pastro kuraĝon. Sur la fundo de lia timo vekigis fajrero de naiva espero ŝajnis al li, ke, ĉar li ne konas la lokon, neniu ĝin konas, neniu venos tien ...

Li iom trankviligis kaj sentis, ke la piedoj fleksiĝas sub li. Li sidigis. Sed ree li salte leviĝis kaj komencis ĉirkaŭrigardi, kvazaŭ por kontroli, ĉu vere minacas lin danĝero kaj de kie?... El kiu el la mallumaj anguloj ĝi eliros, por sin ĵeti sur lin?...

Samentu, kiel neniu alia en Egipto, kutimis al subteraĵoj, mallumo, erarvagado. Krom tio li travivis multajn maltrankvilojn. Sed tio, kion li sentis nun, estis io tute nova kaj tiel nova, ke la pastro timis doni al ĝi la ĝustan nomon.

Fine kun granda peno li kolektis la pensojn kaj diris:

—Se efektive mi vidas lumon ... se efektive iu fermis la pordojn, oni perfidis min ... kaj tiam?...

—La morto!... — murmuretis al li voĉo, kaŝita ie sur la fundo de lia koro.

La morto?...

Ŝvito kovris lian vizaĝon; lia spirado haltis. Kaj subite la frenezo de la timo ekregis lin. Li komencis kuri en la salono kaj bati la murojn per la pugno, serĉante eliron. Li jam forĝesis, kie li estas kaj kiel li venis tien; li perdis la direkton, eĉ la eblon sin orienti kun la helpo de la rozario.

Samtempe li sentis, ke estas en li kvazaŭ du homoj: unu preskaŭ freneza, alia trankvila kaj saĝa. La saĝa klarigis al si, ke ĉio povas esti nur iluzio, ke neniu trovis lin, neniu lin serĉas, kaj ke li eliros, se nur li iom liberiĝos de la timo. Sed la unua, la freneza, ne aŭskultis la voĉon de la prudento, kontraŭe, ĉiuminute li akiris superecon je sia interna antagonisto.

Oh, se oni povus sin kaŝi en iu kolono!... Tiam oni serĉu ... Certe neniu lin trovus, kaj li, dorminte iom, reakirus la regadon de si mem.

—Kio povas okazi al mi ĉi tie? — diris li, levante la ŝultrojn. — Se nur mi trankviliĝos, ili povas persekuti min tra la tuta Labirinto ... Por bari ĉiujn vojojn oni bezonus milojn da homoj, kaj por montri la ĉelon, en kiu mi estas — almenaŭ miraklon!...

Bone, sed ni supozu, ke oni kaptos min ... Kio do?... Mi prenas jen ĉi tiun boteleton, mi levas ĝin al mia buŝo kaj post unu minuto mi forkuras tiel, kie neniu kaptos min ... Eĉ la dioj ...

Sed malgraŭ la rezonado, ree ekregis lin tiel terura timo, ke duan fojon li estingis la torĉon kaj tremante, klakante per la dentoj li enŝovis sin post kolonon.

—Kiel mi povis ... kiel mi povis eniri tien ĉi!... — diris li al si. — Ĉu mi ne havis ion por manĝi ... ion por apogi sur ĝi la kapon?... Estas tute simple, ke oni malkovris min ... Labirinto ja posedas multe da gardistoj, viglaj kiel hundoj, kaj nur infano aŭ malsaĝulo povus supozi, ke li trompos ilin!... La riĉaĵo ... la povo!... Kie estas tia trezoro, kiu valorus unu tagon de la vivo?... Kaj mi, homo en floranta aĝo, riskis la mian ...

Ŝajnis al li, ke li aŭdis pezan frapon. Li salte leviĝis kaj en la fundo de la salono ekvidis brilon!...

Jes: realan brilon, ne iluzion ... En malproksima muro, ie en la fino de la salono, pordo estis malfermita, kaj tra ĝi en ĉi tiu momento eniris kelke da armitaj homoj kun torĉoj.

Vidante tion, la pastro eksentis malvarmon en la piedoj, en la koro, en la kapo ... Li ne dubis plu, ke ne nur li estas malkovrita, sed persekutata kaj ĉirkaŭita.

Kiu povis lin perfidi?... Kompreneble, nur unu homo: la juna pastro de Set, al kiu li sufiĉe detale konfidis siajn planojn. La perfidulo sola devus unu monaton serĉi la vojon en Labirinto, sed kun la helpo de la gardistoj li povis dum unu tago trovi liajn postesignojn ...

En ĉi tiu momento li havis la impreson, konatan nur de homoj, kiuj staras antaŭ morto. Li ĉesis timi, ĉar la imagataj teruroj malaperis en la ĉeesto de la realaj torĉoj. Kaj ne sole li reakiris la memregadon, sed eĉ li eksentis sin senfine supera, ol ĉio vivanta ... Post unu momento minacos lin plu neniu ... neniu danĝero ...

La pensoj trakuris lian kapon kun la rapideco kaj heleco de fulmo. Li rememoris sian tutan ekzistadon: la laborojn, danĝerojn, esperojn kaj ambiciojn, kaj ĉio ŝajnis al li bagatelo. Ĉar eĉ se li estus en la nuna momento faraono aŭ posedus ĉiujn juvelojn de ĉiuj reĝaj trezoroj ...

Ĉio ĉi estas vantaĵo, polvo, eĉ malpli, ĉar iluzio. Nur unu estas granda kaj reala, la morto ...

Dume la homoj kun la torĉoj, atente rigardante la kolonojn kaj angulojn, atingis jam la mezon de la grandega salono. La pastro vidis eĉ la pintojn de iliaj lancoj kaj rimarkis, ke ili ŝanceliĝas, ke ili iras antaŭen nevolonte kaj kun timo. Kelke da paŝoj post ili iris alia grupo de personoj, lumigita per unu torĉo.

Samentu eĉ ne sentis koleron kontraŭ ili, nur scivolon: kiu perfidis lin? Sed ankaŭ ĉi tiu demando ne tre interesis lin; multe pli grava ŝajnis al li la demando: kial homo devas morti?... Kaj por kio li naskiĝis?... Ĉe fakto de la morto, la tuta vivo mallongiĝas en unu doloran momenton, eĉ se ĝi estis plej longa kaj plej riĉa je spertoj.

—Kial?... Pro kio?...

Vekis lin la voĉo de unu el la armitoj:

—Neniu estas ĉi tie ... neniu povas esti!...

La armitoj haltis. Samentu sentis, ke li amas ĉi tiujn homojn, kaj la koro ekbatis en li.

Malrapide proksimiĝis la alia grupo. Oni disputis:

—Kiel povas via ekscelenco eĉ supozi, ke iu eniris ĉi tien?

— parolis voĉo, tremanta de kolero. — Ĉiuj eniroj ja estas gardataj, precipe nun. Eĉ se iu englitis, certe nur por morti de malsato ...

—Tamen rigardu via ekscelenco Likonon — respondis alia voĉo. — La dormanta Greko havas aspekton, kvazaŭ li sentus la malamikon tute proksime ...

”Likon? — pensis Salmentu. — Ah, tio estas la Greko simila al la faraono ... Sed kion mi vidas?... Mefres mem alkondukis lin ĉi tien ...”

En la sama momento la dormanta Greko sin ĵetis antaŭen kaj haltis antaŭ la kolono, post kiu sin kaŝis Samentu. La armitoj sekvis lin, kaj la brilo de iliaj torĉoj eklumigis la nigran figuron de la pastro.

Samentu eliris. Lia apero faris tiel grandan impreson, ke la homoj kun la torĉoj posteniĝis. Li povus trairi inter la teruritaĵoj, kaj neniu haltigus lin; sed la pastro ne pensis plu pri la forkuro.

—Do, ĉu trompis min mia klarvidulo?... — diris Mefres, etendante la manon. — Jen la perfidulo!...

Samentu proksimiĝis al li kun rideto kaj diris:

—Mi rekonis vin per tiu ĉi ekkrio, Mefres. Kiam vi ne povas esti trompanto, vi estas nur malsaĝulo ...

La ĉeestantoj ŝtoniĝis. Samentu daŭrigis kun trankvila ironio:

—En ĉi tiu momento vi estas samtempe trompanto kaj malsaĝulo. Trompanto, ĉar vi volas kredigi al la gardistoj de Labirinto, ke ĉi tiu fripono havas kapablon de la duobla vidaĉo; malsaĝulo, ĉar vi pensas, ke ili kredos al vi. Prefere tuj diru, ke ankaŭ en la templo de Ptah estas detalaj planoj de Labirinto ...

—Tio estas malvera!... — ekkriis Mefres.

—Demandu ĉi tiujn homojn, al kiu ili kredas: al vi aŭ al mi? Mi estas ĉi tie, ĉar mi trovis la planojn en la templo de Set, vi venis dank'al la senmorta Ptah ... — finis Samentu ridante.

—Ligu la perfidulon kaj mensogulon!... — ekkriis Mefres.

Samentu retiriĝis kelke da paŝoj. Li rapide eltiris el sub la vesto la boteleton kaj, levante ĝin al la buŝo, diris:

—Mefres, ĝis la morto vi estos malsaĝulo ... Ruza vi estas nur, kiam via celo estas mono.

Li almetis la boteleton al la buŝo kaj falis sur la plankon.

La armitoj sin ĵetis al li, levis lin, sed jam li glitis el iliaj manoj.

—Li restu ĉi tie, kiel la aliaj — diris la gardisto de Labirinto.

Ĉiuj forlasis la salonon kaj zorge fermis la kaŝitan pordon. Baldaŭ ili eliris el la subteraĵo.

Kiam la nobla Mefres venis en la korton, li ordonis al siaj pastroj prepari la portilojn kaj senprokraste forveturis Memfison kun la dormanta Likon.

—Mi ne povas kredi, — diris la ĉefpastro gardisto — ke estis dum niaj tagoj homo, kiu penetris en la subteraĵon ...

—Via ekscelenco forgesas, ke ni estis hodiaŭ tri — intermetis unu el la junaj pastroj, strabe lin rigardante.

—Jes ... vere ... — respondis la ĉefpastro. — Ĉu la dioj malklarigis mian prudenton? — diris li, frotante la frunton kaj premante la amuleton sur sia brusto.

—Kaj du forkuris — sufloris la juna pastro.

—Kial vi ne turnis mian atenton tie ... en la subteraĵo!... — eksplodis la ĉefpastro.

—Mi ne sciis, ke tiel okazos ...

—Ve al mia kapo!... — kriis la ĉefpastro. — Ne la ĉefo, sed la pordisto de ĉi tiu konstruaĵo mi devus esti ... Oni avertis nin, ke iu glitas en Labirinton kaj mi ne malhelpis tion ... Kaj nun mi ellasis du plej danĝerajn, kiuj alkondukos ĉi tien ĉiun, se plaĉos al ili ... Ho ve!...

—Via ekscelenco ne bezonas malesperi — diris alia pastro. — Nia leĝo estas klara ... Via ekscelenco sendu Memfison kvar aŭ ses niajn homojn kaj donu al ili verdiktojn. La resto estos ilia afero ...

—Mi perdis la saĝon! — lamentis la ĉefpastro.

—Kio okazis, okazis — interrompis la juna pastro ne sen ironio. — Unu afero estas senduba, ke la homoj, kiuj ne nur trovis la vojon al la subteraĵoj, sed eĉ promenis en ili kvazaŭ en la propra domo, ke ĉi tiuj homoj ne povas vivi ...

—Elektu do ses homojn el nia milico.

—Kompreneble!... Oni devas fini kun tio ... — jesis la pastroj gardistoj.

—Kiu scias, ĉu Mefres ne agis interkonsente kun la plej nobla Herhor? — murmuretis iu.

—Sufiĉe! — ekkriis la ĉefpastro. — Kiam ni trovos Herhoron en Labirinto, ni agos laŭ la leĝo. Sed konjekti, aŭ suspekti,

ni ne havas la rajton ... La skribistoj preparu la verdiktojn por Mefres kaj Likon, la elektitaj plej rapide persekutu ilin, la milico multobligu la starantajn garde. Oni devas ankaŭ esplori la internon de Labirinto kaj malkovri, de kie eniris Samentu ... Kvankam mi estas certa, ke ne baldaŭ li trovos imitantojn ...

Post kelke da horoj ses homoj galopis al Memfiso.

ĈAPITRO DEKKVINA

Jam la 18-an de Paofi en Egipto ekregis ĥaoso. La vojoj inter Malsupra kaj Supra Egipto estis interrompitaj, la komerco ĉesis, la ŝoseoj estis okupitaj de la regimentoj, kiuj rapidis al la urboj, posedantaj la plej famajn templojn.

Sur la kampoj laboris nur la pastraj kamparanoj. En bienoj de la nobeloj, nomarĥoj, kaj precipe de la faraono, lino ne estis elŝirita, trifolio ne estis tuŝita, vinberojn ŝirkolektis neniu. La kamparanoj faris nenion, vagis en bandoj, kantis, manĝis, trinkis kaj minacis al la pastroj aŭ al Fenicianoj.

En la urboj butikoj estis fermitaj kaj la senokupaj metiistoj tutajn tagojn diskutis pri la ŝanĝoj en la ŝtato. Ĉi tiu skandala fenomeno ne estis plu novaĵo por Egipto, sed nun ĝi atingis tiel minacan gradon, ke la kolektistoj de impostoj, eĉ juĝistoj komencis sin kaŝi tiom pli, ke la polico tre malsevere agis kontraŭ la trouzoj de la popolo.

Ankoraŭ unu afero meritis atenton: la granda kvanto da nutraĵo kaj vino. En la drinkejoj kaj gastejoj, precipe en la feniciaj, en Memfiso same kiel en la provinco, povis manĝi kaj trinki ĉiu, kiu volis kaj kiam li volis, tre malkare eĉ tute senpage.

Oni diris, ke lia sankteco donas al sia popolo festenon, kiu daŭros tutan monaton.

Kaŭze de la malfaciligo, eĉ interrompo de la interkomunikiĝoj, la urboj ne bone sciis, kio okazas ĉe la najbaroj. Nur

la faraono, kaj ankoraŭ pli bone la pastroj, konis la staton de la lando.

La situacion antaŭ ĉio karakterizis la malkonsento inter Supra aŭ Teba kaj Malsupra aŭ Memfisa Egipto. En Teboj oni diris, ke Ramzes freneziĝis kaj volas vendi Egipton al Fenicianoj; en Memfiso oni rakontis, ke la pastroj volas veneni la faraonon kaj alkonduki Asirianojn en la landon.

La simpla popolo, norde kaj sude, estis altirita al Ramzes per ia instinkto. Sed la popolo estis forte pasiva kaj ŝanceliĝema. Kiam parolis faraona agitanto, la kamparanoj estis pretaj ataki la pastrojn: sed kiam venis procesio, ili falis sur la vizaĝon kaj tremis, aŭskultante la antaŭdirojn pri katastrofoj, kiuj minacis Egipton jam en ĉi tiu monato.

La teruritaj nobeloj kaj nomarĥoj preskaŭ ĉiuj kunveturis Memfison petegi la faraonon pri helpo kontraŭ la ribelantaj kamparanoj. Sed ĉar Ramzes XIII rekomendis al ili paciencon, kaj ne mallaŭdis la popolaĉon, la grandaj sinjoroj komencis interkonsiliĝi kun la pastra partio.

Vere estas, ke Herhor ankaŭ silentis, aŭ ankaŭ konsilis al ili paciencon, sed aliaj ĉefpastroj rakontis, ke Ramzes estas freneza, kaj malklare komprenigis, ke oni devas forigi lin de la povo.

En Memfiso ambaŭ partioj vagis unu apud la alia. Malpiuloj, kiuj trinkis, bruis, ĵetis koton sur la murojn de la temploj, eĉ sur la statuojn; kaj piuloj, plejparte maljunuloj kaj virinoj, kiuj preĝis en la stratoj, laŭte antaŭdirante malfeliĉojn kaj petegante la helpon de la dioj. La malpiuloj ĉiutage faris ian trouzon, inter la piuloj ĉiutage iu malsanulo retrovis la sanon.

Sed stranga afero: ambaŭ partioj, malgraŭ la bolantaj pasi-

oj, ne malutilis, ne atakis unu la alian. La kaŭzo estis, ke ĉiu el ili faris malordon laŭ direkto kaj plano, preparita per la superuloj.

La faraono, ne kolektinte ankoraŭ regimentojn kaj pruvojn kontraŭ la pastroj, ne donis la signalon al la decida atako kontraŭ la temploj; la pastroj, ŝajnis, atendis ion. Estis tamen videble, ke hodiaŭ ili ne sentas sin plu tiel malfortaj, kiel en la unua tago post la voĉdono de la delegitoj. Ramzes mem komencis mediti, kiam de ĉiuj flankoj oni sciigis al li, ke la pastraj kamparanoj preskaŭ tute ne partoprenas en la malordoj, sed laboras.

”Kion tio signifas? — demandis la faraono sin mem. Ĉu la nudaj kapoj pensas, ke mi ne kuraĝos ataki la templojn, aŭ ĉu ili havas iajn nekonatajn de mi defendajn rimedojn?”

La 19-an de Paofi la polico konigis al la monarĥo, ke en la lasta nokto la popolo komencis detrui la murojn, ĉirkaŭantaj la templon de Horus.

—Ĉu vi ordonis al ili tion fari? — demandis la faraono la ĉefon.

—Ne. Ili ĵetis sin je sia propra impulso ...

—Haltigu ilin delikate ... haltigu ... — diris la sinjoro. — Post kelke da tagoj ili povos fari, kio plaĉos al ili. Sed nun ili ankoraŭ ne agu tro vivege ...

Ramzes XIII, kiel militestro kaj venkinto apud Sodaj Lagoj, sciis, ke kiam unu fojon la amasoj iras al la atako, nenio haltigos ilin: ili devas rompi aŭ esti rompitaĵoj. Se la temploj ne defendos sin, la popolaĉo sukcesos preni ilin, sed se ili volos sin defendi?... La popolo forkuros kaj oni devos sendi tien soldatojn ili estis multenombraj, estas vere, sed ne tiel, kiel estis necese laŭ la kalkuloj de la faraono.

Krom tio, Hiram ne revenis ankoraŭ de Pi-Bast kun la leteroj, pruvantaj la perfidon de Herhor kaj Mefres. Kaj pli grave estis, ke la pastroj, partianoj de la faraono, devis doni helpon al la armeo ne pli frue ol la 23-an de Paofi. Kiel do averti ilin en tiom da temploj, tiel malproksimaj unu de alia? Kaj ĉu simpla singardemo ne ordonis eviti rilatojn kun ili, por ne perfidi ilin?

Pro ĉiuj ĉi motivoj Ramzes ne deziris pli fruan atakon de la popolo kontraŭ la temploj.

Tamen malgraŭ la volo de la faraono la ekscito kreskis. Apud la templo de Izido oni mortigis kelke da piuloj, kiuj antaŭdiris malfeliĉojn por Egipto, aŭ mirakle retrovis la sannon. Apud la templo de Ptah la popolaĉo sin ĵetis kontraŭ procesio, batis la pastrojn kaj rompis la sanktan ŝipeton, en kiu vojaĝis la statuo de la dio. Preskaŭ samtempe venis kurieroj de la urboj Soĥem kaj Anu kun la sciigo, ke la popolo volas superforte eniri en la templojn, kaj en Ĥeran eĉ faris tion kaj sakrilegis la sanktejon.

Vespere, preskaŭ kaŝante sin, venis en la palacon de lia sankteco deputataro de la pastroj. La respektindaj pastroj kun ploro falis al la piedoj de la estro, petegante, ke li ŝirmu la diojn kaj templojn.

Ĉi tiu tute neatendita okazo plenigis la koron de Ramzes per granda ĝojo kaj ankoraŭ pli granda fiero. Li ordonis al la delegitoj leviĝi kaj favore respondis, ke liaj regimentoj ĉiam estas pretaj defendi la templojn, se nur ili estos tien enkondukitaj.

—Mi ne dubas — diris li — ke la detruantoj mem forkuros, vidante ke la domoj de la dioj estas okupitaj per la armeo.

La delegitoj ŝanceliĝis.

—Via sankteco scias — respondis la plej aĝa — ke la armeo ne povas eniri inter la ĉirkaŭbaron de la temploj ... Ni do devas demandi la opinion de la ĉefpastroj.

—Bone, konsiliĝu — diris la sinjoro. — Mi ne scias fari miraklojn kaj de nia palaco mi ne povas defendi la templojn.

La delegitoj malĝojaj forlasis la faraonon, kiu post ilia foriro kunvokis privatan konsilan kunvenon. Li estis konvinkita, ke la pastroj submetiĝos al lia volo, kaj tute ne venis al li la penso, ke la delegitaro estas ruzo, aranĝita de Herhor, por erarigi lin.

Kiam en la reĝa ĉambro kunvenis la civilaj kaj militaj alt-ranguloj, Ramzes, plena de fiero, ekparolis:

—Mi volis — diris li — nur la 23-an de Paofi okupi la memfisajn templojn ... Sed mi opinias, ke pli bone estos fari tion morgaŭ ...

—Niaj regimentoj ankoraŭ ne kolektiĝis ... — intermetis Tutmozis.

—Kaj ni ne havas la leterojn de Herhor al Asirianoj — aldonis la granda skribisto.

—Ne grave! — respondis la faraono. — La popolo eksciuj morgaŭ, ke Herhor kaj Mefres estas perfiduloj; al la nomarĥoj kaj pastroj ni montros la pruvojn post kelke da tagoj, kiam Hiram revenos de Pi-Bast.

—La nova ordono de via sankteco tre ŝanĝas la antaŭan planon — diris Tutmozis. — Morgaŭ ni ne okupos Labirinton ... Kaj se ankaŭ en Memfiso la temploj kuraĝus kontraŭstari, ni ne havas murrompilojn por rompi la pordojn ...

—Tutmozis — diris la faraono — mi povus ne doni klarigojn pri miaj ordonoj ... Sed mi volas konvinki vin, ke mia koro pli profunde juĝas la fluon de la okazoj ... La popolo —

daŭrigis li — jam hodiaŭ atakas la templojn, morgaŭ ĝi volos penetri en ilin. Se ni ne subtenos ĝin, ĝi estos forpuŝita, kaj en ĉiu okazo post tri tagoj ĝi ne havos plu kuraĝon. Post kelke da tagoj povas pligrandiĝi la nombro de pastraj piartianoj inter la popolo ... Entuziasmo kaj timo estas kvazaŭ vino en kruĉo: ju pli multe oni elverŝas, des pli malmulte restas, kaj nur tiu povas trinki, kiu ĝustatempe alŝovos sian glason. Se do hodiaŭ la popolo estas preta al la atako kaj la malamikoj timigitaj, ni profitu tion, ĉar mi diras al vi, ke la fortune povas post kelke da tagoj forlasi nin, eĉ sin turni kontraŭ ni ...

—La nutraĵo ankaŭ finiĝas — intermetis la trezoristo. — Post tri tagoj la popolaĉo devas reveni al la laboro, ĉar ni ne povos plu nutri ilin senpage ...

—Vi vidas!... — diris la faraono al Tutmozis. — Mi mem ordonis al la ĉefo de la polico, ke li haltigadu la popolaĉon. Sed se oni ne povas ĝin deteni, oni devas uzi la movadon. La sperta maristo ne batalas kontraŭ la fluo, nek kontraŭ la vento, sed li permesas al ili, ke ili portu lin en la elektita direkto ...

En ĉi tiu momento venis kuriero kun novaĵo, ke la popolo sin ĵetis kontraŭ la eksterlanduloj. Oni atakis Grekojn, Sirianojn kaj precipe Fenicianojn ... Oni rabis multe da butikoj kaj mortigis kelke da homoj.

—Jen estas la pruvo — ekkriis la monarĥo kun indigno — ke oni ne devas dekonduki la amasojn de la montrita vojo!... Morgaŭ la regimentoj estu proksime de la temploj ... Kaj ili tuj enmarŝu tien, se la popolo komencos penetri tien, aŭ ... se ĝi komencos cedi sub la premo. Estas vere, ke oni devas ŝirkolekti en la monato Paofi. Sed ĉu ekzistas ĝardenisto, kiu lasus la fruktojn sur trunketoj, se ili estus maturaj unu mona-

ton pli frue?... Mi ripetas: mi volis malfruigi la movadon de la popolaĉo, ĝis kiam niaj preparoj estos finitaj. Sed ĉar oni ne povas nun prokrasti, ni profitu la venton, kiu blovas, kaj ni disetendu la velojn!... Morgaŭ Herhor kaj Mefres devas esti arestitaj kaj alkondukitaj en la palacon. Kun Labirinto ni finos post kelke da tagoj.

La membroj de la kunveno konsentis, ke la decido de la faraono estas bona, kaj disiris, admirante lian decidemon kaj saĝon. Eĉ la generaloj diris, ke pli bone estas profiti la okazon, ol kolekti la fortojn por la tempo, kiam la okazo forpasos.

Jam estis nokto. Alkuris alia kuriero de Memfiso kun novaĵo, ke la polico sukcesis ŝirmi la eksterlandulojn. Sed la popolo estas ekscitita, kaj oni ne scias, kion ĝi entreprenos morgaŭ.

De ĉi tiu momento. unu kuriero venis post alia. Unuj alportis sciigojn, ke grandaj amasoj da kamparanoj, armitaj per hakiloj kaj bastonegoj, de ĉiuj flankoj rapidas al Memfiso. Aliaj anoncis, ke en la ĉirkaŭaĵo: de Peme, Soĥem kaj On la popolo forkuras en la kampojn, kriante, ke margaŭ estos fino de la mondo. Alia kuriero alportis leteron de Hiram, ke li tuj venos. Alia konigis, ke la pastraj regimentoj sekrete marŝas al Memfiso kaj, kio estas pli grava, ke de Supra Egipto iras grandaj taĉmentoj de popolo kaj soldatoj, malamikaj al Fenicianoj kaj eĉ al lia sankteco.

”Antaŭ ol ili venos — pensis la faraono — mi jam havos en miaj manoj la ĉefpastrojn kaj eĉ la regimentojn de Nitager ... Ili malfruis je kelke da tagoj ...”

Fine oni komunikis, ke en diversaj lokoj la soldatoj kaptis alivestitajn pastrojn, kiuj penis penetri en la palacon de lia sankteco, kredeble kun malbonaj intencoj.

—Oni alkonduku ilin al mi — respondis la faraono kun rido. — Mi volas vidi tiujn, kiuj kuraĝas havi malbonajn intencojn kontraŭ mi!...

Ĉirkaŭ noktomezo, la respektinda reĝino Nikotris postulis aŭdiencon de lia sankteco.

La nobla sinjorino estis pala kaj tremanta. Ŝi ordonis al la oficiroj eliri el la reĝa ĉambro kaj restinte sola kun la faraono, diris plorante:

—Mia filo, mi alportas al vi tre malbonajn antaŭdirojn ...

—Mi preferus, reĝino, aŭdi detalajn sciigojn pri la fortoj kaj intencoj de miaj malamikoj ...

—Hodiaŭ vespere la statuo de la dio Izido en mia preĝoĉambro deturnis la vizaĝon al la muro, kaj la akvo en la sankta cisterno ruĝiĝis, kiel sango ...

—Tio pravas — respondis la faraono — ke en la interno de la palaco ni havas perfidulojn. Sed ili ne estas tre danĝeraj, se ili scias nur malpurigi la akvon kaj turni la statuojn.

—Ĉiuj niaj servistoj — daŭrigis la reĝino — la tuta popolo estas konvinkita, ke se viaj regimentoj penetros en la templojn, granda malfeliĉo falos sur Egipton ...

—Pli granda malfeliĉo — diris la sinjoro — estas la trokuraĝo de la pastroj. Enlasitaj de mia eterne vivanta patro en la palacon, ili pensas hodiaŭ, ke ili fariĝis ĝiaj posedantoj ... Sed pro dioj, kio mi fine fariĝos ĉe ilia ĉiopoveco!... Kaj ĉu mi ne povas repostuli miajn reĝajn rajtojn?...

—Almenaŭ ... almenaŭ — diris la reĝino post pripenso — estu kompatema ... Jes, la rajtojn vi devas reakiri, sed ne permesu al viaj soldatoj sakrilegi la sanktejojn kaj ataki la pastrojn ... Memoru, ke la dioj favore sendas la ĝojon al Egipto, kaj la pastroj malgraŭ siaj mankoj (kiu ne havas ilin!) faras al

la lando grandegajn servojn ... Imagu nur, ke se vi malriĉiĝus kaj dispelus ilin, vi detruus la saĝon, kiu levis nian ŝtaton super la aliajn popolojn ...

La faraono prenis la patrinon je ambaŭ manoj, kisis ŝin kaj ridante diris:

—La virinoj ĉiam devas troigi!... Vi, patrino, parolas al mi, kvazaŭ mi estus ĉefo de la sovaĝaj Hiksosoj, ne la faraono ... Ĉu mi deziras la pereon de la pastroj?... Ĉu mi malamas ilian saĝon, eĉ tiel senfruktan, kiel la observado de la movoj de la steloj, kiuj sen mi promenas sur la ĉielo, ne pliriĉigante nin eĉ per unu uteno! ... Ne kolerigas min ilia saĝo aŭ pieco, sed la mizero de Egipto, kiu interne malgrasiĝas de la malsato kaj ekstere timas iajn ajn asiriajn minacojn. La pastroj, malgraŭ la saĝo, ne sole ne volas helpi miajn reĝajn intencojn, sed tute senhonte kontraŭstaras al mi. Permesu do, patrino, al mi konvinki ilin, ke ne ili, sed mi estas la sinjoro de mia heredaĵo. Mi ne scius venĝi al humilaj, sed mi piedpremos la nukojn de la trobravaj. Ili scias pri tio, sed ne kredas ankoraŭ kaj ne havante realajn fortojn, volas timigi min per antaŭdiro de iu katastrofo. Tio estas ilia lasta armilo kaj ŝirmo ... kaj tiam eĉ unu ŝtono de iliaj temploj ne falos, ne perdiĝos eĉ unu juvelo de iliaj trezorejoj. Mi konas ilin!... Hodiaŭ ili faras bravajn gestojn, ĉar mi estas malproksime de ili. Sed kiam mi etendos mian bronзан manon, ili falos sur la vizaĝon kaj la tuta malordo finiĝos per paco kaj ĝenerala prospero.

La reĝino ĉirkaŭprenis la piedojn de la sinjoro kaj foriris trankviligita, petegante tamen Ramzeson, ke li respektu la diojn kaj estu kompatema al iliaj servistoj.

Post la foriro de la patrino la faraono alvokis Tutmozison.

—Morgaŭ do — diris la sinjoro — miaj soldatoj okupos la

templojn. Avertu la kolonenojn, ke mia volo estas, ke la sanktejoj restu netuŝitaj kaj ke neniu levu la manon kontraŭ la pastroj.

—Eĉ kontraŭ Meres kaj Herhor? — demandis Tutmozis.

—Eĉ kontraŭ ili — respondis la faraono. — Ili estos sufiĉe punitaj, kiam forigitaj de la nunaj postenoj ili ekloĝos en la temploj kun saĝuloj por preĝi kaj sen malhelpo studi la saĝon

...

—Estos, kiel ordonas via sankteco ... kvankam ...

Ramzes levis supren la fingron, kiel signon, ke li volas aŭskulti nenian proponon ... Poste, por ŝanĝi la temon, li diris kun rideto:

—Ĉu vi memoras, Tutmozis, la manovrojn apud Pi-Bailos?... Du jaroj jam pasis!... Kiam mi koleris en tiu kontraŭ la trouzoj kaj avideco de la pastroj, ĉu mi povis supozi, ke tiel baldaŭ mi reguligos kun ili la kontojn?... Kaj la malfeliĉa Sara ... Kaj mia malgranda filo ... Kiel bela li estis!...

Du larmoj ruliĝis sur la vizaĝo de la faraono.

—Vere — diris li — se mi ne estus filo de la dioj, kiuj estas kompatemaj kaj grandanimaj, miaj malamikoj pasigus morgaŭ malfacilajn horojn ... Kiom da humiligoj ili kaŭzis al mi ... Kiom da fojoj, pro ili, ploro vualis miajn okulojn!...

ĈAPITRO DEKSESA

La 20-an de Paofi Memfiso havis aspekton kvazaŭ en festo. Ĉesis ĉiuj laboroj, eĉ la portistoj ne portis ŝarĝojn. La tuta popolo disfluis sur la placoj kaj stratoj aŭ amasiĝis ĉirkaŭ la temploj, precipe ĉirkaŭ tiu de Ptah, kiu estis plej bone fortigita, kaj kie kunvenis la pastraj kaj civilaj altranguloj, prezidataj de Herhor kaj Mefres.

Proksime de la temploj staris la regimentoj, en maldensaj vicoj, por ke la soldatoj povu komunikiĝi kun la popolo.

Inter la popolaĉo kaj soldatoj rondiris multenombraj vendistoj kun pano en korboj kaj kun vino en kruĉoj kaj ledaj sakoj. Ili regalis la popolon senpage. Kiam oni demandis ilin, kial ili ne postulas pagon, unuj respondis, ke lia sankteco regalas siajn regnantojn, aliaj diris:

—Manĝu kaj trinku, fidelaj Egiptanoj, ĉar oni ne scias, ĉu ni ĝisvivos la morgaŭon!...

Tio estis la vendistoj de la pastra partio.

Rondiris multe da agentoj provokantoj. Unuj rakontis al la aŭskultantoj, ke la pastroj ribelas kontraŭ la monarĥo kaj eĉ volas lin veneni, ĉar li promesis al la popolo la sepan tagon de ripozo. Aliaj murmuretis, ke la faraono freneziĝis kaj kunĵuris kun eksterlanduloj por pereigi la templojn kaj Egipton. Tiuj instigis la popolon ataki la templojn, kie la nomarĥoj diskutas kun la pastroj, kiel ekspluati la metiistojn kaj kam-

paranojn. Ĉi tiuj esprimis timon, ke se oni atakus la templojn, povus okazi granda malfeliĉo ...

Malgraŭ tio, oni ne scias, de kie apud la muroj de la templo de Ptah troviĝis kelke da potencaj palisoj kaj amasoj da ŝtonoj.

La gravaj memfisaj komercistoj, promenante en la popolamasoj, tute ne dubis, ke la popola eksplodo estis provokita arte. La malgrandaj skribistoj, policistoj, oficiroj de la laboristoj kaj alivestitaj soldataj dekestroj ne kaŝis plu siajn oficialajn okupojn, nek sian intencon puŝi la popolon al la okupo de la temploj. Aliflanke: la paraŝitoj, almuzuloj, templaj servistoj kaj malsuperaj pastroj, eĉ se ili dezirus, ne povus kaŝi, ke ili ankaŭ instigas la popolaĉon al la superforto! Ĉiu, kiu havis okulojn, povis tion rimarki.

La prudentaj urbanoj estis mirigitaj per tia konduto de la pastra partio, kaj la hieraŭa fervoro de la popolo komencis estingiĝi. La aŭtoĥtonaj Egiptanoj ne povis kompreni: kio estas la celo kaj kiu efektive provokas la ribelon? La ĥaoso pligrandiĝis dank'al duone frenezaj fanatikuloj, kiuj kuris nudaj tra la stratoj kaj sange vundante sian korpon kriis:

—Ve al Egipto!... La sendieco trapasis la mezuron, kaj proksimiĝas la horo de la juĝo! La dioj montros sian forton kontraŭ la malpieco de la malfideluloj!

La armeo restis trankvila, atendente ĝis kiam la popolo komencos superforte penetri en la templojn. Unuflanke, tian ordonon ili ricevis de la reĝa palaco, duaflanke, la oficiroj antaŭvidis embuskojn en la temploj kaj preferis, ke pereu la popolaĉo, ol la soldatoj. La soldatoj, sen tio, havos sufiĉe da laboro.

Sed la popolamasoj, malgraŭ la krioj de la agitantoj kaj la

vino senpage disdonata, ŝanceliĝis: la kamparanoj rigardis la metiistojn, la metiistoj la kamparanojn, kaj ĉiuj atendis ion.

Subite, ĉirkaŭ la unua horo tagmeze, el la flankaj stratoj ekfluis al la templo de Ptah ebria bando, armita per hakiloj kaj bastonegoj. Tio estis fiŝistoj, grekaj maristoj, paŝtistoj, libiaj vaguloj, eĉ malliberuloj de la minejoj de Turra. En la fronto de la bando iris grandega laboristo kun torĉo. Li haltis antaŭ la pordego de la templo kaj per potenca voĉo komencis krii al la popolo:

—Ĉu vi scias, fideluloj, pri kio diskutas ĉi tie la ĉefpastroj kaj nomarĥoj?... Jen, ili volas devigi lian sanktecon, ke li forprenu de la laboristoj po unu hordean platan kukon tage, kaj la kamparanojn ŝarĝu per nova imposto ĉiun po unu draĥmo ... Kaj tial mi diras al vi, ke vi estas malsaĝaj kaj malnoblaj, starante ĉi tie kun krucitaj brakoj!... Oni devas fine kapti la rajton de la temploj kaj transdoni ilin en la manojn de nia sinjoro, la faraono, kontraŭ kiu komplotas la malpiuloj! Ĉar se nia estro devus cedi al la pastra kolegio, kiu defendos la honestan popolon?...

—Li diras la veron!... — oni kriis en la amaso. — La sinjoro ordonos doni al ni la ripozon de la sepa tago.

—Kaj donacos al ni terojn ...

—Li ĉiam estas bonvola por la simpluloj ... Ĉu vi memoras, kiel antaŭ du jaroj li liberigis la kamparanojn, arestitajn post la atako kontraŭ la bieno de la Hebreino?

—Mi mem vidis, kiel antaŭ du jaroj li batis skribiston, kiu kolektis de la kamparanoj maljustan imposton.

—Vivu eterne nia sinjoro, Ramzes XIII, la protektanto de la premataj!...

—Rigardu — eksonis voĉo de malproksime — la brutaro mem revenas de la paŝtejoj, kvazaŭ proksimiĝus la vespero ...

—Lasu la brutojn ... Antaŭen kontraŭ la pastroj!...

—Vi tie — ekkriis la grandegulo antaŭ la pordego.

—Propravole malfermu al ni, por ke ni konvinkiĝu, pri kio diskutas la ĉefpastroj kun la nomarĥoj ...

—Malfermu!... alie ni rompos la pordegon!...

—Stranga afero — oni parolis de malproksime — la birdoj kuŝiĝas por dormi ... Estas ja nur tagmezo ...

—Io malbona fariĝas en la aero ...

—Dioj! la nokto jam falas, kaj mi ne kolektis ankoraŭ salaton por la tagmanĝo ... — miris iu knabino.

Sed ĉi tiujn rimarkojn sufokis krioj de la ebria bando kaj la bruo de la palisoj, batantaj la kupran pordegon de la templo.

Se la popolamaso estus malpli okupita per la agoj de la atakantoj, ĝi jam rimarkus en la naturo ian eksterordinaran fenomenon. La suno lumis, sur la ĉielo estis neniun nubeto, kaj malgraŭ tio la taga lumo komencis malgrandiĝi kaj blovis malvarmeta vento.

—Donu ĉi tien ankoraŭ unu palison!... — kriis la atakantoj.

— La pordo cedas!...

—Forte!... ankoraŭ unu fojon!...

La rigardanta amaso bruis, kiel fulmotondro ... Tie ĉi kaj tie komencis foriĝi de ĝi malgrandaj grupoj kaj kuniĝi kun la atakantoj. Fine la tuta popola amaso malrapide proksimiĝis al la templo.

Kvankam estis tagmezo, la krepusko pligrandiĝis; en la templo de Ptah komencis kanti kokoj. Sed la furiozo de la

popolo estis jam tiel granda, ke malmultaj rimarkis la sangojn.

—Rigardu! — kriis almozulo — jen proksimiĝas la tago de juĝo ... Dioj ...

Li volis daŭrigi, sed ekbatita per bastono je la kapo falis sur la loko.

Sur la murojn de la templo komencis grimpi homoj nudaj, sed armitaj. La oficiroj alvokis la soldatojn al la armiloj, certaj, ke baldaŭ oni devos subteni la atakon de la popolaĉo.

—Kion tio signifas ... — murmuretis la soldatoj, rigardante la ĉielon. — Oni ne vidas nubojn, tamen la mondo havas aspekton kvazaŭ dum la ventego?...

—Batu!... rompu!... — oni kriis antaŭ la templo. La bruo de la palisoj sonis pli kaj pli ofte.

En ĉi tiu momento sur la teraso super la pordego aperis Herhor, ĉirkaŭita de sekvantaro de pastroj kaj civilaj altranguloj. La plej nobla ĉefpastro havis oran diservan veston kaj ĉapon de Amenhotep, ĉirkaŭitan de la reĝa ureuso.

Herhor ekrigardis la grandegan popolamason, kiu sieĝis la templon kaj sin klininte al la atakanta bando, diris:

—Kiu ajn vi estas, fideluloj aŭ idoloj, en la nomo de la dioj mi alvokas vin lasi la templon trankvila ...

La tumulto eksilentis kaj oni aŭdis nur la batadon de la palisoj kontraŭ la kupra pordego. Sed baldaŭ ankaŭ tio ĉesis.

—Malfermu la pordegon! — kriis de malsupire la grandegulo. — Ni volas konvinkiĝi, ĉu vi ne konspiras perfidon kontraŭ nia sinjoro ...

—Mia filo — respondis Herhor — falu sur la vizaĝon kaj petegu la diojn, ke ili pardonu al vi la sakrilegon ...

—Vi mem petu la diojn, ke ili ŝirmu vin!... — ekkriis la ĉefo

de la bando kaj preninte ŝtonon, ĵetis ĝin supren al la ĉefpastro.

En la sama momento, el la fenestro de la pilono falis sur la vizaĝon de la grandegulo io, kvazaŭ maldika akva strio. La gvidanto de la bando ekŝanceliĝis, baraktis per la manoj kaj falis.

Liaj plej proksimaj najbaroj eligis krion de teruro; la pli malproksimaj vicoj, ne sciante, kio okazis, respondis per ridoj kaj malbenoj.

—Rompu la muron!... — oni kriis de malproksime, kaj ŝtonoj, kvazaŭ hajlo flugis al Herhor kaj lia sekvantaro.

Herhor levis ambaŭ manojn al la ĉielo. Kaj kiam la amasoj ree eksilentis, la ĉefpastro ekkriis per forta voĉo:

—Dioj, sub vian protekton mi transdonas la sanktejojn, kiujn minacas perfidaj blasfemuloj ...

Post unu momento, ie super la templo, eksonis superhoma voĉo:

—Mi deturnas mian vizaĝon de la malbenita popolo kaj mallumo falu sur la teron.

Kaj okazis afero terura: kun la malbenaj vortoj, la suno estis perdanta sian brilon!... Kaj post la lasta vorto fariĝis mal-lume, kiel nokte. Sur la ĉielo ekbrilis la steloj, kaj la lokon de la suno okupis nigra disko, ĉirkaŭita per ringo de flamoj.

Terura krio elŝiriĝis el cent mil brustoj. La atakantoj rompantaj la pordegon, ĵetis la palisojn, la kamparanoj falis teren ...

—Jen venis la tago de la juĝo kiaj morto! ... — ekkriis ĝema voĉo, el fino de la strato.

—Dioj, kompaton!... Sankta viro, deturnu la katastrofon!... — kriis la popolo.

—Ve al la soldatoj, kiuj plenumas la ordonojn de sendiaj ĉefoj!... — kriis la potenca voĉo de la templo.

Responde la tuta popolo falis sur la vizaĝon, kaj en du regimentoj antaŭ la templo ekregis malordo. La vicoj rompiĝis, la soldatoj komencis ĵeti la armilojn kaj kiel frenezaj forkuri al la rivero. Unuj, kurante kiel blindaj, en la mallumo sin frakasis je la muroj de la domoj, aliaj falis sur la pavimon, kaj iliaj kunuloj morte piedpremis ilin. Post kelke da minutoj, anstataŭ densaj kolonoj, kuŝis sur la placo diŝjetitaj lancoj kaj hakiloj, kaj ĉe la eniro en la stratojn — altaj amasoj da vunditoj kaj kadavroj.

Neniu perdita batalo finiĝis per tia katastrofo.

—Dioj! ... dioj!... — ĝemis kaj ploris la popolo — ekkompatu la senkulpajn ...

—Oziriso! ... — ekkriis de la teraso Herhor — ekkompatu la popolon kaj montru vian vizagon al la malfeliĉuloj ...

—Lastfoje mi plenumos la petojn de miaj pastroj, ĉar mi estas kompatema ... — respondis la superhoma voĉo de la templo.

En la sama momento la mallumo forkuris, kaj la suno reakiris sian brilon.

Nova krio, nova ploro, novaj preĝoj eksonis en la popolamasoj. Ebriaj de ĝojo la homoj salutis la reviviĝantan sunon. Nekonatoj sin ĵetis en la brakoj unuj de aliaj, kelke da personoj mortis, kaj ĉiuj surgenue rampis al la templo, por kisi ĝiajn sanktajn murojn.

Sur la supro de la pordego staris la plej nobla Herhor. Lia rigardo, dronis en la ĉielo, kaj du pastroj subtenis liajn sanktajn manojn, per kiuj li dispelis la mallumon kaj savis sian popolon de la pereco.

Samaj scenoj, kun malgrandaj ŝanĝoj, okazis en la tuta Malsupra Egipto. En ĉiu urbo, la 20-an de Paofi, la popolo kolektiĝis antaŭ la temploj; en ĉiu urbo ĉirkaŭ la tagmezo iu bando atakis la sanktan pordegon. Ĉie, ĉirkaŭ la unua horo, super la pordego aperis la ĉefpastro de la templo kun sekvantaro, malbenis la malpiulojn, kaj faris mallumon. Kaj kiam la popolo forkuris en paniko aŭ falis teren, la ĉefpastroj preĝis al Oziriso, ke li montru sian vizaĝon, kaj la taga lumo revenis sur la teren.

Tiamaniere, dank'al la mallumiĝo de la suno, la plena de saĝo pastra partio ekŝancelis la aŭtoritaton de la faraono eĉ en Malsupra Egipto. En la daŭro de kelke da minutoj la registaro de la faraono troviĝis, eĉ ne sciante pri tio, ĉe la bordo de la senfundaĵo. Savi ĝin povis nur granda inteligento kaj detala kompreno de la situacio. Sed tio jam mankis en la reĝa palaco, kie ĝuste en la malfacila momento komencis ĉiopova regado de la okazo.

La 20-an de Paofi lia sankteco leviĝis kun la suno kaj, por esti pli proksime de la teatro de la agado, li transloĝiĝis el la ĉefa palaco en somerdomon, apenaŭ unu horon de piedira voja de Memfiso. La domo havis ĉe unu flanko la kazernojn de la aziaj regimentoj, ĉe la alia la palacon de Tutmozis kaj de lia edzino, la bela Hebron. Kun la sinjoro venis tien la fidelaj partianoj de Ramzes kaj la unua regimento de la gvardio, al kiu la faraono konfidis senlime.

Ramzes XIII havis bonegan humoron. Li banis sin, matenmanĝis kun apetito kaj komencis akcepti la kurierojn, kiuj ĉiun kvaronhoron venis de Memfiso.

Iliaj raportoj estis tede unuonaj. La ĉefpastroj kaj kelke da nomarĥoj sin enfermis en la templo de Ptah. La armeo estas

plena de kuraĝo, la popolo ekscitita. Ĉiuj benas la faraonon kaj atendas la ordonon al la atako.

Kiam je la 9-a horo kvara kuriero ripetis la samajn vortojn, la faraono sulkigis la brovojn.

—Kion ili atendas? — demandis la sinjoro. — Ili ataku senprokraste.

La kuriero respondis, ke ne kolektiĝis ankoraŭ la ĉefa bando, kiu devas ataki la templon kaj rompi la kupran pordegon.

Ĉi tiu klarigo ne plaĉis al la sinjoro. Li skuis la kapon kaj sendis oficiron, por plirapidigi la atakon.

—Kion signifas ĉi tiu prokrasto? — demandis li. — Mi pensis, ke miaj regimentoj vekos min per la sciigo, ke la templo estas prenita ... En similaj okazoj la rapideco de la agado estas ĉefa kondiĉo de la sukceso.

La oficiro forveturis, sed apud la templo de Ptah nenio ŝanĝiĝis. La popolo atendis ion, la ĉefa bando ne venis ankoraŭ.

Oni povis supozi, ke iu alia volo malfruigas la plenumon de la ordonoj.

Je la deka horo matene al la somerdomo de la faraono venis la portilo de reĝino Nikotris. La respektinda sinjorino preskaŭ superforte penetris en la ĉambron de la filo kaj kun ploro falis al liaj piedoj.

—Kion vi postulas, patrino? — diris Ramzes, apenaŭ kaŝante la malpaciencon. — Ĉu vi forgesis, ke en tendaro ne estas loko por la virinoj?...

—Hodiaŭ mi ne moviĝos de ĉi tie, mi ne forlasos vin eĉ dum unu momento!... — ekkriis ŝi. — Estas vere, ke vi estas la filo de Izido kaj ke ŝi ĉirkaŭas vin per sia protekto ... Sed malgraŭ tio mi mortus de maltrankvilo ...

—Kio minacas min? — demandis la faraono, levante la ŝultrojn.

—La pastro, kiu observas la stelojn — daŭrigis la reĝino kun ploro — diris al unu el la servistinoj, ke se hodiaŭ ... se la hodiaŭa la tago pasos feliĉe por vi, vi vivos kaj regos cent jarojn ...

—Ah, ah! ... kie estas tiu konanto de mia sorto?

—Li forkuris Memfison ... — respondis la reĝino.

La faraono ekmeditis, poste li diris ridante:

—Kiel Libianoj apud Sodaj Lagoj ĵetis sur nin ŝtonojn, tiel hodiaŭ la pastraro sendas al ni minacojn ... Estu trankvila, patrino! La babilado estas malpli danĝera, ol la sagoj kaj ŝtonoj.

De Memfiso venis nova kuriero, ke ĉio iras bone, sed ke la ĉefa bando ne estas ankoraŭ preta.

Sur la bela vizaĝo de la faraono aperis signoj de kolero. Dezirante trankviligi la monarĥon, Tutmozis diris:

—La popolaĉo ne estas armeo. Ĝi ne scias kolektiĝi al destinita horo irante ĝi treniĝas kiel koto kaj ne obeas la komandon. Se al la regimentoj oni estus ordoninta okupi la templojn, ili jam estus tie ...

—Kion vi diras, Tutmozis? — ekkriis la reĝino. — Ĉu oni iam aŭdis, ke la egipta armeo ...

—Vi forgesis — interrompis la faraono — ke laŭ miaj ordonoj, la regimentoj ne devas ataki, sed defendi la templojn kontraŭ la atako de la popolaĉo ...

—Kaj tial malfruas nia agado — respondis malpacience Tutmozis.

—Jen la reĝaj konsilantoj! — eksplodis la reĝino. — La sin-

joro agas prudente, stariĝante kiel defendanto de la dioj, kaj vi, anstataŭ kvietigi lin, instigas al la supertorto ...

La sango leviĝis al la kapo de Tutmozis. Feliĉe, elvokis lin el la ĉambro adjutanto, sciigante, ke ĉe la pordego oni haltigis maljunulon, kiu volas paroli kun lia sankteco.

—Ĉe ni hodiaŭ — murmuretis la adjutanto — ĉiu sin puŝas al la sinjoro, kvazaŭ la faraono estus gastejmastro ...

Tutmozis pensis, ke tamen en la tempo de Ramzes XII ne niu kuraĝus tiel paroli pri la monarĥo ... Sed li ŝajnis, ke li ne atentis.

La maljunulo, kiun haltigis la gardistoj, estis la fenicia princo Hiram. Li portis kovritan de polvo soldatan mantelon, estis laca kaj kolera.

Tutmozis ordonis enlasi lin, kaj kiam ambaŭ troviĝis en la ĝardeno, li diris:

—Mi pensas, ke via nobleco sin banos kaj sanĝos la vestojn, antaŭ ol mi ricevos por vi aŭdiencon de lia sankteco?

La grizaj brovoj de Hiram stariĝis, liaj okuloj fariĝis ankoraŭ pli sangaj.

—Post tio, kion mi vidis — respondis li akre — mi povas eĉ ne postuli aŭdiencon ...

—Vi ja havas la leterojn de la ĉefpastroj al Asirio ...

—Por kio vi bezonas la leterojn, se vi repaciĝis kun la pastroj—

—Kion babilas via nobleco!... — eksplodis Tutmozis.

—Mi scias, kion mi parolas!... — diris Hiram. — Dekojn da miloj da talentoj vi eltiris de Fenicio, por liberigi, vi diris, Egipton de la pastra povo, kaj rekompence hodiaŭ vi rabas nin kaj mortigas ... Rigardu, kio okazas de la maro ĝis la unua

katarakto: ĉie via popolaĉo persekutas Fenicianojn, kiel hundojn, ĉar tio estas la ordono de la pastroj ...

—Vi frezeziĝis, Feniciano!... En ĉi tiu momento nia popolo prenas la templon de Ptah en Memfiso ...

Hiram eksvingis la manon.

—Ili ne prenos ĝin! — respondis li. — Vi trompas min aŭ vi mem estas trompitaĵ ... Vi devis antaŭ ĉio preni Labirinton kaj ĝian trezorejon, kaj ne pli frue ol la 23-an de Paofi ... Dume hodiaŭ vi malŝparas la fortojn apud la templo de Ptah, kaj Labirinto estas perdita ... Kio okazas ĉi tie?... Kie estas la prudento? — daŭrigis la ekscitita Feniciano!. — Por kio la atakoj kontraŭ malplenaj konstruaĵoj?... Ĉu vi atakas ilin, por ke oni pligrandigu la gardistaron de Labirinto!

—Ni prenos ankaŭ Labirinton! — interrompis Tutmozis.

—Nenion vi prenos, nenion!... Labirinton povis okupi nur unu homo, al kiu malhelpos viaj hodiaŭaj aventuroj en Memfiso.

Tutmozis haltis en la aleo.

—Kion vi aludas? — mallonge demandis li Hiramon.

—La malordon, kiu regas ĉe vi ... Vi ne estas plu registaro, sed amaso da oficiroj kaj altranguloj, kiun la pastroj pelas, kien ili volas kaj kiam ili volas ... De tri tagoj en la tuta Malsupra Egipto regas tia ĥaoso, ke la popolaĉo batas nin, Fenicianojn, viajn solajn amikojn ... Kaj kial?... Ĉar la povo elglitis el viaj manoj kaj jam kaptis ĝin la pastroj ...

—Vi parolas tiel, ĉar vi ne konas la situacion — respondis Tutmozis. — Vere estas, ke la pastroj implikas niajn aferojn kaj atakas Fenicianojn. Sed la povo estas en la manoj de la faraono, la ĝenerala fluo de la okazoj fariĝas laŭ liaj ordonoj ...

—Ankaŭ la hodiaŭa atako kontraŭ la templo de Ptah? — demandis Hiram.

—Jes. Mi mem ĉeestis privatan kunvenon, dum kiu la faraono ordonis okupi la templojn hodiaŭ, anstataŭ la 23-an ...

—Do — interrompis Hiram — mi anoncas al vi, ĉefo de la gvardio, ke vi estas perditaj ... Ĉar mi scias tute certe, ke la hodiaŭa atako estis decidita en la kunveno de la ĉefpastroj kaj nomarĥoj, la 13-an de Paofi en la templo de Ptah.

—Por kio ili decidus la atakon kontraŭ si mem? — demandis Tutmozis per moka tono.

—Sendube tion iel postulas iliaj aferoj. Kaj ke ili kondukas siajn aferojn pli bone ol vi, pri tio mi jam konvinkiĝis.

La interparoladon interrompis adjutanto, alvokanta Tutmozison al lia sankteco.

—Aŭskultu ankoraŭ!... — diris Hiram. — Viaj soldatoj arestis sur la vojo Pentueron, kiu havas ion gravan por diri al la faraono.

Tutmozis sin kaptis je la kapo kaj tuj sendis oficirojn, por ke ili trovu Pentueron. Poste li kuris al la faraono, kaj post momento revenis, kaj ordonis al la Feniciano sekvi lin.

Kiam Hiram eniris en la reĝan ĉambron, li trovis tie la reĝinon, grandan trezoriston, grandan skribiston kaj kelke da generaloj. Ramzes XIII, incitita, rapide pasis en la salono.

—Jen estas la malfeliĉo de la faraono kaj Egipto! — ekkriis la reĝino, montrante la Fenicianon.

—Respektinda sinjorino — respondis la nekonfuzita Hiram kun saluto — la tempo montros, kiu estas fidela kaj kiu malbona servisto de lia sankteco ...

Ramzes subite haltis antaŭ Hiram.

—Ĉu vi havas la leterojn de Herhor al Asirio?... — li demandis.

La Feniciano eltiris el sub la vesto paketon kaj silente transdonis ĝin al la faraono.

—Nur tion mi bezonis! — ekkriis kun triumfo la estro. — Oni devas tuj anonci al la popolo, ke la ĉefpastroj perfidis la ŝtaton ...

—Mia filo — interrompis la reĝino per peteganta voĉo — pro la ombro de la patro ... pro niaj dioj, prokrastu kelke da tagoj la anoncon ... Kun la donacoj de Feniciano oni devas estis tre singarda ...

—Via sankteco, — intermetis Hiram — povas eĉ bruligi la leterojn. Ili estas indiferentaj por mi.

La faraono pensis momenton kaj kaŝis la paketon sub la tuniko.

—Kion vi aŭdis en Malsupra Egipto? — demandis la sinjoro.

—Ĉie oni batas Fenicianojn — respondis Hiram. — Niaj domoj estas detruataj, mebloj ŝtelataj kaj jam oni mortigis kelkdekon da homoj.

—Mi aŭdis pri tio!... Tio estas la verko de la pastroj — diris la sinjoro.

—Prefere diru, mia filo, ke tio estas la sekvoj de la sendieco kaj rabemo de Fenicianoj — intermetis la reĝino.

Hiram sin deturnis de la reĝino kaj daŭrigis:

—De tri tagoj estas en Memfiso la poliestro de Pi-Bast, kun du helpantoj kaj ili jam estas sur la postesignoj de Likon ...

—Kiu estis edukita en la feniciaj temploj! — ekkriis reĝino Nikotris.

—De Likon — daŭrigis Hiram — kiun la ĉefpastro Mefres ŝtelis de la polico kaj tribunalo ... De Likon, kiu en Teboj, ŝajnigante vian sanktecon, kuradis nuda en la ĝardeno, kiel frenezulo ...

—Kion vi diras? — ekkriis la faraono.

—Via sankteco demandu la plej respektindan reĝinon, ĉar ŝi vidis lin ... — respondis Hiram.

—Jes — diris la reĝino — mi vidis tiun malnoblulon, sed mi diris nenion, por ŝpari al vi ĉagrenon ... Sed mi devas aldoni, ke neniuj havas pruvojn, ke Likon estis instigita de la pastroj; la samon povis fari Fenicianoj ...

Hiram ekridetis ironie.

—Patrino ... patrino!... — diris dolore Ramzes — ĉu en via koro la pastroj valoras pli multe ol mi?...

—Vi estas mia filo kaj mia plej kara sinjoro — respondis la reĝino kun ekscito — sed mi ne povas toleri, ke fremdulo ... idolano ... ĵetas kalumniojn sur la sanktan pastraron, de kie ni ambaŭ devenas ... Ho Ramzes!... — ekkriis ŝi, falante sur la genuojn — forpelu la malbonajn konsilantojn, kiuj vin puŝas al la sakrilego de la temploj, al atenco kontraŭ la posteulo de via avo Amenhotep! Estas ankoraŭ tempo ... estas ankoraŭ tempo por paco ... por savi Egipton ...

Subite eniris en la ĉambron Pentuer en disŝiritaj vestoj.

—Kion vi diros? — demandis la faraono kun stranga trankvilo.

—Hodiaŭ, eble tuj — respondis la pastro — estos mallumiĝo de la suno ...

La faraono posteniĝis de miro.

—Kio estas por ni la mallumiĝo de la suno, precipe en la nuna momento?

—Sinjoro — diris Pentuer — mi ankaŭ pensis tiel, antaŭ ol mi legis en la malnovaj kronikoj priskribojn de la mallumiĝoj ... Tio estas tiel terura fenomeno, ke oni devus averti la tutan popolon ...

—Jen!... — intermetis Hiram.

—Kial vi ne sciigis al ni pli frue? — demandis la pastron Tutmozis.

—Du tagojn la soldatoj tenis min arestita ... La popolon ni ne povos plu averti, sed sciigu almenaŭ al la regimentoj apud la palaco, por ke almenaŭ ili kontraŭstaru al la paniko.

—Ah, malbone, malbone!... — murmuretis Ramzes kaj aldonis laŭte: — Kio ĝi estos kaj kiam?...

—Tage fariĝos nokto ... — diris la pastro. — Ĝi devas daŭri, oni diras, tiom da tempo, kiom oni bezonas por iri kvincent paŝojn ... ĝi komenciĝos tagmeze ... Tiel diris al mi Menes ...

—Menes? — ripetis la faraono. — Mi konas la nomon, sed ...

—Li skribis pri tio leteron al via sankteco ... Sed avertu la regimentojn!...

Tuj eksonis la trumpetoj. La gvardio kaj Asirianoj stariĝis kun la armiloj, kaj la faraono, ĉirkaŭita de la stabo, sciigis pri la mallumiĝo, aldonante, ke ili ne devas timi, ĉar la mallumo tuj pasos, kaj li estos kun ili.

—Vivu eterne! — respondis la armitaj vicoj. Samtempe Memfison oni sendis kelke da plej inteligentaj kavaliroj.

La generaloj sin lokis en la fronto de la kolonoj, la faraono medite promenis sur la korto, la civilaj altranguloj mallaŭte murmuretis kun Hiram, kaj la reĝino Nikotris, kiu restis sola en la ĉambro, falis sur la vizaĝon antaŭ la statuo de Oziriso.

Estis jam post la unua horo, kaj efektive la lumo de la suno komencis malgrandiĝi.

—Ĉu vere estos nokto? — demandis la faraono Pentueron.

—Jes, sed tre mallongan tempon.

—Kaj la suno?

—Ĝi kaŝos sin post la luno ...

—Mi devas redoni mian favoron al la saĝuloj, kiuj esploras la stelojn ... — diris la sinjoro al si mem.

La krepusko rapide pligrandiĝis. La ĉevaloj de la Azianoj komencis maltrankviliĝi, aroj da birdoj falis sur la ĝardenon kaj kun laŭta pepado okupis ĉiujn arbojn.

—Kantu ion!... — ekkriis Kalipos al la Grekoj.

Ekbruis la tamburoj, ekajfis la flutoj kaj kun ilia akompano la greka regimento kantis la gajan kanton pri la timema filino de la pastro: ŝi tiel timis la fantomojn, ke ŝi povis dormi nur en la kazernoj.

Subite sur la flavajn libiajn altaĵojn falis malbonsigna ombro kaj kun fulma rapideco kovris Memfison, Nilon kaj la pacajn ĝardenojn. La nokto invadis la teron, kaj sur la ĉielo aperis disko, nigra kiel karbo kaj ĉirkaŭita per krono de flamoj.

Terura ekkrio mutigis la kanton de la greka regimento: la Azianoj ĵetis militan krion, sendante al la ĉielo nubon de saĝoj, por fortimigi la malbonan spiriton, kiu volas manĝi la sunon.

—Vi diras, ke la nigra disko estas la luno? — demandis la faraono Pentueron.

—Tiel asertas Meneso.

—Granda saĝulo li estas!... kaj la mallumiĝo tuj finiĝos?...

—Tute certe ...

—Kaj se la luno deŝiriĝus de la ĉielo kaj falus sur la teron?...

—Tio ne estas ebla ... Jen la suno!... — ekkriis Pentuer kun ĝojo.

Ĉiuj regimentoj kriis grandan aklamon por la honoro de Ramzes XIII.

La faraono ĉirkaŭprenis Pentueron.

—Vere — diris la sinjoiro — ni vidis strangan fenomenon ... Sed mi ne volus vidi ĝin duan fojon ... Mi sentas, ke se mi ne estus soldato, la timo ekregus mian koron.

Hiram proksimiĝis al la faraono kaj murmuretis:

—Sendu via ekscelenco kurieron Memfison, ĉar mi timas, ke la ĉefpastroj faris al vi ion malbonan ...

—Vi supozas?

Hiram balancis la kapon.

—Ili ne regus tiel longe la staton, — diris li — ne enterigus dek naŭ viajn dinastiojn, se ili ne scius profiti tiajn okazojn, kiel la hodiaŭa!...

Dankinte la armeon por ilia bona sintenado dum la eksterordinara fenomeno, la faraono revenis en la somerdomon. Li estis meditplena, parolis trankvile, eĉ delikate, sed sur lia bela vizaĝo estis legebla necerteco.

Efektive en la animo de Ramzes bolis terura batalo. Li komencis kompreni, ke la pastroj havas en la manoj fortojn, kiujn ne nur li ne atentis, sed eĉ pri kiuj li ne pensis, pri kiuj li ne volis aŭskulti.

La pastroj, observantaj la movojn de la steloj, en la daŭro de kelke da minutoj ekstreme grandiĝis en liaj okuloj. Kaj la faraono diris al si, ke tamen oni devas koni la strangan saĝon, kiu tiel terure implikas la homajn projektojn.

Kuriero, post kuriero estis sendata Memfison, por ekscii, kio okazis tie dum la mallumiĝo. Sed la kurieroj ne revenis, kaj super la reĝo kaj liaj konfidatoj la necerteco disetendis siajn nigrajn flugilojn. Ke io malbona okazis apud la templo de Ptah, pri tio ne sole neniu dubis, sed eĉ ne kuraĝis aŭskulti la proprajn konjektojn. Ŝajnis, ke la faraono kaj la liaj estas kontentaj de ĉiu minuto, kiu pasis sen novaĵo de tie.

Dume la reĝino Nikotris, sidiĝinte apud la sinjoro flustris al li:

—Permesu al mi agi, Ramzes ... La virinoj pli ol unu servon faris al nia ŝtato ... Rememoru nur la reĝinon Nikotris dum la sesa dinastio, aŭ la reĝinon Makara, kiu kreis la ŝiparon sur Ruĝa Maro?... Al nia sekso mankas nek saĝo, nek energio, permesu do al mi agi ... Se la templo de Ptah ne estas prenita, nek la personoj de la pastroj atakitaj, mi repacigos vin kun Herhor. Vi prenos kiel edzinon lian filinon, kaj via regado estos plena de gloro ... Memoru, ke via avo, la sankta Amenhotep, ankaŭ estis ĉepastro kaj vic-reĝo de la faraono, kaj ke vi mem eble ne regus hodiaŭ, se la pastraro ne dezirus havi la propran sangon sur la trono ... Tiel vi dankas ilin pro la povo?...

La faraono aŭskultis ŝin, sed senĉese pensis, ke tamen la saĝo de la pastroj estas grandega forto, kaj ke la batalo kontraŭ ili estas malfacila ...

Nur je la tria horo aperis la unua kuriero de Memfiso, — adjutanto de la regimento, kiu havis sian tendaron apud la templo. Li diris al la faraono, ke la templo ne estis prenita kaŭze de la kolero de la dioj, ke la popolo forkuris, la pastroj triumfas, ke eĉ en la armeo ekregis malordo dum la terura, kvankam mallonga nokto.

Poste, preninte Tutmozison flanken, li anoncis, ke la soldatoj estas demoralizitaj, ke post la panika forkuro ili havas tiom da vunditoj kaj mortigitoj, kiel post batalo.

—Kaj kia estas nun la stato de la armeo? — demandis la konsternita Tutmozis.

—Kompreneble — respondis la adjutanto — ni sukcesis kolekti kaj ordigi la soldatojn. Sed uzi ilin kontraŭ la temploj? pri tio oni ne povas eĉ pensi ... precipe nun, kiam la pastroj sin okupas per la flegado de la vunditoj ... Nun la soldato, vidante razitan kapon kun pantera felo, estas preta fali sur la vizaĝon, kaj multe da akvo forfluos, antaŭ ol iu kuraĝos transpaŝi la sanktan sojlon ...

—Kaj la pastroj?...

—Ili benas la soldatojn, nutras, donas al ili trinkaĵon kaj ŝajnigas, ke la armeo ne estis kulpa en la atako kontraŭ la temploj, ke tio estas la verko de Fenicianoj ...

—Kaj vi permesas tian demoralizon de la regimentoj? — ekkriis Tutmozis.

—Lia sankteco ja ordonis al ni defendi la pastrojn kontraŭ la popolaĉo ... — respondis la adjutanto. — Se oni permesus al ni okupi la templojn, ni jam estus tie de la deka horo, kaj la ĉefpastroj estus en la keloj.

Deĵoranta oficiro, sciigis al Tutmozis, ke ree iu pastro veninta de Memfiso, deziras paroli kun lia sankteco.

Tutmozis atente rigardis la gaston. Tio estis homo ankoraŭ juna, kun vizaĝo kvazaŭ skulptita en ligno. Li diris, ke li venas al la faraono de Samentu.

Ramzes tuj akceptis la pastron, kiu falinte sur la plankon, donis al Ramzes ringon. La monarĥo paliĝis.

—Kion tio signifas?... — demandis la sinjoro.

—Samentu mortis ... — respondis la sendito.

Ramzes dum momento ne povis eligi sonon el la gorĝo. Fine li diris:

—Kie tio okazis?...

—Ŝajnas — diris la pastro — ke Samentu estis trovita en unu el la salonoj de Labirinto kaj ke li mem venenis sin, por eviti turmentojn ... Ŝajnas ankaŭ, ke malkovris lin Mefres, kun helpo de iu Greko, kiu, oni diras, tre similas vian sanktecon ...

—Ree Mefres kaj Likon! — ekkriis kolere Tutmozis.

— Sinjoro — li turnis sin al la faraono — ĉu neniam vi liberigos vin de ĉi tiuj perfiduloj?...

Lia sankteco ree kunvokts privatan kunsidon en sia ĉambro. Li alvokis Hirammon kaj la pastron, kiu venis kum la ringo de Samentu. Pentuer ne volis partopreni, la respektinda reĝino Nikotris venis nenvitita.

—Mi vidas — murmuretis Hiram al Tutmozis — ke kiam la pastroj estos forpelitaj, la virinaĉoj komencos regi Egipton!...

Kiam kolektiĝis la altranguloj, la faraono donis la parolon al la sendito de Samentu. La juna pastro volis nenion paroli pri Labirinto. Kontraŭe li vaste rakontis, ke la templo de Ptah tute ne estas defendata, kaj ke sufiĉus kelkdeko da soldatoj por preni ĉiujn, kiuj sin kaŝas en ĝi.

—Ĉi tiu homo estas perfidulo!... — ekkriis la reĝino. — Li mem pastro, li konsilas al vi superforton kontraŭ la pastroj ...

Eĉ unu muskolo ne ekstremis en la vizaĝo de la sendito.

—Respektinda sinjorino — respondis li — se Mefres pereigis mian protektanton kaj majstron, Samentu, mi estus hundo, se mi ne serĉus venĝon. Morto por morto!...

—La juna homo plaĉas al mi! — murmuretis Hiram.

Efektive en la kunsido kvazaŭ ekblovis freŝa aero. La generaloj rigardis scivole la pastron, eĉ la vizaĝo de la faraono viviĝis.

—Mia filo, ne aŭskultu lin! — petegis la reĝino.

—Kiel vi pensas? — diris subite Ramzes al la juna pastro:
— Kion farus nun la sankta Samentu, se li vivus?...

—Mi estas certa — respondis energie la pastro — ke Samentu enirus en la templon de Ptah, bruligus incenson por la dioj, sed punus la perfidulojn kaj mortigintojn ...

—Mi ripetas, ke vi estas la plej malbona perfidulo!... — ek-kriis la reĝino.

—Mi plenumas nur mian devon — respondis la ne kortuŝebla pastro.

—Vere, ĉi tiu homo estas la lernanto de Samentu!... — intermetis Hiram. — Li sola vidas klare, kio restas al ni por fari ...

La militaj kaj civilaj altranguloj konsentis, ke Hiram estas prava, kaj la granda skribisto aldonis:

—Ni komencis la batalon kontraŭ la pastroj, ni devas fini ĝin, des pli hodiaŭ, kiam ni havas la leterojn pruvantajn, ke Herhor traktis kun Asirianoj, kio estas granda ŝtata perfido.

—Li daŭrigas la politikon de Ramzes XII — intermetis la reeĝino.

—Sed mi estas Ramzes XIII!... — jam malpacience respondis la faraono.

Tutmozis leviĝis de la seĝo.

—Mia sinjoro — diris li — permesu al mi agi. Estas danĝera afero daŭrigi ĉi tiun staton de necerteco, kiu regas nun en la administrado, kaj estus krimo kaj malsaĝo ne profiti la oka-

zon. La pastro diras, ke la templo ne estas defendata, permeso do al mi iri tien kun areto da homoj; mi mem elektos ilin.

—Mi iros kun vi — intermetis Kalipos. — Laŭ mia sperto la triumfanta malamiko estas plej malforta. Se do nun ni invados en la templon de Ptah ...

—Ni ne bezonas invadi, ni eniros tien, kiel plenumantoj de la volo de la faraono, kiu ordonas al vi aresti la perfidulojn — diris la granda skribisto. — Por tio oni ne bezonas eĉ forton. Kiom da fojoj unu policisto sin ĵetas sur bandon da ŝtelistoj kaj kaptas, kiom li volas.

—Mia filo — interrompis la reĝino — cedas al la premo de viaj konsiloj ... Sed li ne volas superforton, li malpermesas al vi ...

—Ah, se estas tiel — diris la juna pastro de Set — mi komunikos al via sankteco, ankoraŭ unu aferon.

Kelkfoje li profunde spiris, sed malgraŭ tio li finis per sufokita voĉo:

—Sur la stratoj de Memfiso la pastra partio publikigas, ke ...

—Kion? — parolu sentime — interrompis la faraono.

—Ke via sankteco estas frenezulo, ne havas la ĉefpastran rangon, eĉ la reĝan, kaj ke ... oni povas forigi vin de la trono ...

—Jen kion mi timis — murmuretis la reĝino.

La faraono salte leviĝis de la seĝo.

—Tutmozis! — ekkriis li per voĉo, en kiu oni sentis la retrovitan energion. — Prenu tiom da soldatoj, kiom vi volas, iru en la templon de Ptah kaj alkonduku al mi Herhoron kaj Mefreson, kulpigitajn pri ŝtata perfido. Se ili pruvos sian senkul-

pecon, mi redonos al ili mian favoron, en la kontraŭa okazo ...

—Ĉu vi pripensis?... — interrompis la reĝino.

Tiu ĉi fojon la indigninta faraono ne respondis al ŝi kaj la altranguloj komencis krii:

—Morto al la perfiduloj!... De kiam en Egipto la faraono devas oferi siajn fidelajn servistojn por almozpeti la favoron de friponoj!...

Ramzes donis al Tutmozis paketon de la leteroj de Herhor al Asirio kaj diris per solena voĉo:

—Ĝis la sufoko de la ribelo de la pastroj, mi transdonas mian povon al Tutmozis, la ĉefo de la gvardio. Nun lin vi obeu, kaj vi, respektinda patrino, al li vin turnu kun viaj rimarkoj.

—Saĝe kaj juste agas la sinjoro!... — ekkriis la granda skribisto. — Ne konvenas al la faraono lukti kontraŭ la popolo, kaj la manko de energia povo estus pereiga por ni.

Ĉiuj altranguloj sin klinis antaŭ Tutmozis. La reĝino Nikotris kun ĝemo falis al la piedoj de la filo.

Tutmozis, akompanata de la generaloj, eliris en la korton. Li ordonis al la unua regimento de la gvardio stariĝi en vico kaj diris:

—Mi bezonas kelkdekojn da homoj, kiuj estas pretaj morti por la gloro de nia monarĥo ...

Eliris el la vicoj pli multe da soldatoj kaj oficiroj, ol oni bezonis, kaj en ilia fronto, Eunana.

—Ĉu vi estas pretaj morti? — demandis Tutmozis.

—Ni mortos kun vi, ĉefo, por lia sankteco!... — ekkriis Eunana.

—Vi ne mortos, sed venkos la malnoblajn krimulojn — re-

spondis Tutmozis. — La soldatoj, partoprenantaj en la ekspedicio, ricevos oficiran rangon, la oficiroj ricevos avancon je du gradoj. Tiel diras al vi mi, Tutmozis, la ĉefa militestro laŭ la volo de la faraono.

—Vivu eterne!...

Tutmozis ordonis jungi ĉevalojn al dudek kvin ĉaroj de la peza kavalerio kaj sidigis tie la memvolulojn. Li mem akompanata de Kalipos sidiĝis sur ĉevalojn, kaj baldaŭ la tuta taĉmento, sin direktanta al Memfiso, malaperis en la polvo.

Vidante tion el la fenestro de la reĝa somerdomo, Hiram sin klinis antaŭ la faraono kaj murmuretis:

—Nur nun mi kredas, ke via sankteco ne estis en konspiro kun la ĉefpastroj ...

—Ĉu vi freneziĝis?... — eksplodis la sinjoro.

—Pardonu, estro, sed la hodiaŭa atako kontraŭ la temploj estis aranĝita de la pastroj. Kiel ili entiris en ĝin vian sanktecon? tion mi ne komprenas.

Estis jam la kvina horo post la tagmezo.

ĈAPITRO DEKSEPA

En la sama momento, en la sama minuto, la pastro, staranta garde sur la pilono de la templo de Ptah en Memfiso, konigis al la ĉefpastroj kaj nomarĥoj disputantaj en la salono, ke la palaco de la faraono donas signojn.

—Ŝajnas al mi, ke lia sankteco petos pacon kun ni — diris ridante unu el la nomarĥoj.

—Mi dubas!... — respondis Mefres.

Herhor suriris la pilonon, ĉar al li oni signalis de la palaco. Baldaŭ li revenis kaj diris al la kunvenintoj:

—Nia juna pastro lerte aranĝis la aferon ... En ĉi tiu momento Tutmozis kun kelkdeko da memvoluloj rajdas ĉi tien, por nin aresti aŭ mortigi ...

—Kaj vi kuraĝos ankoraŭ defendi Ramzeson? — ekkriis Mefres.

—Mi devas defendi lin kaj mi lin defendos, ĉar mi solene ĵuris tion al la reĝino ... Kaj sen la respektinda filino de la sankta Amenhotep, nia situacio ne estus tia kia ĝi estas.

—Bone, sed mi ne ĵuris!... — respondis Mefres kaj forlasis la salonon de la kunveno.

—Kion li volas fari? — demandis unu el la nomarĥoj.

—Infaniĝinta maljunulo!... — respondis Herhor, levante la ŝultrojn.

Antaŭ la sesa horo vespere la taĉmento de la gvardio, al kiu neniu faris malhelpon, proksimiĝis al la templo de Ptah; la

ĉefo ekfrapis la pordegon, kiun oni malfermis. Tio estis Tutmozis kun siaj memvoluloj.

Kiam la ĉefa militestro eniris en la korton, li ekmiris, ke renkonte al li eliris Herhor, portanta la tiaron de Amenhotep kaj ĉirkaŭita nur de pastroj.

—Kion vi postulas, mia filo? — demandis la ĉefpastro Tutmozison, iom konfuzitan per ĉi tiu vido.

Sed li tuj ekregis sin kaj diris:

—Herhor, ĉefpastro de la tebo Amon! Pro la leteroj, kiujn vi skribis al la asiria satrapo, Sargon, kaj kiujn mi havas kun mi, vi estas kulpigita pri ŝtata perfido kaj vi devas senkulpiĝi vin antaŭ la faraono ...

—Se la juna sinjoro — trankvile respondis Herhor — volas ekscii pri la politikaj celoj de la eterne vivanta Ramzes XII, li sin turnu al la plej alta kolegio, kaj li ricevos klarigojn.

—Mi alvokas vin tuj min sekvi, se vi ne volas, ke mi devigu vin — ekkriis Tutmozis.

—Mia filo, mi petegas la diojn, ke ili gardu vin de la superforto kaj puno, kiun vi meritas ...

—Vi iras? — demandis Tutmozis.

—Mi atendas ĉi tie Ramzeson — respondis Herhor.

—Restu do ĉi tie, trompisto!... — ekkriis Tutmozis.

Li eltiris la glavon kaj sin ĵetis al Herhor. En la sama momento Eunana, staranta post la ĉefo, levis la hakilon kaj tutforte elkbatis Tutmozison inter la kolon kaj la dekstran ŝlosiston. La sango ekŝprucis en ĉiujn direktojn. La favorato de la faraono falis teren preskaŭ dishakita en du pecojn.

Kelke da soldatoj, mallevinte la lancojn, saltis al Eunana, sed falis post mallonga batalo. El la memvoluloj tri kvaronoj estis pagataj de la pastroj.

—Vivu la sankta Herhor, nia sinjoro!... — ekkriis Eunana, svingante la makulitan hakilon.

—Li vivu eterne! — ripetis la soldatoj kaj pastroj kaj ĉiuj falis sur la vizaĝojn.

La plej respektinda Herhor levis la manojn supren kaj benis ilin.

Forlasinte la korton de la templo, Mefres malsupreniris en la kelon, kie loĝis Likon. Jam sur la sojlo la ĉefpastro eltiris el sub la vesto kristalan globon. Vidante ĝin la Greko ekkoleris.

—Englutu vin la tero!... Neniam ĝuu trankvilon viaj kadavroj!... — malbenis Likon per pli kaj pli mallaŭta voĉo.

Fine li eksilentts kaj ekdormis.

—Prenu ĉi tiun ponardon — diris Melfres, donante al la Greko mallarĝan ŝtalan pecon. — Prenu ĉi tiun ponardon kaj iru en la palacan ĝardenon ... Tie stariĝu en la figa bosko kaj atendu tiun, kiu forprenis kaj delogis vian Kaman ...

Likon komencis grinci la dentojn en senforta kolero.

—Kaj kiam vi ekvidos lin, vekigu ... — finis Mefres.

Poste li ĵetis sur la Grekon oficiran mantelon kun kapuĉo, murmuretis al li en orelon la signalan vorton kaj el la kelo, tra kaŝita pordeto elkondukis lin en malplanan straton de Memfiso.

Poste, kun viveco de junulo, Mefres kuris sur la supron de la pilono kaj, preninte kelke da diverskoloraj flagetoj, komencis fari signojn al la palaco de la faraono. Sendube oni rimarkis kaj komprenis lin, ĉar sur la pergamena vizaĝo de la ĉefpastro ekbrilis malica rideto.

Mefres remetis la flagojn, forlasis la terason de la pilono kaj komencis malrapide iri malsupren. Subite, kiam li estis jam sur la unua etaĝo, ĉirkaŭis lin kelke da homoj en brunaj

manteloj, per kiuj ili kovris siajn tunikojn kun nigraj kaj blankaj strioj.

—Jen estas la plej nobla Mefres — diris unu el ili.

Kaj ĉiuj tri ekgenuis antaŭ la ĉefpastro, kiu aŭtomate levis la manon, kvazaŭ por beni ilin. Sed subite li mallevis ĝin, demandante:

—Kiu vi estas?

—La gardistoj de Labirinto.

—Kial vi baras al mi la vojon? — diris li. Liaj manoj kaj delikataj lipoj komencis tremi.

—Ni ne bezonas rememorigi al vi, sankta viro, — diris unu el la gardistoj, ĉiam genuante — ke antaŭ kelke da tagoj vi estis en Labirinto, al kiu vi same bone konas la vojon, kiel ni, kvankam vi ne apartenas al la gardistoj. Vi estas tro granda saĝulo por ne scii, kiaj estas niaj leĝoj por tiaj okazoj.

—Kion tio signifas?... — ekkriis Mefres per laŭta voĉo. — Vi estas mortigistoj, senditaj de Her ...

Li ne finis. Unu el la atakantoj kaptis lin je la manoj, aliaj ĵetis tukon sur lian kapon, tria ŝprucigis klaran fluidaĵon sur lian vizaĝon, Mefres kelke da fojoj sin ĵetis konvulsie kaj falis. Ankoraŭ unu fojon ili ŝprucigis sur lin, metis la mortinton en niĉo, lasis en la senviva mano papiruson kaj malaperis en la koridoroj de la pilono.

Tri homoj, same vestitaj, persekutis Likonon preskaŭ de la momento, kiam ellasita de Mefres el la templo li eliris en la malplenan straton.

Ili estis kaŝitaj proksime de la pordeto, tra kiu eliris Likon kaj en la komenco lasis lin libera. Sed baldaŭ unu el ili rimarkis en lia mano ion suspektindan, ĉiuj do komencis sekvi lin.

Stranga afero! La dormigita Likon, kvazaŭ antaŭsentante

la persekuton, subite sin turnis en bruano straton, poste sur placon, kie svarmis multe da homoj, kaj fine komencis kuri al Nilo tra la strato fiŝista. Tie, en angulo li trovis ŝipeton, saltis en ĝin kaj kun eksterordinara rapideco komencis remi al la alia bordo de la rivero.

Li jam preskaŭ atingis la bordon, kiam ekglitis post li ŝipeto kun unu remisto kaj tri veturantoj. Apenaŭ tiuj forbordiĝis, aperis dua ŝipeto kun du remistoj kaj ankaŭ tri veturantoj.

Ambaŭ ŝipetoj furioze persekutis Likonon.

En tiu, kiu havis unu remiston, sidis la gardistoj de Labirinto kaj atente rigardis siajn konkurantojn, kiom permesis la krepusko, rapide falanta post la subiro de la suno.

—Kiu ili estas, tiuj tri? — murmuretis la gardistoj de Labirinto unu al alia. — De antaŭhieraaŭ ili vagis ĉirkaŭ la templo kaj hodiaŭ ili persekutas lin ... Ĉu ili volus savi lin de ni?...

La malgranda ŝipeto de Likon atingis la kontraŭan bordon. La dormigita Greko elsaltis kaj per rapidaj paŝoj komencis iri al la palacaj ĝardenoj. De tempo al tempo li ŝanceliĝis, haltis kaj kaptis sin je la kapo sed post momento li ree iris, kvazaŭ tirata de nekomprenebla forto.

La gardistoj de Labirinto ankaŭ elŝipiĝis, sed iliaj konkurantoj jam pli frue atingis la bordon.

Komenciĝis neordinara veturado: Likon galopis al la reĝa palaco, kvazaŭ kuristo; post li tri nekonataj homoj, kaj en la fino la tri gardistoj de Labirinto.

Kelkcenton da paŝoj de la ĝardeno ambaŭ persekutantaj grupoj kuniris. Estis jam nokto, sed luma.

—Kiu vi estas? — demandis la gardisto de Labirinto.

—Mi estas la poliestro de Pi-Bast kaj kun du miaj centestroj mi persekutas grandan krimulon ...

—Kaj ni estas la gardistoj de Labirinto. Ni ankaŭ persekutas ĉi tiun homon ...

Ambaŭ grupoj rigardis unu la alian, kun glavoj aŭ tranĉiloj en la manoj.

—Kion vi volas fari kun li? — demandis fine la poliestro.

—Ni havas verdikton kontraŭ li ...

—Kaj vi lasos la kadavron?

—Kun ĉio, kio, estas sur li — respondis la gardistoj. La poliestro flustre interkonsiliĝis.

—Se vi parolas la veron — diris fine la poliestro — ni ne malhelpos vin. Kontraŭe, ni pruntos lin al vi por momento, kiam li falos en niajn manojn ...

—Vi ĵuras?

—Ni ĵuras ...

—Bone, ni povas iri kune ...

Ili kuniĝis, sed la Greko malaperis de iliaj okuloj — Malbenita!... — ekkriis la poliestro — ree li forkuris ...

—Ni retrovos lin — respondis la gardisto de Labirinto — eble li eĉ revenos sur la sama vojo.

—Por kio li iras al la reĝa palaco? — demandis la poliestro.

—La ĉefpastroj uzas lin por siaj celoj, sed li revenos en la templon, revenos!... — diris la gardisto.

Ili decidis atendi kaj agi kune.

—Ni perdas jam la trian nokton! — diris unu el la policistoj, oscedante.

Ili envolvis sin en siajn mantelojn kaj kuŝiĝis sur la herbo.

Tuj post la forveturo de Tutmozis, la respektinda reĝino Nikotris, kun lipoj kunpremitaj de kolero, forlasis solene la

ĉambrojn de la filo. Kaj kiam Ramzes volis trankviligi ŝin, ŝi interrompis severe:

—Mi adiaŭas la faraonon kaj petas la diojn, ke ili permesu al mi saluti vin ankoraŭ kiel faraonon ...

—Ĉu vi dubas pri tio, patrino?

—Pri ĉio oni povas dubi apud homo, kiu obeas konsilojn de frenezuloj kaj perfiduloj!...

Ili disiris, ambaŭ ekscititaj.

Baldaŭ lia sankteco retrovis la bonan humoron kaj gaje parolis kun la altranguloj. Sed je la sesa horo komencis lin turmenti maltrankvilo.

—Tutmozis devus sendi al ni kurieron ... — diris la sinjoro.

—Ĉar mi estas certa, ke la afero tiel aŭ alie jam estas solvita ...

—Tion mi ne scias — respondis la granda trezoristo. — Eble ili ne trovis ŝipojn ... Eble en la templo ili renkontis kontraŭstaron ...

—Kaj kie estas la juna pastro? — demandis subite Hiram.

—La pastro, la sendito de la mortinta Samentu? — ripetis la konfuzitaj altranguloj. — Kie li povas esti?...

Oni dissendis soldatojn por traserĉi la ĝardenon. La soldatoj trakuris ĉiujn vojetojn, sed nenie trovis la pastron.

Ĉi tiu okazo faris malbonan impreson sur la altranguloj. Ĉiu sidis silente, meditante maltrankvile.

Ĉe la subiro de la suno eniris en la salonon la ĉambristo de la faraono, kaj murmuretis, ke sinjorino Hebron grave ekmalsanis kaj petegas, ke lia sankteco bonvolu ŝin viziti.

La altranguloj, konante la rilaton, kiu ligis la sinjoron kun la bela Hebron, ekrigardis unu la alian. Sed kiam la faraono anoncis sian intencon eliri en la ĝardenon, ili ne protestis. La

ĝardeno, dank'al dense starantaj gardistoj, estis same sendanĝera, kiel la palaco. Neniu trovis konvena, eĉ de malproksime gardi la faraonon, sciante, ke Ramzes ne amas, ke oni okupu sin pri li en tiaj momentoj.

Kiam la sinjoro malaperis en la koridoro, la granda skribisto diris al la trezoristo:

—La tempo treniĝas, kiel veturiloj en la dezerto. Eble Hebron havas novaĵon de Tutmozis?...

—En la nuna momento lia militiro kun kelkdeko da homoj kontraŭ la templo de Ptah ŝajnas al mi nekomprenebla frenezo ...

—Kaj ĉu pli prudente faris la faraono apud Sodaj Lagoj, kiam li persekutis Teĥennan nokte en la dezerto?... — interrompis Hiram. — La kuraĝo valoras pli multe, ol la nombro.

—Kaj la juna pastro? — demandis la trezoristo.

—Li venis sen nia scio kaj foriris, ne demandante permeson. Ĉiu el ni agas kiel konspiranto.

La trezoristo balancis la kapon.

Ramzes rapide trakuris la interspacon, apartigantan lian domon de la palaco de Hebron. Kiam li eniris en la ĉambron, Herbon kun ploro sin ĵetis al lia kolo.

—Mi mortas de teruro!... — ekkriis ŝi.

—Ĉu vi timas pri Tutmozis?

—Pri Tutmozis? — demandis Hebron, malestime grimacante per la lipoj. — Vi sola estas kara por mi ... pri vi sola mi pensas ... pri vi timas ...

—Benita estu via timo, kiu por unu momento liberigis min de la enuo ... — diris la faraono, ridante. — Dioj, kia malfacila tago!... Se vi aŭdus niajn diskutojn, se vi vidus la mienojn de niaj konsilantoj!... Kaj fine, por kroni ĉion, plaĉis al la respekt-

inda reĝino honori nian kunvenon per sia ĉeesto ... Mi neni-
am supozis, ke la titolo de la faraono povos tiel tedi min ...

—Ne diru tion tro laŭte — konsilis Hebron. — Kion vi faros, se Tutmozis ne sukcesos preni la templon?

—Mi reprenos de li la komandon, kaŝos mian kronon kaj surmetos oficiran kaskon — respondis Ramzes. — Mi estas certa, ke kiam mi mem elpaŝos en la fronto de la armeo, la ribelo falos ...

—Kiu ribelo?... — demandis Hebron.

—Jes, ni havas du ribelojn — ridis Ramzes. — La popolaĉo kontraŭ la pastroj, la pastroj kontraŭ mi ...

Li kaptis Hebronon inter la brakojn kaj kondukis al la kanapo murmuretante:

—Kiel bela vi estas hodiaŭ!... Ĉiufoje kiam mi vidas vin, vi ŝajnas al mi alia, pli kaj pli bela ...

—Lasu min! — murmuretis Hebron. — Iafoje mi timas, ke vi min mordos!

—Mordi vin ... ne ... sed mi povus kisi vin ĝis mortigo ... Vi eĉ ne scias, kiel bela vi estas ...

—Malpli ol la ministroj kaj generaloj ... Lasu min ...

—Apud vi mi dezirus fariĝi granata arbo ... Mi volus havi tiom da brakoj, kiom da branĉoj havas arbo, por ĉirkaŭpreni vin ... Tiom da manoj, kiom da folioj ĝi havas, kaj tiom da buŝoj, kiom da floroj, por ke mi povu en la sama momento kisi viajn okulojn, buŝon kaj bruston ...

—Por monarĥo, kies trono estas en danĝero, vi havas strange liberajn pensojn ...

—En la lito mi ne zorgas pri la trono — interrompis li. — Dum mi havas la glavon, mi havas la povon.

—Via armeo estas venkita — diris Hebron, defendante sin.

—Morgaŭ venos freŝaj regimentoj kaj postmorgaŭ mi kolektos la venkitajn ... Mi ripetas al vi, ne okupu vin per vantaĵoj ... Unu momento da karesoj valoras pli multe ol unu jaro da povo ...

Unu horon post la subiro de la suno, la faraono forlasis la loĝejon de Hebron kaj estis revenanta malrapide al sia palaco. Li estis revema, dormema kaj li pensis, ke la ĉefpastroj estas grandaj malsaĝuloj, se ili kontraŭstaras al li. De la tempo kiam ekzistas Egipto, ĝi ne havis pli bonan sinjoron ol li.

Subite el figa bosko elglitis homo en nigra mantelo kaj baris la vojon al la faraono. La sinjoro, por pli bone vidi lin, proksimigis sian vizaĝon al lia kaj subite ekkriis:

—Ah, tio estas vi, fripono?... Venu en la gardejon ...

Tio estis Likon. Ramzes kaptis lin je la nuko; la Greko siblis kaj ekgenuis sur la tero. Samtempe la faraono eksentis bruigan doloron en la maldekstra flanko de la ventro.

—Vi mordas ankoraŭ? — ekkriis Ramzes.

Per ambaŭ manoj li potence premegis la kolon de la Greko, kaj kiam li ekaŭdis la krakon de la rompataj vertebroj, li forĵetis lin kun abomeno.

Likon falis, skuata de la antaŭmortaj konvulsioj. La faraono foriris kelke da paŝoj. Li palpis sin kaj trovis la tenilon de la ponardo.

—Li vundis min?...

Li eltiris el sia flanko la mallarĝan ŝtalan pecon kaj kunpremis la vundon.

—Mi volus scii — pensis li — ĉu iu el miaj konsilantoj havas plastron.

Li sentis naŭzon kaj plirapidigis la paŝojn.

Proksime de la palaco renkonte al li kuris oficiro kriante:

—Tutmozis ne vivas plu — La perfidulo Eunana mortigis lin!...

—Eunana? — ripetis la faraono. — Kaj la aliaj ...

—Preskaŭ ĉiuj memvoluloj, kiuj forveturis kun Tutmozis, estis subaĉetitaj de la pastroj ...

—Bone, mi devas fini tion! — diris la sinjoro. — Trumpetu, por kolekti la aziajn regimentojn ...

Eksonis la trumpeto, kaj la Azianoj komencis amase eliri el la soldatejoj, tirante post si la ĉevalojn.

—Ankaŭ al mi oni donu ĉevalon — diris la faraono. Sed li eksentis fortan kapturton kaj aldonis:

—Ne, oni donu al mi portilon ... Mi ne volas min lacigi ...

Subite li falis ŝanceliĝante sur la brakojn de la oficiroj.

—Mi preskaŭ forgesis — diris li per estingiĝanta voĉo.

—Alportu mian kaskon kaj glavon ... la ŝtalan glavon ... de Sodaj Lagoj ... Ni iras al Memfiso ...

El la palaco alkuris altranguloj kaj servistoj kun torĉoj. La faraono, subtenata de la oficiroj, havis grizan vizaĝon kaj okulojn, vualitajn de nebulo. Li etendis la manon, kvazaŭ serĉante armilon, movis la lipojn kaj, en la ĝenerala silento, ĉesis spiri, li la sinjoro de la du mondoj: la mondo de la vivantoj kaj la mondo okcidenta.

ĈAPITRO DEKOKA

De la morto de Ramzes XIII ĝis la tago de lia enterigo re-
ĝis la ŝtaton la plej nobla San-amen-Herhor, kiel la ĉef-
pastro de la teba Amon kaj vic-reĝo de la mortinta faraono.

La kelkmonata regado de la vic-reĝo estis tre prospera por Egipto. Herhor kvietigis la ribelojn de la popolaĉo kaj, kiel estis iam, permesis al la laboristoj ripozi ĉiun sepan tagon. Li enkondukis severan disciplinon inter la pastroj, ĉirkaŭis per sia protekto la eksterlandulojn kaj precipe Fenicianojn, kaj faris traktaton kun Asirio, ne cedante tamen Fenicion, kiu restis tributano de Egipto.

Dum la mallonga regado justeco estis plenumata rapide, sed sen krueleco, kaj iu ajn ne kuraĝis bati la egiptan kamparanon, kiu povis sin turni al la tribunalo, se li havis sufiĉe da tempo kaj atestantoj.

Herhor sin okupis ankaŭ pri la ŝuldoj, ŝarĝantaj la faraonon kaj ŝtaton. Por ĉi tiu celo li igis Fenicianojn rezigni parton de la sumoj, ŝuldataj al ili de la ŝtato, kaj por pagi la reston li prenis el Labirinto grandegan sumon da tridek mil talentoj.

Dank'al ĉi tiuj rimedoj, post tri monatoj ekregis en la lando trankvilo kaj bonstato, kaj la regnantoj ripetis:

—Benata estu la regado de la vic-reĝo, San-amen-Herhor!
Vere, la dioj destinis lin esti regnestro, por ke li liberigu Egip-

ton de la malfeliĉoj, kiujn altiris Ramzes XIII, senreligia virinamanto ...

Kelkdeko da tagoj sufiĉis, por ke la popolo forgesu, ke ĉiuj verkoj de Herhor estis nur plenumo de la intencoj de la juna kaj nobla faraono!

En la monato Tobi (oktobro-novembro), kiam la mumio de Ramzes XIII jam estis metita en la reĝajn kavernojn, en la templo de la teba Amon kunvenis ĉiuj plej altrangaj personoj de la ŝtato. Estis tie preskaŭ ĉiuj ĉefpastroj, nomarĥoj kaj generaloj, kaj inter ili Nitager, la kovrita de gloro maljuna ĉefo de la orienta armeo.

En la sama grandega ĉambrego, ĉirkaŭita per kolonoj, kie antaŭ duono de jaro la pastroj juĝis Ramzeson XII kaj montris sian malbonvolon al Ramzes XIII, en la sama loko kunvenis hodiaŭ la altranguloj por solvi, sub la prezido de Herhor, la plej gravan ŝtatan aferon. La 25-an de Tobi tagmeze Herhor, portante la tiaron de Amenhotep, sidiĝis sur la trono, la aliaj sur seĝoj, kaj la kunsido komenciĝis.

Ĝi daŭris ekstreme mallonge, kvazaŭ ĝia rezultato estus antaŭe preparita.

—Ĉefpastroj, nomarĥoj kaj militestroj! — komencis Herhor. — Ni kunvenis ĉi tien por tre malĝoja kaj grava afero. Kun la morto de la eterne vivanta Ramzes XIII, kies mallonga kaj uragana regado finiĝis tiel malfeliĉe ...

Herhor eksopiris.

—Kun la morto de Ramzes XIII ne nur estingiĝis la faraono, sed la glorplena dinastio XX ...

Murmuro traflugis inter la kunvenintoj.

—La dinastio ne finiĝis — intermetis preskaŭ malĝentile la

potenca memfisa nomarĥo. — Vivas ja la respektinda reĝino Nikotris, al ŝi do apartenas la trono ...

Post momento Herhor respondis:

—La plej nobla mia edzino, la reĝino Nikotris ...

Ne murmuro, sed krio eksonis nun kaj daŭris kelke da minutoj. Kiam ĉio eksilentis, Herhor daŭrigis trankvile kaj klare:

—Mia plej nobla edzino, la reĝino Nikotris, nekonsolebla post la morto de sia filo, rezignis la tronon ...

—Pardonu!... — ekkriis la memfisa nomarĥo. — La plej nobla vic-reĝo nomas la reĝinon sia edzino ... Tio estas fakto tute nova, kiun oni devas, antaŭ ĉio, kontroli ...

Herhor faris signon. La plej alta teba juĝisto montris la akton pri la edziĝo de la plej nobla ĉefpastro de Amon, Sanamen-Herhor, kun la reĝino Nikotris, vidvino de Ramzes XII kaj patrino de Ramzes XIII.

Post ĉi tiu klarigo ekregis tomba silento. Herhor daŭrigis:

—Ĉar mia edzino, la sola heredanto de la trono, forlasis siajn rajtojn, ĉar tiamaniere finiĝis la regado de la XX dinastio, ni devas elekti novan monarĥon ... Ĉi tiu monarĥo — daŭrigis Herhor — devas esti homo matura, energia kaj sperta en la regado. Tial mi konsilas al vi, ekscelencoj, elekti por ĉi tiu plej alta posteno ...

—Herhoron!... — ekkriis iu.

—Elekti la plej gloran Nitageron, la ĉefon de la orienta armeo — finis Herhor.

Longan momenton sidis Nitager kun fermitaj okuloj ride-tante. Fine li leviĝis kaj diris:

—Neniam, sendube, mankos homoj, pretaj akcepti la titolon de faraono. Oni eĉ eble havus tro multe da ili. Feliĉe la

dioj mem, forigante la danĝerajn konkurantojn, montris al ni la homon, plej indan ricevi la faraonan povon. Kaj ŝajnas al mi, ke mi faros prudente, se anstataŭ akcepti la kronon, favore proponitan al mi, mi respondos:

—Vivu eterne lia sankteco San-amen-Herhor, la unua faraono de la nova dinastio!...

La ĉeestantoj, kun malmultaj esceptoj, ripetis la ekkcion, kaj samtempe la plej alta juĝisto alportis sur ora plado du ĉapojn: blankan de Supra Egipto kaj ruĝan de Malsupra. La unuan prenis la ĉefpastro de Oziriso, la duan la ĉefpastro de Horus kaj transdonis ilin al Herhor, kiu, kisinte la oran serpenton, metis ambaŭ sur la kapon.

Poste komenciĝis la ceremonio, kiu daŭris kelke da horoj: ĉiuj prezentis sian respekton al la nova sinjoro. Fine, oni skribis konforman akton, la partoprenantoj en la elekto surmetis siajn sigelojn, kaj de tiu momento Sanamen-Herhor fariĝis la vera faraono, la sinjoro de la du mondoj, kaj de la vivo kaj morto de siaj regnantoj.

Vespere lia sankteco revenis laca en siajn ĉefpastrajn ĉambrojn, kie li trovis Pentueron. La pastro estis pala, kaj sur lia malgrasa vizaĝo oni povis legi laciĝon kaj malĝojon.

Pentuer falis sur la vizaĝon. La sinjoro levis lin kaj diris kun rideto:

—Vi ne subskribis mian elekton, vi ne prezentis al mi vian respekton, kaj mi timas, ke mi devos iam sieĝi vin en la templo de Ptah!... Vi ne decidiĝis resti ĉe mi? Vi preferas Menseson?...

—Pardonu via sankteco — respondis la pastro — sed la kortega vivo tiel lacigis min, ke la sola mia deziro estas hodiaŭ lerni la saĝon.

—Vi ne povas forgesi Ramzeson? — demandis Herhor. — Tamen vi konis lin tre mallonge, kaj ĉe mi vi laboris kelke da jaroj.

—Via sankteco ne kondamnu min, sed Ramzes XIII estis la unua faraono, kiu sentis la doloron de la egipta popolo ...

Herhor ekridetis.

—Ah, vi saĝuloj!... — diris li, balancante la kapon — vi, vi ja mem turnis la atenton de Ramzes al la situacio de la popolaĉo, kaj nun vi portas je li funebbron en via koro, kvankam li faris nenion por la popolo ... Vi tion faris, ne li ... Ridindaj homoj vi estas, malgraŭ via potenca inteligenteco — daŭrigis Herhor. — Same Menes ... Ĉi tiu pastro sin opinias la plej kvieteta homo en Egipto, kvankam li faligis la dinastion kaj liberigis al mi la vojon al la povo!... Se li ne estus sendinta sian leteron pri la suna mallumiĝo la 20-an de Paofi, eble ni ambaŭ, la mortinta Mefres kaj mi, rompados nun ŝtonojn en minejo ... Iru jam kaj salutu Meneson en mia nomo. Memoru ankaŭ, ke mi scias esti dankema, kio estas la plej granda sekreto de la povo. Diru al Menes, ke mi plenumos ĉiun lian peton, se nur li ne ordonos al mi forlasi la tronon ... Vi mem revenu al mi, kiam vi estos ripozinta, kaj mi konservos por vi gravan oficon.

Kaj li tuŝis per la mano la humile klinitan kapon de la pastro.

EPILOGO

En la monato Mefrir (novembro, decembro) Pentuer venis en la templon post Memfiso, kie Menes grave laboris pri la ĉielo kaj tero.

La maljuna, enpensiginta saĝulo ree ne rekonis Pentueron. Rekonsciiĝinte tamen li alpremis lin kaj demandis:

—Kio do, ĉu vi ree intencas malkvietigi la kamparanojn por plifortigo de la faraona povo?

—Mi alvenis por resti kun vi kaj al vi servi — respondis Pentuer.

—Ho, ho ... — ekkriis Menes atente rigardante lin. — Ho! ho!... Ĉu vere vin jam tedis la kortega vivo kaj honoroj?... Benata estu tiu ĉi tago!... Kiam de la supro de mia pilono vi observos la mondon, vi konvinkiĝos, kia ĝi estas, malgranda kaj malbela.

Ĉar Pentuer nenion respondis, do Menes ree okupiĝis pri siaj aferoj. Reveninte post kelke da horoj li trovis la lernanton, sidanta sur la sama loko, obstine rigardanta en la punkton, kie de malproksime estis videbla la palaco de la faraonoj.

Menes donis al li hordean kukon, poteton da lakto kaj lasis lin en trankvilo.

Tiel daŭris kelke da tagoj. Pentuer manĝis malmulte, parolis ankoraŭ pli malmulte, vekigadis kelkfoje nokte kaj la tagojn pasigis sen movoj, rigardante ne sciate kien.

Tiu ĉi vivmaniero ne plaĉis al Menes. Do unufoje okupinte lokon apud Pentuer sur la ŝtono li diris:

—Ĉu vi tute freneziĝis, aŭ la spiritoj de mallumo nur por-tempe ekregis vian koron?...

Pentuer turnis sur lin la nebulecajn okulojn.

—Rigardu ĉirkaŭen — diris la maljunulo. — Tio ja estas la plej agrabla sezono de la jaro. La noktoj estas longaj kaj stel-oriĉaj, la tagoj mallongaj, la teron kovras floroj kaj nova herbo. La akvo estas pli travidebla ol kristalo. La dezerto kuŝas kvieta, sed la aero estas plenplena per kanto, plepado, zumado ... Se la printempo faras tiajn miraklojn sur la morta tero, do kiel ŝtoniĝinta devas esti via animo, kiu ne sentas similajn miraklojn?... Mi diras al vi, rekonsciiĝu, ĉar vi aspektas kiel mortinto meze de la viva naturo. Sub tiu ĉi suno vi similas al la sekiĝinta kotbulo kaj preskaŭ malodoras inter la narcisoj kaj violoj.

—Mia animo estas malsana — rediris Pentuer.

—Kio okazas al vi?

—Ju pli longe mi meditas, des pli certa mi estas, ke se mi ne forlasus Ramzeson XIII, se mi disponigus al li miajn servojn, estus vivanta ĝis nun tiu ĉi plej nobla el la faraonoj. Ĉirkaŭis lin centoj da perfiduloj, sed eĉ ne unu bona homo montris al li rimedojn por saviĝo!...

—Kaj ĉu vere ŝajnas al vi, ke vi povis lin savi? — demandis Menes. — Ho, la fiero de la nefinlerninta saĝulo!... Ĉiuj saĝoj ne savus la falkon erarvagintan inter la kornikoj, kaj vi, kva-zaŭ ia dieto, dezirus ŝangi la sorton de la homo?

—Sed, ĉu Ramzes devis pereji?...

—Certe, jes. Antaŭ ĉio li estis militema faraono kaj la nuna Egipto abomenas militistojn. Ĝi preferas oran braceleton ol

glavon, eĉ se el ŝtalo; ĝi pli preferas bonan kantiston aŭ dancistojn ol sentiman soldaton; profiton kaj sagon ol militon. Se en la monato Meĥir maturiĝus olivo aŭ violo ekflorus en la monato Tot, tiel la unua, kiel la alia devus pereji, kiel la fruktoj malfruiĝintaj aŭ antaŭtempaj. Vi ja deziras, ke en la epoko de Amenhotepoj kaj Herhoroj povus konserviĝi faraono apartenanta al la epoko de Hiksosoĵ. Ĉio havas sian tempon, dum kiu ĝi maturiĝas, kaj tian — dum kiu ĝi neniĝas. Ramzes XIII aperis en nekonforma epoko, do li devis cedi.

—Kaj ĉu vi pensas, ke nenio lin povus savi? — demandis Pentuer.

—Mi ne konas tian potencon. Li ne nur ne taŭgis por sia epoko kaj rango, sed ankoraŭ trafis je la periodo de la falo de la ŝtato kaj estis kiel juna folio sur putriĝinta arbo.

—Vi tiel trankvile parolas pri la fato de la ŝtato? — ekmiris Pentuer.

—Mi vidas ĝin de kelkdeko da jaroj, kaj vidis ĝin jam miaj antaŭuloj en tiu ĉi templo ... Oni povis alkitimiĝi.

—Ĉu vi havas duoblan vidkapablon?...

—Tute ne — diris Menes — sed ni havas mezuron. Laŭ moĵoj de la flageto vi ekscios: kia vento blovas, la puto ĉe Nilo atestas: ĉu la rivero leviĝas aŭ malleviĝas ... Kaj nin tra jarcentoj instruas pri malforto de la stato tiu ĉi Sfinkso ...

Kaj li montris per la mano direkton al la piramidoj.

—Nenion mi scias pri tio ... — flustris Pentuer.

—Legu la malnovajn kronikojn de nia templo kaj vi konvinkiĝos, ke — kiomfoje Egipto floris, ĝia Sfinkso estis sendifekta kaj leviĝis alte super la dezerto. Sed kiam la ŝtato komencis fali, Sfinkso krevis, dispeciĝis kaj sablo atingis ĝis ĝiaj piedoj. Kaj nun de kelkaj jarcentoj Sfinkso dispeciĝas kaj ju

pli altiĝas la sablo ĉirkaŭ ĝi, ju pli profundaj montriĝas sulkoj sur la korpoj, des pli rapide kliniĝas al pereo la ŝtato ...

—Kaj pereos?...

—Tute ne — rediris Menes. — Same kiel post la nokto sekvas la tago, kaj post la malalta akvo sekvas la leviĝo de Nilo, tiel post periodoj de faloj venas la tempo de vivdisfloro. Eterna historio!... De certaj arboj falas la folioj en la monato Meĥir, sed nur por rekreski denove en la monato Faĥono ... Vere Egipto estas miljaraĝa arbo, kaj la dinastioj ĝiaj branĉoj. Ni vidas propraokule, ke elkreskas la dudek unua branĉo, kial do malgaji?... Ĉu pro tio, ke kvankam defalas la branĉoj, la kreskaĵo vivas?...

Pentuer enpenŝiĝis, sed liaj okuloj rigardis pli konscie.

Post kelke da tagoj diris Menes al Fentuer: — Elĉerpiĝas nia nutraĵo. Ni devas iri en la direkton al Nilo kaj provizi nin por iom da tempo.

Ili ambaŭ prenis grandajn korbojn sur la ŝultrojn kaj de la frua mateno komencis viziti la apudbordajn vilaĝojn. Kutime ili ekstaris antaŭ la kabanoj de la kamparanoj, kantante piajn kantojn, post kio Menes frapis en la pordon kaj diris:

—Kompatemaj animoj, piaj Egiptanoj, oferu almozon al la servistoj de la diino de Saĝo!...

Oni donis al ili (plejofte virinoj) tie plenmanon da tritiko aŭ hordeo, ĉi tie panpecon aŭ sekiĝintan fiŝeton. Foje ilin atakis malbonaj hundoj aŭ infanoj de la idolanoj superĵetis ilin per ŝtonoj aŭ koto.

Eksterordinara estis la vidaĵo de tiuj ĉi humilaj almozuloj, el kiuj unu dum kelke da jaroj influis la sorton de la ŝtato, kaj la alia per kono de la plej profundaj misteroj de la naturo sanĝis la kuradon de la historio.

En pli riĉaj vilaĝoj oni akceptis ilin pli bone, kaj en iu domo, kie okazis edziĝfestoj oni manĝigis ilin, regalis per biero kaj permesis tranokti inter la mastrumaj konstruaĵoj.

Sed nek iliaj razitaj vizaĝoj kaj kapoj, nek la kalviĝinta pantera felo imponis al la loĝantoj. La popolo de Malsupra Egipto, miksita kun diverskreduloj, ne karakteriziĝis per pieco kaj precipe ignoris la pastrojn de la diino de Saĝo.

Kuŝante en la budo sur faskoj de freŝa kano, Menes kaj Pentuer aŭskultis la edziĝfestan muzikon, ebriajn kriojn, kaj de tempo al tempo malpacigojn de la ĝojantaj gastoj.

—Estas terure — elkdiris Pentuer. — Apenaŭ nur kelke da monatoj forpasis de post la morto de la sinjoro, kiu estis bonfaranto de la kamparanoj kaj ili jam forgesis lin ... Vere mallonge daŭras la homa dankemo ...

—Ĉu vi dezirus, ke la homoj ĝis fino de la jarcentoj superŝutu siajn kapojn per cindro? — demandis Menes. — Kiam krokodilo kaptas virinon aŭ infanon, ĉu vi pensas, ke tuj ĉesos flui akvo en Nilo?... Ĝi ruliĝas malgraŭ la senvivuloj kaj malgraŭ la leviĝo aŭ malleviĝo de la rivero. La samo estas kun la vivo de la popolo. Kiam finiĝas unu dinastio kaj komenciĝas la alia aŭ la ŝtaton tordas ribeloj kaj milito aŭ floras prospero, la popolamasoj devas manĝi, trinki, dormi, geedziĝi kaj labori, same kiel arbo kreskas malgraŭ pluvo kaj sekeco. Permesu do al ili salti, se ili havas sanajn piedojn, aŭ plori kaj kanti, se iliajn brustojn plenigas la sento.

—Konfesu tamen, ke ilia ĝojo aspektas strange vide al la falo, laŭ via diro, de la ŝtato — intermitis Pentuer.

—Tute ne mirinde, ĉar ĝuste ili estas la ŝtato, kaj ilia vivo estas la vivo de la ŝtato. Homoj ĉiam malgajas aŭ gojas kaj ne ekzistas horo, dum kiu iu ne ridus aŭ sopirus. Ja la tuta ku-

rado de la historio konsistas el tio, ke — se estas pli da ĝojo inter la homoj oni diras: la ŝtato floras, kaj se pli ofte estas verŝataj larmoj, oni nomas tion la falo. Oni ne devas alku-timiĝi al esprimoj, sed rigardi la homojn. En tiu ĉi kabano estas ĝojo, ĉi tie la ŝtato floras, do vi ne rajtas sopiri, ke ĝi falas. Vi devas nur penadi, ke ĉiam pli kaj pli multaj estu la kontentaj kabanoj.

Kiam la saĝuloj revenis post la almozpetado en la templon, Menes kondukis Pentueron sur la supron de la pilono. Li montris al li grandan marmoran globon, sur kiu helpe de oraj punktoj li mem fiksas la situon de kelkcent steloj, kaj — ordonis al li dum duono de la nokto observi la lunon sur la ĉielo.

Pentuer volonte prenis tiun ĉi taskon kaj hodiaŭ, la unuan fojon en la vivo, propraokule konstatis, ke dum kelkaj horoj la ĉiela firmamento kvazaŭ turniĝas okcidenten, sed la luno transŝoviĝis inter la steloj al oriento.

Tiujn tiel simplajn fenomenojn Pentuer bonege konis, sed nur de aŭdo. Do kiam la unuan fojon li propraokule ekvidis la movadon de la ĉielo kaj kvietan vagadon de la luno, li tiel emociiĝis, ke li falis sur la vizaĝon kaj ekploris.

Antaŭ lia animo malkovriĝis nova mondo, kies belecon li des pli bone taksis, ĉar li jam estis granda saĝulo.

Ree forpasis kelke da tagoj, kiam sin turnis al ili riĉa farmisto, proponante, ke ili kiel saĝuloj mezuru la grundon kaj fosu kanalon. Interŝanĝe li proponis al ili nutraĵon por la daŭro de la laboro kaj ankaŭ kaprinon kun kaprido kiel pagon.

Ĉar lakto mankis en la templo, Menes konsentis kaj kun Pentuer ambaŭ iris al la laboro. Ili nivelis la grundon, desegnis la direkton kaj fosadis.

Dum la malfacila okupado, Pentuer plivigliĝis kaj eĉ, kiam

li estis sola kun Menes, interparolis. Nur en ĉeesto de homoj li perdis humoron: ŝajnis ke iliaj ridoj kaj kantoj pligrandigis liajn suferojn.

Menes ne iris por la nokto en la vilaĝon, sed kune kun Pentuer dormis sur la kampo, de kie ili povis vidi la florantan grenon kaj aŭskulti ĉhojn de la homa ĝojo, ne partoprenante ĝin.

Iun vesperon la kampaj laboroj estis pli frue ĉesigitaj, ĉar en la vilaĝon venis por almozpeti malriĉa pastro kun malgranda knabo. Ili iris de domo al domo petegante almozon. La knabo ludis per fluto malgajan melodion, kaj en la paŭzoj la pastro kantis per forta voĉo kanton duone laikan, duone pian.

Menes kaj Pentuer kuŝante sur monteto observis la disflamiĝintan ĉielon, sur kies ora fono forte reliefigis la nigraj trianguloj de la piramidoj, ankaŭ brunaj trunkoj kaj malhele verdaj bukedoj de palmarboj. Dume la pastro treniĝis de kabano al kabano kaj elkantetis sian kanton ripozante longan tempon post ĉiu strofo.

”Kiel kvietas estas tiu justa princo! La bela destino plenumiĝis. De la tempo de Ra forpasas la malnovaj korpoj kaj sur iliajn lokojn alvenas la junaj. Ĉiun matenon leviĝas la suno kaj ĉiun vesperon ĝi kaŝiĝas en la okcidento. Viroj naskiĝas, virinoj gravediĝas, ĉiu brusto spiras per la freŝa aero. Sed ĉiuj, kiuj naskiĝis, ĉiuj sen escepto, iras al la loko por la homo destinita.”¹

—Kaj pro kio? — subite diris Pentuer. — Se almenaŭ estus vero, ke la vivon oni tiucele kreis, por ke kresku honoro al la dioj kaj virto. Sed tiel ne estas. La insida krueulo, la patrino,

1 Aŭtentika.

kiu fariĝas edzino de la mortiginto de ŝia filo, la amantino, kiu dum karesoj pensas pri perfido, ĉi tiuj sukcesas kaj estiĝas potencaj. Kaj la saĝaj sekiĝas en senageco, kaj la bravaj kaj noblaj pereas kaj pereas memoro pri ili.

”Faru al vi, princo, ĝojan tagon — kantis la pastro — ĉar ne multe da ili oni al vi donacis! Preparu ŝmirajojn kaj incensojn por la nazo via, kaj lotosajn kronojn por la membroj, por la korpo de la fratino, kiu logante en via koro sidas apud vi. Oni kantu kaj ludu por vi. Forĵetu zorgojn kaj ĝoju, ĉar baldaŭ venos la tago, en kiu oni veturas en la landon, kie regas silento.”

—La ŝmirajoj por la nazo, la lotosaj kronoj por la membroj, kaj poste ... la silento!... — intermitis Pentuer. — Vere arlekeno ŝajniganta kavaliron havas pli multe da senco, ol tiu ĉi mondo, en kiu ĉiuj ion ŝajnigas, sen ia utilo por si. Kaj almenaŭ tiu ĉi tera sonĝo estu seninterrompa ĝojo?... Sed, ho ne!... Se al iu malsato ne tordas la intestojn, do lian koron venenas deziro aŭ maltrankvilo. Kaj se iafoje okazos momento de silento, tiam el ĝia profundaĵo eliĝos la penso pri la lando de la eterna silento kaj turmentas la homan animon.

”Solenu la gajan tagon, ho Nefarhotep, viro kun la puraj manoj! Mi scias ĉion, kio okazis al viaj antaŭuloj: iliaj muroj disrompiĝis, la urboj jam plu ne ekzistas, kaj ili mem estas, kvazaŭ neniam estis. Neniu alvenas de tie, kiu dirus al ni, kiel ili fartas, kaj la korojn niajn ĝojigus. Kaj tiel estos, ĝis kiam vi mem ne proksimiĝos al la loko, kien ili iris.”

—Ĉu vi vidis iam trankvilan maron? — ekparolis Menes al Pentuer. — Vere, kiel enua ĝi estas, kvazaŭ bildo de la dormo, en kiu nenion oni sonĝas? Nur kiam uragano plugas la glatan surfacon, kiam unu ondo falas en la profundegaĵon, kaj

la alia leviĝas, kiam ekludas sur la ondsupraĵoj la lumoj, kaj el la profundo eksonas minacaj aŭ timemaj voĉoj, tiam la maro fariĝas bela. Same estas kun rivero. Kiam ĝi fluas en unu direkton, ĝi aspektas morta; sed kiam ĝi turniĝas dekstren kaj maldekstren — ĝi estiĝas ĉarma. Same okazas kun montoj: unutona altaĵo estas enua, sed malegalaj pintoj kaj profundaj intermontoj estas belaj ...

”Surmetu mirhon sur la kapon vian, survestu la maldikajn tolojn kaj ŝmiru vin per la diaj donacoj — kantis la pastro. — Vestu vin bele, se vi povas, kaj ne permesu fali al la kora via. Vivu por la plezuro, ĝis kiam vi estas sur la tero, kaj ne malgajigu la koron, antaŭ ol venos por vi la tago de malĝojo.”

—La samo estas kun la homa vivo — daŭrigis Menes. — Plezuro estas kvazaŭ ondoj kaj pintoj de la montoj, suferoj — kvazaŭ profundegaĵoj kaj intermontoj, kaj nur ĉiuj kune kaŭzas, ke la vivo estas bela, ĉar ĝi skulptigas sin kiel la disŝirita orienta montarĉeno, kiun ni rigardas kun admiro.

”Sed tiu, kies koro jam ne batas — kantis la pastro — ne aŭdas la plendojn kaj ne malgajas pro la fremda funebro. Do kun la heliĝinta vizaĝo solenu la gajajn tagojn kaj multobligu ilian nombron ...”

—Ĉu vi aŭdas? — demandis Pentuer montrante en direkton de la vilaĝo. — Tiu, kies koro jam ne batas, ne nur ne malgajas pro la fremda funebro, sed eĉ ne ĝojas pri la propra vivo, kvankam ĝi estus plej bele skulptita ... Kiacele do ekzistas tiuj ĉi skulptaĵoj, por kiuj oni pagas per doloro kaj sangaj larmoj?...

Noktiĝis. Menes volvis sin en la mantelon kaj rediris:

—Kiomfoje komencas vin ataki similaj pensoj, iru en iun ajn nian templon kaj atente rigardu ĝiajn murojn, sur kiuj

amasigis bildoj de homoj, bestoj, arboj, riveroj, steloj — tute kiel la mondo, en kiu ni vivas. Por profano similaj figuroj havas nenian valoron kaj eble ne unu demandadis: por kio ili estas?... Kial oni skulptas ilin kun tia laborstreĉo?... Sed saĝulo respekte alproksimiĝas al tiuj figuroj kaj ĉirkaŭrigardante ilin legas en ili la historion de la longe pasintaj tempoj aŭ misterojn de la saĝo.

FINO

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-118-6